# Durruti en la Labirinto



## MIQUEL AMORÓS

Esperantigis Jesús González

**Biblioteko Mateo Morral**

**Ĝenerala Konfederacio de la Laboro**

AMORÓS, Miquel: *Durruti en el laberinto.*
Unua eldono: aprilon 2007. Eldonejo Muturreko burutazioak.
Dua eldono reviziita kaj ampleksigita: novembron 2014. Eldonejo Virus Editorial.

Esperantigita de Jesús González, 2016

2017 Biblioteko Mateo Morral
Ĝenerala Konfederacio de la Laboro
Urba Federacio de Viladekans'
Sant Marià, 72
ES-08840 Viladecans

# Antaŭparolo

La historio de nia enlanda milito estas plena de demandoj, kies objektiva solvo estas neceso por kiuj luktas kontraŭ la detruo de la historia kono entreprenita de la potenco, ĉar la neniigo de la historia memoro asociita al la proletaro signifus la malaperigon de ĉiu revolucia perspektivo. La figuro de Durruti, kiel personigo de la anarkiisma proleta revolucio de 1936, koncentris multajn el tiuj demandoj, veraj vundoj de la liberecana movado, kiuj por ties propra profito konvenas teni malfermitajn por prifosi ilin. Se ili doloras, estas signo, ke ĝiaj ideoj postvivas. Tiuj ideoj estas senprezaj. Tiuj, kiuj klopodis vendi ilin, nur vendis sin mem. La anarkiismo aŭ estas radikala aŭ estas nenio. Tie lokiĝas la vera ortodokseco. Tamen, en la tempoj de la spektaklo kaj la kulturo de homamasoj, la pasinteco estas kvazaŭ moderna varo, konsumebla kiel ajna alia; kultura objekto por distro atingebla per kolekteblaj kajeroj, lumdiskegoj aŭ televidaj serioj. La bando de historiistoj de la universitato jam ne havas la taskon de falsado aŭ kaŝado de la pasinteco, kiel faradis la stalinistoj, sed ĝia aliigo en spektaklon. La unua paŝo de tiu preparo por la konsumo estis la muzeigo; la dua, la banaligo. Por la universitata bando, la historio estus grandega maŭzoleo el kadavroj, kiujn oni povas disŝiri kaj analizi, kiel oni farus kun la mumioj de Egiptujo. La distanco, kiu nin disigas de ili, devus esti tiel eksterordinara, ke nenion oni devas timi. La kadavrofaka vidpunkto certigas la malproksiman momenton de la forpaso kaj disfaldas gamon de elekteblaj hipotezoj. Tiu «plura» aspekto estas la marko de la varo; en la spektaklo malmulte gravas la moralaĵo. La pasinteco iĝas

ujo de donitaĵoj per kiu oni konstruas ajnan intrigon. Ni tiam povas pasi de la historio al la romano pri privataj kaŝpolicanoj. Oni laboras por la forgeso, sed alie: se la stalinistaj historiistoj antaŭe uzis la estantecon por reskribi la pasintecon, la nuntempaj spertuloj kaj felietonistoj uzas la pasintecon por mistifiki la estantecon. La historio-spektaklo legitimas la superregadon kvazaŭ ĉi tiu ne rilatiĝis kun tiu; enbalzamigante kadavrojn, la povo volas montri sin, kiel la leĝa heredanto de la venkitoj kaj ne kiel la venkinto de la antaŭtago. Kiel bona uzurpanto, ĝi volas, ke oni ne sciu, ke ĝi estas ĵus alveninta, ke ĝia pasinteco estas freŝa, ke ĝi preskaŭ ne havas historion. Ke ĝi estas tie ĉar neniu decidiĝas forĵeti ĝin. Bona ekzemplo estis la «liberecana socialismo», kiun antaŭ jaroj surprize eldiris la tiama prezidanto*. La okulfrapa enmerkatigo de la Enlanda Milito respondas al tuta perdo de la historia senco en la homamasoj, malplenaj, brutigitaj kaj timigitaj. Tamen ĉi tiu perdo ne estas kompleta kaj sekve havas rimedon. La historio ankoraŭ ne apartenas al kiu ĝin manipulas. Durruti nur mortos se triumfas lia mitigo tiel, ke lia reala loko plu restos ne okupata. La vera senco de liaj vivo kaj morto estas bone reflektita en la linioj, kiujn al li dediĉis la verkisto kaj anarkiisto Rodolfo González Pacheco, kiu lin konis en Argentino kaj restadis en Hispanujo dum la revolucia enlanda milito:

> *La anarkiismo antaŭ ĉio estas pozicio: la libera homo. Volante esti tia, li luktadas kontraŭ la medio, reala aŭ transtomba mondo, metafiziko aŭ antaŭjuĝo, kiuj lin neas aŭ subpremas. Lia doktrino, la anarkiisma komunismo, estas senco, ne kliŝo: ekbrilo de lia sango kaj ne sociologia afero nereala. Li estas kaj aktivas en ĝi kaj spertas ĝin, kaj tiu estas lia dramo: ke la impulso de lia vivo, potenca aŭ delikata, esprimante sin per lia*

* Noto el tradukinto: temas pri José Luis Rodríguez Zapatero, tiama ĝenerala sekretario de la Hispana Laborista Socialista Partio kaj poste prezidanto de la hispana registaro.

*agado, povas malkovri, por unuj, la malklarigitan bildon de sanktulo kaj, por aliaj, la implikiĝintan bildon de bandito.*

*Ĉi tiu estas la homo, kiun ankoraŭ ne komprenis la historio, nek antaŭsentis la arto kaj antaŭ kies paŝo kraĉas aŭ al si faras krucojn la stultuloj (la ĵurnalistoj). De li, de lia malluma vojo, kiu, de tempo al tempo, lumigas lian malamon al la tirano aŭ lian amon al la popolo, scias kaj sentas neniu, kiu ne estu alia liberecano. Kiel Reclus, la mildulo, sciis pri Ravachol, la dinamitulo.*

*Kaj ke ili lin ignoras ankaŭ ne gravas. Kaj multe malpli nun, kiam ideoj, sentoj kaj adjektivoj revenas al la instinktoj. Bona aŭ malbona, malnobla aŭ nobla, ili esprimas nenion. La burĝo, per sia cinikeco, hontigis honoron kaj malhonoron. Restis la vortoj; la ŝeloj de pulpo, kiu turnis sin internen, en la radikon de la speco. Pli bone! De tie ili morgaŭ revenos pli bongustaj kaj bonodoraj. Pli esencaj. Por ĉi tio estas ankaŭ la milito per la premitaj dentoj kaj la espero de la triumfo ĝis en la vermoj de niaj mortintoj.*

*Durruti, sanktulo aŭ bandito, ne estas, neniam estis, la reala, nia Durruti. Tio estas karikaturo aŭ legendo: la du barokaj bildoj malantaŭ kiuj ĉiam estis, starigita en sia tragedio aŭ poemo, la batalanta bildo de la anarkiisto. Kaj nur ni vidas kaj perceptas ĉi tiun.*

*Mortis la homo. Antaŭ lia nobla labortago, kiu ne havis pli da salajro ol tiu de lia malamo al la tirano kaj lia amo al la popolo, ni meditu momenton: Kio estis Durruti?... Kolego, kies malplenon oni devas kovri, kiel siatempe li kovris tiun de alia. Priplori lin estus priplori nin. Kaj nun ni estas en la horo ekagi; ke la sango kaj la larmoj renversis internen, en la radikon de la kuraĝo. Marŝ'! Antaŭen!*[1]

1 Rodolfo González Pacheco, «Durruti», *Carteles II*, Editorial Nosotros, Valencio, 1937.

# 1. Zaragozo

La grupo Nosotros —Ascaso, Durruti, García Oliver, Jover, Sanz, Aurelio, Ortiz kaj José Pérez Ibáñez, kromnome ‘el Valencia’— plenumis unuarangan rolon en la reorganizo kaj gvidado de NKL* en Katalunujo de post finoj 1935. Ĝiaj membroj oftiĝis en politikaj amaskunvenoj kontraŭ la mortpuno kaj favore de la amnestio por la enkarcerigitaj laboristoj ekde la momento, kiam oni povis ilin okazigi. Antaŭ la februaraj balotadoj, la grupo tenis taktikan pozicion, kiu konsistis ne fari porsindetenan kampanjon, ĉar tio ĉefa ne estis voĉdoni, sed eliri surstraten ĉe la okazo, ke la dekstrularo klopodus ŝanĝi sian antaŭvideblan malvenkon per ribeligo, kies plej grava kerno estis en la Protektorato de Maroko. Cirkulero de la Nacia Komitato de NKL, datita en Zaragozo la 14-an de februaro 1936, avertis pri la proksima militista ŝtatrenverso kaj konsilis, «ke tie, kie aperos la legianoj de la tiranio per armita ribelo, senhezite atingu interkonsenton kun la kontraŭfaŝismaj sektoroj energie zorgante, ke la defenda kontribuo de la homamasoj sekvu vojojn de vera socia revolucio sub la protektado de la Liberecana Komunismo». Por la tiama N. K. evidentis ke, se oni deklarus la militon, la respublika burĝa demokratio pereus kaptita inter du fajroj, tiu de la proletaro kaj tiu de la reakcio:

> *Aŭ faŝismo aŭ socia revolucio. Venki tiun estas devigo de la tuta proletaro kaj de la amantoj de la libero, per la armiloj enmane; ke la revolucio estu socia kaj liberecana devas esti la plej profunda zorgo de la konfederaciistoj. De nia inteligenteco, unuiĝo de penso kaj agado dependas, ke ni estos la plej respektindaj inspirantoj de la homamasoj kaj, ke*

* NeT: Nacia Konfederacio de la Laboro, anarkiisma sindikato.Vidu: https://eo.wikipedia.org/wiki/Confederaci%C3%B3n_Nacional_del_Trabajo

*ĉi tiuj ekpraktikos manierojn de societemo, kiuj kombiniĝos kun la spirito de la liberecanaj ideoj kaj estos la nekonkerebla barilo kontraŭ la aŭtoritatema instinkto de blankuloj kaj ruĝuloj*[2].

Sur la tribuno la anarkisindikatistaj oratoroj foje kaj refoje indikis al la laboristaj amasoj, ke ili voĉdonos se volus sed la solvo al ilia bedaŭrinda stato devenos de neniu Parlamento, sed de ilia surstrate propra unuiĝa agado, kiu detruos la kapitalisman socion. Laŭ rakontas García Oliver, por kiu voĉdoni malobservis neniun principon, Durruti favoris alvoki la sindetenon sed Ascaso, pli bone harmoniigita kun la pozicio de la N. K., ŝanĝigis al li liajn ideojn. La formulo, kiun li uzis estis la sekva: «Ni staras antaŭ la revolucio aŭ la enlanda milito. La laboristo, kiu voĉdonos kaj trankvile restos hejme, estos kontraŭrevoluciulo. Kaj la laboristo, kiu ne voĉdonos kaj ankaŭ restos en sia domo, estos alia kontraŭrevoluciulo».[3] Venkis la Popola Fronto kaj Buenaventura Durruti eĉ kuraĝis diri en la politika amaskunveno de la teatro Price de unuaj de marto, ke la triumfo de la maldekstrularo estis danke al la antaŭmalhelpa prigardo de NKL, kio ĝenis iujn anarkiistojn: «La vortoj de Durruti ŝajnas indiki, ke la Organizo de Katalunujo tiutempe iĝis ŝildisto de la kataluna Esquerra[*]»[4]. Tio, kio maltrankviligis la ortodoksan malplimulton ne estis la progreso de la sindikata reformismo sed la «tendenco al la bolŝevikismo», t. e., la kreskanta influo de Nosotros kaj ĉefe de García Oliver, kiu, en parolado efektivigita en la Sindikato pri la Ligno, sin

2 Reproduktita en *Esfuerzo. Revista de divulgación sociológica,* Montevideo, n-roj 8 kaj 9, aŭguston kaj septembron 1936.

3 A. G. Gilabert*, Un héroe del pueblo. Durruti (*hispane*,* Heroo de la popolo, Durruti*),* Ediciones CGT, Valparaíso (Ĉilio), 1938.

* NeT: katalune, *Esquerra Republicana de Catalunya (ERC)* - Respublika Maldekstro de Katalunujo (RMK). Vidu: https://eo.wikipedia.org/wiki/Esquerra_Republicana_de_Catalunya

4 *Más Lejos,* n-ro 8, 28-an de majo 1936. Direktita de Eusebio Carbó.

proklamis favore al la preno de la povo kaj la praktikado de regado. La afero devenis de antaŭe; jam kiam la grupo nomiĝis «Los Solidarios»*, Alfonso Miguel, unu el ĝiaj membroj, publikigis broŝuron, en kiu sen ĉirkaŭiroj parolis pri «la diktatorado de NKL», la anstataŭigo de la homamasoj per «specife revolucia organizo» kaj la «revolucia armeo»[5]. De la paĝoj de *Más Lejos*, la puritanaj anarkiistoj volis debati la aferon sendante enketon, kiu konsistis el du demandoj pri la sindeteno kaj tria, kiu tekstis:

> *Ĉu povas la anarkiistoj, pro tiaj aŭ kiaj cirkonstancoj, kaj superante ĉiujn skrupulojn, esti pretaj por la preno kaj la transira praktikado de la Potenco, kiu ajn el ĝiaj formoj, kiel rimedo rapidigi la ritmon de ilia progreso al la realigo de la Anarkio?*[6]

La debato, antaŭtage de la Kongreso de Zaragozo, estis tre oportuna, ĉefe kiam García Oliver kaj Durruti kontraŭis sin en la Teksa kaj Fabrika Sindikato disputante pri la punkto «defendo de la revolucio». Oliver defendis la fondon de milita organizo, dum Durruti defendis la kreon de geriloj. Ĉi tiu opiniis, ke la ekzemplo de la Ruĝa Armeo tute pruvis la facilecon per kiu la organizoj iĝas potenco apartigitaj de siaj iniciatintoj; per la preteksto venki la militon, ili finus, kiel la bolŝevika partio, forigante la revolucion. Durruti perdis la debaton kaj liaj kolegoj prezentis en Zaragozo, nome de la Teksa kaj Fabrika Sindikato de Barcelono, proponon pri la revolucia armeo, kiu saltigis el la seĝo pli ol unu kaj kaŭzis la abruptan eldiron de Mera: «Ke al ni diru la kolego García Oliver de kiu koloro li volas la galonojn!». La malmultaj respondoj, escepte de

---

* NeT: armita grupo konsistigita de anarkiistoj (Durruti, García Oliver, Ascaso, ktp) kreita por alfronti la registaran subpremadon kontraŭ la anarkisindikatismo en Barcelono dum la 1920-a jardeko.

5 Alfonso Miguel, *Todo el poder a los sindicatos* (hispane, La tuta povo por la sindikatoj), Editorial Realidades Revolucionarias, Barcelono, 1932. Miguel ne volis partopreni en Nosotros pro malkonsentoj kun Durruti, laŭ García Oliver.

6 *Más Lejos*, n-ro 1, 9-an de aprilo 1936.

Berneri, estis senkuraĝigaj: antaŭ realaj problemoj, la demanditoj —ekzemple, Federica Montseny aŭ Fontaura— respondis per kliŝoj pri la anarĥia ideologio. La praktikaj problemoj de la hispana revolucio ŝajne maltrankviligis preskaŭ neniun kaj tial la membroj de Nosotros, kiuj partoprenadis en politikaj amaskunvenoj pri «ideologia gvidado», gajnis influon en NKL kaj IAF*, fronte al la reformisma miksaĵo de dogmemaj anarkiistoj kaj sindikataj burokratoj, kiu estris la organizon. Antaŭ antaŭvidebla ŝtatrenverso fare de la reakciaj fortoj balotade venkitaj en februaro, estis la grupo Nosotros, kiu pli strebis proponi revolucian respondon —kaj akiri armilojn—, sed je la momento alfronti la eblajn okazontajn konsekvencojn —ekzemple la praktikado de la povo—, ne ĉiuj interkonsentis.

La afero pri la povo povintus disigi Durruti-on el García Oliver kaj la aliaj, sed la perado de Ascaso kaj la apogo al la grupo de la barcelona kaj kataluna proletaro evitis tion. Oni ne povis mistrakti la esperojn kreitajn inter la laboristoj pro ilia propra agitado. Estis aliaj aferoj, kiuj ilin malproksimigis, kiel la rifuzo de García Oliver partopreni en la ribelo de decembro 1933** kaj la rolo de fajrestingisto, kiun de tiam li prenis sur sin. La rivaleco ekzistis. Memoras Federica Montseny, ke

> *... la distingiteco de Durruti, lia granda kaj forta voĉo, lia parolado senartifika kaj ĉies atingebla, donis al li grandan altiron inter la homamasoj. García Oliver estis konvinkita, ke li lin superis, sed la kolegoj kaj ĝenerale la popolo pli estimis*

---

* NeT: Iberia Anarkiisma Federacio. Vidu: https://eo.wikipedia.org/wiki/Iberia_Anarkiisma _Federacio

** NeT: ankaŭ nomita de la NKL-istoj Revolucio de decembro 1933, estis revolucia ĝenerala striko akompanita de la agado de armitaj volontarmeoj, kiu havis sian kernon en la urbo de Zaragozo kaj ĝenerale en Aragono kaj Rioĥo kaj pretendis plenumi la libecerenan komunismon kaj etendiĝis tra lokoj de Ekstremaduro, Andaluzujo, Katalunujo kaj la mina baseno de Leono.

*Durruti-on, instinkte antaŭsentante la bonecon de lia koro kaj la honestecon de lia karaktero[7].*

García Oliver riproĉis al Durruti lian korinklinon al la laboristaj amasoj, lia emo komuniki sin kun ili kaj diri al ili, kion ili volis aŭdi anstataŭ venigi ilin al sia tereno. Tio havis klarigon. Teksto verŝajne skribita de la plumo de Alaiz alportas argumentojn:

*Nenio faris lin malantaŭeniri. Li estis la senartifikeco mem. Li havis talenton, kiu faris heziti ne malmultajn kaj al kiu oni atribuis preskaŭ miraklajn virtojn de kaptado. Ne estis tiaj mirakloj. Tio esenca de lia karaktero estis, ke li volis per tuta kaj sincera volo esti ĉies atingebla, ĉiam kore bonveniga al kolegoj kaj proksimuloj. Ne estis miraklo sed sentema scivolemo, frata aspirado, deziro de ekscitaj tagoj kaj verkoj.[8]*

La impreso de Eleuterio Roig, unu el la fondintoj de la Grupigo *Los Amigos de Durruti*, kiu estos granda paroltemo de post majo 1937, povas kompletigi la portreton:

*Ĉiuj memoras lian viglan kaj pikan esprimon. Lia voĉo kaj gesto altrudis respekton al liaj malamikoj. Kontraŭ li neniu kuraĝis. Li neniam malkuraĝis antaŭ io aŭ iu. La tono de lia voĉo estis ĉiam la sama, vigla, defia, mordanta. Durruti estis timita de siaj malamikoj kaj —kial ne diri ĝin— idoligita de la popolo. Ĉi tiu sentis sin tiel sekura kaj fidplena sub lia ombro, ke kun li ĝi kapablis entrepreni la plej malfacilajn kaj riskajn entreprenojn. Ĝi grupiĝis ĉirkaŭ li kaj sekvis lin, memcerta pri la venko. Kaj unu el la ĉefaj faktoroj de la influo, kiun li havis sur la homamasoj, nedubeble, estis la kuraĝo kaj firmeco, kiun li donis al sia lingvaĵo, kiam ilin parolis.[9]*

García Oliver, pli prudenta pri la kuraĝo kaj pli kompromisema al la ideoj kaj la postenoj, malfidis la

7 Federica Montseny, *Mis primeros cuarenta años* (hispane, Miaj unuaj kvardek jaroj), Plaza y Janés, Barcelono, 1987.

8 *Acracia*, ĉiutaga organo de NKL kaj IAF de Ilerdo, 22-an de novembro 1936.

9 Eleuterio Roig, «Ni parolu firme», *El Amigo del Pueblo*, n-ro 2, 26-an de majo 1937. Aliaj fondintoj menciitaj en ĉi tiu libro estis Pablo Ruiz, Francisco Carreño, Progreso Ródenas kaj Jaime Balius.

homamasojn: «mi ĉiam kredis, ke estas la malplimultoj, kiuj indikas la sekvendan vojon al la plimultoj»[10]. Li traktis kun politikistoj, kiam kredis tion necesa, plurokaze kun la katalunistoj, aŭ eĉ kun Lerroux en 1934. Li regis sian lingvaĵon kaj ne sentis sin malkomforta kun ili. Kiam li estis konata en la oficejoj kaj kunvenejoj, liaj pli laŭdindaj virtoj estis la organiza kapablo elde la oficejoj, la elokventa uzado de la politikaj kliŝoj kaj la talento de komando, kiu estas la tipaj de perfekta burokrato.

Kiel atendeblis, la Registaro de la Popola Fronto ne efektivigis sian programon pri reformoj, parte pro propra sentaŭgeco kaj parte pro forta kontraŭstaro de la burĝaro. La ombro de la kazerna klerika konspiro refariĝis videbla kaj la 27-an de junio la Nacia Komitato de NKL dissendis de Madrido manifeston «Al la hispana popolo. Al la Konfederaciistoj ĝenerale», defendante, konsente kun tio akordigita en la Eksterordinara Kongreso de Zaragozo, la Revolucian Sindikatan Interligon kun ĜUL[*] por venki la faŝismon kaj nuligi la kapitalismon. Ĝi finis tiel:

> *Super kiom da kvazaŭdemokratiaj ornamaĵoj oni volas fari, la nerefutebla vero estas, ke tra la arterioj de la hispana vivo kuras laŭ kontraŭa direkto du fluoj de arda lafo. Unu reprezentas la krimon, la nigran nokton de la historio, unuvorte la brutalan kaj malhumanan faŝismon. La alia, la nia, la via, laboristoj sen pano kaj konsolo, estas kiu devas liberigi nin, se ni kuraĝe alprenas la armilojn, el la malameginda sklaveco de la salajro kaj la ŝtato. Vivu la revolucia agado de ĉiuj laboristoj!*
>
> *Vivu NKL! Vivu la Liberecana Komunismo!*[11]

---

10 Fondaĵo Salvador Seguí, *Colección de Historia Oral. Juan García Oliver* (hispane, Kolekto de parola historio. Juan García Oliver), Madrido, 1990. Finfine, la revoluciaj anarkiistoj konsideris 'García Oliver'-on, kiel perfidulon, kaj la aliaj, kiel aŭtoritateman sinadoranton, trajtoj, kiuj ŝajne devas akompani ĉiun modernan anarkiiston, kiel deziras certa artefarita ortodokseco.

* NeT: Ĝenerala Unuiĝo de Laboristoj, socialista sindikato. Vidu: https://eo.wikipedia.org/ wiki/UGT

11 *Esfuerzo. Revista de divulgación sociológica*, citita verko.

La manifesto lasis duonvidi komunan fakton en la konfederaciaj medioj: de antaŭ monatoj la aktivuloj preparadiĝis, organizante grupojn pri defendo kaj kolektante armilojn. Pli-malpli je tiuj datoj, en Katalunujo la Komitato por Konfederacia Defendo, direktita de la grupo Nosotros, kontaktis kun kontraŭfaŝismaj militistoj, kiel la kapitano de aerarmeo Servando Meana, estro de la Servoj pri Informo kaj Interrilato pri Publika Ordo. Dum la monato de julio, ĉi tiu ĉiutage renkontiĝis en la Sindikato pri la Ledo kun Durruti, García Oliver, Ascaso kaj José Asens, sekretario de la Urba Federacio de Sindikatoj de NKL. Meana informis pri la kunvenoj de konspirantaj estroj en la kazernoj tiel, kiel pri la partopreno de la Falango en la ŝtatrenverso. Oni diskutis pri la konveneco, ke la Grupoj pri Defendo prigardis la kazernojn por neebligi la eniron de falangistoj. La ĉefa problemo estis, ke la laboristoj ne havis armilojn nek sufiĉajn municiojn por multo da tempo subteni la lukton. Por klopodi mildigi tion, Meana promesis la liveradon al NKL de la armiloj, kiuj estis en la ejo de la Civila Registaro. La 15-an de julio okazis kunveno en domo de la komisiito de la rubejo de El Prat de Llobregat, al kiu ankaŭ ĉeestis la militistoj Ponce de León, Díaz Sandino kaj Ramón Franco, la aviadisto. Oni jam sciis tion, kio okazis en Maroko kaj oni parolis pri preparoj. La 16-an matene, Companys petis intervidiĝon kun la respondeculoj de NKL. Por tio, estis kreita Komisiono por Interrilato konsistigita de Santillán, García Oliver, Ascaso, Durruti kaj Asens, kiu prezentiĝis en la Palaco de la Generalitat[*] kaj komencis malfacilajn intertraktadojn. La Komisiono petis mil fusilojn por la kadrularoj pri defendo kaj la prezidanto ne konsentis ĝis la fino[12]. Dume, samtage, la grupoj de la kvartalo Barceloneta, apartenantaj al la Sindikato pri la Mara Transporto,

* NeT: nomo en la kataluna de la aŭtonoma Registaro de Katalunujo.

12 Diego Abad de Santillán, *La revolución y la guerra de España* (hispane, La revolucio kaj la milito de Hispanujo), Ediciones Nervio, Bonaero, 1937.

kunvenigitaj de alvoko fare de Juan Yagüe, propra-vole kuratakis la ŝipon Manuel Arnús, elportante proksimume cent kvindek fusilojn, kiuj estis tie stokitaj. Tien, sendita de la kolonelo de la CivilGvardio Escofet, nome de la kataluna registaro, iris la Respublika Gvardio*, por repreni ilin. Laŭ iu atestanto, Durruti, kiu ankaŭ ĉeestis, diris al Vicente Pérez, kromnome Combina, de la Sindikato pri Transporto: «Serĉu al mi kamioneton!». Kaj ĉi tiu «ekserĉis unu el ĉi tiuj, kiuj faras transporton de lakto, enmetis ĝin, ili ŝarĝis la fusilojn, li eliris, oni donis al la kataluna registaro kvar aŭ ses kaj ĉion ceteran alproprigis la organizo»[13]. Jam estis la 18-an de julio kaj la aktiveco de Durruti, García Oliver kaj Ascaso estis freneza: de la Regiona Komitatejo al la Sindikatejo pri Konstruo, de la ejo de la Kvartala Federacio de Sindikatoj de Sants al la domo de la sindikatoj de Sant Andreu. En ĉiuj sindikatejoj la laboristoj petis armilojn. Durruti, García Oliver kaj Asens prezentiĝis en la sidejo de la Civila Registaro serĉante ilin, sed la konsilisto pri Internaj Aferoj de la kataluna registaro, José María España kaj la kolonelo Escobar, ĝenerala komisaro pri Publika Ordo, nome de Companys rifuzis transdoni ilin al ili. Durruti diris al ĉeestantoj antaŭ eliri batfermante la pordon: «Ni luktos per la armiloj, kiujn ni posedas, sed bone memoru, ke se la okazo prezentiĝas, antaŭ ol esti venkitaj ni venos ĉi tien kaj vi estos niaj lastaj viktimoj». El la koridoro aperis Meana kaj prenis sur sin la respondecon havigi armilojn al NKL. Ili supreniris kun fasko de ŝlosiloj al la ĉambroj de la teraso kaj, kiel la ŝlosiloj ne eniris en la serurojn, Durruti, senpacienca, rompis la pordojn per batoj. Ili trovis skatolojn kun fusiloj kaj elportis ilin malsupren, sur la korton, ŝarĝante

* NeT: hispana polica organo, kreita dum la Dua Respubliko cele disponi policaron por la subteno de la publika ordo, kiu estu tute fidela al la respublika reĝimo; hispane, Guardia de Asalto.

13 Intervjuo de Hans Magnus Enzensberger kun Eugenio Valdenebro, por *El corto verano de la anarquía* (hispane, La mallonga somero de la anarkio), en la paperoj de Helmut Rüdiger, IISH (NeT: Internacia Instituto pri Sociala Historio), Amsterdamo.

ilin en du aŭtojn. Ili faris kvar vojaĝojn al la Sindikatejo pri la Konstruo, sur la strato Mercaders, kaj ekarmis la kolegojn[14]. Ankaŭ Meana, en sia oficejo en Internaj Aferoj, subskribis ordonojn pri konfisko de la armovendejoj por García Oliver kaj ordonis se necese bombadi la ribelajn trupojn lokitaj en la flughaveno de El Prat. Je la tria matene de la 19-a, kamiono kun mallongaj kaj longaj armiloj devenantaj de la ŝipo Juan Sebastián Elcano haltis antaŭ la pordoj de la Sindikatejo pri Transportoj, en la aleo de Santa Mónica. Durruti ekdisdonis ilin. Anekdote, hazarde pasis preter tie la deputito de RMK Josep Antoni Trabal, kiu surprizita de la nekutima movado de taksioj, kiun li observis en la Ramblas, demandis lin; Durruti al li respondis, ke «ne maltrankviliĝu, ke estis eksplodinta faŝisma movado kaj ili estis pretaj batali kontraŭ ĝi»[15]. Ankoraŭ en la Palaco, je la 5a matene, Durruti serĉis pistolojn. Ĉe la pordo, amaso de laboristoj kreis streĉitecon kun la respublikaj gvardiistoj, kiuj gardis la enirejon. Durruti estis devigita aperi sur la balkono por trankviligi la situacion kaj tiam okazis kunfratiĝo inter laboristoj kaj gvardiistoj, transdonante ĉi tiuj siajn pistolojn. Durruti kaj la aliaj, escepte Santillán, profitis la okazaĵon por forlasi la Palacon. Tiumomente la ribelaj trupoj estis pretaj eliri sur la straton. NKL deklaris la revolucian ĝeneralan strikon.

La Konfederacia Komitato por Defendo, lokita sur la placo de Arco del Teatro, kunordigis multajn grupojn. Aliaj, kiel tiuj de la Barceloneta, propra-vole agadis. Oni ne povis neebligi la eliron de trupoj el la kazerno de Artilerio, sed ja oni sukcesis reteni tiujn de la kazerno de la avenuo Icaria, ankaŭ evitante, ke la soldatoj, kiuj marŝis sur la strato Paralelo kontaktiĝis kun tiuj de la kazerno de Atarazanas.

14 José Asens, *Del sindicato al Comité de Milicias* (De la sindikato al la Komitato pri la Volontarmeoj), neeldonitaj memoraĵoj havigitaj de Phil Casoar.

15 «La Movado en Barcelono», *El Sol,* Sendependa Ĵurnalo, Madrido, 21-an de julio 1936.

Tion plenumis Ascaso, García Oliver, Ortiz, Jover kaj ‘el Valencia’, akompanitaj de multnombraj proletoj. Durruti, Aurelio kaj Sanz, kun la kadrularoj pri defendo de la centro de Barcelono, klopodis haltigi la soldatojn en la Ramblas, luktante en la placo Universitat kaj en tiu de Catalunya, kie ili kuratakis la konstruaĵon de la Telefónica. En ĉiuj ŝlosilaj lokoj, la NKL-aj laboristoj levis barikadojn kaj sukcese atakadis la ribelan trupon. Noktomeze, Durruti, tute laca, aperis en la plej proksima sidejo de la LPMU*, ĉe la haveno, por ripozi malmultajn horojn. La cikatroj de lia ĵusa operacio de hernio doloris lin. Baldaŭ li estis en Arco del Teatro por plani la lastajn movadojn. La 20-an matene la soldatoj ŝirmitaj en la monaĥejo de la Carmelitas kaj en la kazerno de la Militista Registaro kapitulacis. Per la kuratako al la militaj oficejoj kaj la kazerno de Atarazanas, kie mortis Francisco Ascaso, finiĝis la batalo de Barcelono. Post konkeri la kazernon, Durruti kaj García Oliver piediris sur la Ramblas. Samtempe, la kazerno de Sant Andreu estis prenita de laborista amaso kaj ĝiaj deponejoj de armiloj disdonitaj inter la atakantoj, dum la laboristoj de Sants kaj Hospitalet prepariĝis por fari tion saman en la kazerno de Pedralbes.

Tiel, kiel disvolviĝis la okazaĵoj, kun Barcelono en manoj de la proletaro, la ordo sur la strato jam nur povus esti restarigita per politika interkonsento de la katalunaj institucioj kun NKL kaj IAF. Tial, apenaŭ finitaj la stratoj bataloj, el la Generalitat eliris mesaĝistoj serĉante Durruti-on. Jordi Arquer renkontis lin en la Ramblas kaj al li komunikis la peton. Se ni konsideras la ateston de José del Barrio, stalinista kaj ĝenerala sekretario de la kataluna ĜUL, li kaj Sesé estis la unuaj, kiuj parolis kun Durruti kaj García Oliver la 20-an tagmeze. Ili al ili proponis la tujan starigon

* NeT: Laborista Partio de Marksisma Unuiĝo, trockiisma. Vidu: https://eo.wikipedia.org/wiki/POUM

de Centra Komitato pri la Volontarmeoj, kion Durruti «proksimume» aprobis kaj García Oliver «absolute kaj komplete» malakceptis. Ĉi tiu asertis, ke la kontribuo de la partioj kaj policaj fortoj al la malvenko de la ribeluloj estis minimuma kaj, ke «NKL sufiĉis por daŭre impulsi kaj direkti la lukton ĝis ĝiaj lastaj revoluciaj konsekvencoj». Tamen, ili interkonsentis, ke delegitaroj de ĜUL kaj NKL ĝisfunde diskutos la aferon tiunokte[16]. Post tiu mallonga interparolo, Durruti prezentiĝis en la Palaco de la Generalitat akompanita de Ricardo Sanz kaj García Oliver, kaj la prezidanto Companys rekonis ilian venkon kaj senkondiĉe metis sin je ilia dispono. La parolado de Companys tute surprizis ilin ĉar ili ĉi-rilate havis nenian preparitan pozicion. Ili ne volis trakti la kernon de la afero, respondante, ke fidis lin kaj, ke esperis, ke li daŭrigu en la posteno, tamen la decido apartenis al la Organizo[17]. Sendube estis ĉefverko de la politika parolarto, per kiu laŭ konvinka maniero la katalunisma burĝaro metis sin je la servo de la proletaro, ĉar García Oliver restis impresita. Kiel li mem memoris jaron poste:

> *Tiumomente, Companys parolis per evidenta sincereco. Homo konformiĝema, kaj pli ol konformiĝema, realisma, kiu profunde vivis la tragedion de sia popolo savita el la plurjarcenta sklaveco fare de la anarkiista penado, uzis la lingvaĵon, kiu postulis la cirkonstancojn kaj agis laŭ la malfacilegaj postuloj de ili, per ununura gesto de digno kaj kompreno, je kiuj tiom mankaj estis la hispanaj politikistoj. Companys, ne havante timon al la Revolucio, logike pensante, ke la Revolucio mem atingus ampleksi tion eblan kaj neeblan de la cirkonstancoj, farus penadon por lokiĝi digne, kiel kataluno, kiu komprenis, ke estis alveninta la granda momento por lia lando, kaj kiel*

16 José del Barrio, *Memorias políticas y militares* (hispane, Politikaj kaj militistaj memoraĵoj), Pasado y Presente, Barcelono, 2013.

17 Atestoj de Jordi Arquer kaj Ricardo Sanz kolektitaj de Ronald Fraser, *Recuérdalo tú y recuérdalo a otros. Historia oral de la guerra civil española*, (hispane, Memoru tion kaj memorigu tion al aliuloj. Parola historio pri la hispana enlanda milito) Editorial Crítica, Barcelono, 1979.

*homo de tre progresa liberala penso, kiu ne timis la plej aŭdacajn realigojn de socia tipo ĉiam, kiam ĉi tiuj estis bazitaj sur la viva realo de la ebloj.*[18]

La posttagmezon de la 20-a de julio, la prezidanto Companys, la persono de la kora konsento inter la proleta revolucio kaj la institucioj, kiujn ĉi tiu devis neniigi, modelo de la postvivado de la profesia politikisto sub ekstremaj kondiĉoj, telefonis la sidejon de la Regiona Komitato de NKL, en la ejo de la Sindikato pri la Konstruo de la strato Mercaders. Komisiono konsistigita de Asens, el la Regiona Komitato; Aurelio Fernández, Durruti kaj García Oliver, el la Komitato por Defendo; kaj Abad de Santillán, el la Duoninsula Komitato de IAF iris al la Generalitat. Companys, sen sufiĉaj armeaj fortoj, sugestis al NKL la fondon de institucio komisiita gvidi la politikan vivon kaj prepari civitanajn volontarmeojn kaj konsistigita de ĉiuj kontraŭfaŝismaj partioj kaj organizoj, kies reprezentantoj atendis en apuda salono. Laŭ Asens, la komisionanoj respondis, ke «komence ni konsentas la kreon de Komitato pri la Volontarmeoj; tamen ni devas konsulti la aliĝantaron de la Konfederacia Organizo. Ni akceptas la fondon de la komitato kondiĉe, ke ĉi tiu havu la tutan respondecon pri la direkto de la lukto»[19]. Ili revenis al la sidejo de la Regiona Komitato por informi ĝin pri ilia klopodo kaj malmulte poste NKL okazigis Regionan Delegitkunvenon en la ĵus konfiskita Domo Cambó «por preni interkonsentojn pri la progreso kaj gvidado de la movado kontraŭ la faŝismo», en kiu oni akceptis la sugeston[20]. Ankoraŭ oni ne disponis sufiĉan

18 García Oliver en la unua oficiala studaĵo pri la verko de NKL, *De julio a julio* (hispane, De julio al julio), Ediciones Fragua Social, Valencio, julio 1937.

19 Asens, citita verko.

20 La Delegitkunveno estis anoncita en la eksterordinara kaj senpaga numero de *Solidaridad Obrera* de la 21-a de julio, farita kiel la antaŭa preskaŭ komplete de Alejandro Gilabert kaj Jaime Balius. Same, Mariano R. Vázquez (kromnome Marianet), Sekretario de la Regiona Komitato de la Regiona Konfederacio de la Laboro (RKL) de Katalunujo, asertas tion en sia retrospekta artikolo en la kompilaĵo *De julio a julio* (hispane, De julio al julio). Ortiz ankaŭ mencias la Delegitkunvenon de

informon por tute kompreni la cirkonstancojn kaj neniu parolis pri la preno de la povo. García Oliver mem perfekte klarigis la signifon de tiu paŝo:

> *NKL kaj IAF decidiĝis al la kunlaborado kaj la demokratio, rezignante la revolucian diktatoradon, kiu kaŭzus la strangoladon de la Revolucio fare de la konfederacia kaj anarkiista diktatorado. Ili fidis la parolon kaj personon de kataluna demokrato kaj apogis kaj subtenis Companys-on, kiel prezidanton de la kataluna registaro; akceptis la Komitaton pri la Volontarmeoj kaj starigis reprezentan proporciecon de fortoj por konsisti ĝin, kio, kvankam ne estis justa —oni atribuis al ĜUL kaj la Socialista Partio, malplimultaj en Katalunujo, la saman numeron de postenoj, ke al la venkintaj NKL kaj Anarkiismo— reale estis ofero cele konduki la diktatorajn partiojn sur la vojo de lojala kunlaborado, kiu ne povos esti ĝenota de memmortigaj konkuroj.*[21]

Ĉirkaŭ la naŭa horo nokte Durruti kaj García Oliver (Ascaso ĵus mortis) prezentiĝis en la Navigacia Lernejo por kunveni kun la estroj de ĜUL, akompanitaj de Pérez Farrás, militista asistanto de Companys, kaj de José María España, konsilisto pri Internaj Aferoj de la kataluna registaro. NKL inklinis al la Centra Komitato pri Kontraŭfaŝismaj Volontarmeoj, sed estis malkonsentoj koncerne al la ĜUL-a propono ordoni la estrojn, oficirojn kaj soldatojn, ke ili restos en la kazernoj je dispono de la Komitato. Komence Durruti kaj Oliver estis favoraj malplenigi la kazernojn kaj konfiski la armilojn por armi la volontarmeajn kolonojn, sed je la tagiĝo ili atingis kompromisan solvon: dum la sekva mateno, Durruti kaj Pérez Farrás trairos la kazernojn animante la lojalajn militistojn por ke ili aliĝu al la lukto, sed ankaŭ donante al ili la eblon foriri hejmen.

---

la 20-a en la intervjuo, kiun al li faris Juan Campá, la 5-an de junio 1995.

21 J. García Oliver, «La Centra Komitato pri la Kontraŭfaŝismaj Volontarmeoj», *Solidaridad Obrera*, 19-an de julio 1937. Preskaŭ ĉiuj aŭtoroj konfuzas la Delegitkunvenon de la 20-a kun tiu de la 23-a. Abel Paz, ekz-e.

La sekvan tagon, 21-an de julio, fondiĝis la Centra Komitato pri Kontraŭfaŝismaj Volontarmeoj kaj en tiu preciza momento la kontraŭrevolucio montris la kapon, ĉar estis kreita USPK el la fandado de KPH, HLSP, SUC kaj KPP*. La Kominterno kontraŭis tian unuiĝon, sed laŭ informis ĝiaj agentoj Luis (Codovila) kaj Díaz: «La kamaradoj diras, ke ili tion faris, kiel simbolan agon, por ke estu pli efika la armita lukto kontraŭ la faŝismo, prezenti solidan fronton kontraŭ la konduto de la anarkiistoj kaj, ankaŭ, doni fortan baton al la trockiistoj»[22].

Ĵus sidiĝinte Durruti en la salono de la Navigacia Klubo, kie okazis la kunvenoj de la Komitato pri la Volontarmeoj, devis toleri la malagrablan ĉeeston de Vidiella kaj Miravitlles, du profesiaj politikistoj, kiuj jam antaŭe elmontris sian nefidindan mienon malnoble kalumniante IAF-on. Kaj krome Companys aperadis donante konsilojn, kvazaŭ ili estis novuloj. Kiam ĉi tiu eniris, la delegitoj de RMK stariĝis pro konsidero al li kaj la aliaj kontraŭvole ilin imitis, escepte la anarkiistoj, kiuj restis sidantaj. Samtage la prezidanto enoficigis estron de la katalunaj volontarmeoj al la majoro Enrique Pérez Farrás (oficiro, malnova estro de la Mossos d'Esquadra**), starigis volontarmean komitaton por interligo kaj klopodis koncentri en Barcelono la solan organon de publika ordo ankoraŭ aganta, la Civilgvardio, per la preteksto, ke la restado de malgrandaj trupunuoj en la vilaĝoj ne estis sekura. Neniu el tiuj proponoj akceptiĝis. Durruti, divenante la intencojn, kiuj kaŝiĝis malantaŭ tiaj agoj, alparolante Miravitlles-on kaj Tarradellas-on eldiris iujn

* NeT: USPK, Unuiĝinta Socialista Partio de Katalunujo; KPH, Komunista Partio de Hispanujo; HLSP, Hispana Laborista Socialista Partio; SUC, Socialista Unuiĝo de Katalunujo; KPP, Kataluna Proleta Partio.

22 Letero al Mayor kaj Dio (Stalino), 30-an de julio 1936, en Ronald Radosh, Mary R. Habeck kaj Grigory Sevostianov, *España traicionada. Stalin y la guerra civil* (hispane, Hispanujo perfidita. Stalino kaj la enlanda milito), Planeta, Barcelono, 2002.

** NeT: polico de la kataluna registaro. Vidu: https://eo.wikipedia.org/wiki/Mossos_d%27Esquadra

zorgigajn vortojn: «Diru al Companys, ke se li denove aperas ĉi tie, mi lin plenigos per kugloj»[23].

Oni konspiris ekde la 21-a mem kontraŭ la povo konkerita de NKL, sed laŭ la tiumomenta korelativeco de fortoj, neniu kuraĝis tro konkretigi la atribuojn de la Komitato pri la Volontarmeoj, kiu prenis sur sin ĉiujn[24]. La direkto de la milito falis sub respondecon de García Oliver kaj tiu de volontarmeoj, sub tiu de Abad de Santillán. Al Durruti oni asignis la komandon de la Departemento pri Transportoj kaj al Aurelio Fernández kaj Asens tiun pri Sekureco. Durruti tuj volis eliri el tiu burokrata kaptilo kaj apenaŭ prezentiĝis Ángel Estivill (socialista kaj fondinto de USPK) informante pri la danĝero de ebla faŝisma atako devenanta de Aragono, li proponis sin por estri la unuan kolonon. Pérez Farrás, majoro de artilerio, estis enoficigita lia militista teknika asistanto. Al Companys tio ŝajnis bonega ideo.

Zaragozo estis la dua anarkiisma ĉefurbo kaj ĝia falo en manoj de la ribelaj militistoj signifis bategon al la ebloj de liberecana revolucio. La civila respublika guberniestro neadis armi la laboristojn, sed ĉi tiuj, anstataŭ amasigi armilojn kaj organizi la kuratakon al la kazernoj, fidis ĉion je la intertraktadoj. La 19-an de julio malmultaj soldatoj de la armeo okupis Zaragozon kaj proklamis la militstaton. La laboristoj respondis per la ĝenerala striko kaj retiriĝis en siajn kvartalojn. Ili fidis je sia kvanto kaj la kontaktoj de Miguel Abós kun la aŭtoritatoj kaj ne prepariĝis por la batalo, kiel defendis Miguel Chueca. La 20-an la Civilgvardio kaj la Respublika Gvardio aliĝis al la ribelo kaj,

23 Atesto de Miravitlles, en Fraser, citita verko.

24 Pons, respondeculo de RMK en la Departemento pri la Volontarmeoj (aŭ Komitato pri la Volontarmeoj), akuzis Vidiella-on transdoni pro malforteco al Aurelio Fernández la estradon de la Publika Ordo, kaj Miravitlles-on permesi pro la sama kialo al «la homoj de IAF» fari ĉion, kion ili volis en ĉiuj departementoj. Joan Pons Garlandí, *Un republicà enmig de faistes* (katalune, Respublikano meze de IAF-istoj), Edicions 62, Barcelono, 2008.

kiel rekta konsekvenco, la povo ŝanĝiĝis al aliaj manoj. Per 2.500 soldatoj —al kiuj aldoniĝis 2.000 requetés[*] de Pamplona trejnitaj en Italujo—, la generalo Cabanellas venkis 30.000 NKL-ajn aliĝantojn. La 22-an García Oliver realigis alvokon per la radio instigante, postulante, ke la laboristoj de Zaragozo sin ĵetis sur la malamikon ne atendante minuton. Li anoncis la sendon de skadro de militaviadiloj kontraŭ la kazernoj kaj la baldaŭan alvenon de Durruti kaj li mem al la urbo:

> *La aktivuloj de NKL kaj IAF devu plenumi sian devon en la nuna horo. Uzu ĉian rimedojn. Ne atendu, ke mi finos mian paroladon. Forlasu viajn domojn, bruligu, detruu. Venku la faŝismon.*[25]

Verŝajne estis lia plej bona parolado, sed estis malmulte utila; la faŝismo venkis kaj evitis la danĝeron en Zaragozo pafmortigante kiujn ajn. Durruti, monatojn poste, ankoraŭ demandis sin «kiel Ukrainujo de la hispana anarkiismo kapitulacis preskaŭ sen lukto». Zaragoza fuĝinto, lia barbiro en la malliberejo de la Torrero, klopodis pravigi sin rimarkigante al li, ke la urbo estis dum la lastaj kvin jaroj en konstanta revolucia mobilizado per ribelemaj strikoj, kiuj «donis, kiel rezulton, tre altan kvanton da viktimoj kaj malfacile ripareblan malfortecon, kaj kiam jam alvenis la momento eliri surstraten por fari la veran revolucion, la popolo, la laborista klaso, ne kredis je siaj estroj», iuj el kiuj, kiel Abós, havis konduton en la Komitato por defendo, kiu montris ne malmulte da mankoj[26]. Tiu morala paralizo de la zaragozaj laboristoj en decida momento estis fatala por ili kaj la revolucio, ĉar ĝi senigos la anarkiistojn je grava bastiono kaj senmovigos milojn el ili en

---

* NeT: karlismaj soldatoj. Vidu: https://eo.wikipedia.org/wiki/Karlismo

25 *Solidaridad Obrera*, 23-an de julio 1936.

26 Jusamar, *Vida y muerte de un idealista* (hispane, Vivo kaj morto de idealisto), Tetragrama, Valencio, 1998. Memoraĵoj de Juan Sanz Martínez, komencitaj skribi en 1966 en Brazilo.

la militfronto. Sekvatage, 23-an de julio, Durruti okupis somerdomon de la Bonanova por organizi sian kolonon, kien aliris la unuaj laboristaj delegitoj kaj la kuracisto José Santamaría. Kun Pérez Farrás li iris poste al Pedralbes, al la kazerno de la Regimento de Infanterio de Alcántara, en manoj de NKL. Durruti alparolis la soldatojn, donante al ili la elekteblon iri kun li aŭ reveni hejmen. La soldatoj respondis, ke ili irus tie, kie li ilin ordonus kaj, rapide, prepariĝis tri kompanioj el fusilistoj, du el maŝinpafilistoj, du sekcioj de kanonoj kaj bombopafiloj kaj iuj tankoj. Centoj da laboristoj kuris en la sindikatejojn aŭ la kazernojn por enskribi sin en la kolono, sed la armiloj de la militistaj oficejoj de Sant Andreu ne estis tiel abundaj, kiel oni esperis. Multaj restis en la postmilitfronto en manoj de la sindikatoj, la grupoj kaj la volontarmeoj por prigardo, aliaj estis senditaj al Valencio kaj la cetero disdoniĝis inter ĉiuj kolonoj.

Cele decidi la sintenon de la Organizo en tiuj krizaj momentoj, la Regiona Komitato de NKL okazigis, la 23-an, urban kaj distriktan Delegitkunvenon en la konstruaĵo de la labormastraro de Vía Layetana, de tiam nomita, «Domo NKL-IAF». La vizaĝoj ne estis la samaj de tiuj, kiuj batalis ĝis la elĉerpiĝo sur la stratoj kaj placoj de Barcelono kaj la entuziasmo estis malsama. La gloro de la batalo sendube respondis al la grupo Nosotros, sed la profitoj estis disdoniĝontaj inter ĉiuj. Kiel la grupo estis difektita pro la disiĝo de Durruti kaj lia unuflanka decido liberigi Zaragozon, García Oliver restis preskaŭ sola defendante «celi ĉion», t. e., la prenon de la povo fare de NKL kaj la altrudo de la liberecana komunismo per la forto de la armiloj, kvankam nur estos en Katalunujo. Nur la instruisto José Xena, delegito de la distrikto de Baix Llobregat, konsentis kun li. La plimulto kontraŭis, tial ne estis bezone voĉdoni. Ankaŭ ne Oliver volis trudi la aferon. NKL pli ol jaro poste publikigis la definitive adoptitan pozicion:

*Ĉi-okaze la Revolucio subite aperis antaŭ la revoluciuloj kaj al ili proponis la problemon direkti kaj gvidi ĝin, sed ne lasante vidi al ili sian profundon nek sian disvastigadon. En tiuj plej gravaj momentoj de la Revolucio, la cirkonstancoj nin konsilis kunlabori kun la aliaj kontraŭfaŝismaj sektoroj.*[27]

La Delegitkunveno analizis la situacion kaj decidis «ne paroli pri liberecana komunismo dum ni ne konkeros la parton de Hispanujo, kiu estis en manoj de la faŝismo», ĉar NKL rifuzis trudi sian «diktatoradon» sur la «gvardiistoj kaj aktivuloj de aliaj partioj [...] diktatorado, kiu aliflanke estus sufokota de la eksterlando kvankam venkus interne»[28]. La cirkonstancoj rilatis al la malcerta situacio en la plimulto de regionoj, la malmulta konfederacia influo en Madrido kaj, ĉefe, la timo de eksterlanda interveno. Venkis la kunlaborado proponita de la prudenta Santillán, tial ni deduktis, ke la rezigno pri la revolucio estis la unua ago pri ekstera politiko de NKL. Ĉiutendencaj anarkiistoj malfidis 'García Oliver'-on, ĉefe la ideologoj de la «prudenta anarkiismo» —Marianet diris—, tre influaj en la Organizo. Mi logike aludas Federica-on, Herrera-on kaj Santillán-on. Sed liaj kolegoj Ortiz, Jover, Sanz aŭ Aurelio Fernández ankaŭ ne helpis per sia silento kaj pli surprize ankoraŭ estis lia milda akcepto de la posteno en la Komitato pri la Volontarmeoj, kiam la Delegitkunveno lin konfirmis. Ortiz pledis sin dirante, ke «al li ne plaĉis la ĝenerala aspekto de la ĉeestantoj» kaj, ke estis ne sufiĉa armilaro por «celi

27 *Informo de la delegitaro de NKL al la Eksterordinara Kongreso de ILA* (NeT: Internacia Laborista Asocio; vidu: https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_Laborista_Asocio) *kaj ties rezolucioj*. Decembron 1937, eldonita de la Sekcio pri Informo, Propagando kaj Gazetaro, NKL, Nacia Komitato, sen dato sed 1938. La subskribintoj de la informo, vera apologio de la kunlaborado, estis Marianet, David Antona, Horacio Martínez kaj José Xena! Tiu informo datas la kunvenon je la 21-a de julio, sed García Oliver ĉiam insistis, ke ĝi okazis la 23-an, kaj la Informo de la Duoninsula Komitato de IAF al la Internacia Liberecana Movado, skribita en junio 1937, tiel tion konfirmas.

28 *Informo de la delegitaro de NKL al la Eksterordinara Kongreso de ILA kaj ties rezolucioj.* Decembron 1937, citita verko.

ĉion»[29]. Kio estis falsa, ĉar la preno de la kazernoj de Sant Andreu havigis dek kvin mil fusilojn al la anarkisindikatistoj, fakte ili iĝis la hegemonia forto en Katalunujo. Peirats havis la impreson, ke la propono estis farita sen konvinko; kvazaŭ García Oliver scius, ke ĝi estis malakceptota. Peirats ne kredis en lia sincereco, nek García Oliver al li inspiris fidon[30]. La burokrata historio de García Oliver ĉe liaj tiutagaj kontraŭuloj kaj lia posta ekstremisma defendo de la Armeo kaj la Ŝtato garantios, se estus bezono, la suspektojn de Peirats.

Posttagmeze, la grupo Nosotros kaj ties proksimuloj paradis sur la Ramblas kaj Vía Layetana kune kun la volontuloj, kiuj volis liberigi Zaragozon. Oni parolis pri miloj, sed tiu vespero nur forlasis Barcelonon tra la Diagonal la soldatoj de la Regimento de Infanterio, la sanigistaj servoj kaj la unuaj centopoj organizitaj. Tiunokte okazis lasta kunveno en domo de Jover, kie García Oliver prezentis projekton de ŝtatrenverso, kiu konsistis profiti la koncentriĝon de la kolono je la 24-a por okupi la povsidejoj kaj Durruti klarigis siajn rezervojn. Laŭ lia kompreno, unue oni devis konkeri Zaragozon por deĉenigi la revolucion kun garantioj de sukceso; nur kun Katalunujo en manoj de NKL la ebloj estis minimumaj: «Ĉi-momente, nur kun Katalunujo, kiel bazo de subteno, ni estus geografie limigitaj al minimumo»[31]. Kaj li aldonis: «Kiam ni prenos Zaragozon, starigos la Liberecanan Komunismon». La kunveno

29 José Manuel Márquez Rodríguez kaj Juan José Gallardo Romero, *Ortiz, general sin dios ni amo* (hispane, Ortiz, generalo sen dio kaj mastro), Hacer, Barcelono, 1999.

30 Josep Alemany, «Intervjuo kun José Peirats», J*osé Peirats Valls. Historia contemporánea del Movimiento Libertario* (hispane, José Peirats Valls. Nuntempa historio de la liberecena movado), Revuo *Anthropos*, n-ro 102, 1989. Ankaŭ en Fondaĵo Salvador Seguí, *Colección de Historia Oral: El movimiento libertario en España. José Peirats* (hispane, Kolekto de parola historio: la liberecena movado en Hispanujo. José Peirats), Madrido, 1989.

31 Joan Sans Sicart, *El dia de les sirenes* (katalune, La tago de la alarmiloj), Pagès Editors, Ilerdo, 2007.

malvarme finiĝis. Ne estis simpla diferenco de opinioj aŭ alfronto de malsimilaj strategioj en la kerno de grupo. Estis definitiva rompo. Eble Durruti kredis ne realigebla la proponon de García Oliver tiel, kiel certigis, aŭ eble timis, ke Ĉefstabo de la revolucio kun tiu ĉekape kondukus ne deziritajn celojn. La fakto estas, ke la fina malakordo inter la du finis Nosotros-on kaj la eblon de logika strategia agado en NKL kaj IAF. Poste ĉiu el ili devos serĉi sian lokon en la milito: Durruti pafos en la militfronto, García Oliver movos la fadenojn en la postmilitfronto. La grupo ne plu kuniĝis, eĉ ne dum la entombigo de Francisco Ascaso.

La 24-an, je la 9.30, Durruti faris alparolon al la proletaro petante rekoni la Komitaton pri la Volontarmeoj, organizi la defendon de la laboristaj konkeroj kaj foriri al Zaragozo por detrui la faŝismon:

> *En Aragono la kolegoj, la laboristoj estas viktimoj de la faŝistaj bandoj, kiuj suferigadas la laboriston. La kataluna proletaro, kiu ĉiam estas singarda, kiu ĉiam vivis ĉekape de la libero de Hispanujo, hodiaŭ pli ol neniam devas aŭskulti nin. Sed ne kredu, ke ni defendas personajn interesojn, ĉar temas pri la hispana proletaro, laboristoj, kiuj ne povas alifoje sperti «tion», kion ĉiuj jam konis, kio al ni faris travivi la plej mizeran el la vivoj.*
>
> *Vi havas devon en ĉi tiuj momentoj: koncentriĝu sur la ŝoseo de Promenejo de Gracia je la deka matene.*
>
> *Averto, laboristoj de Barcelono ĉiuj, kaj ĉefe tiuj de la Nacia Konfederacio de la Laboro. La lokoj, kiuj estis konkeritaj en Barcelono, ke ne estu forlasotaj. La ĉefurbo ne devu esti forlasota.*
>
> *Vi devu resti tre atentaj, je konstanta gardo, ĉiaokaze, ke ni devus agi ĉe eblaj okazaĵoj. Laboristoj de NKL: ĉiuj, kiel sola viro, ni devu iri helpi la kolegojn de Aragono.*[32]

32 *La Vanguardia*, Barcelono, 25-an de julio 1936.

Durruti poste iris al la Sindikatejo pri la Metalurgio kaj tie estis intervjuita de la kanada ĵurnalisto Van Paassen. El la tuta intervjuo oni povas substreki la firmecon montri la intereson de ĉiuj ŝtatoj neebligi, ke disvolviĝos liberecana revolucio en Hispanujo, inkluzivitaj la hispana ŝtato mem kaj la «patrujo» de la proletaro, Sovetio. Li do konfirmis, ke la influo de Moskvo inter la hispanaj laboristoj estis nula kaj, ke la rusaj komunistoj sekve havis nenian aŭtoritaton por paroli nome de tiuj:

> *Ni luktas ne por la popolo sed kun la popolo, t. e., por la revolucio ene de la revolucio. Ni konscias, ke en ĉi tiu lukto ni estas solaj kaj, ke ni nur povas kalkuli kun ni mem. Por ni, signifas nenio la ekziston de iu Sovetio en parto de la mondo, ĉar ni anticipe sciis, kiu estis ĝia sinteno koncerne al nia revolucio. Por Sovetio, nur gravas ĝia trankvileco. Por ĝui tiun trankvilecon, Stalino oferis la germanajn laboristojn al la faŝisma barbareco. Antaŭe estis la ĉinaj laboristoj, kiuj estis viktimoj de tiu forlaso. Ni lernis la lecionon kaj deziras porti nian revolucion antaŭen, ĉar ni volas ĝin por hodiaŭ kaj ne por post la proksima eŭropa milito. Per nia sinteno ni donas pli da kaprompoj al Hitlero kaj Mussolini ol la Ruĝa Armeo, ĉar ili timas ke iliaj popoloj, inspiriĝante el ni, infektiĝos kaj finos kun la faŝismo en Germanujo kaj Italujo. Sed tiun timon ankaŭ dividas Stalino, ĉar la triumfo de nia revolucio nepre devas efiki sur la rusa popolo.*[33]

La deklaroj estis tiel firmaj, ke Durruti povis pro ili iĝi faligenda celo de la sovetianoj.

Matene, komenciĝis la homamasa parado. Ĉekape iris, inter tondraj aplaŭdoj de la proleta amaso, la kamionoj de NKL-IAF, de kiuj pendis ruĝaj kaj nigraj rubandoj. Fine, la granda malfermita aŭto de Durruti kaj lia «Stabo»: «La volontarmeanoj devis veturi sur la piedingoj de la aŭto por neebligi, ke la homamaso ĝin faligos pro ties fervora deziro

33 Publikigita en *Toronto Star*, 18-an de aŭgusto 1936. Reproduktita de Abel Paz, *Durruti en la Revolución española* (hispane, Durruti en la hispana revolucio), Fondaĵo Anselmo Lorenzo, Madrido, 2001.

ree vidi Durruti-on»[34]. Ne ĉiuj tuj foriris; nur ĉirkaŭ mil kvincent volontarmeanoj kaj kelkaj dekduoj da volontarmeaninoj foriris kun Durruti al Ilerdo, ene de trideko da aŭtoĉaroj kaj sesdek kamionoj, sekvitaj de dekkvino da ambulancoj kaj pluraj veturiloj ŝarĝitaj de provizoj, akvo, brulaĵo, municioj kaj pecoj de artilerio. La krio de «Al Zaragozo!» estis ĝenerala, kvankam neniu konis la situacion de la trairotaj vilaĝoj laŭ la vojiro. Ĉiu portis la manĝaĵojn, kiujn la popolo de Barcelono portis al la parado, litkovrilon, malpli ol la duono fusilon kaj skatolon de municio, sed nenion plian. La plimulto neniam havis armilon en la manoj. Tiuj, kiuj jam plenumis la militservon, klarigis la uzadon de la fusilo kaj tio estis ĉio. La aliaj kolonoj ne disponis la taŭgan transporton kaj devis veturi per trajno. Akompanante Durruti-on iris Yoldi, Esplugas, Ruano, Ballano, Mira, Ros, Arís, Campón, la serĝento Manzana, la kapitano Ramos, Libertad Ródenas, ties frato Progreso, Carreño kaj Pablo Ruiz, kaj ankaŭ kompanio de civilgvardio sub la komando de la leŭtenanto Pedro Garrido. Durruti diris al unu el la gvardianoj: «Se ni venkos, ne estos Civilgvardio nek Respublika Gvardio, sed nur laboristoj»[35]. Sekvatage devis foriri ĉirkaŭ sescent volontarmeanoj kun Pérez Farrás. Atestas Santillán pri la kreema spontaneeco de la revoluciaj laboristaj amasoj, ĉar «horojn antaŭe ni ne sciintus certigi el kie eliros la volontarmeanoj, nek la armiloj nek la rimedoj de transporto; sed la armiloj, la volontarmeanoj kaj la rimedoj de transporto foriris direkte al Zaragozo je la tago kaj horo fiksitaj de la Komitato pri la Volontarmeoj»[36]. Tamen, ĉio

34 Tradukado neeldonita de *Bakom Barcelonas barrikader* (svede, Post la barikadoj de Barcelono), eldonita en Svedio de Federativs fine 1936. La aŭtoro estis Axel Österberg, membro de la sveda junulara liberecana organizo AJF (NeT: Anarkisindikatista Junulara Federacio) kaj hazarda atestanto de la faktoj.

35 José Colera, *La guerre d'Espagne vue de Barcelone. Memoires d'un garde civil républicain 36-39* (france, La milito de Hispanujo vidita de Barcelono. Memoraĵoj de respublika civilgvardiano 36-39), Éditions du Cygne, 2008.

36 Abad de Santillán, citita verko.

havas sian kompenson: la mallerteco de la improvizitaj ŝoforoj lasis semita la vojo de difektitaj veturiloj. Kaj koncerne al la armiloj, tro da ili restis en la postmilitfronto aŭ estis disdonitaj inter la ceteraj fortoj; Durruti kalkulis, por kolono el tri mil antaŭviditaj volontarmeanoj, kun dek du pecoj de artilerio, dek ses maŝinpafiloj, naŭ bombopafiloj kaj nur mil fusiloj. Sekve, pli ol la duono de la kolonanoj estis senarmigitaj. Dum la sekvaj tagoj foriris la ceteraj kolonoj kun la ideo atingi siajn respektivajn militistajn celojn kaj kuniĝi kun Durruti en Zaragozo. Estis tiam, kiam la gvidantoj de NKL montris etaniman inklinon al la ĵus konkeritaj postenoj, simptomo de la ekburokratiĝo de la organizo:

> *Jam foriris la dua kolono al Aragono [tiu de Ortiz] kaj ni kolizias kun la interpreto de iuj el plej elstaraj aktivuloj de la liberecanaj organizoj mem. Dum ni [la Duoninsula Komitato de IAF] opiniis, ke la plej kapablaj kaj popularaj kolegoj devis foriri al la militfronto komandante la centopojn, batalionojn kaj kolonojn, trudiĝis la kriterio, ke oni devis konservi por la postmilito la plej elstarajn aktivulojn [...] Ni vidis, ke ĉefis la celo de la divido de la urshaŭto, antaŭ ĝin ĉasi.*[37]

Kiel ĉi tiu aserto devenas de unu el kiuj partoprenis en la divido, tio plej verŝajna estas, ke ĉio estis manovro de gvidanta sektoro tiu, kiu ĉefis Santillán kaj Federica, kontraŭ alia, tiu de García Oliver. Ĉi tiu falis en la reton ĉar la 25-an de aŭgusto foriris al la militfronto kun la Kolono Los Aguiluchos, «forgesante» eksiĝi el siaj postenoj en la Komitato pri la Volontarmeoj. Tuj post la alveno, li cedis la kolonon al Jover, García Vivancos kaj 'el Valencia', por reveni al postmilitfronto ricevinte urĝan skribaĵon de Marianet, la sekretario de la Regiona Komitato, indikante al li, ke «tio, pro Santillán iras en la kaoson»[38]. Fakte, NKL kaj

37 Abad de Santillán, *Por qué perdimos la guerra* (hispane, Kial ni malvenkis la militon), Plaza y Janés, Barcelono, 1977.

38 Juan García Oliver, *El eco de los pasos* (hispane, La eĥo de la paŝoj), Ruedo Ibérico, Parizo, 1978.

IAF batalis por ke la gvidantoj restu en postmilitfronto por organizi la produktadon kaj fortigi la strukturojn de la organizo por atingi la plej bonan politikan efikecon. Tiu estis la granda argumento, kiun oni prezentis favore de la mobilizado de kiuj atingis la aĝon por la militservo unue, kaj de la regula armeo poste.

La unua parto de la Kolono Durruti alvenis al Ilerdo la 25-an de julio frue matene. Tie la volontarmeanoj estis informitaj, ke la faŝistoj kaj la Civilgvardio konkeris Caspe-on, tial iuj iris al tiu urbo. Je kvar kilometroj de ĝi, sur la enirponto, ili renkontiĝis kun la ribelaj civilgvardianoj de Bujaraloz, kiuj veturis per la aŭtoĉaro de linio Bujaraloz-Zaragozo-Villalba, kiun ili konfiskis[39]. Sur la ponto mem ili faris energian batalon, uzante la kirasitajn aŭtojn kaj la artilerion. La gvardianoj kaj faŝistoj, kiuj ilin akompanis retiriĝis interne de Caspe kun multaj homperdoj[40]. Samtage eliris el Ilerdo direkte al Caspe la Mikskonsista Kolono el soldatoj kaj laboristoj Hilario-Zamora, kiu plifortigis la Durruti-an taĉmenton, dum la militaviadilaro superflugis la urbon. La faŝistaj helptrupoj restis en Escatrón kaj mezmatene kapitulacis la ribelulojn[41]. En Ilerdo oni enoficigis delegitojn kaj organizis grupojn, centopojn kaj

39 Rakonto de la ŝoforo en «Kronikoj de la kontraŭfaŝisma lukto. En la aragona fronto», *La Vanguardia*, 18-an de aŭgusto 1936.

40 Kvankam en *El Frente de Aragón* (hispane, La militfronto de Aragono) (Zaragozo, 2007) la historiisto José María Moya obstinas nei tiun informaĵon, ni povas alporti la ateston de José Mira, de la Komitato por la Milito de la kolono, kiu krome indikas sian kunulon Mariño, vundita en la pulmo, en *Guerrilleros Confederales. Un hombre: Durruti* (hispane, Konfederaciaj gerilanoj. Unu viro: Durruti) (Servo pri propagando kaj gazetaro de NKL, Barcelono, 1937). Ni ankaŭ disponas la atestojn de la volontarmeanoj Manuelo Cruz kaj Enric Cassanyes, kolektitajn en Jordi Camps kaj Emili Olcina, *Les milícies catalanes al Front d'Aragó* (katalune, La katalunaj volontarmeoj en la militfronto de Aragono), Laertes, Barcelono, 2006.

41 José Manuel Martínez Bande, *La Invasión de Aragón y el desembarco en Mallorca* (hispane, La Invado de Aragono kaj la surteriĝo de Majorko), SHM, editorial San Martín, Madrido, 1970. La preno de Caspe estis rakontita de Alfonso Martínez Rizo en *Solidaridad Obrera*, 31-an de julio 1936.

sekciojn. Oni ankaŭ kolektis armilojn, kiuj bone utilis[42]. De la balkono de la urbodomo Durruti alparolis la volontarmeanojn: «Vi estas la liberiga spirito, kiu devas detrui la nigran beston de la faŝismo». Je la kvina posttagmeze li kunvenis en la oficejoj de la urbodomo kun Pérez Farrás, sia milita asistanto, kaj kun Manuel Grossi kaj Jordi Arquer, la estroj de la Kolono Maurín, tiam simple nomita Unua Kolono de LPMU, kiuj protestis kontraŭ la neegala divido de la kolektitaj armiloj. Laŭ Manolón aŭ Manolé (Grossi), kiu proponis «la unuiĝon de la batalo», Durruti certigis, ke «Por gajni la militon kaj solidigi la revolucion sufiĉas NKL sola, sen pli da fortoj ol siaj propraj». Arquer insistis pri «la unuiĝo en ĉiuj kampoj» kaj Durruti, malfidanta, timante prokrasti sin por sennecese implikiĝi en la neriskema politiko de LPMU, respondis: «Tion ni jam vidos poste, kiam ni priparolos la venkon. Kredu min, ni scios esti toleremaj». Ĉi tiujn lastajn vortojn oni devus nuanci, ĉar kiu ilin eldiris estis iu kun evidenta malamikeco al la anarkiistoj, kies verkon de kolektivigo intence fuŝis en sia sektoro[43]. Ne perdante pli da tempo, Durruti foriris al Fraga la 26-an, konstatante dum la vojaĝo, ke Tamarite kaj Alcarrás estis en manoj de komitatoj. En Fraga, la kapitano de la Civilgvardio restis lojala al la Respubliko kaj tial tie la faŝisma ribelo malsukcesis. Maŝinpafilo en la enirejo de la

42 «Ilerdo nin akceptis per korinklino kaj ĝojo. Nia ĉeesto sufiĉis por rapidigi la decidiĝon de iuj militistoj, kiuj ankoraŭ estis en konfuza pozicio. Durruti, Farrás, Ballano, Carreño, la kolego, kiu poste estis urbestro de Ilerdo kaj mi supreniris al la kastelo. Ĉi tiu vizito kaj la responda klopodo faris, ke la medio normaliĝis kaj la aferoj restis aranĝitaj. Ni tie kolektis kelkajn maŝinpafilajn fusilojn kaj rapide, danke al la lecionoj de serĝento, ni lernis uzi ilin; kaj oni rekomencis la marŝon al la aragona limo.» Joaquín Ascaso, (1936-1938). *Hacia un nuevo Aragón* (hispane, (1936-1938). Al nova Aragono), eldonita origine en 1938 kaj reeeldonita de Prensas Universitarias de Zaragoza, Zaragozo, 2006.

43 La rakonto lokas la Kolonon Durruti en Barbastro la 27-an, kio estas malvera. Grossi, kiu ankaŭ ne bone rilatis kun Arquer nek kun ties militista asistanto, legiano nomita Piquer, estis anstataŭita je la komando de sia kolono fine de septembro. *Notas de mi carnet* (hispane, Notoj de mia identokarto), manskribita teksto de Grossi en 1972, en la IISH de Amsterdamo, eldonita en 2009 de Salvador Trallero, Sariñena (Osko) kun la titolo de *Cartas de Grossi* (hispane, Leteroj de Grossi).

urbo superregis la ŝoseon, dum pluraj patroloj kontrolis la pason de aŭtoj. La kolono tie haltis por manĝi kaj poste veturis al Candasnos, kie estis muntita provizora kuracejo[44]. La 27-an, sen kontraŭaĵoj, ĝi pasis tra Peñalba, sed ĵus alveninta al Bujaraloz, dum Durruti kontrolis la forlasitan kazernon de la Civilgvardio, sonis la telefono. Li prenis la aŭdilon kaj respondis: «Jen Durruti!». Estis la civilgvardianoj de Monegrillo, kiuj aŭdinte lian voĉon, senhalte forkuris ĝis Zaragozo. Durruti instalis sian stabon en la vilaĝo kaj faris malgrandan paroladon sur la placo de la urbodomo, sinceran kaj ardan: «Kamaradoj, la lukto estos tre malmola kaj la malamiko havos neniun kompaton. Ni devas venki kaj ĉi tiu estos mia instrukcio. Nu se la timo trafas iun, ke li restu ĉi tie por foriri al la postmilitfronto kaj fari aliajn servojn»[45]. Neniu movis sin kaj tuj poste li komencis koncentri kaj organizi siajn fortojn atendante, ke Ortiz progresos transe de la rivero Ebro. La Nigra Bando, rekonskoltaro konsistigita de metalurgiistoj kaj akompanita de grupo de respublikaj civilgvardianoj, ekkonkeris per surprizo 'Pina de Ebro'-n tiun posttagmezon mem. La ribelaj civilgvardianoj, kiuj ĝin gardis forlasis la vilaĝon malmultajn horojn antaŭe. La skoltaro ne restis en la vilaĝo, sed revenis al la kruciĝejo de Gelsa por renkonti la kolonon, okazo uzita de la ribelantoj por denove eniri en Pina-on. De Farlete alproksimiĝis aŭto kun falangistoj sed havis la malfeliĉon renkonti alian skoltaron de la kolono. Pro ĉiuj ĉi faroj Vicenç Guarner, estro de servoj de la Konsilantarfako pri Publika Ordo de la kataluna registaro kaj respondenculo de la departemento por la milito de la Komitato, proponis en la kunsido de la Komitato pri la Volontarmeoj de la 3-a de

44 Manuel Nogareda, «La heroaĵo de la katalunaj volontarmeoj en Aragono», *Mi Revista*, Barcelono, 1-an de majo 1938.

45 Manuelo Ramos, *Una vida azarosa* (hispane, Hazarda vivo), eldono de la aŭtoro, 1993.

aŭgusto gratuli la kolonon «por ties disciplino kaj senco de la organizo»[46].

Post alveni la Kolono Ortiz al Puebla de Híjar, Durruti ekmovis sin sur la ŝoseo de Zaragozo, translokante sian stabon al la gastejo de la kruciĝejo de Gelsa (Venta Monzona) kaj starigante malsanulejon de kampanjo proksime de ĝi. Tiam jam estis tro malfrue; la generalo Gil Yuste eniris en Zaragozon kun konsiderindaj helpofortoj por anstataŭi Cabanellas-on. Sekvatage, frue matene, la skoltaro el volontarmeanoj kaj civilgvardianoj alifoje revenis al Pina, sekvita de kamiono kun 36 armitaj homoj. La kolono marŝis sur la ebenaĵo inter Gelsa kaj Pina intence okupi Osera-on, defendita de nur tridek respublikaj gvardiistoj devenintaj de Zaragozo. Subite kvar aviadiloj pasis ĵetante manbombojn sur kamionojn kaj aŭtoĉarojn. La homperdoj estis malmultaj, trideko inter mortintoj kaj vunditoj, sed la paniko, kiun ili kaŭzis estis grandega[47]. La ŝoseo estis mallarĝa kaj pluraj kamionoj restis kruciĝintaj, blokante la movadojn de la kolono. La volontarmeanoj diskuris. Unuj petis klarigojn al Pérez Farrás, kiu respondis «ke li ne estis la estro, ke ili demandos Durruti-on», dume Durruti respondis ĉiujn, kiuj prezentiĝis antaŭ li, «ke la militisto estis Pérez Farrás kaj, ke estis li, kiu devis antaŭvidi tiajn okazaĵojn»[48]. La aviadiloj faris alian pasadon kaj tiam okazis tian senordan diskuron, ke la kolono tute disiĝis, restante en Bujaraloz nur ducent volontarmeanojn. Kiam revenis la

46 Akto de la 3-a de aŭgusto 1936 de la Centra Komitato pri Kontraŭfaŝismaj Volontarmeoj (CKKV), en Diversaj Aŭtoroj, *Ordre públic i violència a Catalunya* (1936-1937) (katalune, Publika ordo kaj perforto en Katalunujo (1936-1937)), Edicions DAU, Barcelono, 2011.

47 Raquel Castro, ĉeestanta dum la faktoj, diris, ke ĉio «estis kulpo de Farrás, kiu estis la militista respondeculo kaj estis ebria». En «Akto de la Delegitkunveno de Anarkiistaj kaj Konfederaciaj Kolonoj, okazigita en Valencio la 5-an de februaro 1937», Arkivoj de Salamanko.

48 Colera, citita verko.

forkurintoj, Durruti al ili riproĉis ilian timon kaj nomis ilin malkuraĝuloj:

> *Al tiuj, kiuj hodiaŭ kuris, neebligante la Kolonon antaŭeniri, mi petas, ke ili kuraĝu delasi la fusilon por ke ĝi estu prenota de alia pli firma mano [...] Tiuj, kiuj restos daŭrigos nian marŝon. Ni konkeros Zaragozon, liberigos la laboristojn de Pamplono kaj faros manprenon kun niaj ministaj kolegoj de Asturio kaj venkos, donante al nia lando novan mondon. Kaj al tiuj, kiuj revenos hejmen post ĉi tiuj bataloj, mi petas, ke ili diru al neniu tion, kio hodiaŭ okazis, ĉar ĝi plenigas nin de honto.*[49]

Neniu el la ĉeestantoj delasis sian armilon, sed la memoro de Pablo Ruiz tiel, kiel estis komunikita al ni, ne similas pri ĉi tiu afero tiun de Manuel Lozano, aktivulo de NKL ĵus alveninta de Bellver de la Cinca:

> *Durruti, antaŭ tia situacio, ordonas, ke ĉiu tiu, kiu ne sentas sin kun kuraĝo por preni la armilojn ilin lasu sur la placo, donante al ili templimon ĝis tiu vespero por ke ili malaperu de la vilaĝo; tiu, kiu ne tion faros ĝuste tiun vesperon jam ne povos fari tion. Ĉiuj, kiuj konsideris la militon, kiel sporton rapidas forlasi siajn fusilojn kaj supreniras en kamionojn, kiuj eliris el Bujaraloz al Barcelono. La fusiloj estas transdonataj al la kamparanoj, kiuj prezentiĝas devenintaj de pluraj lokoj de la provinco.*[50]

Tiu neatendita kontraŭaĵo iĝis Durruti pli singarda. Sekvatage li ordonis, al kiuj lin akompanis, kolekti la forlasitan materialon kaj li komencis bone strukturi la kolonon bazante sin sur centopoj sen estroj, sed kun delegitoj nomumitaj de asembleo. Sed li tiam ricevis konfidencon pri tio, ke ribelaj fortoj de kavalerio tiunokte klopodus atingi Bujaraloz-on. Pérez Farrás, pro postulo de Durruti, planis defendaranĝon formante duonlunon ĉirkaŭ la

---

49 Paz, citita verko.

50 Manuel Lozano Guillén, *Apuntes incompletos de mi vida, escritos en la cárcel de Las Capuchinas de Barbastro* (1941) (hispane, Nekompletaj notoj pri mia vivo, skribitaj en la karcero de Las Capuchinas de Barbastro (1941)), Centre d'Estudis Llibertaris Federica Montseny, Badalona, 2011. Lozano estis pafmortigita en 1945.

ŝoseo per grupoj de ok fusilistoj ŝirmitaj de faskoj de cerealoj kaj, malantaŭ ili, sur la ŝlosilaj punktoj, maŝinpafiloj. Kiam ekus la pafado la cetero de la volontarmeanoj kurus sur la flankoj[51]. Pasis kvar tagoj sen pli da okazaĵo ol la alveno de fuĝintoj el Zaragozo, kio klarigas la malfruon de la kolono repreni la perditan terenon post la bombado de la ribela militaviadilaro.

Farlete estis ree okupita de faŝistaj trupoj la 28-an kaj forlasita la 29-an pro nova mallonga penetro de volontarmeanoj el la centopo de Terrassa[52]. Dum tiuj tagoj la kolono zorgis havi bone organizita la Roton de Trajno kun la helpo de laboristoj de la Sindikato pri la Transporto (sekcio de taksiistoj), kiuj instalis mekanikan riparejon en Bujaraloz, kaj dume ĝi ankaŭ etendis siajn fortojn tra la proksimaj vilaĝoj de Castejón, Valfarta kaj La Almolda. En la du unuaj iliaj loĝantoj proklamis sin por la Respubliko kaj organizis sian propran defendon. Ne tiel okazis en La Almolda, kie la volontarmeanoj havis la unuan seriozan alfronton kun grupo de dudek faŝistoj. Ili starigis komitaton kaj forlasis la vilaĝon. Durruti ankaŭ helpis ‘Hilario Esteban’-on, kiu batalis en Sástago. La 5-an de aŭgusto nokte alvenis multnombraj laboristoj kaj kamparanoj de la vilaĝoj de Aragono okupitaj de la faŝistoj, kiuj serĉis momentan rifuĝon en la montoj de Zuera. Entute li povis rekonsistigi dudek kvin centopojn. Sekvatage, li armis du kaj, per la helpo de Pablo Ruiz, reokupis Pina-on sen pafi pafon. Ĝiaj defendantoj transiris la riveron kaj de tie ekatakis, sed tiam ricevis pafojn de aliaj centopoj, kiuj ĵus alvenis, kaj fine ili fuĝis piede, lasante malantaŭ ili plurajn veturilojn. Durruti kunvenigis la volontarmeanojn sur la placo kaj admonis ilin al ekzempla konduto: «Mi ne akceptos, ke oni malfermu ajnan pordon de

51 Lozano, citita verko.

52 Memoraĵoj de José Borrás, *Del Radical-Socialismo al Socialismo Radical y Libertario* (hispane, De la Radikal-Socialismo al Socialismo Radikala kaj Liberecena), Fondaĵo Salvador Seguí, Madrido, 1998.

forlasita domo. La vilaĝo de Pina estas en niaj manoj. Teni ĝin nun dependos de ni»[53]. Pina restis zorge de la 12a kaj 13a centopoj. La 8-an Gelsa estis liberigita de centopo kaj grupo de karabenistoj[*] gviditaj de Francisco Carreño kaj la serĝento Manzana. Tiel en Pina, kiel en Gelsa kaj en la najbara Velilla estis kreitaj revoluciaj komitatoj la saman tagon, kiam oni kunvenigis la loĝantojn. Oni ankaŭ kreis Komitaton por Nutraĵ-provizado por organizi la laborojn de kolekto kaj interŝanĝo de produktaĵoj. Komitato por Prigardo okupiĝis je la sekureco. Malmultajn tagojn poste oni deklaris la liberecanan komunismon en Gelsa[54]. La faŝistoj rifuĝis kaj fortikiĝis en Quinto. Osera kaj la vilaĝeto de Aguilar, je 32 kilometroj de Zaragozo, estis prenitaj de aliaj du centopoj. Je lia dekstra flanko, la fortoj de LPMU alvenis ĝis Leciñena kaj tiuj de USPK, ĝis Tardienta. Je la maldekstra, la volontarmeanoj kaj soldatoj de la Kolono Hilario-Zamora liberigis 'La Zaida'-on, Azaila-on, 'Cinco Olivas'-on kaj Alborge-on, kuniĝante kun Velilla kaj Gelsa, sed ili haltis antaŭ Quinto, tro bone protektita, dum la Kolono Ortiz restis bremsita en Belchite. La Komitato pri la Volontarmeoj ordonis al Durruti, ke li ne plu antaŭeniros ĝis kiam Quinto kaj Belchite estus liberigitaj ĉar la kolono enirus kojnoforme en la militfronton kaj estus en danĝero. Tio signifis rezigni Zaragozon, pli bone protektita kaj kun la pontoj antaŭ ĝi. Feliĉe, de Barcelono, de diversaj vilaĝoj de Katalunujo kaj Aragono, kaj de la cetero de Hispanujo, alvenis al Bujaraloz homoj per kiuj kovri militfronton, kiu jam ampleksis tridek kilometrojn. Ni legas en la *Soli*, ke «Preskaŭ ĉiuj alvenas senarmigataj, sen litkovriloj kaj provizoj. Tuj post ilia alveno,

53 Alejandro Soteras, *Mis Memorias* (hispane, Miaj memoraĵoj) , Casa Libertad, Gurrea de Gállego (Osko), 2003.

* NeT: hispana armita institucio, kreita en 1829, kies komisio estis la prigardo de la marbordoj kaj landlimoj, kaj la subpremado de la fiska pagevitado kaj la kontrabando.

54 P. Bargalló, «Plenumo de la liberecana komunismo en Gelsa», *Solidaridad Obrera*, 16-an de aŭgusto 1936.

ili estas aligitaj al la centopoj, kiuj ne estas kompletaj kaj oni procedas al la fondado de novaj grupoj kaj centopoj»[55].

La 8-an de aŭgusto, la leŭtenanto Garrido kaj pluraj civilgvardianoj, ĉagrenitaj de la «maldisciplino» de la volontarmeanoj kaj malbone viditaj de ili, estis eksigitaj. Pablo Ruiz komisiis la aferon. La 11-an, skoltaro de la kolono alproksimiĝis al Lanaja, kie ankoraŭ restis ribelantaj civilgvardianoj, kaj al Monte Oscuro, apud Perdiguera, fortikigita de la faŝistoj. Ili devis tranĉi la ŝoseon inter Perdiguera kaj Villamayor por faciligi la atakon de la homoj de LPMU, sed ricevis ordonojn en kontraŭa senco de la kolonelo Villalba, «estro» de la trupoj de la aragona militfronto. Perdiguera do restis en manoj de la malamiko[56]. Progresante de Monegrillo, la kolono ree prenis Farlete-on kaj eĉ donis baton en la malamika postmilitfronto surprize enirante en Alfajarín-on. Durruti movis sin tra la longo kaj larĝo de la sektoro, klopodante sekurigi la provizadon kaj konstrui ŝirmejojn. Por tio unua li publikigis proklamon, kiu konsideris la rikolton, kiel «ion sanktan», kiu devis plenumiĝi sen perdo de tempo, samtempe, li proklamis la eksproprigon de la kontraŭaj bienuloj kaj proprietuloj. Sed li ne haltis tie. Balius alvenis al Bujaraloz por skribi raportaĵon por la *Soli* kaj atestis, ke:

> *Kiam la Kolono de Durruti eniras en vilaĝon, la unua dispono, kiun li decidas, estas la bruligo de la registro pri la Propraĵo. Tuj la kamarado Durruti animas la popolon kunvenigitan sur la placo aŭ en loko preparita por tio. Durruti klopodas klarigi al ili, kion signifas la eniro de la volontarmeanoj en la vilaĝon. Li eldiras laŭ detala maniero la praktikajn bazojn de la liberecana komunismo.*

55 P. Bargalló, «Tago en la Stabo», *Solidaridad Obrera*, 16-an de aŭgusto 1936.

56 Manuel Benito, *Orwell en las tierras de Aragón* (hispane, Orwell en la teroj de Aragono), Salvador Trallero, Sariñena, 2009.

Balius manpremis emociita la manon de Durruti en la dometo de vojreparistoj, kiu servis, kiel stabejo kaj faris portreton de la heroo:

> *Li estas admirinda viro. Haltas neniun momenton. Iras ĉien. Paroladas, gestadas. Liaj vortoj troviĝas reflektitaj en liaj okuloj. Li estas perfekta gerilano. Viro de malmola vizaĝo sed nobla kaj sindonema. Lia aspekto impresas, sed minuton poste li donas senton de boneco. Durruti havas forton de granito sed posedas animon de infano*[57]*.*

Li ne restis tro da tempo ĉar ne volis deturni la atenton de Durruti de la batalo:

> *Durruti ne volas turistojn. La kolegojn, kiuj klopodas distri sin per vojaĝeto li aligas al la kolono. Ni interkonsentas. Ĉe la batalfronto oni devas iri por iel esti utila, sed neniel por promeni.*[58]

La 11-an, Durruti publikigis sian faman proklamon per kiu li proklamis «la rikolton, kiel ion sanktan por la interesoj de la laborista popolo kaj kontraŭfaŝisma afero», deklarante, ke la varoj, utilaĵoj kaj teroj de la faŝistaj posedantoj iĝis «popola heredaĵo», administrita de la komitatoj. La 14-an, la kolono eltenis faŝistan kontraŭatakon en Osera. La vilaĝo estis bombardita kaj oni devis translokigi la loĝantaron. Oni poste laboris por prepari ŝirmajn fosaĵojn. La militkorespondanto de la angla *News Chronicle*, John Langdon-Davies, kiu vizitis la militfronton fine de monato, eldiris:

> *La Kolono Durruti alvenas ŝveligata de entuziasmo sed ne tre bone armata [...] Se la ribeluloj atakus, trovus malmulte pli ol entuziasmon kaj kuraĝon kontraŭ ili [...] oni vidas la hontindan spektaklon de la respublikanoj senarmigitaj de la Traktato pri Ne Interveno luktante sen pli da armiloj ol la fido, kontraŭ la*

---

57 Jaime Balius, «En la Militfronto de Aragono, la Kolono de Durruti», *Solidaridad Obrera*, 12-an de aŭgusto 1936.

58 Balius, citita verko.

*artilerio, la maŝinpafiloj, la bomboj kaj la aviadiloj havigitaj de la Faŝisma Internacio.*[59]

De Quinto la faŝista artilerio ĵetis detruajn grenadojn sur Gelsa-on, defendita de la Internacia Grupo. La 18-an, la respublika militaviadilaro de la flughaveno de Sariñena bombardis la alian parton de la rivero, de kie oni pafis. Poste la militfronto trankviliĝis kaj la kolono organiziĝis per grupigoj el kvin centopoj. Tiu tipo de strukturo ne estis ekskluziva de la anarkiistoj; la kolonoj de USPK-ĜUL kaj LPMU estis same organizitaj. La diferenco inter la Kolono Durruti kaj la aliaj eble baziĝis sur la eksterordinara adaptokapablo de ĝia pleja respondeculo al nova situacio en kiu neniu kompetentis. Madrida ĵurnalisto skribis:

*Durruti plisolidiĝas, kiel konscienca batalhomo, kiel batalestro, praktika kaj firma. Lia aŭtoritato inter la liaj pliiĝas tagon post tago. Li ne estas el la estroj, kiuj restas malantaŭe dum la kolono antaŭeniras, sed li estas el kiuj iras al la militfronto serĉante la malamikon. En ĉi tiuj malmultaj semajnoj li facile adaptiĝis al la vivo de kampanjo kaj agadas ĉe la militfronto per la lerta taktiko de milita aŭtoritato.*[60]

La 25-an la *Soli* anoncis la publikigadon en Pina de *El Frente*, proparolanto de la Kolono Durruti. Ankaŭ ekfunkciis ĝia radiostacio. Oni kreis Departementon pri Statistiko por efektivigi la registron de la volontarmeanoj (tie laboris, kiel tajpistinoj lia parulino Emilienne kaj Pilar Balduque*, ankaŭ plenigante identigilojn) kaj veturilan parkon en Bujaraloz. Durruti dediĉis sin normaligi la vivon de la liberigitaj vilaĝoj, organizante komitatojn, disdonante terojn, solvante la nutraĵ-provizadon, fortikigante la urbalirojn kaj stimulante la

59 John Langdon-Davies, *Detrás de las barricadas españolas* (hispane, Malantaŭ la hispanaj barikadoj), Ediciones Península, Barcelono, 2009. La angla eldono aperis en januaro 1937.

60 *La Voz*, vespera ĵurnalo de Madrido, 24-an de aŭgusto 1936, de la proprulo de *El Sol* kaj la Novaĵagentejo Febus.

* NeT: sekretariino de Durruti.

kolektivigadon. José Gabriel, korespondanto de la argentina ĵurnalo *Crítica*, memoras vortojn de Carreño ĉi-rilate: «Ĉi tie, ĉio por ĉiuj: ili falĉis sian kampon, draŝas en sia draŝejo, kaj poste iris al tiu de alia, kaj la produkto por la komunumo; ni interŝanĝe donas al ili la varojn, kiujn ili bezonas; nenio de mono; ĉi tio estas la anarĥia komunismo funkcianta. Ĉi tie ne okazos, kiel en Rusujo».[61]

Durruti fidis la inteligentecon de la laboristoj por elekti la plej kompetentajn kaj respondecajn kolegojn, kiuj okupos sindikatajn postenojn. Kaj ĉi tiuj lin respondis per la plej granda konsidero. Danke al tio povis esti solvitaj ĉiuj problemoj. La sindikatoj de la regiono sendis laborsupertutojn kaj litkovrilojn; la Sindikato pri la Branĉo de la Nutrado, fruktojn, legomojn kaj konservaĵojn; la Sindikato pri la Haŭto, ŝuojn; tiu de Presistoj, per la aŭto de la *Soli*, ĉiutage alportis la gazetaron. Kiam traktis Durruti la problemon de la publika sano de la kolono, apenaŭ improvizita de la kuracisto Martí Ibáñez, organizanto de la unua sanigista servo, li povis konstati, kiom efika povis esti la solidareco de la laboristoj. Ankoraŭ ne ekzistis la provizora hospitalo de Bujaraloz, nek la malsanulejo de kampanjo de Pina, nek io, kio similis kuracejon. La vunditoj estis translokitaj al malsanulejoj malproksimaj de la militfronto. La Komitato pri la Volontarmeoj sendis al Bujaraloz la kuraciston Joaquín Nubiola, sed ĉi tiu troviĝis, ke por fari la unuajn kuracadojn ne disponis pli ol kotonon kaj oksigenan akvon. Durruti, kruda kaj «neniel inklina perdi la tempon», sed flegme optimisma, sugestis lin instaliĝi en la vilaĝo kaj listigi la tutan bezonan materialon. Kiam li ĝin havis, ordonis al Emilienne, ke ŝi tajpis ĝin kaj pretigis leterojn kun petoj al diversaj sindikatoj partoprenantaj: Sano, Ligno, Fabrika kaj Teksa, Transporto, Dissendo kaj

61 José Gabriel, *La vida y la muerte en Aragón* (hispane, La vivo kaj la morto en Aragono), Ediciones Imán, Bonaero, 1938.

Metalurgio. Kiam ĉio estis farita, li iris al Barcelono kun la kuracisto Nubiola:

*En Barcelono, per la impona aŭtego —konfiskita al la Markizo de Foronda, la pleja ĉefo de la Kompanio de Tramoj de la antaŭmilito—, kun la insignoj de la Kolono Durruti sur la pordoj, mi pasigis preskaŭ semajnon en Barcelono, irante kaj venante de sindikatejo al alia, traktata, kiel alia kolego plia. La leteroj subskribitaj de Durruti estis, por la respondecaj kolegoj de ĉiu sindikato, kvazaŭ kristanon estus skribinta lia propra Dio. Kelkfoje oni aŭdis malaŭdacan ekkrion: «Nu, la kamarado Durruti, ni devos labori tutan jaron por lia kolono!»[...]*

*La munteblaj barakoj, la litaĉoj, la ŝrankoj, la kuracilujoj, matracoj, litkovriloj, la kirurgia instrumentaro kaj ĉio cetera komencis alveni ĉe la militfronto antaŭ du semajnoj. Antaŭ ol aperos la malvarmoj de la aragona vintro, ni jam havis muntitaj la multfoje menciitajn kaj deziritajn kuracejojn de kampanjo.*[62]

Dum tiuj tagoj García Oliver kaj la leŭtenanto kolonelo Díaz Sandino, asistanto de Companys kaj de Oliver mem, vizitis lin en Bujaraloz, estante ricevitaj per krioj. Sandino memoris tiun intervidiĝon:

*Mi preskaŭ ne lin konis, sed per la konversacio, kiun ni havis, mi povis formi al mi tre ĝustan koncepton pri ĉi tiu figuro de la revolucio. Ĉi tiu homo de la popolo estis gerilano laŭ la legenda stilo de la Milito de la Sendependeco, de kruda nobleco kaj altaj sentoj, samtempe, ke lia fera karaktero kaj lia heroa kuraĝo ĉirkaŭis lin per spontanea persona simpatio, praktikante vere surprizan superregadon sur la homamaso [...] li estis tre indignoplena ĉar oni ne sendis al li la elementojn de materialo kaj manĝo, kiujn la kolono bezonis, sed ĉi tiu indigno cedis iom-post-iom pro la rezonadoj, kiujn oni al li eldiris, kaj kiel li estis inteligenta kaj komprenema, li povis taksi la malfacilaĵojn, kiuj estis en la postmilitfronto por havigi al li la rimedojn, kiuj, ni akceptis, necesis por liaj trupoj.*[63]

62 Atesto prenita de Eduardo Pons Prades, *Realidades de la Guerra Civil* (hispane, Realaĵoj de la Enlanda Milito), La Esfera de los Libros, Madrido, 2005.

Durruti certigis al ĉiu, kiu volis aŭdi lin, ke se oni al li donus municiojn kaj sufiĉajn homojn li kapablus preni Zaragozon sen helpo de aliaj trupoj. Simone Weil, ĉeestanta en la kolono, notis la 16-an de aŭgusto sur sia militkajero:

> *Telefona interparolo Durruti-Santillán. Por la preno de Quinto oni bezonus 1200 virojn sen kanonoj. Kun kanonoj ni povus alveni ĉe la pordoj de Zaragozo. Tre energia. Ni povas bombardi Zaragozon.*[64]

Li havis plurajn maŝinpafilojn sen municio kaj ne disponis rezervojn, kiel ankaŭ okazis en la aliaj kolonoj, tial li ne povintus entrepreni atakagon kvankam li volintus.Trans la rivero estis Quinto kaj Fuentes de Ebro, kiuj al li neebligis la antaŭeniron. Durruti estis kolerigita; Zaragozo havis por li specialan gravecon kaj li ne atingis vidi ĝin proksima. Ofte alvenis tieaj fuĝintoj al liaj trupoj kaj la grupoj de gerilanoj nokte revenis en la urbon por eltiri ĉiujn eblajn kamaradojn el tiu buĉejo. Danke al ili, Durruti povis esti bone informita pri la trupoj, kiuj defendis Zaragozon, ne ĉiam multnombraj, kaj pri ilia armilaro, ne tro abunda. La ebloj preni ĝin, kvankam malgrandaj, ekzistis. La korespondanto de Pravda, Mijail Koltsov, la unua rusa spiono, kiu vizitis lin, rakontis disputon okazinta meze de aŭgusto inter Durruti kaj Manuel Trueba, la militistestro de la Kolono Karolo Markso (komence nomita Kolono ĜUL-USPK). Antaŭ la hezitemo de la stalinisto, Durruti al li ĵetis:

> *Se vi deziras, helpu; se vi ne deziras, ne helpu! La operacio pri Zaragozo estas mia, laŭ la milita, la politika kaj la politika-milita aspekto. Mi respondecas pri ĝi. Ĉu vi kreas, ke vi donas al ni mil homojn ni dividos Zaragozon kun vi? En Zaragozo*

---

63 Felipe Díaz Sandino, *De la Conspiración a la Revolución (1929-1937)* (hispane, De la Konspiro al la Revolucio (1929-1937)), Ediciones Libertarias, Madrido, 1990.

64 Simone Weil, «Journal d’Espagne» (france, Taglibro de Hispanujo), en *Écrits historiques et politiques. II* (france, Historiaj kaj politikaj skribaĵoj. II), Gallimard, Parizo, 1991.

*estos liberecana komunismo aŭ faŝismo. Prenu por vi la tutan Hispanujon!, sed lasu min trankvile kun Zaragozo!*[65]

Alimomente li animis siajn volontarmeanojn. Kiam li alparolis Koltsov-on kaj ties akompanantojn de USPK diris:

*Ni montros al vi, rusaj kaj hispanaj bolŝevikoj, kiel oni faras revolucion kaj, kiel oni ĝin portas ĝis ĝiaj lastaj konsekvencoj. Vi tie havas diktatoradon, en via Ruĝa Armeo estas koloneloj kaj generaloj. En mia kolono ne estas majoroj nek subuloj, ĉiuj havas la saman rajton, ĉiuj estas soldatoj, ankaŭ mi estas soldato.*[66]

La 9-an de aŭgusto, en la politika amaskunveno organizita de la Urba Federacio de Sindikatoj, García Oliver diris, ke oni ne devis sekvi la rusan ekzemplon tamen sekvatage li certigis al Koltsov, ke

*... ne veris, ke la anarkiistoj kontraŭis Sovetion.*

*Ili amis kaj respektis la rusajn laboristojn kaj ne dubis, ke la rusaj laboristoj helpus Hispanujon. La anarkiistoj helpus Sovetion se necesas. Sovetio ne devis subtaksi en siaj planoj la grandan forton de la anarkiistaj hispanaj laboristoj.*[67]

La dezirata konfuzo inter sovetia Registaro kaj rusa popolo estis unu el la unuaj rimedoj de la konfederacia diplomatio, kiu, la 5-an, ĵus kreis Komitaton por Interligo kun la komunistoj, en kiu intervenis José Pérez Blonda kaj Facundo Roca de NKL, Antonio Sesé kaj Emilio García de ĜUL, Comorera de USPK kaj Herrera de IAF, kun «la

---

65 Mijail Koltsov, *Diario de la Guerra de España* (hispane, Taglibro de la milito de Hispanujo), Ruedo Ibérico, Parizo, 1963. Li estis korespondanto de Pravda kaj misinformanta agento de la Kremlo, tial liajn asertojn oni devas akcepti per la plej granda prudento kaj forĵeti ilin, kiam ili ne akordas kun aliaj fontoj.

66 Koltsov, citita verko.

67 Koltsov, citita verko. Similaj vortoj al tiuj, kiujn li diris al la rusa konsulo Antonov-Ovseenko (akto de la kunveno de la komitatoj la 14-an de oktobro, en la Arkivoj de NKL en Amsterdamo). Se ni kredas Koltsov-on, García Oliver certigis la 10-an de aŭgusto, ke li farus ĉion eblan por disciplini la konfederaciajn amasojn, sinteno pro kiu lin «oni akuzis en la manifestacioj interkonsenti kaj perfidi la anarkiismajn principojn» kaj, ke la liberecanaj gvidantoj «estis pretaj kunlabori kun burĝa kontraŭfaŝisma registaro».

komisio serĉi akordopunktojn, kiuj ekzistas inter ĉi tiuj institucioj, kaj submeti ilin al la diskutado kaj aprobo de tiuj, por poste diskonigi la publikajn gvidilojn kaj instrukciojn»[68]. Cetere, la demokratia organizo de la volontarmeoj, ties asembleoj de delegitoj kaj ties Komitato por la Milito ĉagrenis tiel 'García Oliver'-on, kiel Koltsov-on. Tiu pensis, ke pri militistaj aferoj nur devis esti estroj kaj ties ordonoj devis esti nediskuteblaj; kaj li klopodis diskonigi tiun ideon inter la hierarkio de NKL, kiu laŭvorte ĝin sekvos.

Same opiniis la sekvaj vizitantoj de Durruti alvenintaj al Bujaraloz du semajnojn post Koltsov, akompanitaj de la ĵurnalisto de *La Noche* José Pomés. Miravitlles, kiel membro de la Komitato pri la Volontarmeoj komisiita de ties Sekcio pri Propagando, kaj Ilya Ehrenburg, kiel korespondanto de *Izvestia* kaj agento de Moskvo, vespermanĝis kun Durruti kaj Carreño en la Venta Monzona, kiu samtempe estis stabejo kaj magazeno de nutraĵo-provizoj. La impresoj de Pomés meritas diskoniĝi, ĉar ĝuste tiu vizito servis, kiel preteksto al Ehrenburg por prepari fabelon por propagando de partio, tiu de Durruti rezignanta, destinita neatendite sukcesi en la liberecanaj vicoj:

> *Temo: la sukcesoj de la kolonoj de NKL kaj IAF, kiuj agadas per la plej granda disciplino direkte de Zaragozo. Kiam Durruti prononcas ĉi tiun nomon, sia vizaĝo lumiĝas: «Li ĝin okupos! Sendube li ĝin okupos!». Li jam povis esti ene de ĝi se pro kialoj de humaneco ili ne lin bremsis. Samkiel li okupos se necesas Valadolidon, Pamplonon... kion ajn, preta konkeri, per la nesubmetebla potenco de siaj kamaradoj ĉion, kion li renkontis sur la vojo ĝis la Atlantiko. Liaj legioj timas nenion.*
>
> *Oni parolas pri la Revolucio de Oktobro en Oviedo. Oni komentas artikolojn [kiuj kaŝas la rolon de la anarkiistoj] de Ehrenburg, kiujn ĉi tiu pravigas, kaj poste oni traktas la socian*

---

68 Dokumento publikigita en José Peirats, *La CNT y la revolución española* (hispane, NKL kaj la hispana revolucio), Ruedo Ibérico, París, 1978.

*demandon, la estontecon de Hispanujo kaj Katalunujo, kaj kompreneble, por tio oni faras historion pri la faŝisma movado. Durruti konkretigas novajn respondecojn. Poste ilin juĝos li, kun la Tribunalo de la Popolo, kiam finiĝos la kampanjo.*

*Durruti certigas, ke en tiuj teroj la vivo rapide socialiĝis, kaj oni milde atingis restarigi la interŝanĝon, kun granda kontentigo de la civitanoj kaj lia. Durruti estas malamiko de la malpura mono kaj revas forigi ĝin. La polemiko kreskis. Durruti kaj Ehrenburg malkonsentas pri kelkaj punktoj. Ĉiuj intervenas kaj stariĝas interesaj difinoj.*

*—Ni estas anarkiistoj —diras Durruti— kaj estas pruvantaj nian revolucian kaj konstruan kapablon. Ni faris la revolucion kaj scios konservi ĝin. Vi devenas de marksisma instruado kaj kompreneble malkonsentas. Oni telefonas lin de la militfronto de Osko, kie estas alia kolono de NKL kaj IAF. Post la telefona parolo liaj okuloj atingas plej grandan lumecon, li kunpremas la pugnojn kaj diras, ke oni devas agadi per pli granda energio.*[69]

69 «Durruti pruvis al Ehrenburg, kiel oni luktas kaj konstruas la socialismon», reproduktita en *Acción Libertaria*, organo de la Argentina Anarkikomunista Federacio, n-ro 23, Bonaero, 25-an de novembro 1936.

# 2. Osko

De post la 21-a de julio, en Katalunujo la povo restis en manoj de la Centra Komitato pri la Volontarmeoj, dum la kataluna registaro konservis nur kelkajn ŝajnojn, sed kiel la Komitato ne havis internan regularon, ĉiu departemento agadis laŭ la politika tendenco de sia delegito. Ne estis vera plenuma institucio kaj eĉ ne havis la simpatiojn de multaj liberecanaj gvidantoj, sed sufiĉis, ke la kataluna registaro volus ŝanĝi sin inkluzivante reprezentantojn de USPK kaj de Unió de Rabassaires*, por ke NKL perforte reagu, devigante ĝin rezigni. La Regiona Komitato de NKL ne volis esti en la registaro kaj ankaŭ ne, ke aliaj tion faris. La Centra Komitato pri la Volontarmeoj estis kompromisa solvo, portempa interkonsento inter la establitaj povoj kaj la potenco el la strato. Ĝia aŭtoritato estis minimuma ĉar ĝi regis nek la kontraŭfaŝismajn komitatojn de aliaj urboj nek ties patrolojn; ankaŭ ne la komitatojn de kvartalo aŭ sindikato de Barcelono, nek la patrolojn fervojajn, pri sano aŭ de la haveno. Ĝi malmulte influis la disvolviĝon de la milito, ĉar la kolonoj preskaŭ havis tutan aŭtonomecon kaj rekte provizis sin. Daŭris en la aktivularo la ĉagreno pro la rezigno deĉenigi la proletan revolucion kaj ĉi tiu ne volis transdoni la konkeritan pozicion. Finfine, ĝi estis neniu institucio de la revolucio kaj tio tre evidentis.

Dum la Delegitkunveno de Urbaj kaj Distriktaj Sindikatoj de dimanĉo 26-a de julio, kunvokita por akordigi la revenon en la laborpostenojn sen instrukcioj de socialigo kaj io simila, oni parolis «pri la senpacienco de kelkaj kolegoj, kiu volas iri pli for en la detruo de la faŝismo, sed nuntempe la

* Unió de Rabassaires i Altres Cultivadors del Camp de Catalunya (katalune, Unuiĝo de Terluantoj kaj Aliaj Terkulturistoj de la Kamparo de Katalunujo) estis sindikato de vitkulturistoj ne propruloj fondita en Katalunujo en 1922.

situacio en la tuta Hispanujo estas tre delikata. Rilate al la revolucia ordo, Katalunujo estas oazo en Hispanujo»[70]. La Regiona Komitato ĉi-rilate estis definitiva:

> *Hodiaŭ ne estas pli da malamiko por la popolo ol la ribelanta faŝismo. Kontraŭ ĝi ĉiuj energioj; por detrui ĝin ni devas alproksimiĝi al ĉiuj samopiniaj organizoj; al ĝia tuta ekstermo oni devas dediĉi ĉiujn aktivecojn kaj penadojn. Ke neniu iru pli for.*[71]

Same, oni decidis sendi delegiton al Madrido por kunveni kun la Nacia Komitato, kio okazis la 29-an. Ankaŭ ĉeestis la delegitoj de la madridaj sindikatoj pri Telefonoj, Metalurgio kaj Pluraj Oficoj. La delegito de Katalunujo informis pri la tuta hegemonio de NKL kaj elmetis

> *... ke la plimulto de la aktivularo ŝajnas preta, kiel konsekvenco de la superpotenco de la Organizo, ekstarigi la liberecanan komunismon en la tuta Katalunujo. Se la kolonoj el kolegoj, kiuj foriris al Zaragozo prenus ĉi tiun urbon, tiam ne eblos, ke la malplimulto retenos, kiel ĝis nun la plejparton de la organizo. Ili ekstarigos nian idearon ne konsiderante la kondiĉojn en kiuj disvolviĝos la cetero de la regionaj sindikatoj.*[72]

La provizora sekretario, David Antona, kaj la cetero de la ĉeestantoj ne estis tiel optimismaj. La nordo estis izolita, Andaluzujo kaj Aragono malorganizitaj, kun pluraj ĉefurboj en manoj de la ribeluloj, kaj en Valencio la situacio ankoraŭ estis konfuza. Sen pliaj aldonaĵoj, ili interkonsentis novan kunvenon por proksima Tutlanda Delegitkunveno en kiu, inter aliaj aferoj, oni traktos tiun de «iam neniigita la

70 Nek pri ĉi tiu, nek pri la du antaŭaj delegitkunvenoj oni konservas aktojn. La citaĵo aperas en cirkulero de la Regiona Komitato, kolektita de Peirats, *La CNT en la revolución española* (hispane, NKL en la hispana revolucio), Ruedo Ibérico, Parizo, 1978.

71 Unua interkonsento de la Delegitkunveno, publikigita en *Solidaridad Obrera* kaj reproduktita en *La Vanguardia*, 28-an de julio 1936.

72 «Akto de la kunveno de la Nacia Komitato okazigita la 29-an de julio 1936 je la 10a matene», IISH, Amsterdamo.

kontraŭfaŝisma ŝtatrenverso, kiun sintenon devos adopti la organizo»[73].

La 2-an de aŭgusto okazis en Barcelono urba Delegitkunveno de Sindikatoj de regula karaktero, t. e., kun la sola ĉeesto de rektaj delegitoj de la sindikatoj. Oni nur parolis pri tujaj praktikaj problemoj kiel, ekzemple, la regado de la propraj volontarmeoj, la socialigo de la produktejoj en manoj de la laboristoj kaj la administrado de la multnombra kvanto da aliĝantoj. La temoj, kiujn oni ne povis trakti, prokrastiĝis al nova Delegitkunveno, kiu okazos semajnon poste. Sed samtage okazis Regiona Delegitkunveno de Distriktaj kaj Urbaj Sindikatoj, en kiu la Nacia Komitato informis, proponis novan sekretarion por la Organizo kaj diskutis, por la proksima Tutlanda Delegitkunveno, pri la «konveneco aŭ ne partopreni en la Kontraŭfaŝisma Nacia Komitato»[74]. La gvidantaro de NKL jam pripensis la partoprenon en unueca registaro, kvankam nomante ĝin «komitato», kvazaŭ la nomo ŝanĝus la aĵon. Poste ĝi preferis «konsilantaron». La Tutlanda Delegitkunveno okazis la 4-an de aŭgusto, ĉeestante nur tri regionaj: Katalunujo, Oriento kaj Centro. Horacio Martínez Prieto estis enoficigita nova sekretario de la N.K. kaj pri la fundamenta demando supre menciita nur estis interŝanĝo de opinioj. La decido prokrastiĝis por nova Delegitkunveno, al kiu povus ĉeesti ĉiuj regionaj sindikatoj, sed oni ne okazigis alian ĝis septembro kaj en tiu la demando limiĝis al la propono pri Nacia Konsilantaro pri Defendo, speco de kaŝita registaro[75]. Ja okazis Regiona Delegitkunveno de Centro, menciita de Cipriano Mera en tre posta intervjuo:

73 «Akto de la kunveno de la Nacia Komitato okazigita la 29-an de julio 1936 je la 10a matene», citita verko.

74 La Vanguardia, 2-an de aŭgusto 1936.

75 «Akto de la Tutlanda Delegitkunveno de Regionaj Sindikatoj kunvokita de la Nacia Komitato en Madrido la 4-an de aŭgusto 1936», IISH, Amsterdamo.

*Intervjuanto.– En la unuaj tagoj de la milito, kiel estiĝis, ekz-e, la interkonsento sendi delegitaron de NKL diskuti kun la Prezidanto de la kataluna registaro, Companys?*

*Mera.– Mi ignoras tion, ĉar oni ne demandis la regionajn sindikatojn. Kunvenintaj en la regiona sindikatejo de la Centro por aŭskulti la informon de du elstaraj aktivuloj, pluraj kolegoj opiniis kontraŭ tiu interkonsento konsiderante ĝin, kiel malforteco. Ni opiniis, ke NKL ne havis kial akcepti la kunlaboradon, samkiel ne havis kial akcepti la militistigon.*

*Intervjuanto.– Kiu estis en tiu kunveno la plimulta sento?*

*Mera.– La plimulta sinteno estis de muta aprobo, rezignaciinta kaj kvazaŭ fatala antaŭ realo, kiu jam superregis aferstaton, kiun oni ne antaŭvidis. Ne estis polemiko aŭ kategoria malkonsento.*[76]

En la informo de la delegitaro de NKL al la Eksterordinara Kongreso de ILA oni parolas pri Tutlanda Delegitkunveno de Regionaj okazinta en Madrido la 28-an de julio en kiu

*... oni unuanime decidis ne fari diktatorajn realigojn nek paroli pri liberecana komunismo dum daŭras la milito, kaj ankaŭ deklaris sin la Delegitkunveno por la kunlaborado kun la aliaj partioj kaj organizoj, tre ĉefe kun ĜUL, kunlaborante en ĉiuj institucioj stariĝintaj en la diversaj urboj.*[77]

Evidente, tio estas intenca eraro, tia Delegitkunveno neniam ekzistis kaj tiaj asertoj fariĝis cele kaŝi, ke la decido kunlabori kun la burĝaj institucioj kaj rezigni la socian revolucion estis unuflanke adoptita de la respondecaj komitatoj. Mariano R. Vázquez en sia artikolo por la eldono de De julio a julio korektis la daton:

*NKL kunvenis en Tutlanda Delegitkunveno de Regionaj je unuaj de aŭgusto kaj decidis tion saman, kion la kataluna*

76 «Intervjuo al Cipriano Mera: ĉu oni rezignis la revolucion?», *Presencia, Tribuna libertaria*, n-ro 6, Novembro-decembron 1966, Parizo.

77 *Informo de la delegitaro de NKL al la Eksterordinara Kongreso de ILA kaj ties rezolucioj*. Decembron 1937, citita verko.

*regiona sindikato interkonsentis la 20-an de julio: Ne estas liberecana komunismo. Ni unue detruu la faŝismon.*

En Katalunujo la burokrataro mem de NKL estis alfrontita inter si. La partianoj subteni la hegemonion per la Komitato pri la Volontarmeoj, García Oliver ekz-e, kaŝe kontraŭstaris la Regionan kaj Duoninsulan Komitatojn, ambaŭ inklinaj al la inkluzivo de la «sociaj konkeroj» en la leĝa maŝinaro de la kataluna registaro pere de amaso da komisionoj, konsilantaroj aŭ estraroj pli aŭ malpli «funkciantaj ene de» la konsilantarfakoj de la kataluna registaro. Do oni ekparolis pri «restrukturado» kaj «simpligo de la Komitato pri la Volontarmeoj», kreante sendependajn instituciojn, kiuj prenis sur sin parton de ĝiaj koncernaj fakoj: la Konsilantaro pri Ekonomio, la Konsilantaro pri la Unuiĝinta Nova Lernejo, la Konsilantaro pri Nutraĵ-provizado, la Komisiono por Esploro, la Komisiono pri la Industrioj por Milito... La departementoj de Justeco kaj Publika Ordo, nominale de la Komitato, aŭtonome agadis. Intence kunordigi kaj gvidi, la Pleno de la Komitato pri la Volontarmeoj okazigis konstantajn kunsidojn en la sidejo de Regiona Ĉefgeneralo. Laŭ la respublikano Joan Pons,

*...La kunvenoj nur estis utilaj por ke homoj, kiel García Oliver, Vidiella kaj Rovira elmetu siajn talentojn pri la oratoreco per longaj kaj enuigaj paroladoj.*

*Kiel estus la afero, ke la sekretario, Miravitlles —kelkfoje pro maldiligenteco, aliaj pro manko de akordoj kaj aliaj pro la negraveco de la traktitaj temoj— redaktis neniun akton pri tiom da kunvenoj.*[78]

78 Pons, citita verko. La urbestro de Barcelono Carles Pi i Sunyer diras ion similan: «Pro la relative granda nombro de ĝiaj membroj, la kunvenoj de la Komitato iĝis oratoraj turniroj, kie abundis la fanatikeco kaj la demagogio», en *La guerra 1936-1939. Memòries* (katalune, La milito 1936-1939. Memoraĵoj), Editorial Pòrtic, Barcelono, 1986. De la Komitato oni konservas dek sep aktojn, el kiuj dek kvar nur estas resumoj.

Meze de aŭgusto la Komitato pri la Volontarmeoj malpliigis siajn funkciojn je la militistaj de la militfronto de Aragono. Sed la ĉefa zorgo de la liberecanaj gvidantoj ne estis tiu militfronto, sed la divido de la povo kun la estroj de la aliaj partioj, kiuj, avidaj pligrandigi siajn povkvantojn, konspiris kontraŭ la aferstato, tro favora al NKL. Estat Català* intrigis kontraŭ Companys kaj IAF, Companys kaj Comorera kontraŭ la Komitato pri la Volontarmeoj, Del Barrio kontraŭ la Industrioj por Milito, ktp. Ene de la liberecana movado, Santillán, Federica kaj Marianet starigis partion kontraŭ García Oliver, Aurelio Fernández, Asens kaj Alcón. Tamen neniu klare parolis por denunci tiun ludon de etanimaj interesoj. Frukto el tiu malafabla medio estis la absurda operacio de Majorko, kiu nur servis por forpreni rimedojn kaj armilojn de la militfronto de Aragono. Estis ago, kaŝe de la Centra Komitato pri la Volontarmeoj, stimulita de stranga akordo inter la kataluna registaro, Kataluna Ŝtato, USPK kaj la plimulta sektoro de la burokrataro de NKL-IAF. Ree, Regiona Delegitkunveno estis scenejo de la alfronto inter la tezoj de Abad de Santillán kaj tiuj de García Oliver. Dum ĉi tiu inklinis por forigi la katalunan registaron, la Delegitkunveno akordigis la malfondon de la Komitato pri la Volontarmeoj «procedante je la kreo de tiom da Konsilantaroj, kiom la politikaj bezonoj de la vivo de Katalunujo postulos»[79]. Dum ĝi ankoraŭ funkcios, «la Centra Komitato pri la Volontarmeoj ne povu fari nek realigi aliaĵon,

* NeT: katalune, Kataluna Ŝtato, politika partio de kataluna sendependema karaktero, fondita en 1922. Poste, je la 1930-aj jaroj, ĝi iĝis kvazaŭfaŝisma partio.

79 Estis la Delegitkunveno de Urbaj kaj Distriktaj Sindikatoj de la 17-a de aŭgusto; pri kiu oni nur konas la rezoluciproponon pri la malfondo de la Komitato, ĉar ĝi aperis en la akto de la Regiona Delegitkunveno de IAF okazigita en Barcelono la 21-an, en la DIHM (NeT: Dokumenta Institucio pri Historia Memoro) de Salamanko. Aurelio Fernández, kiu ĉeestis en la Delegitkunveno reprezentante la grupon Nosotros, konsente kun Federica kaj Santillán, kiuj havis la ĉefan voĉon, nur informis pri la mankoj de armilaro en la militfronto kaj insistis pri tio, ke forlasis la postmilitfronton «la kolegoj, kiuj ne volas lasi la armilon».

kio ne konformiĝas al tio akordigita de la Organizo»[80]. Kvardek jaroj poste, García Oliver klarigis sian sensukcesan strategion:

> *... La Revolucion mi vidis alveni per la Komitato pri la Volontarmeoj kaj tial mi klopodis koncentri la tutan povon en la Komitaton, por ke la tago kiam la Organizo diru: jam!... estus la aferoj tiel pretaj, ke preni ĉion estus io tiel, kiel meti aŭ ne meti subskribon. Sed la Organizo neniam tion diris.*[81]

Konata la fakto, ke la revolucio ne aperis en la planoj de la gvidantoj de la «Organizo», ne eblas dubi pri tio, ke ĉi tiuj eĉ malpli deziris, ke García Oliver «koncentru» troan povon en sian personon; tial ili preferis pli oficialan kunlaboradon. NKL, kaj ĉefe IAF, estis gvidataj de porintertraktada burokrataro estigita, kiel rezulto de la Kongreso de Zaragozo kun interesoj ĉiam pli kaj pli diferencaj je la aliĝantaro. Ian rilaton havis la kutima subtera agmaniero de la framasonaro; pri Federica, Marianet, Birlán, Fàbregas, Vivancos, García Oliver, Santillán kaj multaj aliaj oni diris aŭ suspektis, ke ili estis framasonoj, kaj iliaj manieroj ĉiam estis videble akompanitaj de tiu burĝa konspira nuanco tipa de tiu frataro, kun aldona inklino kunlabori kun la kataluna registaro eĉ je normalaj cirkonstancoj, kio faris ekkrii Companys, kiam li estis intervjuita de franca revuo: «Mi trovis en IAF konstruajn disponojn de la plej granda intereso kaj, vi povas kredi min, tre laŭraciajn»[82]. La kataluna prezidanto perfekte komprenis la politikan nulecon de la respublika burĝaro post la "ribelo", kio kondukis lin protekti sin ĉe la proletaro, eĉ koste de la

---

80 Akto de la kunveno de komitatoj okazigita la 9-an de septembro 1936, IISH, Amsterdamo.

81 Fondaĵo Salvador Seguí, *Colección de Historia Oral. Juan García Oliver* (hispane, Kolekto de parola historio. Juan García Oliver), citita verko.

82 Deklaroj de la prezidanto Companys al la verkisto Jean Cassou, *Vu*, 15-an de septembro 1936.

perdo de siaj klasprivilegioj. Je tiuj tagoj li respondis al la ĵurnalisto Langdon-Davies:

> *L-D: Ĉu malpliiĝis la povo de la kataluna demokratia burĝa registaro, kiel konsekvenco de la kreskanta interveno de NKL en la registaron?*
>
> *Companys: Ne. NKL prenis sur sin, kune kun aliaj organizoj de la Popola Fronto, la funkciojn de prigardado kaj protektado de la socio, kiuj forlasis la ribelan armeon kaj ĝi iĝis armilo en manoj de la demokratia registaro. Post la perfido de la normalaj gardistoj de la publika ordo, ni turnas nin al la proletaro serĉante protektadon.*[83]

Meze de aŭgusto, la haltigo de la progreso de la kolonoj estis fakto. Tio evidentigis negativan faktoron, t. e., la lacecon pro la malkomfortoj de la militfronto, danĝeran, ĉar tio malfermis la pordon al la nostalgio, la senkuraĝiĝo kaj la memforlaso. Post monato de la eliro el Barcelono, la Komitato por la Milito ne povis solvi la lavangon de petoj pri forpermesoj, kiu minacis detrui la tutan organizan laboron plenumitan. Durruti devis memorigi la signifon de la milito:

> *Ni venis militi kaj ne praktiki sporton kaj en lukto havanta tiel eminentajn celojn, kiel tiujn celatajn de ni, tiu forlasanta sian postenon ne plenumas la devojn, kiujn al ni trudas la cirkonstancoj. Estas la libero minacata kaj la estonteco estas kreanta kaj konkeranta sin per ĉies apogo, en ĉiu momento de la tago.*
>
> *Alveninte al la militfronto, la volontarmeano venas por sinoferi sian vivon, oferi komfortojn, fordoni sian tutan eston por la venko de nia afero. Kiu ne venas kun ĉi tiuj kapabloj ne estas utilaj por la militfronto.*
>
> *Oni devas malligiĝi de ĉiu obstaklo, kiu ne estu atingi per persistado kaj energio la venkon.*[84]

---

83 Langdon-Davies, citita verko.

84 *El Frente*, Bulteno de Milito de la Kolono Durruti, n-ro 3, 27-an de aŭgusto 1936.

Por Durruti, kiu kredis havi la venkon atingebla, estis la horo de la sinofero kaj oni devis elekti inter la familio aŭ la lukto:

*Kiu ne estis preta flanklasi la konvenecojn de la familio por doni liberan esprimon al la revolucia sento, kiu devas nin porti en la venkon, ke li transdonu siajn armilojn al restantoj, kaj foriru en siajn hejmojn, kie la familioj sen konvinkoj lin atendas.*[85]

Durruti povis malmole paroli, sed en lia kolono la centopoj havis la finan decidon. Kiel li mem poste rakontis al Eduardo de Guzmán: «Ĉi tiu ne estas armeo, kiel tiu, kiun vi jam vidis en aliaj militfrontoj. Ĉi tie ne estas generaloj, nek steloj, nek skarpoj. Ĉi tie nur estas kolegoj luktantaj por la revolucio»[86]. Iun vesperon de aŭgusto relative trankvilan alvenis volontarmeanoj ĝenataj de unu el ili, kiu volis foriri. Durruti diris, ke li transdonu la fusilon kaj piede marŝu tiel, kiel oni interkonsentis:

*Volontarmeano.– Ne estas unu, kiu volas fuĝi, Durruti.*

*Durruti.– Do kiu estas?*

*Volontarmeano.– Tiu volontarmeano havas malsanan filon kaj volus foresti ne pli ol kvardek ok horoj.*

*Durruti.– Tio estas alia afero, sed je la venonta tagiĝo ni devas ataki. Ĉu vi ja volas foriri?*

*Aludito.– Jes.*

*Durruti.– Nu, vi foriros ĉiam, kiam la asembleo de kolegoj, ĉiuj ni, kiuj venis lukti, tion al vi permesos. [Post minuto kuniĝis pluraj grupoj kaj ĉiu volontarmeano opiniis.]*

*—Ke iru.*

*—Ke ne iru.*

*—Ke atendu.*

---

85 *El Frente*, n-ro 4, 29-an de aŭgusto 1936.

86 Raportaĵo citita en *La Libertad*, 19-an de septembro 1936.

*—Ke tuj nun foriru.*

*—Ni voĉdonu!*

*[Ili voĉdonis kaj la rezulto preskaŭ unuanime estis, ke li foriru.]*

*Durruti.– Kamarado volontarmeano, ke oni al vi faru la permisilojn kaj foriru vidi vian filon.*

*La volontarmeano prenis sian paspermesilon en la barako de la oficejoj kaj deiris, akurate revenante du tagojn poste.*[87]

Tamen, la familiaj aferoj estis problemo kaj Durruti klopodis solvi ĝin permesante la vizitojn de la parencoj ĉe la militfronto, kio siavice estigis alian. Finfine oni devis peti al la parencoj, ke ili ne sendu ĉe la militfronto alarmigajn telegramojn kaj ĉefe, ke ili ne alvenu.[88]

Ĉirkaŭ la 20-a de aŭgusto Durruti vojaĝis en Barcelonon por ĉeesti al Regiona Delegitkunveno. La Regiona Komitato estis premita de la sindikatoj, kiuj demandis sin pri la daŭro de la milito kaj la manko de gravaj venkoj, kaj ĉi tiu decidis trakti la aferon kunvokante “García Oliver”-on, kiel respondeculon pri Milito en la Komitato pri la Volontarmeoj kaj la estrojn de la liberecanaj kolonoj al Delegitkunveno de Urbaj kaj Distriktaj Sindikatoj. Durruti donis klarigojn pri la kialo de la paralizo de la militfronto sen tio, ke iu lin sugestus eksiĝi kaj sen tio, ke li donis signojn deziri ĝin; la manko de armiloj estis tio plej grava kaj li ne havis rezervojn montri la respondecon de la postmilitfronto pri tio, ĝis la punkto, ke la Delegitkunveno prenis «la definitivan interkonsenton senarmigi la sepdek procenton el la volontarmeanoj de la respektivaj organizoj, kiuj konsistis la Kontraŭfaŝisman sektoron»[89] interkonsento pli ol malfacile realigebla. Oni ankaŭ menciis la konduton kaj

87 Anekdoto publikigita en *Acracia*, 4-an de decembro 1936.

88 Durruti, «Petego al la parencoj de la volontarmeanoj», *Solidaridad Obrera*, 27-an de oktobro 1936.

89 Ĉefartikolo de *Solidaridad Obrera*, 25-an de aŭgusto 1936.

moralon de la volontarmeanoj, la mankon de kunordigo inter la kolonoj kaj eĉ la konkurecon inter iliaj estroj, tial la fina konkludo de la Delegitkunveno deturnis sin, kiel estis planite, al la disciplino kaj la ununura komando. Tiam ja rimarkiĝis la influo de García Oliver, ĉar kiel ankoraŭ funkciis la Komitato pri la Volontarmeoj, li estis la respondeculo enoficigi estron pri operacioj por la tuta militfronto. Li venĝis kontraŭ Durruti ne elektante lin ĉar li estis «tre limigita pri talentoj de komando», t. e., ĉar li dividis la direkton kun sia Komitato por la Milito kaj permesis, ke liaj volontarmeanoj familiarece trakti lin, kvankam dum la kunveno de oktobro kun la estroj de kolonoj García Oliver diris, tamen, ke li faris tion por ne montri sin partiano antaŭ la komunistoj. Li gloris la virtojn por la komando de Ortiz, kvankam ne devis ignori, ke ties estreco estis pridubita de ties direktaraj kunuloj, Carod kaj Castán, ekz-e, kaj de pluraj centopoj lokitaj en Zaida, kiuj formulis gravajn akuzojn antaŭ la komitatoj, kiuj ja lin minacis per la eksigo. Oni akuzis lin pri despota trakto kaj nerespondeca militista konduto, ĉar li ordonis la malmulte honoran retiriĝon de Belchite, paralizante la progreson al Zaragozo trans Ebro. García Oliver pravigis la retiriĝon pro manko de artilerio, sed Asens indikis en la Komitato pri la Volontarmeoj la konvenecon esplori lian agadon kaj ĉi tiu delegis en Antoni Soler la ellaboradon de informo.[90] Fine, García Oliver enoficigis, kiel estron de operacioj, la kolonelon Villalba, militisto apogita de Companys, suspekta simpatii kun la ribeluloj kaj kun frato en la alia flanko. Li estis fervora katoliko kaj ĉiam portis kun si valizon kun la neputrema brako de Sankta Teresa, akirita al volontarmeanoj. Lia strategia vidado iĝis miopa pro la serĉo de militista profito. La unuajn tagojn Villalba koliziis kun la volontarmeanoj, kiuj fine ignoris lin. La elekto ne

90 Aktoj de la CKKV de la 2-a, 4-a kaj 8-a de septembro 1936, en Diversaj Aŭtoroj, *Ordre públic i violencia a Catalunya* (katalune, Publika ordo kaj perforto en Katalunujo), citita verko.

povis esti plej malbona. Villalba funkciis, kiel estro de la sektoro inter Pireneoj kaj Leciñena nur apogita de la komunistoj kaj respublikanoj. Durruti kaj Ortiz restis, kiel estroj de siaj respektivaj sektoroj dekstre kaj maldekstre de la rivero Ebro.

Durruti povis konstati en Barcelono ĝis kiom estis indiferenta la postmilitfronto pri la necesoj de la militfronto kaj kiom granda estis la disigo inter unu kaj la alia. Rakontis Fontaura, tiam redaktisto de la *Soli* kaj preskaŭ anstataŭa direktisto, ke dum liaj mallongaj estadoj en Barcelono

> *... li kutimis kolekti impresojn, kiuj sen cedigi lian bone kuraĝan volon kaŭzis al li certan amarecon, fortan impreson de disreviĝo. Pri tio li nur alparolis la plej intimajn el siaj amikoj. Al li kaŭzis profundan ĉagrenon rimarki en la postmilitfronto la malbone vualitajn ambiciojn, la internan lukton, kiu serĉis materialajn profitojn, la hipokritecon de supozitaj idealistoj, la bonan vivon de la «militevituloj»; unuvorte, medio el frivoleco kaj falseco. Ĉio tute fremda al la afero de la kontraŭfaŝismo, por kiu en la militfrontoj lokiĝis tiuj pretaj fordoni la vivon!*[91]

Tial kelkfoje li ne povis eviti la ironion eĉ kun siaj plej proksimaj amikoj. Kiam li ricevis la viziton de Vicente Pérez, Combina, demandis lin: «Kaj dum ni luktas, kion vi faras tie?»; kaj ĉi tiu al li klarigis la malfacilan laboron plenumita de la Sindikato pri Transportoj por konstrui novan socion sur la ruinoj de la malnova. Tiam Durruti lin interrompis meze de la frazo:

> *Durruti.– Jes, jes. Kaj dume vi vivas iom foraj de la pafoj.*
>
> *Combina.– Se vi volas, mi tuj restas ĉi tie. Finfine ĉi tiu lukto estas multe pli bela ol tiea.*
>
> *Durruti.– Estas ŝerco. Vi devas reveni al Barcelono, kiel la aliaj. Vi devas realigi bonegan laboron. Necesas, ke kiam ni*

91 Fontaura, *La estela de los recuerdos* (hispane, La spuro de la memoraĵoj), Asocio Isaac Puente, Vitorio, 1986.

*revenos ĉio estu ŝanĝita. Tie, en la urbo, vi estas tre bezonaj. Ĉi tie, ni estas pli ol sufiĉaj por venki la faŝismon.*[92]

La prezidanto Companys mem rekonis, ke ne estis armiloj por ĉiuj, kaj dubis, ke la kontraŭfaŝismaj volontarmeoj disponus «pli ol ses aŭ sep mil da fusiloj»[93]. Oni kalkulis, ke en la postmilitfronto eble estis kvindek mil fusilojn kaj kelkan dekduojn da maŝinpafiloj, sed malgraŭ la petoj neniu faris ion praktikan ĉar timis resti en kondiĉoj de malsupereco antaŭ la najbaro. Se vere la liberecana komunismo dependis de la preno de Zaragozo oni ne komprenas, ke NKL ne tute penados por tiu komisio. Raportas Santillán, ke Durruti «blekis, kiel leono» ĉiam, kiam li vojaĝis en la ĉefurbon kaj renkontis armitajn virojn. Manuel Hernández rakontis, ke dum liaj vizitoj al Barcelono:

*Li eltiris la pistolojn el la poŝo al ni, al siaj propraj kamaradoj, finfine ni ankaŭ devis protekti nin, sed oni povis fari nenion.*

*—Por kio vi volas pistolon en la postmilitfronto? —li kriis—, donu ĝin al mi aŭ venu ĉe la militfronto kun ni, se vi ne volas transdoni ĝin.*

*Li tiel traktis la anarkiistojn, siajn proprajn kolegojn.*[94]

Se tiela estis lia konduto kun la liaj, kiel estus kun la ceteruloj. Eksciante la ekziston de abundaj sencelaj armiloj en magazeno de Sabadell destinitaj al loka kolono, kiu neniam fondiĝis, li sendis Carreño-n kun kelkaj volontarmeanoj por forpreni ilin, kvankam estu per sango kaj fero, al la lokaj stalinistoj, plimultaj en la urba komitato. Santillán povis haltigi la kolizion, tamen Carreño akiris la armilojn, kiuj estis utilaj por ekipi la lastajn sendojn de

92 «Kun Durruti, sur la vojo de Zaragozo», *Solidaridad Obrera,* 24-an de septembro 1936.

93 Intervjuo farita fine de aŭgusto de Langdon Davies, en *Detrás de las barricadas españolas* (hispane, Malantaŭ la hispanaj barikadoj), citita verko.

94 Enzensberger, citita verko.

volontuloj, la Kolono Malatesta, de Mataró kaj la centopo de Graells.

La situacio daŭre estis senŝanĝa komence de septembro. La malabundeco de armilaro kaj municio rimarkiĝis malgraŭ la senaktiveco aŭ ĝuste pro ĝi. Tamen, kiam ĵurnalisto de Daily Herald, ĵurnalo de la brita Laborista Partio, lin intervjuis en Bujaraloz, Durruti fieris pri sia grupo kaj eĉ al li certigis la prenon de Zaragozo:

> *Se ni obeas la leĝojn de la milito, Zaragozo estas nekonkerebla. Ĝiaj defendantoj estas duoble pli multnombraj ol ni. Sed ankaŭ, laŭ la leĝoj de la milito, antaŭ longe ili volas nin ekstermi, kaj ni ĉiam estas en nia posteno kaj portas la iniciaton de niaj operacioj*
>
> *[...]*
>
> *Ĉiusemajne nova kolono eliras el Barcelono kaj ĉiufoje ni estas pli bone ekipataj per militaviadiloj, kanonoj kaj municioj. Krome, ni kunligas nian agadon kun tiu de la militfronto de Osko, kvindek kilometrojn norde. Oni tre malĝojiĝos en Zaragozo, kiam niaj trupoj tranĉos ilian linion de retiriĝo.*[95]

La intervjuo, kiu estis reproduktita en la *Soli*, enhavis frazon, kiu post lia morto povus allasi misinterpretojn: «Ni estas anarkiistoj, sed nun ni havas solan penson: venki la faŝismon»[96].

Li ankaŭ montriĝis optimisma en la letero sendita al la argentinaj laboristoj:

> *Kiam vi ricevos ĉi tiujn fratajn literojn, la faŝismo estos ricevinta sian meritaĵon, la kolono, kiun mi reprezentas, konsistigita de aŭtentikaj laboristoj, heroe luktas je 18 kilometroj de Zaragozo per entuziasmo kaj abnegacio, ĉar ili havas fidon pri idealo, kiu nin animas kaj ne forlasas nin solan momenton. Ne kredu, ke mi vin faras alvokon pro tio, ke ni*

95 «Nia kamarado Durruti faras interesajn deklarojn al “Daily Herald” de Londono», *Solidaridad Obrera*, 6-an de septembro 1936.

96 En la sama verko.

*estas en senespera situacio. Ne, ni estas optimismaj. Niaj pozicioj estas avantaĝaj kaj baldaŭ la tempo, kiu estas pli konsekvenca ol ĉio, kion mi al vi povas diri, konstatos laŭ decida maniero, kiuj estas la plej fortaj kaj noblaj.*

*Se mi alvokas vin, estas rigardante pasintecen kaj estontecen, kiam ni bezonos ĉiujn vin por rekonstrui justan kaj humanan Hispanujon sur la ruinoj de la hispanaj plutokratio kaj faŝismo.*

*Fidu nin kun la certo, ke ni scios esti indaj de la proletaro de la tuta mondo kaj aparte de niaj argentinaj fratoj.*

*Nome de la Kontraŭfaŝismaj Volontarmeoj vin salutas via amiko,*

*B. DURRUTI.*

*Pina de Ebro, 1-an de septembro 1936.*[97]

Sed la aferoj estis, kiel estis. Okaze de la enterigo de kamarado forpasinta pro akcidento de aŭto je tiuj datoj, José Xena, parolante pri Durruti, konfesis al Peirats: «Estis honto ne povi alporti pli ol kvar aŭ kvin mil homojn pro manko de armiloj, dum ni, kiuj hejme restas, havas nian fusilon»[98]. La realo estis multe pli malbona, ĉar estis multe pli da homoj, kiuj foriris al Zaragozo; tial Durruti plendis antaŭ la landaj ĵurnalistoj pri la manko de fusiloj. La korespondanto de la agentejo Febus ĉe la aragona militfronto raportis:

*Li petegis, ke ni informu, ke la armiloj estas por la milito kaj, ke en la postmilitfronto ili estas ne bezonaj. Ne sufiĉas sendi homojn, sed konvenas, ke ĉi tiuj homoj havu en siaj manoj la bezonajn armilojn.*[99]

97 *Acción Libertaria*, Argentina Anarkikomunisma Federacio, Bonaero, n-ro 22, 21-an de oktobro 1936.

98 José Peirats Valls, *De mi paso por la vida. Memorias* (hispane, Pri mia paso tra la vivo. Memoraĵoj), Flor del Viento Ediciones, Barcelono, 2009.

99 «Durruti petas la fusilojn de la postmilitfronto», *ABC*, Madrido, 6-an de septembro 1936.

La minaca tono de liaj vortoj montris seriozan ĉagrenon:

> *La armilojn ni bezonas kaj ili devas veni ĉi tien propra-vole aŭ perforte. Se necesas mi mem metos min ĉekape de kolono por kapti tiujn armilojn. La armiloj estas por la milito; en la postmilitfronto estas ne bezonaj. Necesas, ke oni ne uzu la armilojn por ornamaj servoj, kiam ili povas esti bezonaj por venki la ribelulojn.*[100]

La manko de armiloj almenaŭ havis pozitivan kompenson, disponi pli da tempo por la revolucia verko. En intervjuo al li farita de la liberecana raportisto Eduardo de Guzmán li klarigis:

> *Ni estas realigantaj profundan transformon. Se estas malfacile fari la revolucion en la urbo, en la postmilitfronto, estas pli malfacile fari ĝin en la militfronto, fronte al la malamiko, en tuta kaj konstanta lukto. Kaj, tamen, ni estas atingantaj ĝin en la aliaj kaj en ni mem. Vizitu la proksimajn vilaĝojn kaj vi vidos, kiel la revolucio estas fakto; observu la vivon, kiun ni faras, kiel ni agadas kaj fine vi konvinkos vin.*[101]

La organiza kapablo de la liberecanaj aktivuloj kaj ties propaganda laboro en la postmilitfronto estis io rekonita eĉ de iliaj najbaroj, la stalinistoj de la Kolono Karolo Markso laŭ oni povas legi en la sekva informo:

> *Nepras, ke nia partio kaj niaj sindikataj organizoj komencu sendi homojn al ĉi tiuj teroj. La anarkiistoj tion faras kun grandaj rezultoj [...] La anarkiistoj disvolvas grandegan kampanjon kaj profitas ĉiujn procedurojn. Ekzemple, la kruĉoj da akvo. Ni havis gravan malabundecon de ili. Nu la anarkiistoj disdonas en ĉiuj militfrontoj kruĉojn da akvo kun la konata surskribo NKL-IAF. Ne necesas paroli pri ŝultrotukoj, ĉapoj, ktp.*[102]

---

100 Publikigita en *El Sol,* 6-an de septembro 1936 kaj en *La Libertad*, 9-an de septembro 1936.

101 Eduardo de Guzmán, «Sur la vojo de Zaragozo». *La Libertad*, sendependa respublika ĵurnalo, Madrido, 19-an de septembro 1936.

La abundo de insignoj de NKL en la tuta militfronto faris ekkrii al Del Barrio, politika estro de la stalinista kolono: «Mi volas, ke ĉiuj niaj volontarmeanoj surportu ion, kio montru al ĉiuj, ke ili apartenas al ĜUL!»[103]. Sed la koleriga liberecana supereco en la ĉiutagaj detaloj ne nur inkluzivis la kaskedojn aŭ flagojn, indikitaj per malestimo de Koltsov. "Del Barrio"-n tiuj aĵoj multege ĝenis:

> *Niaj volontarmeanoj skribas al siaj hejmoj per la poŝtkartoj, kiujn sendas IAF kun sia flago. Kial «Eŭropo Ameriko» al ni ne eldonas milionon da poŝtkartoj kun la ruĝa flago kaj la falĉileto kaj la martelo kaj la komencliteroj de la ĜUL?*[104]

Tamen, la propagando ne malpliigis la malicajn efektojn de la senaktiveco. Poŝtoficisto, kiu estis en la sektoro de Monegrillo rakontis, ke

> *... ni pasigis la vivon prigardante, sed faris nenion. La tabakon oni donis senpage. Manĝi, ni tre bone manĝis. La kuiristoj faris la manĝon per multa abundo de viando. Ni manĝis fazeolojn, kikerojn, lentojn, terpomojn kun viando kaj ĉiam la panpecon. Mi kredas, ke oni malŝparadis. Oni forĵetis tro manĝaĵojn. Pri pedikoj, multaj [...] La homoj estis tre malemaj fosi. Iam Durruti alvenis sur la placon kaj eldiris entuziasmigan paroladon, kaj tiam oni ekfortikigis. Durruti konvinkis per la parolo kaj, se vi ne obeis, li vin ĵetis hejmen.*[105]

José Gabriel, la argentina ĵurnalisto, kiu konis Carreño-n, demandis la volontarmeanojn:

> *—Kaj vi, kion vi faras en Osera?*
>
> *—Vivo de ŝirmejo.*

---

102 Tardienta, «Informo de la Unua Kolono al la Militista Komitato de USP-ĜUL Barcelono», 22-an de septembro 1936, Fondaĵo José del Barrio, Pavelló de la República, Barcelono.

103 «MIlitfronto de Osko. Torre de la Colasa. Estro de la Divizio Karolo Markso al Militista Komitato de USP-ĜUL», 24-an de septembro 1936, Fondaĵo José del Barrio.

104 Tardienta, «Informo de la Stabo Divizio Karolo Markso al la Militista Komitato de USP-ĜUL», 8-an de oktobro 1936, Fondaĵo José del Barrio.

105 Atesto de Manuel Matz, Camps kaj Olcina, citita verko.

*Plenumita la venkinta komenca antaŭeniro oni al ili ne permesas fari aliaĵon.*

*—Kial kaŭzo?*

*Ili ĝin ne scias.*

*—Ĉu vi ne povas ataki Zaragozon?*

*—Tion volas Durruti, sed ŝajnas, ke unue oni devas progresi en aliaj sektoroj.*[106]

Sed en la aliaj sektoroj oni ne progresis. Ĉi tiu antaŭeniro ĉefe estis haltigita pro la manko de armiloj, municioj kaj aliaj akcesoraĵoj (transporto, benzino, kanonoj, tankoj, aviadiloj), kaj kial ne, la manko de sperto de la volontarmeanoj en la batalo sen ŝirmejoj. La komitatoj de la kolonoj ankaŭ ne havis multajn militistajn konojn kaj planis siajn movadojn per gvidiloj Michelin anstataŭ topografiajn mapojn. La industrio por milito kreita de NKL disponis malabundajn krudajn materialojn kaj malpli da monrimedoj por importi ilin. De la postmilitfronto oni klopodis deturni la aferon al la temo de la sola komando kaj la disciplino, kaj por tio oni kreis Komitaton por la Milito de la militfronto konsistigita de estroj militistaj kaj de kolono, sed la fakto estis, ke estis tagoj en kiuj la volontarmeanoj nur disponis tridek kartoĉojn. Ili ankaŭ ne havis tro da fusiloj kaj la volontuloj, kiuj alvenis al la militfronto, devis reveni sur siaj paŝoj ĉar oni ne povis armi ilin. La uzita pulvo estis pulvo kun fumo, kiu ŝtopis la fusiltubojn. La maŝinpafiloj estis malabundaj kaj kun malmulta municio tiel, kiel la pecoj de artilerio. Same nestabila estis la transporto. La senaktiveco nervozigis la plej junajn kaj Durruti ilin klarigis: «Oni ne povas lukti sen materialo kontraŭ pli bone armita malamiko kaj kiu nin estas atendanta. Ni ne havas municiojn, eĉ mankas armiloj al multaj homoj»[107]. La progreso de la

106 Gabriel, citita verko.

107 Soteras, citita verko.

revolucio dependis de la tuja liberigo de gravaj urboj, kiel Osko, Zaragozo, Teruelo, Kordovo aŭ Granado, defenditaj de malmultaj trupoj, per kio la malamika militfronto disfaliĝus, sed por tio mankis armilaro. Durruti daŭre serĉis ĝin premante la gvidantojn de NKL kaj IAF, ĉefe Santillán-on, la malplej taŭga burokrato por esti ĉekape de la organizo de volontarmeoj, kiu memoris, ke:

> *Ĉiuj estroj de la aragona militfronto nin frenezigis per siaj konstantaj depostuloj pri armiloj kaj municioj. Per pli da insisto kaj persistemo ol neniu, Durruti [...] Li al ni improvizis ĉiutagan admonon pri ĉio, kion li bezonis por fari la militon kaj sukcesi en la entrepreno.*[108]

Santillán, kiu samtempe okupis pli ol dekduo da postenoj, kolektis el la liberecanoj en Barcelono kaj distriktoj kelkajn fusilojn, sed «ĉio tio estis vera guto de akvo en la maro se oni ne atingos realan senarmigon en la postmilitfronto, kvankam malmultan tempon poste ni ankaŭ havos mankon de kartoĉoj»[109]. La evidenta nekapableco kaj limigita diligento de Santillán por la militaferoj iel estis kompensita de Ricardo Sanz, organizanto de la volontarmeoj en la kazerno de Pedralbes, rebaptita, kiel kazerno Bakunin. Ĉiuj respondeculoj de la kolonoj ĉiam, kiam povis, parolis kun li anstataŭ Santillán:

> *Ĉiutage je la oka vespere mi ricevis la kutiman telefonalvokon de Durruti.*
>
> *—Ĉu estas vi? —Li diris al mi.*
>
> *—Jes. Kio okazas?*
>
> *—Nu okazas, ke vi ankoraŭ ne sendis al mi tiujn pecojn de maŝinpafilo, kiujn hieraŭ mi vin petis.*

108 Abad de Santillán, citita verko.

109 En la sama verko.

*—Mi ne sendis ilin al vi ĉar ili ne estas en la magazeno. Mi mendis provizon el ili al la Hispana-Svisa. Baldaŭ ili estos fabrikitaj.*

*—Nu. Sendu ilin al mi tuj, kiam ili estos. Mi urĝe bezonas ilin. Kiom da fusiloj vi havas disponeblaj?*

*—Mi nun havas ĉirkaŭ ducent.*

*—Sendu al mi ĉiujn.*

*—Ĉu la aliaj kolonoj? — Mi demandis lin.*

*—La aliaj jam elturniĝos.*

*—Mi sendos, sed ne ĉiuj.*

*—Ĉu ambulancoj?*

*—Estas ses disponeblaj.*

*—Sendu al mi kvar.*

*—Ne, mi al vi sendos unu. Kion mi povas sendi al vi estas ducent volontuloj, kiuj volas iri kun vi.*

*—Mi nuntempe ne volas volontarmeanojn. Ĉiutage alvenas ĉi tien el la vilaĝoj de la ĉirkaŭaĵoj centoj da ili kaj mi ne scias, kie aligi ilin. Fusiloj, kanonoj kaj multa municio estas tio, kion mi bezonas.*

*—Bone, ĉio iros glate.*[110]

Sed ne ĉio iris glate. Manuel Hernández, farinto de la socialigo de la industrioj kaj manlaborejoj de la Ligno, klarigis tion, kio estis senfina rakonto:

*... kiam ili sendis maŝinpafilojn, ni jam ne havis municiojn. Kaj kiam alvenis la municioj, la maŝinpafiloj estis rompitaj. Tiam Durruti milfoje telefonadis kaj finfine eĉ li mem vojaĝis en Barcelonon por serĉi kion li bezonis, ne nur kio estis en manoj de la Registaro, sed ankaŭ en manoj de NKL*[111]*.*

---

110 Ricardo Sanz, *Buenaventura Durruti, tribuno del pueblo* (hispane, Buenaventura Durruti, Oratoro de la popolo), Ediciones El Frente, Toulouse, 1945.

111 Deklaroj kompilitaj de Hans Magnus Enzensberger, *El corto verano de la anarquía* (hispane, La mallonga somero de la anarkio), Grijalbo, Barcelono, 1975.

Por lia amiko Liberto Callejas, Durruti estis malofta miksaĵo de obstineco, praktika senco kaj fideleco al siaj ideoj:

> *En la diskutoj kaj interkonsentoj, Durruti estis tranĉa kaj radikala. Li anticipis sin al la sistema kritiko kaj la ridinda neo kaj dediĉis konstrui, fiksi la ĝeneralajn liniojn pri la socia rekonstruo, almenaŭ pruvi, ke la anarkiismo posedis kapablojn de organizo sur novaj bazoj rifuzantaj la sociajn malvirtojn.*
>
> *La problemo por li estis ĉi tiu: rekonstrui sur liberecanaj bazoj, t. e., malhavante la burokratismon, la ŝtatismon, ĉian parasitismon, la diktatoradon.*
>
> *Ĉiam esprimis sin Durruti laŭ la sekva maniero: «Se la liberecana rekonstruo ne fariĝas per sufiĉa efiko, nur povos esti unu solvo: la ripeto de aŭtoritatemaj sistemoj, la blankaj aŭ ruĝaj diktatoradoj, malnovaj aŭ "novaj" manieroj de premado, kiuj nepre eternigos la malbonojn, kiujn enportas la burĝa socio».*
>
> *Samtempe, ke li diskonigis ĉi tiun taktikon, tuj elmontris la rimedojn por fari ĝin venki. Ĉi tiuj rimedoj estis la organizo kaj la kunordigo de penadoj, por efike venki la malamikon.*[112]

La antaŭa noto estas oportuna ĉar la ideologiaj aferoj disiĝis de la milito kaj degeneris en senutilaj diskutadoj. Durruti, kiu ne multe talentis por la teorio, dediĉis vortojn al la temo per kiuj li ne pretendis nei la revolucion sed rilati ĝin kun la bezonoj de la lukto:

> *Ne estas ĉi tiuj momentoj la plej taŭgaj por serĉi en la teorioj la solvon al la problemo, kiun al ni prezentas la faŝismo kaj la reakcio. Ni estas antaŭ fakto de milito, malnobla kaj kruela, kaj ni ne povas fali en ideologiajn babilaĉadojn. La sola realo, kiun ni devas sperti estas la milito kaj la kuraĝo de niaj volontarmeanoj. Do venkos la kuraĝo kaj la justeco, kiujn ni reprezentas.*
>
> *Ni forlasu provojn kaj statistikojn kaj militu, akceptante la tutan respondecon de la historia momento. Ni jam havos tempon*

112 «La ekzempla morto de Durruti», *Tierra y Libertad*, 28-an de novembro 1936.

> *por disvolvi la planojn kaj taktikojn de la nova socia ordo, kiu jam burĝonas en la rekonkeritaj vilaĝoj.*[113]

Iam, tedita legi en la *Soli* sentaŭgajn strategiistojn, kiuj donis lecionojn pri anarkiismo je tre prudenta distanco de la milita realo, li telefonis la redakciejon serĉante Callejas-on. Prenis la aparaton Fontaura, kiu ricevis la admonegon:

> *«Mi estas —li diris— tiel anarkiista, kiel ĉiuj vi. Sed vi devas konsideri, ke mi vivas en militmedio kaj en la milito ekzistas faktoroj, kiuj apartiĝas de kurantaj perceptoj ene de la liberecana etiko. Oni devas konsideri tion, kiam parolas pri nia lukto.» [Por Durruti] kelkfoje la morala kaj materiala trudado estis bezonaj por savi situacion, en la batalo, kiu estis gravega por la atingo de nemalhavebla celo sen kiu la malvenko estis certa kaj ruinigaj la konsekvencoj.*[114]

Durruti komprenis la senton de la volontarmeanoj, postulante, ke la postmilitfronto estu je la servo de la milito kaj malproksimiĝante de la dogmema anarkiismo, sen tio, ke pro tio li alproksimiĝos al sia kamarado García Oliver, kiu simpligis ĉiun problemon ĝis militistaj aferoj. Balius, kiu defendis en la redakcio de la *Soli* la Durruti-ajn ideojn per sia serio de artikoloj titolita «En la milito, kiel en la milito», parolis pri la bezono de «nova moralo» en la postmilitfronto. Malantaŭ tiu demando aperis la problemo de la disciplino kaj la agadunuiĝo, ĵus diskutita en la antaŭa Delegitkunveno:

> *La disciplino estas la ilo de la celo [...] Se ni estas unuiĝantaj pri la celo, kiu propra-vole nin alportis al la militfronto, ni ankaŭ devas tieli pri la agado, kiun ni devos realigi por atingi la celon.*
>
> *Per unuiĝo pri la celo kaj disciplino en la agado, ĉiuj niaj aspiroj estos atingitaj per la plej malgranda perdo de energioj kaj en la plej malgranda spaco de tempo.*

---

113 *El Frente*, n-ro 6, 2-an de septembro 1936.

114 Fontaura, citita verko.

*Ni estas tute konvinkitaj, ke ĉiel, per disciplino aŭ sen ĝi, niaj volontarmeoj, armeo de la fina venko de la proletaro, atingos ĉiujn siajn celojn, kronante la proponitajn atingojn. Sed kio nun temas estas ne pridubi la venkon kaj ne pro ĉi tio pri kio ni ĝuste parolas, sed fari ĝin malpli peniga kaj pli proksima. Kaj ĉi tio, kamaradoj volontarmeanoj, atingas sin, kiam ĉiu restas en sia posteno, unuiĝintaj ĉiuj pri la celo kaj disciplinitaj en la agado.*[115]

Por García Oliver la volontarmeanoj devis esti simplaj pecoj de la militista dentaĵo, sen alia funkcio ol obei la impulsojn de la maŝino nomita «armeo»; tamen tiuj, kiuj akompanis Durruti-on ĝuste pensis la malon: en la kolono ne ekzistis hierarkiaj diferencoj nek de alia tipo.

*Ĉi tie ĉiuj estas liberaj fari ĉiajn sugestojn kaj konsiderojn, sed ankaŭ estas devigataj aŭskulti kiujn povas fari al ili la cetero el la kolegoj. Estas nature, ke pro tiu fakto de maksimuma egaleco en la tuta kolono tiel, kiel en la antaŭentaĉmentitaj grupoj kaj skoltaroj, la spirito de perfekta konvivado tute superregas.*[116]

Aliflanke,

*La volontarmeano ne devas esti nur gerilano, krome devas esti semanto de la ideo, kiun li subtenas kaj pura spegulo en kiu povas rigardi sin la aliaj por korekti siajn malperfektaĵon. La valoro de la bona volontarmeano ne estas nur en la armiloj sed en liaj konvinkoj kaj, ke estu ĉi tiuj, kiuj gvidas liajn impulsojn kaj liajn rilatojn kun la aliaj.*

*Por detrui la faŝismon ne sufiĉas porti fusilon kaj pafi ĝin, tuj kiam oni vidas la malamikon. La fusilo estas armilo, ne konvinko, eĉ ne kialo.*

*Kaj la faŝismon oni devas sufoki per la plumbo kaj la ideoj.*[117]

Tial la disciplino de la volontarmeano havis nenion komunan kun la militista disciplino:

---

115 *El Frente*, n-ro 4, 29-an de aŭgusto 1936.

116 Pablo Bargalló, «Tago en la Stabo», *Solidaridad Obrera*, 16-an de aŭgusto 1936.

117 *El Frente*, n-ro 7, 3-an de septembro 1936.

*Disciplino [...] ne estas blinde obei, kiel aŭtomatoj, laŭ alvoko de milita trumpeteto aŭ la aŭtoritatema voĉo de ajna medalita ridindulo, sed havi sencon pri la respondeco kaj rezoni ĉiun ajn el niaj agoj.*

*La celo estis tre konkreta, t. e., ne malŝpari municion blinde pafante kaj ne forlasi la postenon por realigi esplorrigardojn aŭ movadojn sen rektaj ordoj. La plej malbona puno inter revoluciuloj estis la malhonoro kaj ĝin efektivigis la kolegoj mem:*

*... oni punos per la senarmigo kaj la deviga reveno, por lia honto kaj ekzemplo por la aliaj, ajnan agon de maldisciplino, kiu povas kompromiti la vivon de liaj kamaradoj kaj la sukceson de ĉi tiu lukto.*[118]

Durruti ne nur kontraŭis puni la riproĉindajn kondutojn de la volontarmeanoj per perforto aŭ malliberejo, sed tre malemis al la ekzekutoj de malamikoj kaj kontraŭuloj, farita de la revoluciaj komitatoj, de la grupoj «fantomo» aŭ de la komisionoj «por esploro». Li ĉiam kontraŭstaris la mortpafojn kaj mem protektis pastron dungante lin en la oficejoj de la kolono. Iam, kontraŭ la ĝenerala opinio, li pardonis la vivon de ŝtelintaj volontarmeanoj surprizitaj, kiam li rabis la kamparanojn, limiĝante forpeli ilin el la kolono. Multnombraj atestantoj atestis lian humanecon sed, tamen, ĉi tiu devis elteni dum jaroj la malhonoron, kiun al li atribuis Simone Weil. Ĉi tiu redaktis en 1938 leteron al la katolika verkisto Georges Bernanos, en kiu ŝi bedaŭris la malĝojan sorton de 15-jaraĝa falangisto, kaptita de la Internacia Grupo kaj portita al Pina antaŭ li. Laŭ Simone, kiu ne ĉeestis dum la okazaĵoj, Durruti priskribis al la knabo la belecon de la anarkiisma idealo kaj petis lin pripensi. Post dudek kvar horoj li denove demandis lin kaj, kiel la junulo daŭre subtenis siajn opiniojn, li ordonis mortpafi lin. La letero estis publikigita kaj la historio de la falangisto restis, kiel ekzemplo de la barbareco, kiun trenis la milito, de kiu

118 *El Frente*, n-ro 6, 2-an de septembro 1936.

liberiĝis eĉ ne la anarkiistoj. Volis la ironio de la historio, ke la vero, kiun rakontis la komunisto Mathieu Corman ankaŭ ne ĉeestanta, estis malkaŝita de la Franco-istoj mem. Dum la enketoj de la «Ĝenerala Juĝafero» efektivigitaj en Pina de Ebro kaj Tauste (vilaĝo sur la ŝoseo de Zaragozo al Tudela), la patro de la junulo, instruisto kaj direktisto de la lerneja grupo de Tauste, la 7-an de novembro 1940 deklaris antaŭ la militista juĝisto:

> *Kiam komenciĝis la Glora Ribelo, mia filo Ángel Caro Andrés, 16-jaraĝa, propra-vole eliris el Tauste por defendi la patrujon en danĝero kaj aliĝis al la roto n-ro 29 de la Falango en la militfronto de Quinto.*
>
> *La 22-an de aŭgusto 1936, dum la nokta batalo en la vilaĝo de Pina, en la loko nomita Mejana del Blanco, li estis kaptita de la internaciaj ruĝuloj de la Kolono Durruti. Ĉi tiu lasta al li pardonis la vivon pro lia junaĝo kaj ordonis, ke oni lin kondukis en la urbodomon de Pina, kiu tiam estis malliberejo. Sekvatage, informitaj ruĝuloj, kiuj fuĝis de Tauste petis al Durruti, ke li al ili transdonu la malliberulon por mortpafi lin, sed ĉi tiu neis, pro lia juna aĝo. Tiam, gviditaj de siaj kriminalaj instinktoj, frue matene, la 24-an de aŭgusto ili eniris en la malliberejon, eltiris la malliberulon kaj mortigis lin ĉe Ebro.*[119]

Posta informo de la Civilgvardio konfirmis la ekziston de la «grupo de Tauste», dediĉita purigi la postmilitfronton de faŝistoj. Senvole, monumento de la faŝisma hororo, kiel estis la Ĝenerala Juĝafero, klarigis, ke la morto de la juna Caro estis kazo de venĝo (efektivigita en foresto de Durruti, kiu marŝis al Bujaraloz), perforta reago —aldonas ni— pro la mortigoj de kontraŭfaŝistoj okazintaj la antaŭaj tagoj en Tauste.[120]

---

119 *Les Giménologues*, «Retour sur la lettre de Simone Weil a Bernanos» (france, Reveno pri la letero de Simone Weil al Bernanos), 8-an de junio 2009. Ariel Camacho kaj Phil Casoar en *Le Petit Phalangiste* (france, La juna falangisto), *Revue XXI*, oktobro-novembro-decembron 2010.

120 En la sama verko.

Ĉirkaŭ tiuj datoj, Durruti kunvenis, en la barako el ligno de la ĉirkaŭaĵoj, kiu servis, kiel stabejo, kun Villalba, Reyes kaj la estroj de la aliaj kolonoj por trakti la solan komandon. Laŭ Ortiz, la iniciato devenis «de Del Barrio kaj aliaj, kiel li»; ĉeestis «granda nombro de estroj» de malgrandaj trupunuoj de la oska sektoro, sed neniu reprezentanto de la Centra Komitato pri la Volontarmeoj. Ortiz fuŝis ĉion, kiam riproĉis ilin «per kiu aŭtoritato, tiuj de la areo de Osko ekpetis la Solan Komandon se por malmultaj soldatoj estis po 25 estroj kaj ili ne povis solvi la diferencojn inter ili por prepari kunan agon?». Antaŭ ol proponi ion ili devintus interkonsenti inter ili: «Kaj se ili estis pretaj por ke ĉiuj nin metu sub unu komando kaj ĉi tiu komandulo devis esti unu el ni, la plej taŭga por la enoficigo estis mi, kiu scipovis kunigi kaj organizi la fortojn de la Sudo de Ebro en unu sola trupunuo»[121]. Kaj tiam finiĝis la diskutado. La 26-an de aŭgusto, en Sariñena, la militistoj kaj kolumnestroj kunvenintaj, kiel «Komitato por la Milito» de la militfronto «ĉiam konsente kun la Supera kaj Centra Komitato pri Kontraŭfaŝismaj Volontarmeoj de Barcelono»[122], akordigis, ke tiuj, kiuj jam atingis la aĝon por militservo, aliĝu al la kolonoj jam kreitaj aŭ iru en la kazernojn de rekrutigo, kio pligrandigis la problemojn de armilaro. Post tio, Durruti faris alparolon al la hispanaj laboristoj nome de la batalantoj de Aragono, indikante la kernan problemon de la militfronto:

> *Ni volas ne medalojn, nek skarpojn. Ni volas ne provincadministraciojn, nek ministrejojn. Kiam ni venkos, ni revenos en la fabrikojn kaj manlaborejojn el kiuj ni eliris, apartigante nin de la monskatoloj, por kies nuligo tiom luktis. En la fabriko, la kampo kaj la mino estas kie oni kreos la veran armeon defendontan Hispanujon [...]*

121 Letero de Antonio Ortiz al Antonio Téllez, 21-an de aŭgusto 1978, en Márquez kaj Gallardo, citita verko.

122 La interkonsento estis publikigita en *El Frente*, 3-an de septembro 1936, kaj reproduktita en *Línea de Fuego*.

*Ke neniu promenu sur la strato; ke neniu seĝu por diskuti ĉe la tabloj de kafejo. Lia devo estas iri al la militfronto.*

*Katalunoj! Fidu en ni samkiel ni fidas en vi. Ĉiuj forgesitaj kaj kaŝitaj armiloj, al la militfronto!*

*Ĉiuj kamparanoj de Aragono aliĝas al ni kaj, de la infanoj ĝis la maljunuloj, ili al ni petas armilojn.*

*Necesas alporti ĉiujn armilojn. Necesas, ke tiuj armiloj, kiuj estas kaŝitaj sub la kaheloj de via domo (mi scias, ke vi ilin havas, ĉar mi ankaŭ ilin havis) tuj alvenu al la militfronto. Mi kredas, ke vi ilin transdonos. Mi konas vin ĉar kune ni vivis kaj luktis. Ni faru potencan militfronton kaj ju pli frue, des pli bone, ĉar ju pli frue ni detruos la faŝismon, des malpli da sango ni verŝos kaj la vivo pli rapide normaliĝos [...]*

*Al la kamaradoj de Aragono, al ĉiuj laboristoj de Zaragozo, mi petas, ke ili ne malhonoru la ilojn fabrikante armilojn kaj municiojn por la faŝistoj. Ni estas ĉe vi. Venu ĉi tien! Post malmultaj tagoj niaj kanonoj alvenos al Zaragozo!*[123]

Durruti malakceptis ĉiun ajn interkonsenton kaj anoncis al la hispanaj laboristoj la proksiman venkon:

*Baldaŭ ni al vi parolos de Zaragozo mem!*

*Laboristoj de Hispanujo, kuraĝo! Se ni iam devis riski la vivon, nun estas. Laboristoj, estu optimismaj! Nin akompanas idealo! Antaŭen kontraŭ la faŝismo! Kun la faŝismo oni ne disputas, oni detruas lin!*

*Sanon, kamaradoj!*[124]

En tiu sama kunveno aŭ alia tuj posta, oni studis kun García Oliver kaj Díaz Sandino la demandojn, kiuj prezentis la prenon de Zaragozo. La plej malforta loko de la militfronto estis Osko, lokita en ebenaĵo, kvankam fortikigita kaj defendita de ses mil soldatoj kaj falangistoj. Tien devis iri la plimulto el la trupoj kaj komenci la atakagon, ne ĉesante fari

123 «Kun la faŝismo oni ne disputas, oni detruas lin», *Solidaridad Obrera*, 12-an de septembro 1936.

124 En la sama verko.

premon en la cetero de la militfrontoj. Marcos Alcón insistis en antaŭa kunveno de la Komitato pri la Volontarmeoj pri la strategia graveco de Osko, kaj Vicenç Guarner eĉ asertis, ke ĝia preno estis afero de miliono da kartoĉoj[125], tial oni interkonsentis, ke la atakago planus sin, kiam oni ricevos sufiĉajn municiojn. Antaŭe, por distri malamikajn fortojn, Durruti atakos la areon de Zuera kaj Ortiz tiun de Belchite. La atakago kontraŭ Osko komencos en Estrecho Quinto. Oni urĝe bezonis artilerianojn por la atako, tial sciigitaj pri la ekzisto de du oficiroj de artilerio, kiuj estis je dispono de la «militista aŭtoritato», Durruti, la majoro de artilerio Medrano kaj la majoro de militaviadilaro Reyes subskribis peton al la Komitato pri la Volontarmeoj depostulante ilian ĉeeston en Barbastro. Durruti promesis iri al Osko kun sia kolono se necesus. Kaj efektive tiel estis. La oska defenda sistemo estis kojno sur la ŝoseo de Barbastro kun tri bone protektitaj verticoj: la kastelo-monaĥejo de Montearagón, la vilaĝo de Siétamo kaj la altaĵo de Estrecho Quinto. Anstataŭ ataki Oskon en sendenfenda proksima loko, la strategio de Villalba komenciĝis en Siétamo, la plej malproksima loko de la ĉefurbo kaj plej bone protektita. Kaj Siétamo estis atribuita al la Kolono Durruti. Ĉi tiu elektis por la batalo du grupigojn el sia kolono, komanditaj de Yoldi kaj Ruano kaj la Internacian Grupon. Durruti, kiu akompanis siajn fortojn, antaŭe haltis en la vilaĝo de Angüés, kie tiumomente troviĝis la militista komandularo de Villalba. Elaŭtiĝinte, li estis ĉirkaŭita de la vilaĝanoj. La infanoj estis la plej aŭdacaj kaj li, donante manfrapojn sur la dorson al iuj, diris al ili: «Knaboj, ni luktas por vi». Li poste parolis, kiel ĉiam, pri la kolektivigo: «Se vi ankoraŭ ne kolektivigis, klopodu fari ĝin ĉar tio urĝas, necesas, ke la popolo sciu, kion ni aspiras. Per la kolektivigoj ni donos sekvendan ekzemplon

125 Aktoj de la CKKV, 31-an de aŭgusto kaj 4-an de septembro 1936, en Diversaj Aŭtoroj, *Ordre públic i violència a Catalunya* (katalune, Publika ordo kaj perforto en Katalunujo), citita verko.

estontece»[126]. La konsilo estis bagatela ĉar la kolektivigo de Angüés jam funkciis, sed Durruti ĉiam komencis siaj paroladoj per tio.

Durruti revenis al Bujaraloz por manovro de distro konsistanta en surpriza atako al Fuentes de Ebro, trans la rivero, fronte al Pina. Du Franco-istaj soldatoj transiris al la kolono havigante grandvaloran informon, kiu helpis plani la atakon. La krucado fariĝis tute silente, antaŭiris tiuj de la Nigra Bando kaj ĝi estis sekvita de atako de artilerio kontraŭ la dometo, kie estis la stabejo de la sektoro. Antaŭ ol konstati la danĝeron, la faŝistoj havis la volontarmeanojn sur ili. La unua skadro de la Regimento de Kavalerio de Castillejos, konsistigita de cent dudek soldatoj kaj pluraj falangistoj, estis encirkligita kaj suferis multajn homperdojn.[127] La operacio estis sukceso sed la pozicio ne povis subteni sin, izolita, kiel estis kaj kun la malmulta municio, kiun ili havis. La volontarmeanoj kaptis kelkajn malliberulojn, prenis maŝinpafilojn, kartoĉojn kaj ĉevalojn, senutiligis kion ili ne povis ŝarĝi kaj revenis al Pina kun la kaptitaj faŝistoj kaj la kamparanoj, kiuj volis akompani ilin. Ili volis kroni sian sukceson konstruante ponton el boatoj en Pina, cele preni la stacidomon de la fervojo, kiu estis trans la rivero, sed la faŝistaj artilerio kaj militaviadilaro ĝin detruis. La faŝistoj respondis atakante Pina-on kaj Gelsa-on. La volontarmeanoj defendis Osera-on kontraŭ nova atako kaj alproksimiĝis al Perdiguera ne sukcesante eniri en la vilaĝon. La 30-an de aŭgusto, malbrue transirante Ebron, ili preterpasis la sekvan vilaĝon al Osera, Villafranca, kaj atakis ĝin de malantaŭe, surprizante la defendantojn. Sekvatage estis faŝisma kontraŭatako, kiun la

126 Martín Arnal Mur, *Memorias de un anarquista de Angüés en la República, la Revolución y la Guerrilla* (hispane, Memoraĵoj de anarkiisto el Angüés en la Respubliko, la Revolucio kaj la Gerilo), eldono de la aŭtoro, Zaragozo, 2009.

127 «En Fuentes de Ebro estis venkita skadro de kavalerio», *Combat*, organo de la Iberia Komunista Junularo-LPMU, Ilerdo, 9-an de septembro 1936.

volontarmeanoj ne povis elteni kaj revenis al Osera kunportante la loĝantaron de Villafranca, ĉar ĝi ne volis resti tie. Je tiuj tagoj la kolono ricevis gravan materialon de artilerio kaj grupon de volontarmeanoj: alvenis sep centopoj, kiuj konsistigis la Kolonon Solidaridad Obrera por plifortigi la militfronton ĉe Pina. Post tiu aliĝo, la Kolono Durruti jam kalkulis kun ĉirkaŭ kvin mil batalantoj. Durruti estis tre kontenta. *El Frente* permesis sin anonci, ke «post malmultaj tagoj ni pruvos al la reakcia kanajlaro [...] ke ni ne vane uzis pulvon por salvoj»[128] kaj Durruti, «je 18 kilometroj de Zaragozo», skribis al la argentinaj laboristoj optimisman leteron: «Kiam vi ricevos ĉi tiujn fratajn literojn, la faŝismo estos ricevinta sian meritaĵon [...] Niaj pozicioj estas avantaĝaj kaj baldaŭ la tempo, kiu estas pli konsekvenca ol ĉio, kion mi al vi povas diri, konstatos laŭ decida maniero, kiuj estas la plej fortaj kaj noblaj»[129].

Tiun saman 30-an de aŭgusto kreskis la aktivecoj en la militfronto de Osko pro la alveno de la Kolono Los Aguiluchos kaj la Bataliono Stalino. Ankaŭ alvenis la Kolono Roja y Negra, konsistigita de kiuj revenis de Majorko kaj kelkaj aragonaj volontarmeoj. La batalo de Siétamo komenciĝis meze de septembro. La volontarmeanoj veturis per kamionoj kaj aŭtoĉaroj al la vilaĝo de Sipan, kaj de tie, piedirante dek aŭ dek du kilometrojn ĝis Siétamo. Samtage la volontarmeanoj rompis la defendojn kaj alvenis ĝis la domoj. Dum pluraj tagoj ili batalis domon post domo ĝis kiam la postvivantaj faŝistoj forkuris al Estrecho Quinto. La 4a centopo de la Kolono Durruti, konsistigita de ministoj de Sallent kaj maristoj de Barceloneta, brave luktis en Loporzano. Durruti kaj Ortiz ordonis novajn distrajn atakojn en Zuera kaj Belchite, sed troviĝis kun la rifuzo de Reyes, majoro de la militflughaveno kiu, pro ordonoj de la «sola

128 *El Frente*, n-ro 6, citita verko.

129 *El Frente*, n-ro 7, citita verko.

komando» de Villalba, rezervis la aviadilojn por kovri la atakon de la fortoj de USPK al Estrecho Quinto. Fine Durruti atingis, ke la aviadiloj de la militflughaveno de Sariñena bombardis Quinto-n kaj ‘Fuentes de Ebro’-n, sed li devis uzi ekstremajn argumentojn. Del Barrio, en informo al la Militista Komitato de sia partio, parolis pri «minacoj sendi centopon por invadi la militflughavenon se la aviadilaro ne tuj alvenis»[130]. Preskaŭ monato poste la majoro Reyes lin akuzis eldiri la samajn minacojn[131]. Devigita la kolono fari malgrandajn bataletojn kaj atakojn, la venkoj de Siétamo kaj Loporzano estis venĝo kaj pruvo, ke braveco ne mankis al ili. La volontarmeanoj revenis al sia sektoro kunportante la tutan konkeritan armilaron, kontraŭ la opinio de Villalba kaj Del Barrio. La aliaj kolonoj prenis ‘Estrecho Quinto’-n kaj Montearagón-on, sed Osko, kiu ricevis helpotrupojn el Zaragozo kaj Ĥako, rezistis la ĉirkaŭ dek tri mil volontarmeanojn, kiuj ĝin sieĝis. La atako al Siétamo, Estrecho Quinto kaj Montearagón permesis gajni tempon al la faŝistoj de Osko, kiuj plibonigis ties fortikaĵojn. La konkludoj, kiujn eltiris la komunistoj malmulte rilatiĝis kun la rezulto de la batalo. Ili resumis ilin en kvar: unua, la elpurigo de anarkiistoj el la trupunuoj komanditaj de ili (la komunistoj), per la rimedo doni al ili paspermesilon kaj ne akcepti ilin, kiam ili revenis; dua, devigi la aplikon de la dekreto pri militareoj, kio signifis fini kun la kolektivigoj kaj la lokaj revoluciaj komitatoj en la ĉirkaŭaĵoj de la militfronto; tria, la militistigo; kaj kvara: «Proponi al la Registaro de Madrido, ke ĝi enoficigu la kolonelon Villalba, kiel delegito

130 «Informo de la Estro de la Divizio Karolo Markso al Militista Komitato de USP-ĜUL», 24-an de septembro 1936, Fondaĵo José del Barrio, Pavelló de la República, Barcelono.

131 Kopio de la «Informo pri la kunveno de politikaj kaj militistaj estroj de la militfronto de Aragono», transdonita de la kolonelo Villalba al la historiisto Bolloten. Tiu informo, redaktita je la monato de oktobro, estas mise datita en septembro. En la Hoover War Library, Burnett and Gladys Bolloten Collection.

de la Registaro en la tuta militfronto de Aragono»[132]. Villalba konsentis kun la kvar, kio signifis senmaskigitan partiecon kun la komunistoj. La indigno de la liberecanaj batalantoj antaŭ konspiro, kiu pretendis neniigi la revoluciajn konkerojn per la preteksto gajni la militon, estis grandega. Del Barrio informis sian partion pri kunveno de delegitoj de anarkiistaj kolonoj okazinta en Bujaraloz en kiu oni decidis «neniigi la kolonelon Villalba kaj la majoron Reyes pro tio, ke ili faras marksisman politikon, kaj min kaj Trueba-on pro tio, ke ni faras la politikajn manovrojn, kiuj trenas la kolonelon kaj la majoron»[133].

La ĵusaj venkoj, kvankam minimumaj, devis maltrankviligi la militistestrojn, kiuj ĉirkaŭis ‘Largo Caballero’-n, ĉar Durruti ricevis ordonon de la Registaro de Madrido postulante lin ne movi sin, ĉar la Centra Stabo esperis preni Zaragozon per fortoj, kiuj devis progresi de Guadalajara. Durruti en la domo NKL-IAF esprimis en kunveno de la komitatoj sian indignon antaŭ la fakto. Laŭ Federica Montseny, Durruti esperis ke, super la Registaro, NKL kaj García Oliver lin rajtigu, sed ĉi tiu «al li diris, ke li devis kontentiĝi al la ordonoj el Madrido, ĉar se ne estis interligo kaj disciplino, ne eblis milito [...] Mi lin vidis plori tiun tagon, kiam li vidis sin en sia projekto senrajtigita de la kataluna organizo kaj siaj amikoj»[134]. La 22-an de septembro, Durruti ree estis en Barcelono kaj volis ĉeesti al neniu kunveno en kiu oni ne parolos pri armiloj, malgraŭ esti kunvokita de la komitatoj. La dua duono de la monato estis fatala por la liberecana afero. Al la problemoj de armiloj aldoniĝis tiuj de municio kaj vicpecoj kaj, finfine, kiam komenciĝis la pluvo kaj la malvarmo, mankis kapotoj kaj

132 «Informo de la Estro de la Divizio Karolo Markso al Militista Komitato de USP-ĜUL», citita verko.

133 «Stabo Divizio Karolo Markso al la Militista Komitato de USP-ĜUL», 8-an de oktobro 1936, Fondaĵo José del Barrio, Pavelló de la República, Barcelono.

134 Montseny, citita verko.

varmigaj vestaĵoj. Kvankam la NKL-isto Eugenio Vallejo estis kreinta industrion por milito el nenio, la produktado tute ne sufiĉis por subteni militfronton de 170 kilometroj, gardita de tridek mil volontarmeanoj. Aliflanke, evidentis, ke la hispana registaro intence fuŝis la katalunan registaron kaj samtempe NKL-on: «ĝi preferis haltigi du vagonojn de armiloj [en Francujo] antaŭ ol ili alvenis al niaj manoj, kiel devis esti. Oni supozas, ke la ordono devenis de la Ministro pri Financoj»[135]. Al la registara bojkoto de la militfronto de Aragono aldoniĝis la fondo kaŝe de la Komitato pri la Volontarmeoj de kolono Tierra y Libertad, komandita de limigita kaj sensperta burokrato, Germinal de Sousa, kaj sendita la 12-an de septembro al Madrido. Ŝajnis, ke neniu en Katalunujo havis tro da deziroj rompi la militfronton, ĉar tiumomente ankoraŭ ne estis okazinta en Aragono grava militista agado krom tiu de Osko. Pro tiel sensencaĵo, eĉ en sia propra organizo, Durruti estis kondamnita neniam eniri en Zaragozon. Por povi efektivigi atakagon, krom la registara permeso, oni bezonis aviadilojn, tankojn kaj sesdek mil bone armitajn batalantojn. La centra Registaro, kiu pli timis la triumfon de NKL ol tiu de Franco, ne ilin provizos, nek havigos monon por tio. Tamen Santillán iris al Madrido por serĉi ĝin. Li vojaĝis en la ĉefurbon kaj parolis kun la tiama registarestro, Giral, sed ne atingis pli ol vortojn. Giral-on sekvis Largo Caballero, kiu tuj proponis postenon en la registaro al NKL. La rilatoj de la liberecanoj kun la ŝtato ekpliboniĝis kaj NKL kaj IAF volis montri sin «respondecaj» kaj pretaj kunlabori. En Katalunujo, neniu krom García Oliver kredis je la Komitato pri la Volontarmeoj, kiu subfosita de interne kaj ignorita de ekstere ŝajnis nekapabla direkti la okazaĵojn. La burokrataro de la partioj kaj sindikatoj, inkluzivita la NKL-a, definitive inklinis por unueca registaro kun la necesa aŭtoritato por direkti la

135 Akto de la kunveno de komitatoj de la 9-a de septembro 1936, Arkivoj de NKL, IISH, Amsterdamo.

revolucian proceson kaj limigi ties atingon. En sekreta Delegitkunveno de NKL al kiu ĉeestis reprezentantoj de IAF kaj la Liberecanaj Junularoj, oni aprobis malfondi la Komitaton pri la Volontarmeoj kaj formi Regionan Konsilantaron pri Defendo kun la kataluna registaro. Kompreneble, se la ĉefa pretekstita motivo por sekrete preni tian decidon estis la militmaterialo, kiun laŭleĝa institucio ne havus malfacilaĵojn akiri, la decido estis fiasko ĉar neniu eŭropa registaro havigis armilojn[136]. Ĉiuj tenis sin je la Traktato pri Ne Interveno. Ĉiuj escepte Germanujo kaj Italujo, kiuj sendis armilojn al Franco. Estis la dua ago en ekstera politiko de NKL, se ni forgesas la traktojn kun la Komitato pri Maroka Agado, kiuj, kvankam fuŝitaj de García Oliver, ĉefe estis afero de la Komitato pri la Volontarmeoj[137]. La 10-an de septembro, la Komitato mem konfirmis la interkonsenton de malfondo antaŭe prenita en aliaj oficejoj kaj la 12-an akordigis ĝian anstataŭigon per «Regiona Konsilantaro pri Defendo de la Kataluna Registaro», konsistigita de reprezentantoj de ĉiuj ĉeestantaj organizoj. La klopodo de alproksimiĝo al la Registaro de Largo Caballero ne donis rezultojn. Pro peto de Miravitlles kaj Pons, oni forigis la adjektivon «Regiona», kaj pro petoj de Vidiella, tiu «pri Defendo»[138].

136 César M. Lorenzo asertas, ke ĝi okazis fine de aŭgusto, sed la «Informo de IAF al la Internacia Liberecana Movado» antaŭe citita diras, ke okazis en septembro. Iel ajn, okazis antaŭ la 10-a, ke estas, kiam la Komitato mem akordis sian malfondon. La informo pri la partopreno en la kataluna registaro verŝajne estis ellaborita de Francisco Isgleas, Xena, Marianet kaj Santillán. La akto de la kunveno de komitatoj de la 5-a de septembro jam menciis la kreon de asistantaj komisionoj en ĉiu departemento de la registaro.

137 La temo estis ĝisfunde traktita de Abel Paz en *La cuestión de Marruecos y la República española* (hispane, La demando de Maroko kaj la hispana Respubliko), Fondaĵo Anselmo Lorenzo, Madrido, 2000.

138 Aktoj de la CKKV, 12-an kaj 14-an de septembro 1936, en Diversaj Aŭtoroj *Ordre públic i violencia a Catalunya* (katalune, Publika ordo kaj perforto en Katalunujo), citita verko.

La malfondo de la Komitato stimulis proceson de koncentriĝo de povo en manoj de la nova kataluna registaro maskita, kiel Konsilantaro, kiu serĉis en la ideo pri «sola komando» kaj la «interna sekureco», kvankam tio estos dependigante de aliuloj, la regadon de la militfronto kaj la postmilitfronto. La unuaj disponoj estis tre ambiciaj, ĉar dekretis la malfondon de la urbaj kontraŭfaŝismaj komitatoj kaj la militistigon de la kolonoj. Fábregas, de la Konsilantaro pri Ekonomio, vojaĝis en Madridon kaj revenis kun la poŝoj malplenaj. En alia Delegitkunveno de Distriktaj kaj Urbaj Sindikatoj de NKL tuj poste oni denuncis «la intencan fuŝon al la verko de ekonomia konstruo de Katalunujo fare de la Registaro de Madrido» kaj akordiĝis «preni heroajn rezoluciojn, eĉ la retiriĝo de niaj kolonoj en determinaj militfrontoj». Tute ne grava minaco, ĉar ĉiuj sciis, ke ĝi ne plenumiĝos. Sendube tio plej interesa estis la interkonsento

> *... proponi al ĉiuj politikaj partioj kaj laboristaj organizoj luktantaj kontraŭ la faŝismo en Katalunujo, Aragono, Oriento, Kastilio, Andaluzujo, Eŭskujo kaj Asturio, la starigon de Regionaj Konsilantaroj pri Defendo, kiuj prenos sur sin la politikan direkton kaj la ekonomian administradon de la regionoj, cele prepari laŭ provizora maniero la federacian strukturadon de Hispanujo, kiam la faŝismo estos venkita. Ĉi tiuj regionaj konsilantaroj siavice fondos Federacian Konsilantaron pri Defendo lokota en Madrido, kiu starigos la tutlandan unuiĝon surbaze de la federaciismo de ĉiuj fortoj luktantaj kontraŭ la faŝisma fiaskinta ŝtatrenvenso.*[139]

Estis vera alternativa politika plano por la respublika areo, la unua ellaborita de NKL laŭ bildo de ĝia agado en Katalunujo kaj, kiu estis adoptita de la Delegitkunveno de Regionaj Sindikatoj, kvankam ĝi daŭris ĝuste la tempon, kiun prenis Largo Caballero por malakcepti ĝin. Tiam, la

139 «Interkonsento de la Delegitkunveno de Urbaj kaj Distriktaj Sindikatoj okazigita la 12-an de septembro 1936, pri la 5a punkto de la tagordo de la Delegitkunveno de Regionaj, kiu devas okazi en Madrido la 15-an de ĉi tiu sama monato», subskribita de Mariano R. Vázquez kaj J. Xena, Arkivoj de NKL IISH Amsterdamo.

federaciisma eblo estis forlasita favore al la centralizisma, kaj Horacio akceptis, en oktobro, kiel sekretario de la Nacia Komitato de NKL, kvar ministrajn postenojn. Alia Regiona Delegitkunveno, kiu ankaŭ sekrete decidis la definitivan malfondon de la memdissolvita Komitato pri la Volontarmeoj, komenciĝis la 25-an de septembro kaj finiĝis je la sekva tago. García Oliver estis lasita relative ekstere, sed la partopreno en la kataluna registaro estis anoncita de li mem: «Hodiaŭ la kataluna registaro reprezentas ĉiujn nin», li diris ĉi-okaze. La deveno de la konsilistoj de NKL en tiu registaro, kiu «reprezentas ĉiujn nin» estis venko de la liberecana burokrataro super García Oliver kaj lia kamarado Aurelio Fernández, kiuj restis en la Konsilantarfakoj pri Defendo kaj Publika Ordo, sed okupante ne gravaj postenoj. La konsilisto García Birlán estis la kandidato de Santillán; Fábregas, tiu de Federica; kaj J. J. Doménech, tiu de Marianet.

# 3. Madrido kun registaro

Pierre Besnard, fondinto kaj sekretario de ILA en 1922, tre konata en la liberecanaj hispanaj medioj pro siaj skribaĵoj, kontaktis kun centraeŭropa grupigo de fabrikantoj de armiloj kapabla provizi ilin al la Respubliko. Dum la antaŭaj tagoj al la malfondo de la Komitato pri la Volontarmeoj, Besnard klarigis la aferon al Santillán kaj la novaj konsilistoj de la kataluna registaro; García Oliver ne ĉeestis ĉar estis iom malsana pro troa laboro, kvankam en aktoj membro de la Regiona Komitato (Trabal) diris, ke li estis en Madrido[140]. La problemo estis, ke ĝi postulis certan antaŭpagon kaj la kompromison pri determinita aĉeto: «Neniu supoza vendisto subskribas kontrakton se oni ne antaŭe deponas la valoron de la varoj. Kaj unu el du: aŭ oni rezignas la operacion aŭ devas fari la deponitaĵon»[141]. La kataluna registaro ne disponis la postulitan monkvanton kaj decidis sendi delegitaron al la ĉefurbo, konsistigita de la kapitano José Guarner, de la Stabo de la delegitaro de la Konsilantarfako pri Defendo en la militfronto de Aragono; Ortiz, delegito de la Kolono Sudo-Ebro; la leŭtenanto Valeriano Gordo, asistanto de Ortiz; kaj la kapitano Matilla, diplomito de la Stabo. Ili alvenis al Madrido kaj parolis kun Largo Caballero atingante nenian rezulton. Largo ne volis «armi IAF-on» ĉar li timis ŝtatrenverson fare de ĝi. Kiam ili revenis, Ortiz informis pri siaj klopodoj al Durruti kaj ambaŭ

140 «Kiam la kamarado García iris al Madrido, restis vaka la posteno de Sekretario pri Defendo, kiu provizore estas okupata de Santillán.» Kunveno de komitatoj okazigita la 9-an de oktobro 1936, Arkivoj de NKL, IISH, Amsterdamo.

141 «De la ambasadestro de Parizo [Araquistáin] al la Ministro pri Publika Sano. Informo pri la origino, fondo, funkciado kaj malfondo de la Komisiono por aĉetoj de Parizo. Parizo, 12-an de januaro 1937», en Ramón Salas Larrazábal, *Historia del Ejército Popular de la República* (hispane, Historio de la Popola Armeo de la Respubliko), 3a volumo, Editora Nacional, Madrido, 1973.

ekkriis: «Ek!, fosi kaj fari ŝirmajn fosaĵojn, ĉar ĉi tio longe daŭros!»[142]. Santillán kredis, ke estis la vico de Durruti. La kondiĉoj estis pli favoraj; la Komitato pri la Volontarmeoj jam ne ekzistis, inter aliaj kialoj, por malproksimigi la timojn de la centra Registaro pri «la potenco de IAF» kaj plibonigi la eblojn de eksterlanda militista helpo. La 28-an de septembro Durruti estis vokita de García Oliver por urĝe kunveni kun li, Santillán, Marianet, Besnard kaj Tarradellas. Besnard estis akompanita de du reprezentantoj de la armilfabrikanta grupigo. Durruti alvenis la sabaton 30-an nokte, kaj sekvamatene li parolis kaj interkonsentis kun ĉiuj, ke Besnard, li kaj la du reprezentantoj foriru al Madrido. La diskuto estis tute konfidenca, kiel poste konfirmos ĵurnalisto: «Post eliri Durruti el la laborĉambro de la s-ro Tarradellas ni demandis al li pri tio traktita en la intervidiĝo, sed li malproksimiĝis kaj ne respondis niajn demandojn»[143]. La 2-an de oktobro matene ili alvenis al Madrido per aviadilo kaj estis ricevitaj de Eduardo Val, al kiu Durruti nomis «el Peque», kiu ilin kondukis al la delegitejo de la *Soli* sur la strato de Alcalá, serĉante la korespondanton Ariel Val, sia frato. Ariel memoris:

> *Alveninte al Madrido, Durruti ne petis —nek deziris—, ke oni fotografu lin, kiel aliaj, en tiuj kaj similaj cirkonstancoj, petis. Ankaŭ ne li volis, ke pri li oni faru ian ĵurnalan informon. Li deziris nenian elmontradon de reklamo*
>
> *[Li alvenis al Madrido pro siaj centopoj:]*
>
> *—Rigardu —li al mi diris—, kiel ĉi tiun kaskedon kaj ĉi tiun jakon, kiujn mi surhavas, oni estas farante por ĉiuj volontarmeanoj de miaj centopoj. Tie ne estas distingo. Ĉiuj estas egalaj. Vera frateco regas inter ni*[144]*.*

142 Márquez kaj Gallardo, citita verko

143 «Durruti vizitas la s-ron Tarradellas», ABC, 2-an de oktobro 1936.

144 Ariel, *Cómo murió Durruti* (hispane, Kiel mortis Durruti), Toulouse, marto 1944.

Ili manĝis en restoracio de la Gran Vía, mastrumita de la Sindikato pri Manĝaĵ-preparado, kaj fininte ili tuj iris intervidiĝi kun Largo Caballero. Iu al ili diris, ke ili atendos kaj informanto de la angla sekreta servo (SIS)* raportis lian reagon:

> *Tamen Durruti kontraŭargumentis: «Diru al la prezidanto, ke li devas akcepti min en la limtempo de tri minutoj, kaj ke se ne, mi kaŭzos skandalon, kiel oni neniam ĉi tie vidis». Post ĉi tio li estis tuj akceptita, kaj Durruti alparolis Caballero-n akuzante lin ne plenumi lian devon kaj simple iĝi nenecesa obstaklo. Durruti sukcesis forigi la ceteron el la ĉeestantoj kaj Caballero decidis elspezi aliajn mil milionojn da frankoj por la aĉeto de milita materialo[145].*

José Mira diras malsaman version laŭaŭde, kiu same finas per seriozaj avertoj al la ministroj fare de Durruti:

> *Mi ne ŝatas perdi la tempon kaj multe malpli ol ĝin perdas vi; sekve, diru al mi ĉu vi estas pretaj akcepti mian proponon. Se ne, elrevigu min ankaŭ. Antaŭ ol vi diskutos pri la afero, mi petegas al vi, ke vi tre atentu la preferan problemon, kiun mi al vi prezentis; mi anticipas al vi, ke se vi neas ĝin, mi perforte klopodos atingi ĝin, se necese uzante ĉiun forton, kiun mi havas sub miaj ordonoj.[146]*

Poste Durruti iris al la Ministrejo pri la Mararmeo por intervidiĝi kun Prieto kaj poste la fratoj Val lin akompanis al malnova domego de la strato Fuencarral, kiu servis, kiel sindikatejo de la Regiona Centro. En la loko svarmis volontarmeanoj, kiuj iris kaj revenis de la militfronto. Kun tiuj de la Regiona Komitato li parolis pri la Franco-ista progreso ĉe Talavera kaj la disciplino:

> *En la militfronto de Aragono ne estas problemo. Ĉiuj tie estas kolegoj. Kiam ni devas fari ion, ni faras ĝin inter ĉiuj ĉeestantoj*

---

* NeT: Angle, Sekret Intelligence Serve. Vidu: https://eo.wikipedia.org/wiki/MI6

145 Informo n-ro 23 de la 19-an de oktobro 1936, «Armiloj por la Registaro de Madrido», en Radosh kaj aliaj, citita verko.

146 Mira, citita verko.

*en tiu loko. Ekzemple, oni devas levi trabon. Mi estas la unua, kiu eklevas ĝin kaj ĉiuj min helpas fari ĝin egale[147].*

Posttagmeze, la Konsilantaro de Ministroj decidis realigi gravan aĉeton de militmaterialo, triono el kiu devus destini sin al la militfronto de Aragono. La gazetaro diseĥis la intervidiĝon: «oni scias, ke dum la intervidiĝo okazinta en Madrido la s-ro Largo Caballero kaj la aktivulo de NKL, Durruti, atingis kompletan kaj absolutan interkonsenton pri ĉiuj traktitaj demandoj»[148]. Tiam Durruti certigis la revolucian karakteron de la milito:

> *Ni samtempe faras la revolucion kaj la militon. La revoluciaj disponoj ne efikas nur en Barcelono sed ili etendiĝas ĝis la paflinion. Ĉiu vilaĝo, kiun ni konkeras komencas revolucie disvolviĝi. Malvenko de mia kolono estus io terura, ĉar nia retiriĝo similus tiun de nenia armeo. Ni devus kunporti ĉiujn luktantojn de la vilaĝoj, kie ni estis. De la paflinio ĝis Barcelono, sur la irvojo sekvita de ni, nur estas luktantoj. Ĉiuj laboras por la milito kaj la revolucio: ĉi tiu estas nia forto.[149]*

Finfine ne estis aĉeto. La respondecaj funkciuloj ne volis aŭ ne atingis trakti kun la grupigo. Besnard asertis, ke la interveno de la sovetia ambasadestro Rosenberg fiaskigis la operacion.

La sovetian Registaron zorgis la atakemeco de Hitlero, de kiu ĝi volis protekti sin interkonsentante kun la burĝaj demokratioj; tial la 25-an de aŭgusto ĝi aliĝis al la Komitato pri Ne Interveno. La 28-an, tagon post la alveno de Rosenberg al Madrido, Stalino donis sian aprobon al dekreto, kiu malpermesis la eksportadon de armiloj al Hispanujo. Tamen, sciante la malobservadojn de Germanujo kaj Italujo, kiuj subtenis la ribelulojn, Stalino

147 Ariel, citita verko.

148 «Interesaj deklaroj de la Registarestro rilataj kun lia intervidiĝo kun Durruti», *La Noche*, respublika ĵurnalo de Barcelono, 7-an de oktobro 1936.

149 «Durruti en Madrido», *Solidaridad Obrera*, 8-an de oktobro 1936. Intervjuo de José García Pradas kun Durruti por *CNT*, tutlanda proparolanto de la Konfederacio.

ŝanĝis opinion: tiel Hispanujo iĝis la kampo de provoj, kie oni povis puŝi politikan interligon inter la demokratioj kaj Sovetio kontraŭ la atakemaj projektoj de la faŝismaj ŝtatoj koncerne al ĝi. Ĉi tiu pozicio kondukis lin interveni en la hispanan konflikton, kvankam ne por favori revolucion, kio ne plaĉus al la franca kaj angla registaroj, sed por solidigi «demokratian» burĝan ŝtaton. La preteksto de la armiloj metis la Respublikon en liajn manojn. Pro rektaj ordonoj de Stalino, la 16-an de septembro, la estro de la servo de informkaptado de la Ruĝa Armeo Uritsky ekfunkciigis la «Operacion X» por sendi materialon kaj personojn al Hispanujo. Ekde tiu momento, la ambasadestro en Madrido, la rusa konsulo en Barcelono kaj la militistaj asistantoj en la Ministerio por la Milito ekvizitadis la diversajn ĉefrolulojn de la lojala flanko kaj klopodis submeti ilin al la imperativoj de la rusa politiko, sed konsiderante, ke «en ajna okazo, la lukto kontraŭ la anarkiistoj estas tute neevitebla post la venko sur la blankuloj»[150]. La katastrofa irado de la milito faris, ke NKL ekde la komenco montriĝis multe pli akceptema proklamante, ke «La tutmonda proletaro devas definitive apogi la pozicion de Sovetio», kaj atendante pli konkretan sovetian geston favore de la Respubliko ĝi anoncis sian partoprenon en la Komisiono, kiu iros al Rusujo je la deknaŭa datreveno de la Revolucio de Oktobro. Laŭ la *Soli*, «Hispanujo» reprenis «sian lokon danke al la voĉo de Sovetio»[151]. Ĉi tiu neatendita porsovietiismo obeis la peton de García Oliver, kiu intervidiĝis kun Ilya Ehrenburg. Ĉi tiu informis Stalinon: «Kvankam Oliver montris sin necedema, mi scias, ke hieraŭ, tamen, li petis en *Solidaridad Obrera*, ke oni haltu la atakojn al Sovetio.

---

150 Informo de Sancho (Vladimir Gorev, konsilisto de la Armeo en Madrido kaj agento de la rusa CPI [NeT: Главное Разведывательное Управление, ruse Centra Departamento pri Informkaptado]) al la «direktisto» (Vorochilov), 25-an de septembro 1936, en Radosh kaj aliaj, citita verko.

151 *Solidaridad Obrera*, 9-an, 10-an, 11-an kaj 12-an de septembro 1936.

Kaj, fakte, hodiaŭ aperis en ĉi tiu ĵurnalo du telegramoj de Moskvo kun favoraj titoloj. Do, la konversacio estis utila»[152]. Tiucele Rosenberg vokis Durruti-on kaj Besnard-on por interŝanĝi opiniojn, sed ĉi tiuj, havante nenion dirotan al ambasadestro, rifuzis. Oni devas supozi, ke Rosenberg parolis kun Horacio M. Prieto, Sekretario de la Nacia Komitato de NKL kaj konvinkis lin pri la oportuno de la liberecana partopreno en la Registaro. Li konvinkis konvinkiton. Poste Rosenberg interkonsentis kun Largo Caballero, certigante lin, ke la sendoj de rusaj armiloj baldaŭ alvenos. Kaj efektive la armiloj alvenis la 4-an de oktobro per la ŝipo Campeche, sed ne multaj, kaj pli el la duono, malnovaj kaj arĥaikaj[153]. Neniu el ili perdiĝis ĉe anarkiistaj trupunuoj. Estis la unua interveno de Sovetio en la hispanaj aferoj. La dua estis la transporto de la oro al Moskvo per la preteksto savi ĝin de la naciistoj[*], kaj de la anarkiistoj!

Besnard kaj Durruti revenis kun la manoj malplenaj sen scii ĝin. Durruti ĉeestis la 5-an de oktobro, ĉirkaŭ la unua tagmeze, en kunveno en la prezidanta restadejo de Companys, kun la ministroj Julio Just kaj Indalecio Prieto, la konsilisto Díaz Sandino, García Oliver kaj la generalo Aranguren[154]. Demandita de la ĵurnalistoj, li nur respondis, ke «li venis kontenta de sia estado en Madrido kaj ĉefe de la intervidiĝo, kiun li havis kun Largo Caballero»[155].

---

152 Dokumento n-ro 12, de la 18-a de septembro 1936, en Radosh kaj aliaj, citita verko.

153 Por tio rilata al la rusaj sendaroj, vidu Gerald Howson, *Armas para España* (hispane, Armiloj por Hispanujo), Ediciones Península, Barcelono, 2000. La Registaro de Largo Caballero kondutis sin per la sama malkuraĝeco kun siaj propraj agentoj, perdante la tempon aŭ malpliigante rimedojn antaŭ proponoj de armilaro de Hispanameriko aŭ Usono. Vidu Félix Gordon Ordás (ambasadestro de Hispanujo en Meksiklando), *Mi política fuera de España* (hispane, Mia politiko ekster Hispanujo), Meksikurbo, tri volumoj, 1965-1969.

* NeT: alia nomo por la ribelantaj faŝistoj

154 *Crònica de la guerra civil a Catalunya* (katalune, Kroniko pri la enlanda milito en Katalunujo), 1a volumo, Govern de la Generalitat, Edicions Dau, 2008.

155 La Vanguardia, 6-an de oktobro 1936.

Marianet, optimisma, informis al la komitatoj de la Organizo, ke pere de Durruti oni estis «en antaŭaj tagoj realigi operacion nome de la kataluna registaro kaj, ke la mono de ĉi tiu vendo [foje] atingita povos esti utila por finkovri la necesan monkvanton»[156]. Pasis tagoj kaj la promesoj ne estis sekvitaj de faktoj. Tiam Besnard ree klopodis ĝin kun la kataluna registaro, sed García Oliver apartiĝis kredante, ke la tuta afero estis manovro de Santillán kontraŭ li. Nek li nek Tarradellas volis anticipi monon kaj la traktado malfariĝis. En siaj memoraĵoj, li liberigis sin de la afero dirante, ke la kontaktoj de Besnard ne estis fidindaj. En tiu situacio oni turnis sin al la oro de la Banko de Hispanujo. Santillán sugestis al la antaŭa estro de Registaro, Giral, la ideon meti en sekuran lokon tiun oron, se oni gardis ĝin alilande[157]. Kaj eĉ li faris plie, en aŭdienco, kiun petis al la prezidanto de la Respubliko Manuel Azaña. Rakontas ĉi tiu, ke li prezentiĝis akompanita de Díaz Sandino:

> *Santillán [vestis] kostumon de filma pistolisto kaj revolvero zone. «Ni prenos Oskon, kiam ni volos», li respondis al miaj demandoj. Li diris al mi, ke kvar mil homoj de NKL estis pretaj alveni al Madrido por forpreni la oron de la Banko [de Hispanujo]. «Ĉu nome de la kataluna registaro?», Mi demandis lin. Ne. Sed ĉar ekaperas serioza minaco kontraŭ Madrido, la oro devis deponi sin en Barcelono[158].*

Tio vera estas, ke antaŭ la eventuala fiasko de la operacio Besnard, Santillán elpensis paralelan agon, t. e., elpreni la bezonan kvanton el la Banko de Hispanujo, kaj li tiucele armis la Kolonon Tierra y Libertad, kiu devus fari la agon. Je la momento de la vero, li ne kuraĝis realigi sian planon kaj, kiel ĝi jam estis konita en la prezidantejo, li

156 «Kunveno de la Komitatoj okazigita la 6-an de oktobro», Arkivoj de NKL, IISH, Amsterdamo.

157 Abad de Santillán, *La revolución y la guerra de España* (hispane, La revolucio kaj la milito en Hispanujo), citita verko.

158 Manuel Azaña, *Memorias de Guerra 1936-1939* (hispane, Memoraĵoj de Milito 1936-1939), Grijalbo Mondadori, Barcelono, 1978.

ankaŭ malkaŝis ĝin al la Nacia Komitato kaj pluraj regionaj estroj, kiuj ĝin malakceptis fortimigitaj[159]. La enŝteliĝanta agento «X», kiun la rusoj havis en la anarkisindikatistaj medioj informis siajn superulojn kaj ĉi tiuj ĉie diskonigis tion, havigante al la diplomatio de Stalino neplibonigeblan argumenton por la transloko de la oro. Caballero kaj Negrín, per ĉiaj singardecoj, transportis malmultajn semajnojn poste la oron al Kartaĥeno, por savi ĝin de la anarkiistoj! kaj ĝin enŝipigis direkte al Odeso, por pagi la armilojn, kiujn Stalino volus sendi. Iu sugestis novan planon, eble alia enŝteliĝanto, ĉar la komerca asistanto de la rusa ambasado, Stashevsky, kurigis la famon pri tio, ke NKL preparis agon por forpreni la oron de la Banko de Hispanujo dum la enŝipiĝo. La Kolono Tierra y Libertad iris al Madrido, kiel estis antaŭvidite, sed la Stabo —t. e., la rusoj—asignis al ĝi pozicion en Talavera batita de la artilerio. Kiam ĝi laciĝis ricevi kaj amasigi homperdojn, malorde retiriĝis en la ĉefurbon, iĝante celo de malicaj ŝercoj.

La afero de la armilaro neniel povis solviĝi de Katalunujo kaj ne kulpis la Industrioj por Milito, kapablaj kvarobligi la produktadon en tiu momento. La problemo estis la malfacilaĵoj por la aĉeto de krudaj materialoj. Mankis mono por pagi la fakturojn kaj akiri devizojn, mono, kiun la kataluna registaro ne havis kaj, kiun ĝi nur povis atingi per ŝtatkreditoj. Vallejo intervidiĝis kun Indalecio Prieto je unuaj de oktobro por klarigi al li la malfacilaĵojn de la produktado kaj ĉi tiu al li faris promesojn, kiuj neniam plenumiĝis. La provizado mem de Madrido, en antaŭaj tagoj de la Franco-ista atako, ne estis sekurigita; la timo stimuli ŝlosilan industrion en manoj de NKL evidentis kaj la intrigoj de la

159 Komunikaĵo de Santillán kaj iuj malnovaj membroj de la Kolono Tierra y Libertad, en Abel Paz, Durruti, el proletariado en armas (hispane, Durruti, la proletaro armita), Editorial Bruguera, Barcelono, 1978. García Oliver neis al Abel Paz koni la planon, sed en siaj memoraĵoj li rakontas, ke Juan Montserrat lin informis pri la transporto de la oro al Kartaĥeno kaj la eblo forpreni ĝin.

rusoj cele regi la Respublikon per la ekskluziveco de la provizado estis klaraj. Kompreneble la situacio ne pliboniĝis per la eniro de kvar NKL-aj ministroj en la Registaro. La Regiona Komitato eĉ minacis la Registaron se ĉi tiu ne atingis la 200 bezonajn milionojn[160].

Kiam Besnard prezentis al la organizoj de ILA sian «moralan raporton» denuncante la rolon de la ambasadestro Rosenberg, tio puŝis la reprezentantojn de NKL solidariĝi kun la Registaro:

> *Veras, ke la Registaro de Largo Caballero aprobis gravegan krediton; sed ankaŭ estas vero, ke la esploro kaj respondeco de realigo de la kontrakto estis konfidita al la Estraro pri Aĉetoj de Militmaterialo, kiun la Registaro havis en Parizo kaj al kies Estraro apartenis pro delego NKL. Oni pruvis, ke la personoj, kiuj ĉirkaŭis Besnard-on, al li faris viktimon de misuzo de konfido, kaj ke la diversaj rendevuoj de la Estraro al la reprezentantoj de la grupigo donis bedaŭrindan rezulton, ĉar ili ne povis pruvi, ke ekzistis la stokoj de materialo, kiujn ili ofertis, nek la leĝan pagokapablecon de ĉi tiu fantoma institucio.*[161]

La Komisiono por Aĉetoj stariĝis meze de oktobro kaj ne ekfunkciis ĝis novembro, monato en kiu probable aliĝis NKL, sed kiel observanto, sen ia povo. Jam tiam neniu prenis en konsidero Besnard-on, eĉ NKL mem. Krome, la Komisiono por Aĉetoj pruvis esti kaverno el nekompetentuloj kaj ŝtelistoj; NKL ade denuncis la neglektadojn kaj malmoralaĵojn de ĝia prezidanto Alejandro Otero, kuracisto kaj socialista deputito por Granado, kaj de ties asociiĝinto Manuel Escudero, sekretario de la delegitejo de

160 Vidu Pelai Pagès, *La Comissió de la Indústria de Guerra de Catalunya* (1936-1938) (katalune, La Komisiono pri la Industio por Milito de Katalunujo (1936-1938)), Publicacions de l'Abadia de Montserrat, Barcelono, 2008. Studaĵo pri la aktoj de la Komisiono pri la Industrioj por Milito de la Arkivo Tarradellas de la Monaĥejo de Poblet.

161 *Informo de la delegitaro de NKL al la Eksterordinara Kongreso de ILA kaj ties rezolucioj*. Decembron 1937, eldonita de la Sekcio pri Informo, Propagando kaj Gazetaro, NKL, Nacia Komitato, sen dato sed 1938.

Meksiklando en Parizo. Unu el la metodoj uzitaj estis la jena: antaŭ propono de materialo, ĝiaj delegitoj esploris la lokon, kie la materialo troviĝis, cele anstataŭigi la negociston per kunpartoprenantaj perantoj. Se pro singardeco la neleĝa komercisto rezervis al si la informon, «ili metis ĉiajn obstaklojn por ke ne plenumiĝu la kontrakto, ĝis nuligi la eblon kaj tiam, jam konante la necesajn detalojn, estis tiuj personoj de ilia rondo, kiuj okupiĝis pri la afero»[162]. Sciata ĉi tio, la malfavora informo de la Komisiono por Aĉetoj, se ekzistus, neniam sufiĉus, kiel klarigo, sed NKL apelacius ĝin, kiel preteksto antaŭ la Kongreso de ILA por senrajtigi Besnard-on. Pruvo, ke la vero estis alia. La provizado de armiloj estis en rusaj manoj fundamenta politika ilo; en oktobro, kiam la ribeluloj progresis al Madrido, la sovetiaj «konsilistoj» jam havis sufiĉan povon por abortigi ajnan operacion, kiu malgrandigos ilian influon, tial la versio de Besnard estis tute akceptebla. Ekzistis antaŭaĵoj: la ministroj de la Registaro Caballero, Álvarez del Vayo kaj Negrín malhelpis pro iniciato de la rusoj aĉeton de armiloj al Usono preparita de la hispana ambasadestro en Meksiklando[163] kaj ili plu povis fari ĝin. Besnard akuzis Santillán-on, 'García Oliver'-on kaj la Nacian Komitaton de NKL lasi sin influi per la rusoj kaj ne voli kontroli la informojn havigitajn de la grupigo. Same kiel Largo Caballero, la liberecanaj estroj abrupte ŝanĝis sian sintenon koncerne al tiu temo; okazis, ke neniu volis akcepti Besnard-on, dum lia dua vojaĝo al Barcelono kaj, kiam li volis iri al Bujaraloz por kunveni kun Durruti, Santillán mem al li neis la aŭton[164]. En Barcelono, la konsulo Antonov-Ovseenko gajnis al si

162 «Pri la konduto de la komisionoj por aĉetoj», Nacia Sekcio pri Kunordigo – Servo pri Ekstera Informado, sen dato sed posta al la perdo de Bilbao, cedita de Joaquín Pérez Navarro.

163 Gordon Ordás, citita verko.

164 *Rapport Moral [du sécretaire de l'AIT pour soumettre au Congrès]* (france, Morala Raporto [de la sekretario de ILA por submeti ĝin al la Kongreso]), septembro 1937, Pierre Besnard, dokumento en la Arkivoj de NKL, IISH, Amsterdamo.

Santillán-on kaj ‘García Oliver’-on, kaj ĉi tiuj —laŭ Besnard — «nur vidis per liaj okuloj». Tio estis lia tasko kaj li ĝisfunde strebis, realigante oftajn privatajn konversaciojn kun ili en la Hotelo Majestic de la Promenejo de Gracia, kie li gastis. Santillán konfirmis la proponojn de Antonov-Ovseenko kaj la malakcepton, kiun li ricevis, kiam li volis ilin efektivigi: «Li diris al ni, ke oni nin konsideris, kiel bonajn kamaradojn sed iun tagon ni povus esti danĝeraj»[165].

La rusoj ne deziris la eniron de Durruti en Zaragozon ĉar tia granda venko de NKL konfirmus ĝin, kiel superregantan forton, kion ĝuste ili klopodis eviti. La intenca fuŝo de la militfronto de Aragono estis instrukcio. Krivitsky, estro de la KPIA[*] por Okcidenta Eŭropo, kiu armefuĝis dum la milito, diris, ke plurokaze Moskvo lin ordonis neebligi, ke la sendoj de armiloj elŝipiĝis en Barcelono, ĉar ili povis fali en manoj de la anarkiistoj[166]. Baldaŭ, la rusa influo gajnis terenon kaj la anarkiistaj gvidantoj mem, dezirantaj kunlabori kun la Registaro, adoptis la paroladon pri la unuiĝo, la disciplino, la sola komando kaj la mobilizado. La malamika medio al la volontarmeoj baldaŭ kalkulis kun la aprobo de NKL kaj IAF, kies estroj —ĉefe post novembro— aliĝis al la ĥoro de kontraŭrevoluciuloj, kiu petis ilian anstataŭigon per ŝtata armeo. Kiom malproksimaj restis la vortoj de la Registarestro, Giral: «La Registaro donadis multajn pruvojn pri la estimo, kiun ĝi havas al la popolaj volontarmeoj kaj pri la dankemo, kiun al ili ŝuldas, kiujn ili meritas pro tiom da kialoj»[167], nur superitaj de tiuj de lia posteulo, Largo Caballero:

---

165 Diego Abad de Santillán, *Alfonso XIII, la II República, Francisco Franco* (hispane, Alfonso la 13a, la dua Respubliko, Francisco Franco), Ediciones Júcar, 1979.

* NeT: KPIA - Народный комиссариат внутренних дел, ruse, Komisararo de la Popolo por Internaj Aferoj de Sovetio .

166 Walter Krivitsky, *In Stalin’s Secret Service* (angle, En la sekreta servo de Stalino), Harper, Nov-Jorko, 1939.

167 «Kion diras la sinjoro Giral pri la Volontarmeoj», *El Heroldo de Castellón*, organo de la Kontraŭfaŝisma Plenuma Komitato de Castellón, 24-an de aŭgusto 1936.

*En ĉiuj militfrontoj, kaj de kiam komenciĝis la perfido de la ribelaj militistoj, la Popolaj Volontarmeoj starigis kune kun la lojalaj fortoj la digon kontraŭ kiu frakasis sin la malamiko. Per firma streko ili estas skribanta la Historion.*[168]

Eĉ multaj militistestroj esprimis similajn opiniojn. Vicenç Guarner, kiu bone konis la volontarmeojn ĉar li okupis postenojn en la Komitato pri la Volontarmeoj kaj en la kataluna registaro flanke de García Oliver, Díaz Sandino kaj Francisco Ysgleas, estis objektiva:

*Iel ajn, en la pesiltaso de la konsciaj volontarmeanoj, malgraŭ la malkono de la nunaj militistaj praktikoj, superregis la bona volo kaj la kuraĝo per kiuj ili prezentiĝis por improvize lukti en milito nekonata de ili.*[169]

La amo de la ŝtatistoj finiĝas, kiam la amata objekto jam ne estas bezona, sed oni supozas, ke la anarkiistoj ne rezonas, kiel ili. Tamen Cipriano Mera, García Oliver kaj Federica Montseny eĉ eldiris verajn frenezaĵojn kontraŭ la kolonoj kaj la volontarmeanoj ne pripensante, ke ili tiel agadis profite de la politikaj interesoj de la reakcio. Baldaŭ la tuta hierarkio de «la Organizo» iĝis bastiono de la militismo.

Komence de oktobro, la faŝistoj de Zaragozo estis pretaj komenci atakagon cele malpezigi la premadon sur la urbo. Tamen, la Kolono Durruti antaŭe agis. La 4-an de oktobro, protektita de la lojala militaviadilaro, ĝi realigis kvarcent pafojn de artilerio sur Quinto-n, 'Fuentes de Ebro'-n kaj 'la Ermita'-on. Tiam la faŝisma malamiko, kiu ricevis grandegajn helpotrupojn, ĵetis atakon sur la flankon, inter La Puntaza kaj Los Calabazares, klopodante tranĉi la ŝoseon inter Osera kaj Monegrillo kaj okupi tiujn vilaĝojn. Entute

---

168 «Kiam la volontarmeoj atakas, la malamiko ne scias nek povas rezisti», *El Heraldo de Castellón,* 25-an de septembro 1936.

169 Vicenç Guarner, *L'aixecament militar i la guerra civil a Catalunya (1936-1939)* (katalune, La militista ribelo kaj la enlanda milito en Katalunujo (1936-1939)), Publicacions de l'Abadia de Montserrat, 1980.

estis ĉirkaŭ kvar mil homoj, apogitaj de la ribelanta militaviadilaro. La sektoro estis defendita de la 26a kaj 27a centopoj —po cent kvindek kugloj por kapo kaj du maŝinpafiloj— dum pluraj horoj ĝis kiam elĉerpiĝis la municio. Kiam ili malantaŭeniris unu kilometron kaj ekforlasis la pozicion, alvenis la internaciuloj kun baterio de bombopafiloj kaj tanko, la King Kong, stirita de Bonilla. Memoras membro de la Internacia Grupo, Isidro Benet, ke dum la lukto superflugis aviadilo de pasaĝeroj sen insignoj kaj ĵetis solan bombon, kiu faris detruojn en la maŭra kavalerio, fakto, kiu decidigis la batalon[170]. Poste alvenis pliaj helpotrupoj ĝis kiam la ŝirmaj fosaĵoj estis reokupitaj. Malgraŭ oni ne povis postkuri la malamikon ĝis Zaragozo, la optimismo kaptis la Komitaton por la Milito. *El Frente* petis atakagon en ĉiuj militfrontoj pro pravigitaj kialoj:

> *La tempo urĝas. La milito devas esti ne longa. Oni devas profiti ĉiujn favorajn cirkonstancojn por tute disfali tiun komploton el perfidaj generalaĉoj kaj naŭzaj falangoj el dungosoldatoj [...] Ni organizu la atakagon. Ni ataku kun antaŭenpuŝo, sen hezitoj, en ĉiuj militfrontoj. Ke estu unuiĝo de agado. Tre Bone. Sed milita senaktiveco, neniam [...] La atakagon de la ribelantoj en Madrido oni devas kontraŭagi per alia atakago en la loko de la malamika militfronto plej facile rompebla [...] La milito devas esti mallonga. Tion postulas nia ekonomio kaj nia grandega intereso por ke la progresanta socia revolucio ne ruiniĝu.*[171]

La 5-an, Durruti estis en Barcelono informante al la Regiona Komitato pri sia vojaĝo al Madrido kaj sia intervidiĝo kun la ministro pri la Mararmeo. Revenante al la militfronto, kiam li alvenis al Ilerdo, renkontis memorigan manifestacion pri la kataluna oktobro[*]. Ĝenita de la

---

170 Intervjuo de *Les Giménologues* al Isidro kaj ties filo César, la 21-an de oktobro 2009.

171 *El Frente*, n-ro 29, 8-an de oktobro 1936.

* NeT: La 6-a de oktobro 1934 okazis en Barcelono la proklamo de la kataluna ŝtato ene de hispana federacia respubliko fare de la prezidanto de la kataluna registaro, Lluís Companys.

rememoro pri la malkuraĝo de la katalunaj naciistoj, li dissolvis ĝin per la sekva parolado:

> *Kamaradoj, al mi interesas mallonge memorigi al vi la signifon, kiu havis por la mondo vian malfeliĉan movadon. Mi devas sciigi vin, ke la veraj revoluciuloj ne povas aliĝi al ĉi tiu manifestacio, kiu laŭ juĝo de kiu ajn estis evidenta malkuraĝo, aparte de ĝiaj plej gravaj iniciatintoj. Ĉi tiun historian daton, nur havas rajton memorfesti la bravaj asturianoj, kiuj ne ŝparante penadojn sciis, kiel hodiaŭ, doni ĉion antaŭ ol kapitulaci antaŭ la kontraŭulo.*[172]

Samtage, la 6-an, li prezentiĝis en Alcañiz en la Eksterordinara Delegitkunveno de Sindikatoj de Aragono kaj Kolonoj, kiuj agadis en la militfronto. Li estis favore starigi Regionan Konsilantaron pri Defendo, propono akordigita de la Delegitkunveno de katalunaj Urbaj kaj Distriktaj Sindikatoj kaj de la Tutlanda Delegitkunveno antaŭ monato:

> *Mi devenas de Madrido, mi konversaciis kun la ministro por la milito kaj elmontris al li sen ĉirkaŭparoloj kaj ĉirkaŭfrazoj la realon. Li tute devis rekoni ĝin kaj promesis apliki rimedon, sed ĉi tio ne sufiĉas; ne sufiĉas, ĉar por porti la aĵojn sur iliajn verajn vojojn nepras praktike efektivigi la interkonsentojn de la Delegitkunveno de Regionaj Sindikatoj de NKL; se la Nacia Konsilantaro pri Defendo ne stariĝos ni riskas perdi ĉion. Pro tio, por venki la ludon al la faŝismo, por ankaŭ atingi premi la centran povon kaj, ke ĝi akceptu niajn proponojn, ni devas konstrui en Aragono la Konsilantaron, kiu regulos ĉiujn niajn aktivecojn.*[173]

Tamen, la aragonaj anarkiistoj, per la Konsilantaro, aspiris «celi ĉion», kion ne kuraĝis fari la katalunoj. La Nacia Komitato de NKL ne tion ŝatis ĉar tio malhelpis ĝiajn interkonsentojn kun la Registaro, kaj la Regiona Komitato de NKL de Katalunujo trudis, ke ne estu Konsilantarfako por la Milito kaj, ke la operacioj en la militfronto daŭre dependu

172 Mira, citita verko.

173 Aktoj, en la Arkivo de Salamanko, PS Barcelono.

de la kataluna registaro. Ĉi tiu tute kontraŭis la Konsilantaron, ĉar ĝi konsideris Aragonon, kiel militareon kaj, sekve, ĝi devis submetiĝi al la militista aŭtoritato. Tion ankaŭ pensis la kolonelo Villalba, «sola komando» de la militfronto kaj, ĝenerale, la fortoj malamikaj al la revolucio, ĉefe la Kolono Karolo Markso, memnomita «divizio», kiuj jam okazigis komencojn de alfrontoj kontraŭ la revoluciaj komitatoj en la aragona postmilitfronto.

La 8-an, la faŝistoj, por rompi la respublikan militfronton, koncentriĝis en Perdiguera kaj ree atakis per la kavalerio la vilaĝon de Farlete, dum per multnombraj trupoj ili progresis sur la ŝoseo de Villamayor tra la montaro de Alcubierre, antaŭintaj de pafado artileria kaj de militaviadilaro. Skribas Antonio de la Villa, speciala korespondanto de la Agentejo Febus al la aragona militfronto:

> *Kiel la supereco de la malamiko estis klara kaj la atako ŝajnis senespera, oni devis fari elmontron de vigleco kaj spriteco. Durruti, sur malferma kampo, iris de flanko al alia, ne por animi —kio ne necesis— sed por prigardi ĉiujn defendojn.*
>
> *Ĝis la dua posttagmeze la batalo ŝajnis necerta. Pro konvenecoj de taktiko oni devis forlasi la ŝirmajn fosaĵojn lokitaj je 2 kilometroj de Farlete; sed kontraŭe oni antaŭeniris tra Perdiguera por tranĉi la pasejon, kiun klopodis konstrui la ribelaj pontonistoj al la rivero.*
>
> *Durruti, kun vinberaro en la manoj —la sola nutraĵo, kiun englutis dum la tago ĉi tiu stranga viro, kiu ne fumas kaj nur trinkas akvon—, ekpensis novan planon, sen flanklasi la telefonon, kiun li saĝe uzas.*
>
> *Posttagmeze jam donis siajn fruktojn la planoj de Durruti. Kvazaŭ magie, mobiliziĝis la baterioj de Pina kaj Fuentes de Ebro, kiuj konvene lokitaj, sentigis sian ĉeeston. Samtempe alvenis de Bujaraloz kolono de helpotrupoj. Kaj la skadro de Reyes, per plia municietaro, ekbombardis sur la precizajn lokojn, kiujn ordonis Durruti.*

*Je la kvina la malamiko ekretiriĝis; je la kvina kaj duono senorde disfuĝis; kiam mallumiĝis la konfuzo estis tiel granda, ke niaj volontarmeanoj kaptis 82 falangistojn, inter ili naŭ oficirojn, kiujn Durruti ordonis transloki al la stabejo.*[174]

La venko estis kompleta sed ili savis sin kvazaŭ mirakle. Estis 26 mortintoj el la volontarmea parto. La faŝistoj konsideris la pozicion perdita ĝuste en la momento, kiam la defendantoj preskaŭ elĉerpis la kartoĉojn. La ago havis esceptan atestanton, la eksministro Francisco Barnés, kiu aliris al Bujaraloz por viziti Durruti-on. Santillán priskribas liajn impresojn:

*Li vidis Durruti-on multobligi sin por esti en ĉiuj danĝerlokoj, animante la volontarmeanojn. Li venis kortuŝita. Li vidis la heroon plorante pro rabio, kiam elĉerpiĝis la municioj kaj, kiam ĉiuj prepariĝis, ne movante sin de sia posteno, uzi la manbombojn, kiel lastan rimedon antaŭ ol esti malvenkitaj. Se la malamiko konintus la realan situacion pri la municionaro de la kolono, ĝi povintus malfari, malliberigi aŭ ekstermi ĝin.*[175]

Revenante al Bujaraloz, ege laca, apud la du lignaj barakoj, kiuj servis de stabejo lokitaj en la maldekstra flanko de la ŝoseo al Zaragozo, li rekontis grupon de aragonanoj, kiu vekiĝis en Leciñena, trans la monto, pro la bruo de fusilaro kaj maŝinpafiloj fare de la faŝista atako al Farlete. Ili interkonsentis kun la estraro de la Kolono Lenino aliĝi ĝuste tiun tagon al la Kolono Durruti, ĉar ili estis aliĝantoj al NKL. Durruti, konante la nivelon de la najbaraj fortoj, ne povis eviti ekkrii: «Se ĉi tiun atakon ili farus kontraŭ LPMU, ĉi tiuj forkurus ĝis Sariñena»[176], antaŭsento, kiu baldaŭ efektiviĝos.

174 «Ni estas tuŝanta Zaragozon per la manoj», *El Mercantil Valenciano*, 11-an de oktobro 1936.

175 Diego Abad de Santillán, «Buenaventura Durruti», *Timón*, Barcelono, 5-an de novembro 1938.

176 Jusamar, citita verko.

En tiuj cirkonstancoj tiel malfavoraj, la rigora plenumo de la instrukcioj povis mildigi la mankon de militaj rimedoj, tial la temo de la disciplino ree aperis sur la tablo. Durruti deklaris en Madrido kontraŭi la disciplinon de kazerno sed ankaŭ, «kontraŭ la malbone komprenita libero al kiu ofte turnas sin la malkuraĝuloj por eviti riskojn»[177].

Li same diris al la korespondantoj de la ĵurnalo de Madrido *Ahora*, Quílez Vicente kaj Alcazán, kiuj vizitis la militfronton de Aragono, kvankam li precizigis:

> *Ĉi tie ne solviĝas deziroj de komando, oni ne konkeros galonojn, nek stelojn, nek skarpojn, nek elstarajn postenojn. Tio restas por la popolaĉo [...] Vi jam konstatis, eble iom surprizita, per kiom da fido kaj kamaradeco alvenas ĉiuj homoj al mi; tio anstataŭ esti rajto estas virto. La disciplino por mi nur estas respekto al la propra respondeco kaj al la fremda [...] En la milito la delegitoj devas esti obeataj, kontraŭe ne eblas sukcese realigi iun operacion [...] Tiu, kiu mensogas, scias, ke li havas duoblan labordaŭron de plug- kaj pik-pioĉo. La senkuraĝigaj leteroj ne eliras el ĉi tie nek oni ilin ricevas. Ili iras en la paperkorbon. Al tiu, kiu volas foriri hejmen rimarkante, ke li propra-vole foriras, samkiel li venis, mi faras la konsiderojn, kiuj ĝustiĝas al ĉiu kazo, kaj se li insistas forlasi nin, mi sendas lin hejmen piede.*
>
> *Feliĉe ĉi tio jam malaperis. En mia Kolono restis forviŝita la vorton «forpermeso». Mi havas tiel sindonemajn homojn, tiel atentaj al la lukto, ke ili al la venko oferis ĉion [...] Tiel mi faras kaj komprenas la militon. Sed mankas io plia. Oni devas mobilizi la tutan postmilitfronton de Hispanujo. Ke ne estu mallaboremuloj. Ke laboru ĉiuj.*[178]

La proparolanto de la kolono publikigis la regularon de la Konfederaciaj Volontarmeoj ellaborita de la volontarmeanoj de la regiono Centro, mallonga dokumento

177 «Durruti parolas en Madrido», *La Noche*, 7-an de oktobro 1936.

178 «Kiel komprenas la militon Durruti: "Ni luktas por ĉies estonteco"», *El Heraldo de Castellón*, 17-an de oktobro 1936.

el ses punktoj, kiu resumis la devojn de la volontarmeano, tamen *El Frente* konsideris, ke devis insisti:

> *Estas multaj kamaradoj, kiuj bedaŭrinde konfuzas la disciplinon kun la aŭtoritato [...] Libero kaj aŭtoritato repuŝas, kontraŭmetas sin, kaj se la unua regas, la alia mortas.*
>
> *Tamen kiam oni al vi parolos pri disciplino, estu pli atenta pri la koncepto. Oni devas konstati, ke por la feliĉa efektiviĝo de ĉiu celo, ĉiu dezirata atingo, necesas la disciplino, t. e., la adaptado al la normoj, reguloj, ktp, kiujn ili bezonas.*
>
> *Ni metu ekzemplon. Ni nun estas en milito. Nia celo estas klara: venki la militon. Ĉiu milito postulas militistan organizon kaj ĉi tiu, disciplinon. Tial, ĉiuj individuaj penadoj estas logike subordigitaj al celo, kiun oni serĉas, t. e., VENKI.*
>
> *Ĉi tie ĉiuj ni estas egalaj. Efektive, ne estas superuloj, laŭ la malnova maniero. Tamen estas kolegoj, kiuj taskas direkti la militon, estas Militista Komando, respondeca pri la taktika kaj strategia dislokiĝo de la agantaj trupoj kaj oni facile deduktas, ke se ne ekzistus la disciplino, t. e., obeado al la militinstrukcioj, la devoj, ktp, stulte ruiniĝus niaj penadoj. Ĉiu konscia kamarado estas disciplina.*[179]

Tamen, super la disciplino kaj la senkonscieco de la postmilitfronto, la fundamenta problemo plu estis la manko de armiloj. Durruti daŭrigis sian eternan rekantaĵon: «Por pafi estas troaj homoj sed fusiloj estas tre malmultaj»[180]. Emma Goldman, kiu lin vizitis malmulte post la batalo de Farlete, rakontis al Alaiz kiam ŝi revenis al Barcelono:

> *Kiam oni vokis lin telefone por ke li diktu la militraporton, li diris:*
>
> *—Armiloj kaj municioj!*
>
> *Li tuj demetis la aŭdilon. Se horojn poste oni al li faris ajnan konsulton, li respondis:*
>
> *—Municioj kaj armiloj!*

179 «Koncepto pri disciplino», *El Frente*, n-ro 30, 9-an de oktobro 1936.

180 Jusamar, citita verko.

*La observoj, kiuj alvenis de la oficejoj havis ĉiam la saman rifuzon:*

*—Armiloj kaj municioj!*[181]

La malabundeco koncernis ĉiujn ceterajn kolonojn de la militfronto de Aragono, kiel la sinsekvaj atakoj de la Franco-istaj trupoj baldaŭ pruvos. Finita la batalo en Farlete, pluvegis kaj pro tio paraliziĝis la lukto kelkajn tagojn. Sed la 12-an la ribelantoj plifortigis Perdiguera-on kaj ĉirkaŭ tri mil el ili supreniris la montojn de la Montaro de Alcubierre, prenante la pozicion de La Casilla por rapide fali sur Leciñena-on, defendita de tricent volontarmeanoj de la Kolono Lenino (aŭ Maurín), kaŭzante al ili severan malvenkon. La trupoj de LPMU retiriĝis al la proksima vilaĝo de Alcubierre. La Kolono Karolo Markso vane klopodis rekonkeri la montpasejon de Alcubierre, dum Durruti kondukis siajn homojn al Monte Oscuro por kontraŭataki direkte Perdiguera kaj la montaro. Kiam ilia atako malsukcesis, la 16-an, en la monteto de Alcubierre, li ordonis la retiriĝon, sed cento da volontarmeanoj el la Internacia Grupo ne ricevis la ordonon kaj eniris en Perdiguera-on, estante encirkligitaj de ribelantaj helpotrupoj venintaj de Zaragozo. Iuj povis eskapi sed ĉirkaŭ sesdek restis ĉirkaŭitaj kaj preferis morti antaŭ ol kapitulaci.[182] Siaflanke, la Kolono Karolo Markso perdis 'Puig Ladrón'-on, sed retenis la atakagon en Robres kaj Torralba, malfarante la ĉirkaŭferman movadon kontraŭ Tardienta. La hekatombo de Perdiguera ne haltis la operacion. Ĉe la kontraŭa

181 Felipe Alaiz, *Grandes figuras de la revolución: Buenaventura Durruti* (hispane, Grandaj figuroj de la revolucio: Buenaventura Durruti), Editorial Minucci, Barcelono, sen dato sed tutcerte je majo 1937.

182 Laŭ telegramo de la generalo estro de la Franco-ista Kvina Divizio, datita la 16-an de oktobro, entute estis 89 mortintoj el ili kvin virinoj, la plimulto francoj kaj rusoj, Ĝenerala Militista Arkivo de Avilo, C.1226. La plej kompleta informo pri la katastrofo de Perdiguera estas en Antoine Giménez kaj *Les Giménologues*, *Les Fils de la Nuit. Souvenirs de la guerre d'Espagne* (france, La filoj de la nokto. Memoraĵoj de la milito de Hispanujo), kuneldono de L'Imsomniaque-Ilin Giménologues, Montreuil-Marseille, 2006. Pepitas de Calabaza eldonis la hispanan version en la jaro 2009.

ekstremo de la Kolono Durruti, en Pina kaj Gelsa, oni bombadis Quinto-n por malhelpi la trupmovadojn inter tiu vilaĝo kaj Fuentes de Ebro, kaj en Alcubierre oni premis direkte Leciñena. Durruti al la sektoro de Tardienta sendis centopon, kiu kvankam ne povis rezisti en la ermitejo de Sankta Quiteria pro manko de municio, reakiris 'Puig Ladrón'-on —escepte de la supermara alto nomita «La Neebla» de la respublikanoj kaj «Sankta Simón» de la ribeluloj— kaj tie restis fiksita la militfronto ĝis 1938. Tio sama okazis al tiuj de LPMU en Leciñena, nun grupigitaj en Monto Pucero.[183] Tiumomente, Durruti fortikigis 'Monte Oscuro'-n kaj rekrutigis homojn por starigi firman militfronton apud Pina. Ĉiuj fortoj de la kolono estis en la unua paflinio, fosante ŝirmajn fosaĵojn, je cent kvindek metroj de la malamiko. Neniu estis en Bujaraloz nek aliloke de la postmilitfronto. En la stabejo li diktis instrukciojn por neebligi la aliron al la delegitaroj, kiuj po dekduoj venis viziti lin. Li same malakceptis inviton por iri al Parizo fare de la Komitato por la Libera Hispanujo kaj skribis leteron al ĉiuj francaj revoluciuloj por krei «kontraŭfaŝisman fronton», etendo de la politika kaj sindikata interkonsento ekzistanta en Hispanujo. La letero estis legita la 24-an de oktobro de Emilienne Morin en la Vélodrome d'Hiver de Parizo, antaŭ publiko el sesdek mil personoj. Oni konvenas klarigi ke, almenaŭ ĉe la komenco, la hispanaj anarkiistoj, eĉ la plej reformismaj, ne konsideris la kontraŭfaŝismon, kiel interklasan interligon por savi la burĝan demokration sed, kiel ĉefe sindikatan fronton favore al laborista revolucia demokratio, kiu politike kaj ideologie interpretis situacion de duobla povo:

> *Se vi malamas la faŝismon tiel profunde, kiel ni, forgesu ĉiujn malgrandajn malkonsentojn inter partioj kaj celu solan celon: la lukto kontraŭ la faŝismo. La hispana revolucio devas esti*

183 Benito, citita verko.

*por ĉiuj revoluciuloj la instrukcio por la unuiĝo de ĉiuj proletaj fortoj de Francujo [...] Vivu la laborista unuiĝo! Vivu la socia revolucio!*[184]

La starigo de la sola komando en Barbastro, limigita al la militfronto de Osko, t. e., sen la apogo de Durruti kaj Ortiz, estis kompleta fiasko.[185] La liberecanaj volontarme-anoj abomenis Villalba-on kaj ĉi tiu malakceptis la revolucian laboron en la vilaĝoj kaj la demokration de la kolonoj («la anarkiista viruso»), samopiniante kun la komunistoj. Villalba kaj la komunisto Del Barrio koliziis pro siaj aŭtoritatemaj manieroj kun la kolonoj de NKL kaj LPMU, kiuj tie agadis. Ekzistis sektoroj de la militfronto, kiuj li neniam vizitis, preferante pasigi longajn periodojn en Barcelono for de siaj devoj. Li ne komprenis la psikologion de la volontarmeano, libera homo, kiu luktis por siaj idealoj, nek lia tipa maniero batali, prenante la iniciaton, kuniĝante al la tereno, malfidante de la senŝirmaj atakoj, kvankam ne malakceptante la korp-al-korpan batalon. Sed tio plej malbona estis lia pretendo trudi sian aŭtoritaton al la vilaĝoj, alfrontante la revoluciajn komitatojn, ĉu pro la kolektivigaj disponoj, ĉu defende de la persekutitaj reakciuloj. La Konsilantaro pri Defendo de Aragono faris alvokon denuncante la sintenon de la komunistaj kolumnestroj:

*Oni insistas [...] agadi en nia Regiono, kiel en tereno konkerita al ekstera kaj interna malamiko; kaj sekvante ĉi tiun eraran konduton, la cititaj estroj trudas sociajn kaj politikajn normojn tute kontraŭaj al la sento de nia Popolo, kiu per la interkonsento de ĉiuj siaj kunloĝantoj memtrudis superajn vivnormojn, ni asertus konsente kun la socia transformo, kiun la kontraŭfaŝisma lukto estas kreanta en Hispanujo.*

*Oni eksigas Komitatojn kreitaj de popola elekto; oni minacas per la pafmorto, la malliberejo kaj la korpa puno; kaj finfine oni*

184 «La mesaĝo de Durruti», *Le Libertaire*, 30-an de oktobro 1936.

185 Abel Paz asertas, ke okazis stariganta kunveno en Sariñena, al kiu ĉeestis García Oliver kaj Díaz Sandino. Ortiz neas la ekziston de tiu kunveno.

*trudas novajn Komitatojn kreitaj laŭ bildo de la politika kredo de la faranto de ĉi tiuj ekscesoj, ankaŭ diskonigante la aserton pri tio, ke kiu kontraŭstaros oniajn ordonojn sentos la tutan pezon de la armita forto, kiu estas sub onia komando.*[186]

Post la fiasko de la operacioj por la preno de Osko en septembro, la alfronto akriĝis. Durruti devis interveni por eviti koliziojn inter la komitatoj, la karabenistoj kaj la komunistaj trupoj. Villalba jam ne povis plenumi la komandon. Tiam García Oliver volis korekti eraron per alia, enoficigante estron de la Stabo de la aragona militfronto, kun pli da atribuoj, al la majoro Reyes, ĉiusence multe pli malbona militisto ol Villalba. La 13-an de oktobro matene, Díaz Sandino, konsilisto pri Defendo de la kataluna registaro, kaj García Oliver, sekretario pri Defendo, kunvokis kunvenon en Sariñena de delegitoj de kolonoj. Durruti rimarkis, ke nek la revolucia senpacienco nek la memnomumita «sola komando» prenis serioze la militon, kaŭzante kverelojn:

*Mi ne volas ricevi pli da telefonalvokoj je la unua kaj dua de la mateniĝo dirante, ke tiu vilaĝo ekribelis, ke tiu alia vilaĝo ankaŭ [...] Min surprizas la malmultaj fojoj, ke mi eliras el la militfronto, mi iras al Ilerdo, kiam oni min diras: Durruti, ĉi tio ne povas tiel daŭri. Ni estas pretaj kaj komencos pafadi. Kio estas ĉi tio? Ĉu eblas, ke la postmilitfronto komencos pafadi? Ĉu eblas, ke ni devas lasi en la vilaĝoj fidindaj kolegoj por ke ili viglu [ĉies] interesojn?*

*[...] Hieraŭ nokte ni estis zorgaj studante la manieron helpi la kolegojn de Perdiguera kaj Leciñena. Oni nin telefonalvokis je la unua de la mateniĝo.*

*—Durruti, ĉi tie vilaĝo, Barbastro.*

*—Kio okazas?*

186 Konsilantaro pri Regiona Defendo de Aragono, «Ĝenerala Dispono por la vilaĝoj de Aragono elliberigitaj de la faŝismo. Varma alvoko al la kolonoj, kiuj agadas en tiuj vilaĝoj», Fraga, oktobro 1936, *Cultura y Acción*, organo de la Regiona Sindikato de Aragono, Rioĥo kaj Navaro, NKL-ILA, 7-an de novembro 1936.

*—Nenio. Alvenis ducent aguiluchos-anoj kaj ĉi tie ĉiuj ni estas pretaj tumulti.*

*—Kio okazas?*

*—Nu, ke eliris el Barbastro civilgvardianoj kaj karabenistoj kaj ĉi tie la situacio baldaŭ eksplodos.*

*Mi diras al ili: vi estas idiotoj; ni ĉi tie estas pensantaj porti tricent virojn en la montaron, kiuj riskos sian vivon kaj vi al mi estas kreantaj malfacilaĵojn en la postmilitfronto.*

*Mi insultis ilin kaj mi devis telefone solvi la aferon. Devas fini ĉi tio; se ne, ne eblas kiom ajn ni strebos nin, se ni ne gajnas la fidon de la postmilitfronto.*[187]

Durruti favoris Stabon, kiu havus la fidon ne nur de la kataluna registaro aŭ de la delegitoj de la kolonoj, sed de la tuta aragona kaj kataluna postmilitfronto. Persono, kiel Villalba ne povis partopreni en ĝi ĉar neniu lin konsideris senpartia. Ankaŭ ne la majoro Alfonso Reyes. La enoficigo de persono, kiel Reyes, malgranda diktatoro, obeis la deziron plaĉi al la komunistoj kaj, per insida maniero, la ideon militistigi la militfronton, ĉar sekrete la Konsilantarfako estis ellaboranta dekreton de militistigo. Samtage, Marianet, sekretario de la Regiona Komitato, klopodis haltigi la nomumon «ĉar oni ne petis unue al la Organizo ties opinion, kiel estis la devo de García Oliver, ĉar al la Organizo ĉi tiu apartenas». Ĉi tiu respondis, ke li enoficigis Reyes-on «por anstataŭi Villalba-on»[188], kies memproklamon, kiel estron li permesis. Durruti insistis pri la eksigo de Villalba pro la fonto de tumultoj, kiu li estis:

*Tio plej malbona, kiun ni havas en la militfronto de Aragono, kie estas pli da kvereloj, estas en Barbastro. Barbastro estas nesto de tumultoj. El tie ĉiutage eliras kaj alvenas vidi min*

187 «Informo pri la kunveno de politikaj kaj militistaj estroj de la militfronto de Aragono», kiu povas troviĝi en la paperoj de José del Barrio, ĝuste datita kaj indikita la loko de la kunveno, Fondaĵo José del Barrio, Pavelló de la República, Barcelono.

188 Aktoj de la kunvenoj de komitatoj de la 13-a kaj 16-a de oktobro 1936, Arkivoj de NKL, IISH, Amsterdamo.

*komisionoj. Mi ilin diras: atentu knaboj, tio estas en viaj manoj, solvu ĝin tie. Oni devas solvi ĝin humiligante neniun. Oni devas konscii pri la situacio. La malamiko jam al ni delokis fortojn el la nordo, samkiel delokas fortojn el aliaj sektoroj en la militfronto de Aragono. Mi tion vidas apenaŭ cent metrojn antaŭ ni. Ni vidas tie grandegan kvanton da homoj kaj ni atendas, ke ili al ni donos la ekpuŝon. Se vi demandus al mi, kiel la alian tagon ni defendis Farlete-on kaj Monegrillo-n, mi vin respondus, ke ni nin defendis, kiel povis, kaj mi estis vidanta la momenton kiam ni ekforkuris al Fraga perdante tiujn du poziciojn. Ĉi tio devas fini. Oni devas fini kun la afero de Barbastro por ke renaskiĝu la fido en la militfronto.*[189]

Por Durruti la militistoj ne devis partianiĝi en la vilaĝoj kaj devis lasi la taskon al la politikaj delegitoj de la kolonoj. La problemo de Barbastro povus solviĝi per politika komitato dediĉita peri pri la internaj aferoj. Sed oni devis eviti la ĉeeston de militevituloj kaj desktruloj en la ĜUL, kiuj aliĝante al tiu sindikato restis protektitaj de la Kolono Karolo Markso, kreante konflikton inter la komunistaj volontarmeanoj kaj la novaj revoluciaj lokaj aŭtoritatoj.

Del Barrio, malamiko de la revolucia proceso, simple pretendis neniigi la Provincan Komitaton de Barbastro. Komence, li suspektis, ke «García Oliver pensis starigi solan komandon enoficigante, kiel superan estron Durruti-on»[190], sed li eraris ĉar fakte estis enoficigita Reyes, proksima al la komunistoj, helpita de la kapitanoj Guarner kaj Botet, dum Villalba, Ortiz kaj Durruti restis kiel estroj de sektoro. 'Del Barrio'-n ĉi tio ne konvinkis:

*... Tiu Stabo estas IAF en la potenco [...] Sandino kaj Guarner ne estas alia aĵo ol viroj, kiuj movas sin laŭ la instrukcioj de García Oliver kaj la aliaj [...] Estas Stabo, kiun ni ne povas akcepti. Antaŭe la anarkiistoj faris kion volis laŭ neleĝa*

189 «Informo pri la kunveno de politikaj kaj militistaj estroj de la militfronto de Aragono», citita verko.

190 «Informo de la Estro de Divizio Karolo Markso al Militista Komitato de USP-ĜUL», citita verko.

*maniero de la revolucia vidpunkto. Ili nun leĝigas sian agadon kaj ĉiujn siajn aktivecojn.*[191]

La stalinistoj sentis sin obstine persekutataj de la anarkiistoj, superaj en armilaro, kiuj ne nur malfaris iliajn intrigojn, sed klopodis senarmigi iliajn volontarmeanojn apenaŭ ili donis paŝon en la postmilitfronto. La ordonoj de Villalba, ilia preferata militisto, estis senĉese pridubitaj kaj eĉ kiam ĉiuj delegitoj ilin akceptis, la volontarmeanoj rifuzis ilin plenumi. Tamen, post la postulo de militista disciplino apenaŭ kaŝiĝis la volo fini kun la anarkiista supereco en la militfronto, t. e., kun la komitatoj por nutraĵ-provizadoj, komisionoj por esploro, konfiskoj, kolektivigoj kaj proklamoj de liberecana komunismo. Ŝajne, Durruti kaj Ortiz akceptis la nomumon de la majoro Reyes, ne tiel la Konsilantaro pri Defendo de Aragono, kiu ĝin malakceptis[192]. Finfine, la komunistoj aprobis ĝin —fakte Reyes estis unu el la iliaj—, por proponi «grupigi laŭ ideologioj la fortojn, kiuj estas en la militfronto; almenaŭ la kamarado Reyes kaj la nova estro de la Sektoro, laŭ nia opinio, konsentas pri tio» ĉar estis «neeble agadi per homamaso de manovro en kiu estas marksistoj, anarkiistoj kaj trockiistoj»[193]. Lia agado estis ruiniga kaj baldaŭ Reyes fariĝis malsimpatia al ĉiuj. Dekreto proklamita de li minacante trakti, kiel ribelantojn kaj mortpafi la volontarmeanojn, kiuj libervole agadis ne atendante ordonojn aŭ foriris armigitaj al la postmilitfronto, kaŭzis indignon[194]. Ĉiuj, krom la komunistoj, tute ignoris lin kaj la 23-an de decembro li prezentis la eksiĝon.

---

191 «De la Divizio Karolo Markso al la Militista Komitato de USP kaj ĜUL», informo de la 15-a de oktobro 1936. Fondaĵo José del Barrio, Pavelló de la República, Barcelono.

192 Kunveno de la komitatoj de la 31-a de oktobro 1936, Arkivoj de NKL, IISH, Amsterdamo.

193 «Informo de la Stabo de la Divizio Karolo Markso al la Militista Komitato USP-ĜUL», 26-an de novembro 1936, Fondaĵo José del Barrio, Pavelló de la República, Barcelono.

194 Aktoj de la kunvenoj de la komitatoj de la 16-a kaj 18-a de novembro 1936, Arkivoj de NKL, IISH, Amsterdamo.

# 4. Madrido sen registaro

La alveno de la ŝipo Zirianin, la 14-an de oktobro, ŝarĝita de nutraĵoj kaŭzis fortan trafon en Barcelono. Delegito de la Sindikato pri Transportoj kaj tiu de la Urba Federacio informis al la komitatoj de NKL, ke «la bonveno estis tre varma. En la tuta kajo kaj Haveno de Barcelono nur flagris unu tipon de flago: tiu de IAF, kio ege surprizis la rusojn»[195]. La aranĝita bonveno, en kiu la ĉeestanta konsulo Antonov-Ovseenko kriis: «Vivu IAF-on!» dum la liberecanaj amasoj respondis: «Vivu Sovetion!», estis spektaklon, kiu kaŭzis senton de malplivaloreco al la anarkiistoj. En kunveno de komitatoj, delegito, kun malespero kaj rabio, transdonis al García Oliver «liston de la malfeliĉaj kolegoj, kiuj suferas la rigoron de la rusa despotismo ornamita per la kromnomo de "Diktatorado de la Proletaro" [...] por ke li klopodu ilian liberigon», kiam li havis okazon paroli kun la ŝipkapitano[196]. Oliver promesis tion fari tiun saman nokton, sed se tion faris, neniam ĝin rakontis. Li estis unu el tiuj «respondeculoj», kiuj pretendis gajni al si la fidon de la sovetianoj por almenaŭ atingi parton de la milita materialo, kiun ili sendis, tial ili sin sentis devigitaj trakti KPH-on kaj USPK-on per prudento kaj eĉ ankaŭ danci kun la popolfronta politiko de Moskvo. García Oliver mem postulis al la redaktistoj de *Solidaridad Obrera*, t. e., la kunlaborantoj de Liberto Callejas kaj Jaime Balius, ke ili neniel ataku Sovetion aŭ la komunistojn de ĝiaj paĝoj. Nur Camillo Berneri kuraĝis skribi —en la itala—, ke «granda, decida

195 Kunveno de komitatoj okazigita la 14-an de oktobro 1936, Arkivoj de NKL, IISH, Amsterdamo.

196 Akto de la kunveno de komitatoj okazigita la 15-an de oktobro 1936, Arkivoj de NKL, IISH, Amsterdamo.

konfirmo pri la ekzakteco de niaj tezoj pri la Ŝtato kreanto de la kapitalismo estas donita de Sovetio, kie la socialismo de ŝtato favoras la aperon de novaj klasoj»[197]. Berneri detale priskribis la predantan kaj koruptan karakteron de la rusa burokrataro kaj ties naturo de klaso. Tial «la malaperigo de la ŝtato estas pli malproksima ol neniam en Sovetio, kie la ŝtata interveno estas ĉiam pli kaj pli vasta kaj subprema kaj, kie la klasoj ne malaperis»[198]. Sed, kompare kun la taktikismo, la intelekta honesteco estis malmulte taksita en la anarkiista medio. Signifa artikolo de Federica Montseny, aperinta je unuaj de oktobro en *Tierra y Libertad* (proparolanto de IAF), «Hispanujo kaj Rusujo», faris ekkrii al Antonov-Ovseenko, ke «la rilatoj inter la anarkisindikatistoj estas ŝanĝantaj laŭ fundamenta maniero»[199]. La artikolo pli-malpli indikis, kiel malforton de la rusa anarkiismo la ne partoprenon en la nova ŝtato, ĉar tiu kontraŭŝtatismo permesis al la bolŝevikoj plenumi ilian diktatoradon kaj detrui la anarkiistojn. Montseny daŭrigis: «Tial nia laboro en Katalunujo estis ĉien enkonduki nin [...] Tiel, eĉ en politiko, ni faris revolucion en Hispanujo. Ne estas malobservo de principoj, sed iom da akcepto pri tio, kion la Historio nin instruis». La anarkiistoj cedis siajn aspirojn por subteni la unuiĝon, sed la komunistoj ankaŭ devis esti flekseblaj. «Tio, kio povis efiki en Rusujo [la diktatorado de partio], ĉi tie estus katastrofa kaj kontraŭefika.»[200] De tiam ĉi tiu estis la oficiala doktrino, la aŭtoritatema komunismo por la rusoj, la

197 *Guerra di Classe*, n-ro 1, 9-an de oktobro 1936.

198 *Guerra di Classe*, n-ro 3, 24-an de oktobro 1936.

199 Informo de Antonov-Ovseenko al KPEA (NeT: Народный Коммиссариат Иностранных Дел, ruse Komisararo de la Popolo por Eksteraj Aferoj de Sovetio) de la 11-a de oktobro 1936, en Radosh kaj aliaj, citita verko

200 Federica Montseny, «Hispanujo kaj Rusujo». Mi citas la reprodukton de *Línea de Fuego*, proparolanto de la Columna de Hierro en la Militfronto de Teruelo, 6-an de novembro 1936.

liberecana por la hispanoj, kion eĉ ne kontraŭstaris la Columna de Hierro*:

> *Ni, la anarkiistaj laboristoj, salutas Rusujon de 1936 kaj ŝatas la helpon, kiun ĝi al ni donas, laŭ ties valoro. Ili, kun sia komunismo de ŝtato. Ĉi tie la sola ebla revolucio: tiu apogita de la anarkiistoj.*[201]

La situacio estis senespera. Santillán pesimisme informis al la komitatoj:

> *Ni estas lacegaj, ne havas kartoĉojn, ĉiutage bezonus duonan milionon kaj preskaŭ ne havas po kuglo por individuo. Ni estas fusilistoj sen kugloj [...] ĉiuj promesoj, kiujn oni al ni faras estas malveraj famoj, ĉiuj aŭdacas trompi nin.*[202]

NKL ĉiam kontraŭstaris la bolŝevikajn metodojn kaj kondamnis la diktatoradon nome de la proletaro, sed plimulto el liberecanaj gvidantoj pensis, ke ili travivis specialajn cirkonstancojn kaj, ke savi la hispanan revolucion kaj eĉ la tutmondan revolucion, meritis la penon kvankam estu per la stalinistoj. Liberto Callejas estis devigita eksiĝi, kiel direktisto de *Solidaridad Obrera* kaj lia kunlaborantaro estis anstataŭigita de alia pli preta sekvi la novan diplomatian kaj porŝtatan vojon. Tiel, Emma Goldman informis 'Rudolf Rocker'-on pri tio, ke «La promeso de Rusujo sendi armilojn turnis la kapon al niaj amikoj. Mirinde, la *Soli* komencis kampanjon de laŭdoj al Rusujo»[203]. La 3-an

---

* NeT: Kolono de Fero. Konsistigita de valenciaj anarkiistoj, ĝi ĉeestis en la militfronto de Teruelo. Ĝi samtempe agadis, kiel milita volontarmeo kaj, kiel revolucia organizo. Ĝi famis ĉar estis la plej malŝatita kaj kritikita kolono el la NKL. Oni akuzis ĝin pri ĉiaj ekscesoj. Sed la vera kerno de la afero estis, ke la kolono volis trudi la liberecenan komunismon tie, kie ĉeestis.

201 Manuel Gimeno, «Rusujo 1936», *Línea de Fuego*, 30-an de oktobro 1936.

202 Kunveno de komitatoj okazigita la 23-an de oktobro 1936, Arkivoj de NKL, IISH, Amsterdamo.

203 Letero de novembro 1936, menciita en D. Nelles, H. Piotrowski, U. Linse kaj C. García, *Antifascistas alemanes en Barcelona. El grupo DAS: sus actividades contra la red nazi y en el frente de Aragón* (hispane, Germanaj kontraŭfaŝistoj en Barcelono. La grupo DAS: ĝiaj aktivaĵoj kontraŭ la germanfaŝista reto kaj en la militfronto de Aragono), Sintra Editorial, Barcelono, 2010.

de novembro, NKL-IAF denuncis la fundamentan kaŭzon, kiu pelis la liberecanojn kien iliaj malamikoj volis. La manifesto demandis: «Kial tiom daŭras la milito?». La respondo evidentas: ĉar la eŭropaj potencoj blokas la Respublikon, ĉar la faŝismo ricevas helpon kaj

> *... ĉar la internacia solidareco de la laboristoj kun kiuj ni luktas kontraŭ la sangavida kaj kruela faŝismo, estas solidareco, kvankam atentinda, ne de batalo. Ĉar ĉi tie ni ne batalas per butero, sed per fusiloj, kaj ne estas per enladigitaj sardinoj, kiel oni devas venki la militon, sed per militaviadilaro kaj kanonoj.*[204]

Efektive, la nesufiĉa apogo de la eŭropa proletaro izolis la hispanan revolucion kaj permesis, ke la burokrataj porŝtataj tendencoj disvolviĝis kaj praviĝis.

Meze de oktobro, la Regiona Komitato de Katalunujo — kies sekretario, Marianet, estis stimulita de la ĵus alveninta konsulo Antonov-Ovseenko— decidis sendi kune kun la kataluna reprezento delegitaron, kiu vojaĝos al Rusujo por ĉeesti al la festoj de la datreveno de la Revolucio de Oktobro, oficiala vizito organizita de la Asocio de Amikoj de Sovetio. La kialoj de la vojaĝo obeis strategiajn kalkulojn, kiel diris Mariano Rodríguez Vázquez en la ceremonio, kiu festis la revenon de la delegitaro: «La lukto, kiun nuntempe oni subtenas en Hispanujo estas la kialo pro kiu NKL decidis iri al Sovetio»[205]. Komence, la Organizo nomumis por la vojaĝo ‘Francisco Carreño’-n, kiel membro de la Kolono Durruti, ‘Marcos Alcón’-on kaj ‘Eusebio Carbó’-n, unua ago de la ekstera politiko de la hispana anarkisindikatismo[206]. Ŝajne, Durruti ne kredis je la efikeco

204 *La Vanguardia,* 4-an de novembro 1936.

205 «Hieraŭ nokte en la Gran Price», *La Noche*, 12-an de decembro 1936.

206 Akto de la kunveno de komitatoj, 20-an de oktobro 1936, Arkivoj de NKL, IISH, Amsterdamo. Joan Llarch asertas, ke Carreño anstataŭis Durruti-on, kiu estis la invitito al Rusujo, kio ne ŝajnas verŝajna (*La muerte de Durruti* [hispane, La morto de Durruti], Ediciones 29, Barcelono, 1983). Ĝisfunda studaĵo pri la vizito al Moskvo, en

de la vojaĝo kaj havis tre malbonan opinion pri Sovetio, kiel ni jam povis konstati. La rusa militkorespondanto Ilya Ehrenburg jam estis admonita de li dum sia vizito de aŭgusto: «Li kriis, ke Sovetio ne estis libera komunumo, sed ŝtato, kiel ĉiuj aliaj, ŝtato plena de burokratoj kaj, ke ne estis hazarde, ke li estis malaprobe rigardata en Moksvo»[207]. Tamen, la Komitato por la Milito, kunveninta en Osera malmulte post la bataloj en Alcubierre, deklaris sin favore kaj decidis, ke Carreño iris reprezentante la kolonon. La volontarmeanoj daŭre ne ricevis la promesitajn armilojn kaj la vizito povus helpi por ke alvenu iu. Tiam, —23-an de oktobro 1936— Durruti redaktis mesaĝon al la rusaj laboristoj kaj transdonis ĝin al la sendoto. La letero estis direktita ekskluzive al la laboristoj, ignorante iliajn estrojn kaj spite al la diplomatiaj singardecoj, kiuj determinis ĝian enhavon, ĝi kategorie finiĝis asertante la anarkiisman idealon:

> *Kolegoj,*
>
> *Servu ĉi tiuj linioj por sendi al vi fratan saluton de la militfronto de Aragono, kie miloj da viaj fratoj luktas, kiel vi luktis antaŭ dudek jaroj por la emancipiĝo de klaso ofendita kaj humiligita dum jarcentoj kaj jarcentoj. Antaŭ dudek jaroj la rusaj laboristoj levis en Oriento la ruĝan flagon, simbolo de la frateco inter la internacia proletaro, en kiu vi metis ĉiun vian fidon, por ke oni helpu vin ĉe la granda verko, kiun vi entreprenis; tasko pri kiu sciis ĉiuj laboristoj el la mondo preni sur sin, sindoneme respondante per la ebloj, kiujn la proletaro posedas.*
>
> *Hodiaŭ ankaŭ estas en Okcidento, kie renaskiĝas nova Revolucio kaj ankaŭ flagras flago, kiu reprezentas idealon, kiu venkonta kunigos per frataj ligoj du popolojn, kiuj estis mokitaj*

---

Miquel Amorós, *Francisco Carreño y los arduos caminos de la anarquía* (hispane, Francisco Carreño kaj la malfacilegaj vojoj de la anarkio), Asocio Isaac Puente, Vitorio, 2013.

207 Ilya Ehrenburg, membiografio, citita de Hans Magnus Enzensberger en *El corto verano de la anarquía* (hispane, La mallonga somero de la anarkio), Grijalbo, Barcelono, 1977.

*de la carismo unuflanke kaj la despota monarĥio aliflanke. Hodiaŭ, rusaj laboristoj, estas ni, kiuj konfidas al viaj manoj la defendon de nia revolucio; ni fidas neniun politikiston laŭdiran demokratan aŭ kontraŭfaŝisman; ni fidas niajn klasfratojn, la laboristojn; ili estas, kiuj devas defendi la hispanan Revolucion, samkiel ni faris antaŭ dudek jaroj, kiam ni defendis la rusan Revolucion.*

*Fidu nin; ni estas aŭtentikaj laboristoj kaj pro nenio en la mondo ni forlasos niajn principojn kaj malpli humiligos la ilon simbolo de la laborista klaso.*

*Saluton el ĉiuj laboristoj, kiuj luktas kontraŭ la faŝismo per la armiloj enmane en la militfronto de Aragono.*

*B. Durruti*

Preskaŭ samtempe, la anarkiisma idealo mem suferis profundan metamorfozon. Jacinto Toryho, nome de la Duoninsula Komitato de IAF, diris en la Olympia, ke kun la komunistoj «ni devas esti sinceraj, rektaj, noblaj kaj, ĉefe, lojalaj»[208]. La 22-an de oktobro, Vidiella, Sesé kaj Felipo García, el ĜUL-USP, kaj Escorza, Eroles kaj Herrera, el NKL-IAF, subskribis «interkonsenton de agadunuiĝo» per kiu ili kompromisis sin «plifortigi la povon de la kataluna Konsilantaro, transformi la volontarmeojn en popola armeo submetita al formala disciplino kaj sola komando, forigi la neregeblajn grupojn kaj agadi per mallarĝa rilato kun la Registaro de Madrido»[209]. En la bovbatalejo La Monumental de Barcelono, la dimanĉon 25-an de oktobro, okazis granda politika amaskunveno por unuiĝo, kie prenis la parolon Comorera, Sesé, Marianet, Federica kaj la konsulo Antonov-Ovseenko. Sur grandega portebla afiŝo oni povis legi «IAF, USP. Vivu la unuiĝon de la proletaro!», kaj la prezidantaro instalita sur la virbovtenejo estis kovrita de granda ruĝa ĉifono, kiu portis, kiel surskribo la liston de

208 *La Vanguardia*, 20-an de oktobro 1936.

209 César M. Lorenzo, *Los anarquistas españoles y el poder* (hispane, La hispanaj anarkiistoj kaj la povo), Ruedo Ibérico, Parizo, 1972.

komencliteroj «IAF-UPF*-ĜUL-NKL-USP». Federica Montseny komencis sian paroladon ĝojante pri «la nedetruebla ligo», kiu kunigis la kunvokantajn organizojn «ekde tiu memorinda dato» kaj asertis havi la «absolutan certecon», ke ne estus «fratomortigaj luktoj». Surprizas aserto tiel tranĉa, ĉar dek tagojn poste Durruti, dum parolado realigita en Radio Barcelona, kiu paligis la liberecanajn gvidantojn, alparolis per severaj esprimoj «la organizojn» kaj petis al ili, ke ili ĉesu «kverelojn kaj insidojn» sub la minaco iri tien kun la volontarmeoj por meti ordon. La organo de NKL de Aragono, *Cultura y Acción*, ĝin komplete publikigis kaj ĝi efektive sonis minace:

> *La volontarmeanoj ruĝiĝis vidante iujn broŝurojn de propagando por la militfronto. Ĉu vi scias kial ili ruĝiĝas? Ĉar la faŝistaj aviadiloj, kiam ĵetas sur niaj militfrontoj gazetaron, ĉi tiu sekvas la samajn procedurojn, eĉ la saman propagandon, kiun faras en siaj broŝuroj la ĵurnaloj de la postmilitfronto kaj la politikaj partioj de Katalunujo. Deŝiru ĉi tiujn broŝurojn, laboristoj! Estas insulto al la sinofero de la volontarmeanoj. Ne permesu, ke al vi devas diri ni, la luktantoj en la ŝirmaj fosaĵoj, ke ne estas almozuloj, ke ne estas ĉifonuloj. La volontarmeanoj fikse rigardas Katalunujon, Barcelonon, kaj Barcelono ne agas laŭ la postulo de la cirkonstancoj. Ĝi ne plenumas sian devon. Ĝi ne plenumas ĉar oni ne povas taksi je 10 pesetoj la vivon de volontarmeano; ĉar al la edzino, al la filo de ĉi tiu oni ankaŭ ne povas limigi la manĝaĵojn. Kaj, dum ĉi tio okazas, la konsilistoj, iuj el NKL kaj eĉ el IAF, ne havas limon nek moderecon por la vestoj kaj la manĝo. Se vi pretendas fari el ĉi tiu milito vulgaran militon, kun ĉiuj ĝiaj konsekvencoj de malmoraleco kaj volupto, ni al vi diras, ke ni ne estas pretaj lukti. Se vi kreas, ke ni povas toleri, ke la benzino malŝpariĝu, ke ĉiuj havu aŭton, ke ĉiujn noktojn Barcelono ofertu la saman bedaŭran spektaklon, vi eraras. Vi eraras ĉar estas, kiu kreas, ke la faŝismo estas Mola, Franco aŭ Queipo, ni nomas faŝiston ĉiu, kiu forneniigas aŭ eluzas tion, kio apartenas al la Revolucio. Pensu kion ni povos fari,*

---

* NeT: Unuiĝo, Proletaj Fratoj. Vidu https://eo.wikipedia.org/wiki/UHP

*kiam ni faros la atakon al Zaragozo, kio estas kazo de justeco, kiam en la postmilitfronto oni ne donas la ekzemplon. Vi diros, ke mia lingvaĵo estas sovaĝa, de milito. Jes, ĝi estas sovaĝa, estas la voĉo de la bombo, de la fusilo, de la krio de hororo de la volontarmeanoj, kiuj eksplode dispeciĝas.*[210]

La parolado koincidis kun la anonco de la eniro de kvar ministroj de NKL en la Registaron kaj publikiĝis en la *Soli* terure kripligita; la pli supre aludita fragmento aperis tiel:

*Ni petas al la popolo de Katalunujo, ke finu la intrigojn, la internajn luktojn; ke agadu laŭ la postulo de la cirkonstancoj; lasu la kverelojn kaj la politikon kaj pensu pri la milito. La popolo de Katalunujo havas la devon respondi al la penadoj de kiuj luktas en la militfronto.*[211]

En la unua paĝo de Acracia, ĝi estis amplekse komentariita:

*Alia parolado de Durruti. Alia parolado kun la propra stampo de la parolanto. Sen retoriko, sen rekantaĵoj, sen preparado kaj afektadoj. Durruti estas el la solaj, kiu en la Nacia Konfederacio de la Laboro sciis restadi senŝanĝa. La dato de la 19-a de julio dividis la vivon de ne malmultaj en du partoj: antaŭ kaj post tiu dato. Durruti estas la sama, ke antaŭe. Liaj vortoj nevarie respondas la faktojn, kaj vortoj kaj faktoj estas la samaj nun, kiel antaŭe [...] Durruti ne rekonas diojn en la ceteraj nek ni en li. Sed oni devas fari justecon al kiu havas sub sia respondeco la plej bone organizatan kaj bataleman kolonon, sen disciplino kaj militistaj rangoj. Ne pro kio estas Durruti sed pro kio li reprezentas [...] Durruti reprezentas nian penson, kiu estas tiu, kiun li dissendis per la ondoj de la radio-stacio NKL-IAF, antaŭ ol pasi tra la oficiala filtrilo.*[212]

Fakte, Durruti alparolis la laboristojn de Katalunujo por ke ili altrudu militmoralon perforte se necese kaj indikis, ke:

---

210 *Cultura y Acción*, n-ro 20, Alcañiz, 7-an de novembro 1936.

211 Milda versio aperinta en *Solidaridad Obrera*, 5-an de novembro 1936.

212 «Durruti, laŭtparolilo de la anarkio», *Acracia*, 6-an de novembro 1936. Eble el la plumo de Alaiz.

*La milito, kiun ni nuntempe faras estas utila por detrui la malamikon en la militfronto, sed ĉu estas ĉi tiu la sola? Ne. La malamiko ankaŭ estas tiu, kiu kontraŭstaras la revoluciajn konkerojn kaj troviĝas inter ni, kaj kiun ni same detruos.*[213]

Ankaŭ li ege kritikis la militistigon aranĝita inter ĉiuj organizoj kaŝe de la kolonoj:

*Se la dekretita militistigo estas por timigi nin kaj por trudi al ni feran disciplinon, ili eraris, kaj ni invitas tiujn, kiuj faris la dekreton iri ĉe la militfronto por konstati nian moralon kaj disciplinon, kaj ni poste venos por kompari tiujn kun la moralo kaj disciplino de la postmilitfronto.*[214]

*Vi konsilistoj misjuĝis la dekreton de militistigo de la Volontarmeoj. Ĉar vi parolas pri fera disciplino, mi diras al vi, ke alvenu kun mi al la militfronto. Tie estas ni, kiuj akceptas nenian disciplinon ĉar ni konscias plenumi nian devon. Kaj vi vidos nian ordon kaj organizon. Ni poste alvenos al Barcelono kaj demandos vin pri via disciplino, ordo kaj kontrolo, kiujn vi ne havas.*[215]

La vortoj de Durruti eĉ mildigitaj malkonfirmis la «ideologian unuiĝon», kiu laŭ Federica ekzistis inter NKL-IAF kaj USPK-ĜUL pro la adopto fare de la anarkiisma parto de la stalinisma sinteno pri la demando de la povo. Kiel ĉi tiu diris en La Monumental:

*... Al ni, al la anarkiistoj, instruis la sperto, ke ne eblis transformo se ni ne metis nin fronte al la povorganoj; ĉi tion devis rekoni ĉiuj. Ni ĉiam rekonis kaj subtenis tion.*

*Hodiaŭ, fakte, la ideologiaj diferencoj, kiuj nin disigis, malaperis, ĉar ni akceptis la plenumitajn faktojn, kiuj nin devigis partopreni en la regado de la lando.*[216]

---

213 «Vortoj de Buenaventura Durruti», *Acracia*, 5-an de novembro 1936.

214 *Solidaridad Obrera*, 5-an de novembro 1936.

215 «Vortoj de Buenaventura Durruti», citita verko.

216 «La grandioza ceremonio de la Monumental», *La Vanguardia*, 27-an de oktobro 1936.

La ideo pri tio, ke per la partopreno en la Registaro kaj la prioritato de la milito super la revolucio forviŝis la diferencon kun la stalinistoj estis ripetita de Serafín Aliaga en politika amaskunveno en Alakanto kaj la ĉeestanta reprezentanto de KPH respondis, ke per la buŝo de Serafín parolis la Komunista Partio, pro la tiom fidela interpreto[217]. Ne veris, ke malaperis la diferencoj inter la revoluciaj laboristoj kaj ties respublikaj kaj komunistaj kontraŭuloj, tute male, kun la plifortiĝo de la ŝtato ili intensiĝis. Sed, kiel pruvas la lingvaĵon de Federica kaj Aliaga, inter la «respondeculoj» de la liberecana movado kaj KPH ĉiufoje estis malpli da kontraŭdiroj. Profitante la klimaton de kunlaborado, la 29-an de oktobro la kataluna registaro proklamis la dekreton pri militistigo de la kolonoj, al kiu ne estis fremda García Oliver kaj, kiun NKL blokis de antaŭ monato. Durruti rompis la harmonion ekzistanta inter la anarkiistaj figuroj kaj avertis la komitatojn:

> *Kolegoj,*
>
> *Mi al vi kunsendas kopion de la letero, kiun ni hodiaŭ sendis al la konsilantaro de la kataluna registaro, por ke estu informita pri nia pozicio en la afero pri la militistigo de la volontarmeoj.*
>
> *Salutojn.*
>
> *B. Durruti*[218]

Efektive, la Komitato por la Milito de lia kolono kunvenis en Osera kaj, konsultante neniun, komunikis al la kataluna registaro sian malakcepton de la mitistigo per deklaro por la memdisciplino, kiu petis «liberon de organizo»:

> *Ĉi tiu Kolono, spontanee kreita pro la efekto de tiu protesto sur la barcelonaj stratoj kaj poste pligrandigita de ĉiuj, kiuj sentis sin interfratigitaj kun nia idealo, havas unuiĝon en sia tuto kaj celoj, kaj ĝiaj individuoj disciplinas sin rilate al ĉio, kio emas*

217 «El nia Regiona Delegitkunveno», interveno de la sindikato pri Liberalaj Profesioj de Alakanto en la naŭa kunsido, *Fragua Social*, 17-an de novembro 1936.

218 Arkivoj de la DK (NeT: Duoninsula Komitato) de IAF, IISH, Amsterdamo.

*atingi ĝian celon venki la faŝismon. Se la disciplino emas serĉi plej grandan efikecon sur la individuoj, ĉi tiu Kolono povas esti bona pruvo de tiu efikeco. La laboro en la militfronto realigita de niaj volontarmeanoj kaj la konstanta progreso de niaj pozicioj estas nia plej bona ekzemplo favore de la memdisciplino.*

*La volontarmeanoj de ĉi tiu Kolono havas fidon pri si mem kaj pri ni, kiuj ĝin gvidas, per ĝia rekta delegado, sen rezervoj. Sekve ili kredas, kaj ni konsentas kun ili, ke la dekreto de militistigo ne povas plibonigi niajn eblojn de lukto, male kreante suspektemojn, rezervojn kaj malinkinojn, kiuj jam ekaperis kaj konkretigus veran staton de malorganizo.*

*La pretekstata kialo pri tio, ke la malamiko luktas «provizita de grandaj kvantoj de materialo» evidente havas ne solvon per la militistigo de la volontarmeoj.*

*Pro ĉio dirita, ĉi tiu Komitato, eĥante la krion de la protesto levita en la Kolono de la menciita Dekreto, estas devigata ne akcepti ĝin.*[219]

La dokumento estis datita la 1-an de novembro 1936 kaj subskribita, nome de la Komitato, de Durruti mem. La komenco de la menciita radia parolado de Durruti je la merkredo 4-a nokte estis kompleta legado de la koncernita dokumento, kun rekta averto al la stalinistoj:

*Kiu en la nunaj momentoj pensas fari porpartian laboron, profiti la cirkonstancojn por gajni homojn aŭ forton por sia politiko, sia partio aŭ sia ideologio, malkreskante la unuiĝon kaj la revolucion mem, eraras; mi diras, ke li estas memmortiganto.*[220]

Kaj se iu ankoraŭ hezitis, tiujn tagojn Durruti estis intervjuita de André Prudhommeaux por *L'Espagne*

219 «La Kolono kontestas la dekreton pri militistigo», reproduktita en *Vía Libre*, organo de NKL kaj IAF de Badalona, 7-an de novembro 1936. La centopo de Badalona troviĝis en Pina, ĝuste apud Osera. La originalo estas en la arkivoj de IAF-DK, IISH, Amsterdamo.

220 «Kion forgesis Durruti», *Fragua Social,* 6-an de novembro 1936.

*Nouvelle* kaj li klare deklaris sin kontraŭ la dekreto, ĉar ĝi enkondukis militistan spiriton kontraŭan al la revolucio:

> *André.– Ĉu la rango, la salutoj, la punoj, la rekompencoj?*
>
> *Durruti.– Ni ne ilin bezonas. Ĉi tie ĉiuj estas anarkiistoj.*
>
> *André.– Sed ĉu ne revalidiĝis la malnova Kodo de Militista Justeco pro juŝa dekreto de Madrido?*
>
> *Durruti.– Jes kaj ĉi tiu decido de la Registaro produktis bedaŭrindan efekton. Tute mankas al ĝi senco pri la realo.*
>
> *André.– Ĉu ekzistas absoluta kontrasto inter tiu sinteno kaj tiu de la volontarmeoj?*
>
> *Durruti.– Ni estas tre akordigemaj, sed ni scias, ke unu el la du pensmanieroj devas malaperi antaŭ la alia.*
>
> *André.– Ĉu vi ne kredas, ke se la milito longe daŭras, la militismo stabiliĝos kaj endanĝerigos la revolucion?*
>
> *Durruti.– Kompreneble! Tial ni devas venki la militon kiel eble plej baldaŭ!*[221]

Du semajnoj poste, kelke da germanaj volontuloj, kiuj, konvinkitaj de delegitoj de la organizo Deusche Anarchosyndikalisten, DAS[*], tre influa inter la fremduloj dum la unuaj monatoj de la milito, aliĝis al la Kolono Los Aguiluchos —la grupo de maŝinpafiloj Erich Mühsam—, faris alvokon al la rusa popolo por ke ĝi propetu antaŭ ĝia Registaro kaj ĉi tiu liberigu liberecaninon forglutita de la sovetia karcera sistemo, kies historio jam estis diskonigita de Callejas kaj Balius en la *Soli*:

> *Kio okazas al Zenzel Mühsam, la parulino de tiu, kies nomo estas sur nia flago? Ne nur estas la kamaradino Zenzel, kiu estas enkarcerigita de la policaj ungegoj de la sovetia Rusujo. La demando ne estus de malfacila respondo. Multego el niaj kamaradoj suferas la saman doloron troviĝi arestitaj en la*

221 Dori kaj André Prudhommeaux, *Catalogne Libertaire (1936-1937)* (france, Liberecena Katalunujo (1936-1937)), Spartacus, Parizo, 1946.

* NeT: Germanaj Anarkisindikatistoj

*proleta lando. La grupo, vokante la aferon de la libero de la hispana popolo, kiu ĉi-momente estas tiel mallarĝe ligita al la nomo de la kolego Erich, petas al la rusaj laboristoj atingi, ke en unu el la proksimaj ŝipoj alvenontaj al Hispanujo vojaĝu Zenzel Mühsam.*[222]

La gvidantoj de NKL kaj IAF, kiuj bone konis la aferon, tute evitis diskonigi la tiurilatajn petojn. Nur la Columna de Hierro, konflikte kun la Organizo de septembro, eĥis ĝin.

La sovetiaj agentoj diferencis inter la «bonaj» anarkiistoj, kiel Marianet, Doménech, Federica Montseny aŭ Santillán, kaj la «malbonaj», t. e., la radikalaj, kiel Durruti. «Bonaj» estis la gvidantoj dezirantaj kunlabori kun la komunistoj, kiuj defendis la militistigon, la disciplinon kaj la unuiĝantan fronton, kaj el tiuj estis ĉiam pli kaj pli. «Malbonaj» estis kiuj bone komunikiĝis kun la liberecanaj amasoj tute penantaj fari la revolucion kaj konsideri la komunistojn, kiel agentojn de la burĝaro. «Malbonaj» estis tiuj kapablaj doni fortobaton kaj korekti la revolucian situacion. García Oliver, informita de la komunisto Almendros pri la timoj de Antonov-Ovseenko, fieris en siaj memoraĵoj pri tio, ke li estis konsiderita «malbona», «ĉar ni povis meti sur la stratojn de Barcelono la duonon de la anarkisindikatistaj trupoj de Aragono kaj ankoraŭ lasi fortojn por reteni la malmultajn centojn da batalantoj, kiujn tie havis RMK kaj USPK»[223]. Li eĉ diris, ke lia enoficigo, kiel ministro okazis pro la deziro de la konsulo havi lin ekstere de Barcelono, sed kial li tiam akceptis la postenon?, ĉu pro vanteco?, kial li ne havis pli bonajn planojn?, ĉu por pruvi al la sovetianoj sian disponon kunlabori? Sagaca observanto, kiel Pierre Besnard ĉi-tempe rekonis la plej malgrandan

222 La ĝusta skribo estas Zenzl Mühsam. «La afero de la kamarado Zenzl Muehsam: Kie estas la nova rusa ”demokratio”?», *Solidaridad Obrera*, 22-an de aŭgusto 1936. Vidu ankaŭ *Línea de Fuego*, 19-an de novembro 1936.

223 García Oliver, citita verko.

komprenkapablecon en neniu liberecana gvidanto, krom Durruti. Li skribis en sia taglibro la 18-an de septembro:

> *La revolucio iras malantaŭen, kaj ne estas kulpo de la popolo, ĉar ĉi tiu luktas per senegala entuziasmo, sed de ĝiaj estroj, kiuj estas trenitaj de la okazaĵoj, donante pruvojn per tio, ke ili perdis la revolucian iniciaton [...] Mi min demandas ĉu la gvidantoj de NKL hodiaŭ estas la samaj homoj de la 19-a de julio. La sola, kiu al mi ŝajnas escepti tiun regulon estas Durruti, tipo de originala revoluciulo, kiu laŭ multaj aspektoj memorigas la gerilanon Néstor Makhno. Kiel ĉi tiu, li agadas kun la popolo, sen disiĝi de ĝi kaj pro tio li diferencas de la aliaj anarkiistaj gvidantoj.*[224]

Tiu sama popolo konstatis per la reapero de la burĝa Barcelono, kun ties luksaj restoracioj, koncertkafejoj, teatroj de malpezaj komedioj, dancejoj kaj bordeloj plenplenaj, la revoluciajn malprogresojn. Volontarmeano de Sástago skribis en *Acracia*:

> *Barcelono jam ne estas Barcelono de la 19-a de julio, tute ne. Barcelono, por ni, kiuj eliris la unuaj aliĝintaj al la kolonoj, estas tute nekonata; la hodiaŭa Barcelono al ni memorigas tiun Barcelonon, kiun administris la burĝaro kaj kiu elstariĝis pro sia vivo plena de malvirto kaj korupto. Ĉi tio estas la hodiaŭa Barcelono. Kloako de diboĉo kaj malŝparado, kie gastas la mallaboremularo kaj la fuŝantoj de la revolucia Katalunujo.*[225]

La intenseco de «la bona vivo» burĝa malkaŝis, ke estis aperanta nova klaso konsistigita de la gvidantaj sektoroj de la nova situacio, inkluzivitaj la anarkiistoj kaj, ke tiu superreganta klaso reproduktis la gustojn kaj inklinojn de la antaŭa. Pri tio, la stalinistoj, kun ilia partio plena de burĝoj, sentis sin, kiel fiŝo en la akvo. En Katalunujo, Antonov-Ovseenko proponis allogi limigitan kvanton da bonaj «gvidantoj» de NKL-IAF, kiel Mas, Eroles, Herrero aŭ

---

224 Citita de Paz, citita verko.

225 «Kvin tagoj en la postmilitfronto», *Acracia*, 9-an de novembro 1936.

Toryho, krom tiuj jam menciitaj, por porti ilin al la komunista medio, por tio li faris revivigi la Komitaton por Interligo de NKL kun ĜUL kaj USPK. Kvankam pri Durruti la misinformantaj spionoj Ilya Ehrenburg kaj Mijail Koltsov estis teksintaj falsan bildon de militemulo preta rezigni siajn principojn por venki la militon, Antonov-Ovseenko lin opiniis nekoruptebla kaj konsideris gravege apartigi lin de la militfronto de Aragono. La dissendita parolado de Durruti konfirmis tiun konvinkon. Laŭ konfidenca informo de la majoro de la Kolono Karolo Markso (Trueba), li proponis la eblon sendi Durruti-on al Madrido cele «malaktivigi» liajn fortojn. Tion faris la anarkiistaj gvidantoj mem, luktantaj pro la povo ene de la Organizo. Por ili, la alveno de Durruti al Madrido estus la pleja atingo de post la eniro de NKL en la Registaron, iom trafita de ties tuja translokiĝo al Valencio. Por tio la sekretario de la Nacia Komitato de NKL, Horacio M. Prieto, aŭtoro de la manovro, vojaĝis en Bujaraloz-on por konvinki lin. La liberecana historiisto Abel Paz kolektis atestojn, kiuj tiel ĝin asertis. Estas Pedro Pablo Portero, kutima ĵurnalisto en la kolono, kiu skribis nur kelkajn monatojn poste: «Ni ne ĝuste memoras kiun tagon. Estis iu el novembro. En la barako, kie Durruti instalis sian Stabon, konversaciis kun Buenaventura iuj senditoj, kiuj intencis konvinki lin por ke li iru helpi Madridon. Ni memoras iliajn vortojn: "La sorto de Madrido kaj de la milito estas en viaj manoj kaj ĉiuj, unue la Registaro, konsideras, ke nur vi povas savi la situacion"»[226]. Horacio, aŭ kiu ajn diable estu, troviĝis kun malmilda malakcepto. Li tiam alvokis la internan disciplinon, sed Durruti ne estis García Oliver kaj respondis lin: «Mi ne konas alian disciplinon ol la Revolucio!»[227]. Poste estis la vico de Federica Montseny. Estas gvidantoj, kiel

226 «Scenoj de milito en los Monegros», *La Libertad*, semajna gazeto de la militfronto, Divizio 42a, n-ro 5, Cuenca, 1937.

227 El atestoj kolektitaj de Paz, citita verko.

Ricardo Sanz, kiu speciale substrekis la implikiĝon de la tuta Registaro:

*La Registaro de Valencio sugestas al la Kataluna Registaro la neceson, ke fortoj el la militfronto de Aragono, tiam neaktiva, tuj translokiĝu al Madrido. Okazis ĉi tio la 7-an kaj 8-an de novembro 1936.*

*La Konsilatarfako pri Defendo de la kataluna registaro okazigas kunvenon. Ĉeestas al ĝi Federica Montseny, ministrino de la Registaro de la Respubliko, kaj reprezentatoj de ĉiuj partioj kaj sindikataj organizoj. Ankaŭ reprezentantoj de la Kolonoj, kiuj agadas en Aragono. La demandon oni proponas per tuta krudeco. «Madrido, post horoj, post tagoj kiel maksimume, perdiĝos —diras Federica Montseny— se oni ne tuj iras ĝin helpi.» Kaj ĉiuj konsentas helpi Madridon. Multaj kolumnestroj propravole proponas sin por iri, kun siaj homoj, defende de la ĉefurbo. Sed ĉi tio ne povas esti akceptata. Estas neeble tute forlasi la militfronton de Aragono. Kaj oni konsentas, ke iros kelkaj miloj da volontarmeanoj al Madrido, sub la komando de prestiĝa homo. Kaj tie oni indikas, ke ĉi tiu devas esti Durruti.*[228]

Por la konsulo Antonov-Ovseenko, kunveno de ĉiuj kolumnestroj antaŭe okazis, la 6-an de novembro:

*Durruti tute kontraŭis sendi helpotrupojn al Madrido; li atakis per malmolaj vortoj la centran Registaron, «kiu estis prepariĝanta por la malvenko»; li karakterizis la situacion de Madrido, kiel senesperan kaj konkludis, ke Madrido havis simple politikan gravecon kaj ne strategian. Tiu sinteno de Durruti, kiu ĝuas esceptan influon sur ĉiuj katalunaj anarkisindikatistoj, kiuj estas en la militfronto, devis esti venkita je kia ajn kosto. Oni devis interveni per forto. Kaj Durruti cedis, deklarante, ke li povis sendi al Madrido milon da unuarangaj batalantoj. Post pasia parolado de la anarkiisto Abad de Santillán, li akceptis sendi du mil kaj tuj diktis*

228 Ricardo Sanz, *Los que fuimos a Madrid* (hispane, Kiuj iris al Madrido), Ediciones Petronio, Barcelono, 1977 (verkita en 1969).

> *ordonon por ke lia najbaro en la militfronto, Ortiz, cedu aliajn du mil, Ascaso aliajn mil, kaj la Divizio K. Markso aliajn mil.*[229]

Sendube temas pri la kunveno en la Konsilantarfako pri Defendo, kiun rakontas Del Barrio en siaj memoraĵoj, kvankam erare ĝin datas meze de oktobro. Krom la delegitoj de la volontarmeoj, ankaŭ ĉeestis la sovetia konsulo, Companys, Abad de Santillán, Díaz Sandino, Reyes, Guarner kaj aliaj militestroj. Efektive, en ĝi Durruti

> *... esprimis sian surprizon pro la kunvoko de tiu kunveno, ĉar li ne vidis, kiel la estroj de la kolonoj de volontarmeanoj, kiuj estis en la militfronto de Aragono, povis helpi la defendantojn de Madrido. Li petis de la kolonelo Sandino pli da klareco koncerne al la situacio de la militfrontoj de la ĉefurbo kaj, ke li faru konkretajn proponojn pri la helpo, kiun li opiniis, kiun povus doni la estroj kunvenigitaj tie.*[230]

Antonov-Ovseenko sugestis la sendon de grupon el kvar aŭ kvin mil volontarmeanoj, kion la delegitoj de la NKL-aj kolonoj, ekskluzivitaj de la sovetia helpo al la Respubliko rilate al armilaro, forte kontraŭstaris. García Oliver, strange klarmensa, «certigis, ke tiu kunveno estis manovro de la komunistoj por pliigi iliajn fortojn, politike kaj militiste», sed ĉi-foje, la komunistoj profitiĝis de la subteno de la kolonelo Sandino, kutima apoganto de Oliver. La delegitoj de NKL post aparta kunveno akceptis, per buŝo de Durruti, la sendon de volontarmeoj al Madrido sub ties ordonoj.[231]

Nek la informo de Antonov-Ovseenko nek la memoraĵoj de Del Barrio estas tute veraj. Durruti ne cedis tie, sed en posta konfederacia Delegitkunveno kunvokita intence por konvinki lin. Lia komenca pozicio ne povis esti pli logika:

---

229 «Pri militistaj aferoj», konsulejo de Sovetio en Barcelono, novembro 1936. En Radosh kaj aliaj, citita verko. Ortiz ne ĉeestis kaj dubas pri tio, ke Jover, delegito de la Kolono Ascaso, ĉeestis.

230 Del Barrio, citita verko.

231 En la sama verko.

*Mi ne konsentas. La plej efika maniero kontribui la defendon de Madrido estas ataki Zaragozon. Ke oni al mi donu la planitajn armilojn kaj helpotrupojn por iri al Madrido kaj mi atakos la urbon de Ebro. Ĉi-okaze, aŭ ni prenos ĝin, kio estus sukceso, aŭ minimume ni devigos la malamikon sengarnizonigi la militfronton de Madrido.*[232]

Nekontestebla de la militista vidpunkto, sed neutiligebla ĉe politika manovro. Oni alvokis ĉion, oni trouzis la flatojn, oni turnis sin al la disciplino de la organizo kaj finfine Durruti kapitulacis. Sed nur parte; el la militfronto li nur elirigis mil kvarcent volontarmeanojn, al kiuj neniam tute aldoniĝis la milo el la Kolono Trueba-Del Barrio (aŭ Karolo Markso). Fernando Pintado kaj Manuel Nogareda, ĵurnalistoj, al li alpaŝis la 9-an nokte sur la placo de Katalunujo kaj, demandante lin kien li iris tiel rapide, li respondis, ke

*... al Madrido, kie ni nun estas bezonaj. Estas horo de grandaj respondecoj por ĉiuj. Mi alfrontas miajn revoluciajn devojn irante al la danĝerpostenoj, kiam necesas aŭ parolante laŭte kaj klare, kiam mi juĝas tion bezona. Do vi jam ĝin scias: Mi, kun miaj lojaluloj, tuj foriras, ŝoseo antaŭen, survoje al Madrido. Ni kunportas ĉion; tiel, ke ni batalos laŭ la normoj, kiuj volos komenci la malamikojn. Kaj jam sufiĉas, ke malfruiĝas.*[233]

Federica Montseny diris, ke la Registaro pretendis enoficigi lin «ĉefgeneralo de la sektoro de la Centro», kio ne estis pura supozo. La sektorestro estis la generalo Pozas, sed rilate al Madrido la efektiva komando falis sur Miaja —ĵus enoficigita de Largo Caballero— kiu, samtempe, prezidis la Estraron pri Defendo de Madrido, starigita la saman tagon, kiam la Registaro forlasis la ĉefurbon pro la paniko kaŭzita de la timinda kuratako de legianoj kaj maŭroj. Miaja kalkulis je la apogo de la komunistoj kaj la malsimpatio de

232 Borrás, citita verko.

233 «La morto de la gerilano de la libereco en Madrido», *Mi Revista,* 15-an de oktobro 1937.

Caballero kaj la anarkiistoj, kiuj lin konsideris «viro sen karaktero». De post la perdo de Toledo, fine de septembro, la madridaj NKL-istaj gvidantoj alarmis sin pro la multego de komunistoj kaj socialistoj, kiuj iris al Madrido por meti sin sub la ordonoj de Largo Caballero. Per la alveno de Internaciaj Brigadoj por partopreni en la tuja batalo pro la ĉefurbo, ili timis perdi sian influon kaj troviĝi inter du fajroj: unuflanke, la faŝistoj kaj aliflanke, la komunistoj kaj la «hispana Lenino»*. Federica informis pri tio en la domo NKL-IAF de Barcelono[234]. Poste ili ŝanĝis sian opinion rilate al Caballero kaj, jam kun kvar ministraj postenoj por NKL, volis plifortigi sian pozicion antaŭ la komunistoj, komandante la defendon de Madrido. Ili pensis tie koncentri dek mil liberecanajn luktantojn el la kolonoj de Mera, Del Rosal, Tierra y Libertad, Villanueva-Benito kaj Durruti, kiuj estus kunordigotaj de la Komitato por Defendo, kies respondulo estis la tre lerta Eduardo Val. Ŝajne ili kalkulis je la kunlaborado de Largo Caballero, pretendis anstataŭigi Miaja-on per Casado kaj iĝi Durruti ĉefo de la batalo pro la ĉefurbo. David Antona kaj Miguel González Inestal, nome de la Nacia Komitato, iris al Bujaraloz

> *... por vidi kaj konvinki lin pri la neceso de lia ĉeesto ĉi tie [en Madrido].*
>
> *Antaŭ la konkurado, kiu povus ekzisti inter Casado kaj Durruti, se ĉi tiu venus, ĉiuj konsideras[, ke] estos nenia problemo ĉar unu estas militista tekniko kaj povas aperi sur la ordonoj de la alia, kiu devas esti kiu, per sia ĉeesto, levos la moralon de ĉiuj luktantoj de ĉi tiu sektoro.*[235]

* NeT: alnomo de Largo Caballero.

234 «Akto de la kunveno de Komitatoj okazigita la 3-an de oktobro 1936», Arkivoj de NKL, IISH, Amsterdamo.

235 «Akto de la kunveno okazigita la 8-an de novembro 1936 en la ejo de la N. K. de NKL inter pluraj membroj de respondecaj Komitatoj de la konfederacia Organizo en Madrido», Arkivoj de NKL, IISH, Amsterdamo. En *La Voz*, 20-an de novembro 1937, la komunismema Antonio Otero Seco parolis pri delegitkunveno okazigita en Madrido la 9-an de novembro en kiu «oni akordigis sendi du kamaradojn por ke ili kontaktu Durruti-on kaj petu lin, ke li alvenu al Madrido». Sendube, li parolas pri la kunveno de

Alveninte al Valencio ili rekontis Federica-on. Ĉi tiu ilin certigis, ke ŝi komunikos ilian proponon kaj ili revenis sur siaj paŝoj, laŭ rakontas Federica mem, sed ni jam scias, ke ĉi tiuj aŭ aliaj anstataŭ ili alvenis al sia antaŭvidita destino. Dume, la operacio fiaskis kaj NKL estis devigita partopreni en la Estraro kaj kunlabori kun la komunistoj. Per la sensukcesa manovro por la hegemonio en Madrido, Durruti perdis la supozitan estrecon sed ne pro tio oni ĉesis ĝeni lin per la samaj argumentoj. Ne lasita en paco kaj laŭdita, li lasis sin porti de siaj kamaradoj, kiuj, oni devas supozi, ke ne sciante ĝin, ĉi tiel agis profite de la rusoj. Durruti alvenis al Valencio la 10-an matene kaj konversaciis kun kelkaj kamaradoj pri la madrida rezisto organizita de la sindikatoj kaj ateneoj, en trinkejo de la placo Emilio Castelar[236]. Samtage li alvenis al Madrido[237] kaj prezentiĝis en la Ministrejo pri Justeco. Li diris al García Oliver:

> *Ili vokis min, enmetis min en Delegitkunvenon, akordigis, ke mi venu savi Madridon. Kaj ĉi tie mi estas [...] Ŝajnas, ke Federica kroĉis sin al la telefono dum nervoza krizo, trumpetis alarmon kaj komprenigis, ke mia ĉeesto en Madrido povus influi la disvolviĝon de la milito.*[238]

En Madrido, Durruti neatendite troviĝis kun la kruda realo. Liaj kamaradoj de la Konfederacia Komitato por Defendo, kiuj ne partoprenis en lia alvoko, akceptis lin sarkasme:

> *Kiel vi vidis ĉi tion, he, Durruti? Se vi iras al la militfrontoj, konstatos, ke ĉi tio ne estas, kiel via Aragono, ĉar ĉi tie oni ne*

la 8-a.

236 Ariel, «La lastaj tagoj de Buenaventura Durruti», *Solidaridad Obrera*, 20-an de novembro 1938.

237 Lia alveno, kune kun tiu de Federica Montseny, estis registrita de la ĵurnalo de la nokto *La Voz*, 10-an de novembro 1936.

238 García Oliver, citita verko.

*manĝas nek dormas. Ĉi tie oni nur mortas. Kaj, se ne, ke ĝin diru viaj katalunaj ministroj, kiuj alvenis, vidis kaj foriris.*[239]

La Registaro fuĝis al Valencio. Largo Caballero al li promesis la komandon de ankoraŭ organizota divizio. Sed, laŭ rakontas García Oliver, en la kunveno de la Supera Konsilantaro por la Milito de la 14-an, ĉi tiu favoris enoficigi Durruti-on, kiel estron de la Centra Stabo anstataŭ Miaja, pri kiu jam estis konata, ke li ne fidis[240], sed kondiĉe, ke pasos ok tagoj dum kiuj Durruti devos fariĝi tre konata en la ĉefurbo, periodo en kiu la decido devos resti sekrete. Indalecio Prieto konsentis, kio faras la historion eĉ pli neverŝajna. Krom se la Registaro mem instigis la rusan manovron kontraŭ Durruti, ĉar oni ne devas forgesi, ke la rusoj lin sendis al Madrido por forigi obstaklon al la militistigo en la aragona militfronto. Ili elirigis lin el Pina kaj Bujaraloz ĉar li estis simbolo kontraŭ la burĝa ordo, kiun oni pretendis restarigi en Katalunujo, kaj la malpura laboro estis tasko de liaj samideanoj Santillán, Federica kaj Marianet, kaj ŝajne ankaŭ García Oliver aldoniĝis al la tasko. La trio konspiris kontraŭ li kaj ties kunlaborantoj, kaj uzis Durruti-on, kiel murrompilo cele trudi «politikon de la malplej granda malbono» en la liberecana movado, sed kiun alian politikon defendis García Oliver? Ĉi tiu lin avertis pri la reala danĝero, kiu ĉirkaŭis lin en Madrido, sed Durruti konsideris sin ne nemalhavebla, nek timis la morton. Se ni kredas 'Federica Montseny'-on, lia sinteno ĉi-rilate estis sufiĉe stoika: «Post tio, kion ni spertis, kio al ni gravas jam morti? Ni spertis belegajn horojn revitaj de ĉiuj revoluciuloj»[241].

239 En la sama verko.

240 Malfido amplekse atestita en Antonio Domínguez Fernández (kapitano kaj sekretario de la generalo José Miaja), *Defensa de Madrid. Relato histórico* (hispane, Defendo de Madrido. Historia rakonto), Editorial A.P. Márquez S. A., Meksikurbo F. D., 1945. Oni devas klarigi, ke oni konsideris, komence de la milito, tiel Miaja-on, kiel Rojo-n pli proksimaj al la konspirantoj ol al la Respubliko.

241 «Pro la morto de Durruti. Funebra alparolado de Federica Montseny», *La Vanguardia*, 22-an de novembro 1936.

Nekonscia pri la konspiro, kiu organiziĝis ĉirkaŭ li, Durruti revenis al Barcelono por klarigi siajn klopodojn. La trio ne volis, ke li atendu semajnojn aŭ monatojn la enoficigon promesita de Largo Caballero kaj insistis pri lia tuja ĉeesto en Madrido, kvankam estu kun kelke da homoj. Kaj Durruti devis cedi kaj eltiri kelkajn fortojn el la fronto de Aragono kaj porti ilin al urbo, ne konata de ili kaj meti ilin en unuan militfrontlinion ĵus alvenintajn. Fliko en malgranda sektoro de militfronto el tridek mil luktantoj, sub intensa malamika pafado, aŭ plej malbone, ratkaptilo. En la kolono, oni kredis la trion kaj la stabo de Bujaraloz publikigis tekston en kiu oni konsideris kiel fakton, ke Durruti iris al Madrido «por estri ĉiujn fortojn de la Centro», pro tio Yoldi estis enoficigita delegito de la fortoj de Aragono[242]. Yoldi ankaŭ iris al Madrido kaj la kolono fine restis en manoj de Ruano kaj Campón. La ĉarpentistoj kaj metalurgiistoj de Barcelono faris por Durruti veturilon kun trenaĵo kaj duobla stirilo, kiel neniu alia militistestro posedis, sed li ne povis unuafoje uzi ĝin.

Revenante al Barcelono, li estis en la sidejo de la Nacia Komitato kaj de la Regiona Komitato de NKL en Valencio, kie troviĝis kun amaso da kolegoj devenintaj de ĉiuj anguloj de la respublika areo por okazigi Tutlandan Delegitkunvenon, kiu ĝuste decidos apogi la kreon de la Popola Armeo kaj militistigi ĉiujn volontarmeojn. Durruti diris al tiuj de la Nacia Komitato, kiuj fuĝis el Madrido akompanante la Registaron, ke li revenis al Barcelono por «preni parton el miaj homoj» kaj reveni al Madrido. Tie li renkontis 'Juan Peiró'-n, ministro pri Industrio, kun kiu, pro evidentaj kialoj, ne parolis de antaŭ ses jaroj. Ĉi tiu, zorgita de la konservado de la gvidantoj de la organizo, al li parolis pri lia troa elmeto al la danĝero kaj Durruti lin respondis: «Rigardu, Peiró, en la milito, kiel en ĉio, tio plej bona estas

242 «La Kolono iras al Madrido», *El Frente*, n-ro 43, 13-an de novembro 1936.

prediki per la ekzemplo. Krome, mi ne povas tion eviti, kiam mi vidas la kuraĝon de miaj knaboj mi ne konscias kaj...». Peiró lin interrompis: «... kaj vi marŝas ĉekape kun ili. Kaj tio estas, kion vi ne devas fari, ĉar Durruti ne estas pli ol unu kaj la tago, kiam ĉi tiu mankos...». Tiam Durruti indiferente kontraŭargumentis: «Ne zorgu! Ne pensu pri malĝojaj aferoj»[243].

Jam en Barcelono, la 12-an li telefonis al Bujaraloz kaj petis, ke foriru al Madrido la grupigoj de José Mira kaj Liberto Ros kaj tri centopoj. Fakte, al Madrido iris voluntuloj el la 2a, 4a, 7a, 8a, 9a, 12a, 24a, 25a, 38a, 43a, 44a, 45a, 48a, 52a centopoj kaj iu plia[244], la plimulto el la Internacia Grupo kaj taĉmento de Kataluna Ŝtato, kiu batalis en la Kolono Ortiz. Entute mil sepcent (la 16-an, la Stabo de la madrida militfronto nombris 1.550 membrojn de la kolono). Estis malmultaj volontarmeaninoj. En la kazerno Bakunin de Pedralbes li faris paroladon al kiuj lin akompanos, rektan, sobran kaj kortuŝan, kiel ĉiujn siajn. Laŭ unu el la ĉeestantoj, li diris:

> *... Ke li estus ĉe la danĝero, ĉie kaj ĉiel kvankam por tio necesus oferi lian vivon, kaj li petegis siajn kolegojn, siajn fratojn volontarmeanojn, ĉu ili estu pretaj sekvi lin en ĉiuj danĝeroj je la nomo de la idealo, kiun ni tiom estimas. Li finis sian oratoraĵon per ĉi tiuj vortoj:«Per pulmo, per brako, per kruro, neniu homo, kiu estas anarkiisto aŭ simple kontraŭfaŝisto devas ĉesi batali ĝis ekstermi la faŝismon ĉiufronte kaj ĉiulande»[245].*

Durruti profitis la okazon por kapti provizon de fusiloj Winchester, kiu devis alveni al Barcelono, reala senutilaĵo.

243 Juan Peiró, «Durruti, la militestro de la popolo», *Solidaridad Obrera*, 20-an de novembro 1937.

244 Donitaĵoj de la «Poŝtkesto de la volontarmeano», en *Solidaridad Obrera*, numeroj de novembro 1936.

245 Jaime Casella, «¡¡Durruti!!», *Cultura y Acción*, eksterordinara numero, 8-an de decembro 1936.

Anstataŭ sendi la volontarmeanojn rekte al Madrido, li sendis ilin senarmigitaj al Barcelono, kie, por ekipi sin, ili forprenis du mil kvincent fusilojn destinitaj al la Respublika Gvardio kaj la Civilgvardio. Per ĉi tiu ago ili metis la kataluna registaro ĉe siaj piedoj. La belga ĵurnalisto Corman atestas la ĉeeston de Durruti en la kajo de Barcelono ĉekape de liaj volontarmeanoj, dum ili malŝarĝis sub la lumo de la stratlumigiloj usonan ŝipon plenplenan el armiloj kaj amasigante ilin en vagonojn destinitaj al Madrido[246]. Laŭ Antonov, ili ne povis atingi la fusilojn ĉar ankoraŭ ili ne estis alvenintaj, sed Ricardo Sanz diris, ke la kolono alvenis al Madrido armita «per individuaj fusiloj nomitaj Winchester, kun granda pafpotenco, sed sen ŝargilo kaj danĝeraj, ke se tiuj, kiuj ilin manipulis ne estis speciale atentaj pri tio, estis la unuaj eblaj viktimoj»[247]. Ankoraŭ havis tempon Santillán por pruvi sian mallertecon. Durruti lin proponis anstataŭigi kelkajn el la fusiloj per kvin maŝinpafiloj. Laŭ Severino Campos, «post tre petegi Santillán-on [ĉi tiu transdonas] la maŝinpafilojn. Sed li nur al ni donas po ok mil kugloj por maŝinpafilo kaj, kontraŭe, la kamarado Ysgleas diris, ke estis por ĉiu po dek mil kartoĉojn»[248].

En la operacio «translokiĝo de Durruti al Madrido» ne partoprenis aliaj sektoroj de la konfederacia burokrataro. Estis ne konata de la Regiona de Oriento, la teritorio de la malnovaj tridekistoj[*], ĉar kiam alvenis la kolono al Valencio, per specialaj trajnoj, la volontarmeanoj devis dormi sur la

246 Mathieu Corman, *¡Salud, camarada!* (hispane, Sanon, kamarado!), Éditions Tribord, Parizo, 1937.

247 Antonov-Ovseenko, «Pri militistaj demandoj», citita verko. Ankaŭ Sanz, citita verko. Mira diras en *Guerrilleros Confederales. Un hombre: Durruti* (hispane, Konfederaciaj gerilanoj. Unu viro: Durruti), ke ili provizis sin per armiloj malsigelante vagonojn en la stacidomo de Valencio. Laŭ la antaŭe citita dokumento de la Stabo, la kolono ankaŭ disponis dek ses maŝinpafilojn, sep pecojn de artilerio kaj dek ses maŝinpafilajn fusilojn.

248 «Kunveno de Komitatoj okazigita la 18-an de novembro 1936», Arkivoj de NKL, IISH, Amsterdamo. Francisco «Pancho» Isgleas, elstara aktivulo de NKL de Sant Feliu de Guíxols, tiam estis komisaro pri Defendo de la ĝironaj marbordoj.

ebenaĵo de la stacidomo kaj poste sekvi al Madrido per ŝoseo. La temo estis menciita en la Regiona Kongreso tiutempe okazinta kaj volontarmeano de la kolono, hazarde ĉeestanta, bedaŭris antaŭ la delegitoj «la mankon de facilecoj por taŭge gasti, kiam en la pli malgrandaj vilaĝoj, kiujn ni konkeris al la faŝismo ĉiam estis akceptitaj per ĉiaj ĝentilaĵoj». Estis indignaj protestoj kaj la respondeculo pri Defendo de la Urba Federacio senkulpigis sin dirante, ke la kolono subite aperis kaj, ke oni kredis, ke ĝi senhalte forirus al Madrido[249].

Finfine Durruti konvinkis sin pri tio, ke la batalo okazanta en Madrido estos decida kaj li volis ĉeesti, esperante postan «rekonkeron», t. e., novan proletan atakagon. Li skribis 'Liberto Callejas'-on, eksiĝinta direktisto de la *Soli*:

> *Mi venis de la teroj de Aragono por gajni la lukton al kio estas problemo de vivo aŭ morto, ne nur por la hispana proletaro, sed por la tuta mondo. Ĉio centris sin en Madrido kaj mi ne vin kaŝas, ke plaĉas al mi vidi min vizaĝ-al-vizaĝe kun la malamiko, almenaŭ ĉar tiel la lukto pli nobliĝas. Antaŭ ol eliri el Katalunujo mi petis konsciencon por kiuj interesas sin pri tio sama.*
>
> *Mi ne aludis la malgrandanimulojn kaj senenergiulojn. Mi aludis tiujn, kiuj penadas doni lastan puŝon. La fusiloj nenion faras se ne estas volo kaj kalkulo en la pafo. Ne estas dubo, ke en Madridon ne eniros la faŝistoj, sed oni devas baldaŭ forĵeti ilin ĉar Hispanujon oni devas denove rekonkeri.*
>
> *Mi estas kontenta en Madrido kaj kun Madrido, mi al vi ne kaŝas tion, ke plaĉas al mi nun vidi ĝin per la seriozeco de la*

* NeT: La tridekismo estis ideologia tendenco kaj fine, reala movado, kiu aperis en NKL. Ĝi defendis la neceson de kelkjara preparfazo antaŭ la komenco de la revolucio. Krome, ĝi klopodis malmitigi la «revolucian miton», proponante revolucion per la instruado kaj la ekzemplo.

249 «De nia Regiona Delegitkunveno. Fino de la lasta kunsido», *Fragua Social*, 25-an de novembro 1936.

*prudenta viro, kiu konas sian respondecon, kaj ne per la frivoleco kaj timemo de la viro, kiam minacas la ŝtormo*[250]*.*

Durruti antaŭiĝis al la siaj veturante per aviadilo al Valencio. Li alvenis al la eksĉefurbo probable la vesperon de la 13-a, ĉar la madrida gazetaro eĥis lian partoprenon en la lasta kunveno de la Estraro pri Defendo okazigita tiun nokton, en kiu ankaŭ ĉeestis Federica Montseny kaj García Oliver[251]. Ĵus alveninte, li iris al la Centra Ĉefstabejo. Miaja kaj Rojo seke lin traktis. Rojo al li proponis defendi la 'Casa de Campo'-n fronte al la Ciudad Universitaria kaj Durruti akceptis. Li estos en la loko de plej granda danĝero, apud la 11a Brigado stalinista de Kléber. Tuj poste, Durruti alparolis iujn rusajn «generalojn», Gorev, Stein kaj Walter, kaj ĉi tiuj lin ŝarĝis per asistanto, la kolonelo Xanti, kies vera nomo estis Mamsurov Jadzhi-Umar. Ĝis tiam, Durruti ĉiam malakceptis la ĉeeston de rusaj konsilistoj en sia kolono. Tamen, Xanti estis pli ĝuste urba gvidisto. Li estis sperta pri enŝteliĝo kaj geriloj —«filo de la nokto», kiel diros la anarkiistoj— kaj kunlaboris en la organizo de la respublikaj spionado kaj kontraŭspionado. Sed li ankaŭ estis agento de la KPIA, tre rilatigita kun Pedro Checa, dua sekretario de KPH, kaj ne havis malfacilaĵon por ĉeesti al la kunvenoj de ties Politika Estraro[252]. Akompanita de Xanti, Durruti vizitis la militfronton kaj la ejo de la Kvina Regimento, kie li povis kontroli la destinon de la unuakvalita rusa materialo alveninta al Kartaĥeno. García Oliver renkontis lin en la ŝirmejo sur la maldekstro de la Ponto de los Franceses. Laŭ ĉi tiu, la sovetia asistanto estis «vestita, kiel civilulo, per trikita brustovesto». Ambaŭ ŝercis kun la volontarmeanoj kaj dividis ilian ĉiutagan panporcion kaj ladskatolon de sardinoj.

250 «La kamarado Durruti diris...», *Solidaridad Obrera*, 17-an de novembro 1936.

251 *La Voz*, 13-an de novembro 1936; *El Sol*, 14-an de novembro 1936 kaj *La libertad*, 14-an de novembro 1936.

252 «Por kiu funebre sonoras la sonorilojn», *Carta del Este*, n-roj 12-13, 16-an de septembro 1978, Madrido, publikaĵo de la sovetia alipensularo.

Forirante, ili estis adiaŭitaj per brakumoj kaj huraoj[253]. Apude estis la sola ĉeestanta kataluna forto —la Regimento Engels de la Divizio K. Markso, konsistigita de la batalionoj Máximo Gorki kaj Potemkin, kaj la Kolono Libertad-López Tienda— alveninta la 13-an, kies respondeculoj, de USPK, ne volis transdoni al li la komandon. Tamen, la ordono donita de Miaja kaj Rojo la 14-an estis tre klara: «La Kolono López Tienda-Libertad, plifortigita per la homoj, kiuj aliĝos la hodiaŭan tagon, agados sub la komando de Durruti»[254].

Li ankaŭ intervidiĝis kun Val kaj Mera en la Komitato por Defendo de NKL, sed ĉi tiuj, submetitaj al la interkonsentoj de la Estraro, ankaŭ ne havis fortojn, kiujn proponi al li. Mera ne povis grupigi siajn fortojn kun tiuj de Durruti, ĉar ili estis okupataj en la sektoro de Aravaca pro ordono de Miaja kaj limiĝis promesi al li centopon[255]. Sen kontakto kun la madridaj liberecanaj volontarmeoj malmultan moralon li povus levi. Li sufiĉe atingus se ne malleviĝos la moralo de la liaj. Tiel, kiel estis la aferoj, Durruti ne akordiĝis kun la Defendo de Madrido. Tiuj, kiuj al li diris, ke li estos ties savanto kaj, ke lia ĉeesto ŝanĝos la direkton de la milito kanajle klopodis trompi lin. Kaj iele li konsciis la propagandan manipuladon pri sia persono. La 16-an, parolante kun la liberecana reĝisoro Armand Guerra pri la konveneco fari filmon pri la kolono, kiu evitos la militestrismon, li konsentis kaj ne volis esti filmota, mankante al li vantecon kaj abomenante la ĉefrolulecon:

> *Ne ĉagrenu, kolego —diris Durruti—, sed mi estas fervora malamiko de la elmontradoj. Malmultaj sukcesis filmi min kaj*

253 «García Oliver kaj Durruti vizitas la militfrontojn de Madrido», *La Libertad*, 15-an de novembro 1936. García Oliver rakontas en *El eco de los pasos* (hispane, La eĥo de la paŝoj), ke li venis de la parko del Oeste akompanita de la kapitano López Tienda, kio tute neeblas, ĉar ĉi tiu mortis antaŭ du semajnoj.

254 José Manuel Martínez Bande, «Durruti kaj la Internaciaj Brigadoj en la Defendo de Madrido», *Historia y Vida*, 3a jaro, n-ro 31, Oktobro 1970.

255 Cipriano Mera, *Guerra, exilio y cárcel* (hispane, Milito, ekzilo kaj karcero), Ruedo Ibérico, Parizo, 1976.

*eĉ tio pro surprizo. La legendo de heroo, kiun oni al mi teksadas spite de mia volo estas maljusta, ĝi min ĝenas. La herooj estas la volontarmeanoj, kiuj konsistigas mian kolonon [...] Vi povas disponi miajn kolegojn [...] sed lasu min inter kulisoj*[256]*.*

Liaj fortoj alvenis la 14-an de novembro tra la ponto de Vallecas, kie estis la kazerno de la volontarmeoj de NKL-IAF kaj instaliĝis en la Lernejo de Surdamutuloj de la ŝoseo de Hortaleza, en la kruciĝo de la trajno al Ciudad Real. Durruti kaj liaj proksimuloj gastis en la Hotelo Gran Vía, ĝis kiam la Ununura Sindikato de Publikaj Spektakloj al ili cedis palaceton proksime al la Promenejo de la Castellana, sur la strato Miguel Angel, 27, kiu servis, kiel Stabejo. Li tuj sendis saluton al la fortoj, kiuj restis en Aragono:

*Kolegoj, mi havas vin en la koro. Ĉi tio iras glate. Ni venkos. Mi baldaŭ estos kun vi, alportante al vi la ruĝa-nigran flagon de nia idealo trempita de venko. Sanon kaj fidon*[257]*.*

Sekvatage, je la dua tagmeze, ili devis ekbatali tiel, kiel Durruti interkonsentis kun la Stabo kaj, kiel ĉi tiu informis poste en la Komitato por Defendo de NKL. Tamen, parolante vespere kun siaj homoj li ŝanĝis opinion kaj diris al Miaja, ke li ne povis «operacii ĉar lia kolono estis laca kaj li bezonis reorganizi ĝin». La decido kaŭzis konfuzon en la Estraro pri Defendo de Madrido kaj, kun la aproba silento de la membroj de NKL, ĉi tiu akordigis voki lin «tiun saman

256 Armand Guerra, «Durruti humana», *Umbral*, eksterordinara numero de novembro 1937 dediĉita al Durruti, kaj, el la sama aŭtoro, *A través de la metralla. Escenas vividas en los frentes y la retaguardia* (hispane, Tra la municietaro. Travivitaj scenoj en la militfrontoj kaj la postmilitfronto), libro de 1937 reeldonita de La Malatesta, Madrido, 2005.

257 «Saluto de Durruti», *El Frente*, n-ro 49, 20-an de novembro 1936. Ariel diras en la menciita artikolo de la *Soli*, ke la fortoj de Aragono alvenis la 11-an kaj, ke li mem vojaĝis kun Yoldi por kunveni kun Durruti en la palaceto de la strato Miguel Ángel la 12-an. Ankaŭ *Acracia* de la 12-a de novembro nedisputeble diras: «Durruti, kun liaj kamaradoj de la kolono, kiu portas lian nomon, firme batalis en la militfronto de Madrido». Ricardo Sanz, siaflanke, parolas pri la 13-a, kiel tago de alveno kaj Mira, kiel tiu de eniro en batalon. Ĉi tio induktas pensi, ke kelkaj volontarmeanoj eble anticipe vojaĝis en Madridon por prepari la alvenon de la plejparto de la kolono.

nokton kaj informi lin pri la decido de la Stabo, ke li obeu la ordonojn, kiujn ĉi tiu al li donas»[258]. Durruti konformiĝis kaj konvinkis siajn homojn por antaŭeniri kune kun la komunistaj kolonoj. La celo estis okupi la monteton Garabitas kaj tranĉi la malamikan spacon de manovro en la Casa de Campo, por tiel kaŭzi la retiriĝon de la fortoj alvenintaj ĝis la rivero kaj liberigi Madridon el la premo. Li studis sur mapo de Madrido metita sur tablo el marmoro de la palaceto la pozicion de la respektivaj fortoj kaj diris: «La batalo estos malmola, sed ili ne pasos». Li turnis sin al la siaj parolante oferi ĉion por la milito. Rico Rionda, de la Komitato por la Milito, aparte demandis lin se li parolis pri la rezigno de la revolucia celo kaj Durruti lin respondis: «Mi ĉiam revis fari la revolucion kaj nun, kiam mi havas la armilojn kun mi, ne perdos ĝin»[259]. Mateniĝe, la volontarmeanoj piede iris ĝis la malliberejo Modelo, sidejo de la Centra Stabo kaj de la Komitato por la Milito de Durruti, sur la Placo de la Moncloa. La fortoj de Durruti[260] devis etendiĝi inter la ponto de los Franceses kaj la riverbordo fronte al la hipodromo. La faŝista komando siavice preparis fortan rektan atakon ĝuste en tiun lokon, kiu estis elektita de la Stabo, kiel bazo de la atakago, por kio ĝi elirigis fortojn el aliaj sektoroj kaj ricevis konsiderindajn helpotrupojn de la montaro kaj la postmilitfronto. La potenca malamika atakago laŭ murompila formo sur malgranda parto de militfronto, per impona apogo de artilerio, militaviadilaro kaj tankoj, neebligis la kunigon de fortoj, kiu estis ankoraŭ efektiviĝanta kaj kaŭzis la panikon en kelkaj

258 Akto de la kunsido okazigita la 14-an de novembro vespere, reproduktita en Julio Aróstegui kaj Jesús Martínez, *Junta de Defensa de Madrid* (hispane, Estraro pri Defendo de Madrido), Aŭtonoma Komunumo de Madrido, 1984.

259 Intervjuo de Hans Magnus Erzensberger kun Ricardo Rionda (Rico), por El corto verano de la anarquía (hispane, La mallonga somero de la anarkio), en la paperoj de Helmut Rüdiger, IISH, Amsterdamo.

260 La atakordono de la Stabo faras rektan aludon al «la Kolonoj Durruti», t. e., al tiu kolono kaj la fortoj de la kolonoj Karolo Markso kaj López Tienda.

trupunuoj. Speciale trejnitaj trupoj konsistigitaj de maŭroj kaj legianoj sukcesis vadi la riveron Manzanares kaj kaŭzis la senordan diskuron de la kolono de USPK, kiu trenante la volontarmeanojn de Durruti kaj du improvizitajn brigadojn el homoj de la teatro kaj sporto, lasis libera la vojon al la Moncloa. Ariel Val konfesas, ke Durruti «devis nepre malokupi» la kvartalon de Pozas. Miaja, kiu eliris el la Modelo surtretante kadavrojn, pistolon enmane ĵetis sin en la centron de la placo, malpli ol kvindek metrojn de la malamiko, laŭte kriante:

> *Kien iras tiuj, kiuj returniras? Ĉu vi estas la soldatoj defendantaj Madridon? Ĉu al vi ne kaŭzas honton vidi Hispanujon en manoj de la maŭro? Tiun, kiu returniros mi mortigos! En la ŝirmajn fosaĵojn, malkuraĝuloj! Antaŭen, alifoje kaj ĉiam!*[261]

La furiozo efikis kaj, malgraŭ ke la afrikaj fortoj alvenis ĝis la promenejo Rosales, havis multajn homperdojn kaj estis finfine retenitaj. Tamen, nokte la malamiko fortigis sin en kelkaj konstruaĵoj de la Ciudad Universitaria. La serĝento Manzana —anstataŭanto de Pérez Farrás en la rolo de milita asistanto de Durruti— estis vundita en la brako. La Stabo (Miaja, Rojo kaj la rusoj) neniigis la Kolonon Karolo Markso, kiel aŭtonoman trupunuon kaj minacis fari la samon kun la Durruti-a kolono. Noktomeze, la Militista Komandantaro de Madrido transdonis la jenan ordonon pri operacioj por la sekva tago:

> *Morgaŭ, 16-an, kiam tagiĝos, la Kolono Durruti, elirante el la Azilo de Sankta Cristina, realigos atakagan kontrolon en la Ciudad Universitaria direkte al la Stadiono por repuŝi trans la riveron la malamikajn soldatojn, kiuj povintus penetri en tiun areon.*

---

261 Domínguez, citita verko. Miaja pretekstis por no iri al Valencio, kiel lin ordonis Largo Caballero, ĉi tiun kontraŭaĵon kun la «Brigado Durruti». Konferenco per teletajpilo kun la generalo subsekretario Asensio, Militista Ĝenerala Arkivo de Ávila.

*Devos kunlabori je la citita kontrolo en la areo de La Moncloa, la fortoj de la Kolono López Tienda-Libertad, kiuj ankoraŭ ĉeestas en ĝi kaj la Internacia Brigado, kiu eliros el la Ponto de Los Franceses al la ŝoseo, ĝis la interligo kun la Kolono Durruti.*

*Okupitaj de la menciitaj trupunuoj la samaj pozicioj, kiujn ili defendis en la mateno de la 15-a, ili profunde organizos sin en ili kaj rezistos, sen ideo pri retiriĝo, ajnan malamikan atakon*[262]*.*

Al la Kolono Durruti oni asignis, kiel celon la areon inter la Stadiono kaj la Palaceto, kiu ne estos atingita, ĉar la Kolono Libertad-López Tienda fiaskis sian celon alveni la Stadionon, malprotektante la Durruti-istojn maldekstre. Krome, la du batalionoj de la «generalo» Kléber, al kiuj Rojo ordonis la 12-an translokiĝi ĝis la areo de Aravaca-Humera, ne tion faris ĝis la 16-a kaj, alveninte tie, en Puerta de Hierro, ne ekbatalis ĝis kiam la volontarmeanoj de la kolono ricevis punon el kanonkugloj kaj municietaro al kiu ili ne estis alkutimiĝintaj. Oni povus pensi pri manovro por malsukcesigi Durruti-on kaj fini, se ne kun li, kun lia prestiĝo. Destini lacegajn trupojn tie, kie oni scias, ke la malamiko realigos sian plej grandan penadon havis malmulte de senkulpa. Almenaŭ la volontarmeanoj tiel pensis: «Estis kaptilo. Ili sendis la Kolonon en la plej malbonan lokon de la militfronto por ke ĝi malsukcesu»[263]. Durruti devis toleri la sarkasmojn de Miaja, sed Rojo petis la eksigon de Kléber, kio kompreneble ne okazis.

Je la tagiĝo de la 16-a ĉiuj disponeblaj trupoj kunvenis en la Ciudad Universitaria. Durruti troviĝis kun nova malfacilaĵo: oni al li sendis aŭtomatajn armilojn malmuntitajn kun la instrukcioj por munti ilin en la ĉeĥa. Li disĵetis ilin sur la planko kaj post observi la pecojn gvidis ilian muntadon tiel, ke post iom da tempo ĉiuj estis disponeblaj. Li prenis

262 Ordo de la Stabo, subskribita de Miaja, Militista Ĝenerala Arkivo de Ávila, C.773. La Kolono Libertad-López Tienda nombris 2.112 batalantoj.

263 Intervjuo de *Les Giménologues* al Isidro Benet, citita verko.

unu el ili, provis kaj ŝargis ĝin kaj pafis. Ili funkciis. El liaj homoj, unuj iris kun Liberto Ros tra la parko del Oeste, apogitaj de kio restis de la bataliono Libertad, kaj aliaj, sub la ordonoj de Mira, piediris pli norden, tra la lernejo de Denta Medicino kaj la fakultatejoj de Medicino kaj Farmacio, klopodante kuniĝi al la Internacia Brigado por liberigi je faŝistoj la Malsanulejon Clínico kaj ceterajn apudajn konstruaĵojn, restarigante la militfronton de la antaŭa tago. Sed la ribeluloj koncentris soldatojn en la pozicio de La Moncloa por dua rekta atako same malmola, kiel la antaŭa.

La Kolono Durruti duonplenumis siajn celojn: plurfoje batalante korp-al-korpe kaj eltenante intensan pafadon de artilerio kaj militaviadilaro, atingis la poziciojn de la Domo de Velázquez kaj la fakultatejo de Humanaj Sciencoj, sed estis tre difektita en la azilo de Sankta Cristina kaj, finfine, ne povis forĵeti la trupojn de Franco trans la riveron. Dume, fortoj de la kolono de USPK, aligita al la Kvina Regimento, forlasis la Malsanulejon Clínico pro subita malamika atako, kio embarasis la centopojn de Durruti, kiuj estis devigitaj fari longan ĉirkaŭiron por eliri el la Ciudad Universitaria. Komunista volontarmeano rakontis tion okazintan:

> *Ni perdis la Clínico-n. [La legianoj] eniris tra la kloakoj kaj, en la unua etaĝo, ni rimarkis, ke ili jam estis sur la koridoroj; estis korp-al-korpaj bataloj. Ni ankaŭ perdis la Domon Velázquez*[264]*.*

Rionda memoris tiun aventuron, kiu kaŭzis al li vundon:

> *... Ni estis ĉirkaŭ 700, nur havis manbombojn kaj fusilaron kaj rezistis nokton kaj tagon malantaŭ la muroj [...] Poste ni povis eliri nokte, ĉar telefone ricevis ordonojn, kiuj diris: tuj kiam vi povos eliri el tie, kie estas encirkligataj, blokataj, foriru tra la placo de la Moncloa*[265]*.*

---

264 Atesto de Sebastián Piera Llobera, en Camps kaj Olcina, citita verko.

265 Intervjuo de Hans Magnus Enzensberger kun Ricardo Rionda (Rico), por *El corto verano de la anarquía* (hispane, La mallonga somero de la anarkio), en la paperoj de Helmut Rüdiger, IISH, Amsterdamo.

Atakoj kaj kontraŭatakoj sinsekvis sin dum la du sekvaj tagoj, kun ĉeesto de tankoj kaj multego da fusilpafoj. La homperdoj malpliigis la fortojn de la kolono ĝis la duono. Lacegaj, sendormaj kaj preskaŭ ne manĝante antaŭ kvin tagoj, ili petis esti anstataŭotaj. La 18-an, post kontroli la staton de siaj volontarmeoj, Durruti penis atingi anstataŭontojn por siaj homoj kaj helpotrupojn por kompensi la multnombrajn homperdojn, sed li ne sukcesis. La Stabo ilin neis, ĉar «oni devas konfesi, ke, dum la paso de tiuj tagoj, kun la tuta militfronto en streĉiteco, estis Madrido tage kaj nokte infero» ekzistis ne rezervoj nek sufiĉaj baterioj de apogo[266], kaj pli-malpli ĉiuj estis luktantaj de antaŭ la samaj tagoj. En kunveno kun la membroj de la Internacia Grupo, li al ili konsilis reveni al Aragono, kion la duono samtage faris. Li plendis, ke la volontarmeanoj estis bonaj por la surstrata lukto, sed ne ĉiuj taŭgas por soldatoj[267]. La 19-an tagiĝis pluvante. Tagmeze, li estis preparinta atakon por reakiri la Clínico-n.

266 Vicente Rojo, *Así fue la defensa de Madrid* (hispane, Tiel estis la defendo de Madrido), Era, Meksikurbo F. D., 1967. Rojo indikas, ke la perdo de parto de la Ciudad Universitaria ne havis gravajn konsekvencojn, ĉar la 19-an, post fortaj homperdoj, la malamiko devis fini la atakagon kaj fortikigi sin, kaj la militfronto restis restarigita: «Se laŭ taktiko veras, ke oni malsukcesas, kiam ne atingas la celon, la penado de tiuj tri tagoj, kiuj povis esti decidaj, estis fiasko por niaj malamikoj».

267 Intervjuo de *Les Giménologues* al Isidro Benet Palou, la 12-an de novembro 2009.

# 5. Moskvo

Al Moskvo iris la instruisto Francisco Carreño, fidindulo de Durruti, elstara membro de la Komitato por la Milito de la kolono kaj aktivulo de ampleksa sperto en postenoj de sindikata respondeco en Argentino, Urugvajo kaj Katalunujo; José Berruezo, de la estraro de la Sindikato pri Metalurgio de Barcelono; kaj Martín Gudell, litova, respondeca kune kun Souchy de la Oficejo pri Ekstera Propagando de NKL. Alcón kaj Carbó restis en Barcelono. La liberecana gazetaro parolis pri la vojaĝo kaj la letero de Durruti al la rusa proletaro, «plena de emocio kaj revolucia sincereco»[268]. La 30-an de oktobro foriris al Parizo 14 delegitoj de Katalunujo, Valencio kaj Eŭskujo, antaŭintaj de 35 pliaj, kiuj eliris el Alakanto, kiel reprezentado de la hispana Respubliko en la festoj pro la deknaŭa datreveno de la rusa revolucio. Ĝin prezidis Antonio Maria Sbert, deputito en Parlamento de RMK kaj membro de la Tribunalo pri Konstituciaj Garantioj. La 7-an de novembro okazis en la Palaco de la Muziko de Barcelono solena akto de honorigo, al kiu ĉeestis la konsulo Antonov-Ovseenko, la ĵurnalisto Ehrenburg kaj la plej altaj aŭtoritatoj. Sekvatage trairis la stratojn de la kataluna ĉefurbo multnombra manifestacio kun abundo de ruĝa-nigraj flagoj. Io simila okazis en Valencio, ĉefurbo de la Respubliko. La 10-an de novembro, la kataluna delegitaro alvenis al Leningrado. La stacidomo estis plenplena de publiko kaj, kiam ili elvagoniĝis, oni al ili

268 «Dum foriras al Rusujo la Delegitaro de hispanaj laboristoj, al kiu apartenas reprezentanto de la Kolono Durruti, ĉi tiu, sentante la momenton per trafa vidado, direktas al la kamaradoj de Sovetio la sekvan leteron...», en *Nosotros*, proparolanto de IAF, Valencio, 7-an de novembro 1936; *Solidaridad Obrera*, 30-an de oktobro 1936; *El Frente*, 5-an de novembro 1936 kaj *Tierra y Libertad*, 5-an de novembro 1936. En *La Libertad,* la 30-an de novembro 1936, oni menciis la leteron de Durruti al la rusaj laboristoj portita de Carreño.

proponis bukedon el floroj. Ĉe la elirejo, oni preparis amaskunvenon, en kiu parolis reprezentantoj de pluraj sindikatoj, kiuj al ili donis stimulon por la lukto entreprenita kontraŭ la faŝismo. Reprezentante la delegitaron, respondis Carreño, de NKL, kaj José González, de ĜUL[269]. *Moscow Daily News*, ĵurnalo en la angla eldonita en Moskvo por la propagando de la reĝimo simple diris:

> *Francisco Carreño, luktanto de la fama Kolono Durruti, instruisto en Barcelono, diris: «La hispana popolo estas preta por ajna ofero. Ni scias, ke la venko super la malamiko kostos multajn viktimojn, sed malgraŭ ĉio ni venkos»[270].*

Carreño, ne ofendante la membrojn de la delegitaro de aliaj organizoj, plurfoje substrekis dum sia parolado sian kondiĉon de anarkiisto kaj la rolon de la anarkiistoj sur la stratoj de Barcelono la 19-an de julio kaj en la militfronto de Aragono. En la traduko de lia parolado, Carreño estis prezentita kiel respublikano, same kiel la laboristoj, kiuj batalis kontraŭ la faŝismo. La komunistoj, kiuj tiam ne ekzistis, estis priskribitaj, kiel la ĉefaj batalantoj. Kompreneble la publiko aplaŭdis la tradukiston kaj kriis vivuojn al Stalino. En la hotelo, Gudell, kiu parolis la rusan, rakontis la trompaĵon al Carreño kaj ambaŭ interkonsentis diri nenion por ne fuŝi la komision, kiun oni al ili konfidis. La sekretario de la komunista parlamenta malplimulto, Antonio Muriel, la ĉefa voĉo de la delegitaro, estis admonita en Hispanujo de la agentoj de la Kominterno, Stepánov kaj Togliatti, por ke la delegitaro ĉie danku la «senegoisman» sovetian helpon kaj la ĝentilaĵojn de Stalino, evitante mencii la temon de la armiloj. Sovetio estis unu el la subskribintoj

269 «Al la Centra Komitato de la Komunista Partio», k-do José Darás, *Verdad*, proparolanto de KPH kaj HLSP de Valencio, n-ro 104, 26-an de novembro 1936. La apoteoza akcepto de la «rusa popolo» ankaŭ estis menciita en *El Sol*, Madrido, 23-an de novembro 1936.

270 «Second Spanish Delegation Welcomed on Arrival Here» (angle, Dua hispana delegitaro estis bonvenigita ĉi tie alveninte), *Moscow Daily News*, 14-an de novembro 1936.

de la Traktato pri Ne Interveno kaj ne deziris, ke oni publike parolu pri eblaj militaj provizadoj, sed ĝi ankaŭ ne deziris, ke en la laboristaj forumoj oni diru, ke ĝi ne sendis armilaron al la hispana Respubliko. La delegitaro de NKL ne partoprenis en la flataĵoj, kvankam ja aldoniĝis al la petoj pri armilaro. Reveninte, Muriel konfesis sian embarason al la ministro pri Instruado, la komunisto Jesús Hernández:

> *La tuta delegitaro ne havis pli ol ideon en la kapo, obsedon: peti armilojn al la sovetia registaro. Ĉie, kie ni ĉeestis, ni proponis la demandon ne pensante ĉu estis aŭ ne prudente krei komplikaĵojn al niaj rusaj kamaradoj*[271]*.*

En Leningrado ili vidis la metalurgiajn fabrikojn, la palacon de la caroj, duon da lernejoj, la sindikatejon de kinartistoj kaj la malliberejo-fortikaĵon de Petro kaj Paŭlo, kie estis malliberigitaj Bakunin kaj Kropotkin. Ofendaj eldiraĵoj pri ilia memoro motivis la unuan proteston de Carreño. En la domo de la Ruĝa Armeo ili konversaciis kun kelkaj malnovaj oficiroj, reciproke al si rakontante epizodojn pri revolucia lukto. La 13-an, ili alvenis al Moskvo kaj devis elteni paroladon de Kalinin, prezidanto de la Unio, kiu daŭris tri horojn. Al la NKL-istoj ne plaĉis la asertoj pri la disciplino, tial «la delegitaro de NKL, konsiderante, ke ĝi ne aliris al Rusujo komplimenti la reprezentajn personojn de la ŝtato, decidis ne prezentiĝi al Kalinin»[272]. La sinsekvaj tagoj estis dediĉitaj al diversaj vizitoj. Estis kortuŝaj la demandoj de grupo de rusaj infanoj de la Lernejo Modelo. Carreño al ili rakontis la historion de la infano Petro:

> *La gepatroj de Petro ne volis permesi al dektrijaraĝa infano, ke li iru al la militfronto, sed Petro prenis la biciklon kaj, ne dirante ion al iu, alvenis al la Stabejo de la fortoj de Aragono.*

---

271 Jesus Hernández, *La Grande Trahison* (france, La granda perfido), Fasquelle Éditeurs, Parizo, 1953. Hernández ankaŭ estis agento de la Kominterno.

272 F. Carreño, J. Berruezo kaj M. Gudell, «Informo de la Delegitaro de NKL, kiu iris al Sovetio en la monato de novembro 1936 al la Regiona Komitato de Katalunujo», 11-an de decembro 1936. En la DIHM de Salamanko, PS Barcelono.

*Ni, la delegitoj de la Komitato por la Milito —diris Carreño— volis lin revenigi hejmen, sed li diris, ke ne volis reveni, ĉar liaj gepatroj ne lin akceptos; krome, li volis lukti kontraŭ la faŝistoj. La volontarmeanoj sentis alligitecon al la knabo kaj permesis, ke li restis en la Stabejo. Petro servis, kiel mesaĝisto, portadis leterojn al la postmilitfronto, ili neniam al li permesis iri kun la skoltaro.*

*Sed subite Petro malaperis el la Stabejo. Ĉiuj lin serĉis ne trovante lin. Kelkajn tagojn poste, mi vizitis malsanulejon kaj multe min surprizis kiam trovis Petron enlitiĝinta. Tiam li al mi rakontis sian aventuron. Iam, ĉeestante ĉe la Stabo, li aŭdis, ke la volontarmeanoj preparis atakon, kaj li, kiu multe inklinis partopreni en la milito, ne dirante ion al iu, foriris al la militfronto, partoprenante en la atako.*

*Petro eniris en la vilaĝon kune kun la aliaj volontarmeanoj, sed poste ili devis forlasi ĝin; dum lia fuĝo oni lin vundis kaj li tie restis kuracante siajn vundojn. Kiam mi adiaŭis lin, Petro al mi diris:*

*—Kiam mi kuracos vi jam ne konsideros min kiel infanon, ĉar mi jam estas matura. Mi partoprenis en batalo, estas vundita kaj estas vera volontarmeano.*[273]

La historio plaĉis al la lernantoj kaj ankoraŭ pli al la sovetia gazetaro, kiu sekvatage ĝin reproduktis. La 20-an ili iris al la sidejo de la Kominterno, la komunista internacio. La delegito Ercoli (Togliatti) direktis sian paroladon, memprofiteme kritikan, al NKL. Carreño lin respondis:

*Li diris, ke li venis al Sovetio ne kiel simpla vizitanto, sed por komenci rilatoj kun la sindikatoj. Li diras, ke ankaŭ alportis saluton al la popolo, al la rusaj laboristoj, kiuj donis sian helpon al la hispana popolo en ĉi tiuj tiom malfacilaj momentoj [...] NKL havas sian disciplinon, neniam ni estis sen ĝi. Nia disciplino estis laŭ la postuloj de la cirkonstancoj kaj konsente kun ĉi tiuj. Ĉi-momente, kiam ni bezonas militdisciplinon, niaj kolonoj estas la unuaj, kiuj ĝin havas. Krome la hispana*

273 Martín Gudell, Lo que oí en la URSS (hispane, Kion mi aŭdis en USSR), *Estudios Sociales*, Meksikurbo F. D., 1946.

*popolo havas siajn metodojn de lukto, scias oferi sin kaj laŭ la maniero, kiu estas propra al ĝi, sciis kaj povis kontraŭstari la faŝismon. Internacie, oni tre malmulte konas la hispanan popolon, kaj ankoraŭ malpli NKL-on. Eĉ en Francujo oni ne konas nin. Ili ĉiam mokis nian movadon kaj nun ilin surprizas niaj revoluciaj faktoj*[274]*.*

Poste parolis Manuilski, delegito por hispanaj aferoj, montrante pli grandan takton sed pli-malpli dirante tion saman. Li menciis la sindikatistan kaj anarkiistan aktivecon de Carreño en Ameriko. Ĉi tiu lin kontraŭargumentis

*...ke bonas la revolucia interligo aŭ, alidirite, la ununura fronto, sed oni ne povas realigi la proletan fronton submetante tendencon al la alia. Devas cedi ambaŭ. Oni ankaŭ ne povas doni la ordonojn de supre; estas la popolo, kiu ilin devas doni. La hispana popolo estas jam plenaĝa kaj ni, tiuj de NKL, estas la plimulto. Vi [...] devas lasi la popolon, ke ĝi decidu siajn proprajn destinojn, vi devas iom malaltigi vin kaj rekoni [al ĝi] la rajton difini sin*[275]*.*

La 20-an vespere alvenis al Moskvo la novaĵo pri la morto de Durruti en Madrido. Martín skribis:

*Ĉi tiu novaĵo demetis al ĉiuj ni la animon por daŭre fari vizitojn, ĉar ĉiuj ni sentis kvazaŭ perdintus tion pli valoran ol ni havis en Hispanujo [...] Sekvatage, la tuta rusa kaj ukraina gazetaro konfirmis la morton de nia kolego kaj reproduktis la leteron, kiun Durruti skribis al la rusa popolo, portita al Moskvo de la delegito de la Kolono Durruti, kolego Carreño. Ĝi ankaŭ reproduktis fotografaĵon de li vestita per la supertuto de gerilano.*[276]

La 22-an ili iris al Kievo:

---

274 F. Carreño, J. Berruezo kaj M. Gudell, «Informo de la Delegitaro de NKL, kiu iris al Sovetio en la monato de novembro 1936 al la Regiona Komitato de Katalunujo», citita verko.

275 En la sama verko.

276 Martín Gudell, «Memoraĵoj pri la vojaĝo al Sovetio», *¡¡Campo!!*, eksterordinara numero de la 20-a de novembro 1937, kaj en *Solidaridad Obrera*, samdate.

*En Kievo, la civilaj kaj militistaj aŭtoritatoj kaj la reprezentantoj de la universitatoj kaj lernejoj al ni proponis akcepton en la granda salono de la plej bona hotelo de la urbo. Tie ĉeestis la oficiala Ukrainujo. La estro de la garnizono de Kievo, malnova bolŝeviko, eldiris salutan paroladon.*

*Bonveniginte la gastojn, li komunikis la novaĵon pri la morto de Durruti kaj invitis al la ĉeestantoj stariĝi kaj gardi minuton de silento honore al la granda hispana gerilano*[277]*.*

Samtage okazis la enterigo en Barcelono, kun la konsulo Antonov-Ovseenko, nerekta kaŭzanto de lia morto, kiel prezidanto de la sekvantaro kune kun Companys kaj García Oliver. [Dume, en Rusujo] Rakontas Gudell, ke ili vidis multajn homojn sur la stratoj kaj laboristojn en la fabrikoj, sed neniam povis paroli kun ili. Eĉ la traktado kun reprezentantoj de sindikatoj, organizoj kaj fabrikoj estis malmulta kaj oficiala. Fine, la kataluna delegitaro revenis al Moskvo kaj sukcesis viziti iujn anarkiistajn laboristojn. En kabano, metalurgiisto kun multnombra familio al ili montris eltondaĵon el la *Pravda* kun la fotografaĵo de Durruti kaj alian eltondaĵon kun tiu de Makhno: «Makhno estis unu el la plej grandaj revoluciuloj kaj nun ili volas nin kredigi, ke li estis bandito. Atentu pri tio, ke nun kiam [Durruti] estas mortinta ili ne profanos ankaŭ lian memoron»[278]. La averto ne estis vana ĉar *Izvestia* ĵus publikigis vortojn atribuitaj al Durruti, kiam li foriris al Madrido: «Jes, mi kredas, ke mi estas bolŝeviko kaj pretas havi la portreton de Stalino sur la muro de mia laborĉambro»[279].

La 27-an ili interŝanĝis opiniojn kun la sekretario de la sovetiaj sindikatoj, Abolin, kaj al li kritikis la malgrandan

277 En la sama verko.

278 Anonima artikolo aperinta en *¡¡Campo!!*, speciala numero de la 20-a de novembro 1937. Probable fare de Carreño.

279 *Izvestia*, 22-an de novembro 1936, citita de Burnett Bolloten en *La Guerra Civil española. Revolución y contrarrevolución* (hispane, La hispana enlanda milito. Revolucio kaj kontraŭrevolucio), Alianza Editorial, Madrido, 1989.

rolon, kiun havis la sindikatoj en la lando tiel, kiel la malmoralecon de la Staĥanov-ismo*. Carreño al li transdonis liston el 154 anarkiistaj kamaradoj malliberaj en la rusaj malliberejoj aŭ ekzilitaj, por ke ĉi tiu influu la Registaron cele atingi ilian liberon kaj veturbileton por Hispanujo[280]. Spite al la kontraŭleĝeco kaj la persekutadoj, ankoraŭ dum la 1930-aj jaroj, la anarkiistoj klopodis rekonstrui siajn federaciojn (ekzemple, la Konfederacio de Ukrainaj Anarkiistoj Nabat), publikigis broŝurojn kaj kaŝajn ĵurnalojn, partoprenis en strikoj kaj movadoj de senlaboruloj, kreis sendependajn sindikatojn kaj ĉiel luktis kontraŭ la stalinisma reĝimo[281]. La burokrato al ili donis la kutiman respondon pri tio, ke «en Rusujo neniu persekutas la anarkiismon nek la anarkiistojn. En Rusujo oni nur persekutas la krimulojn kaj tiuj, kiuj troviĝas en la malliberejoj aŭ ekzilejoj faris iun punindan agon»[282]; tamen, li promesis trakti la aferon ĉe la Registaro, sed pri liaj klopodoj nenio sciiĝis. Kiam ili povis paroli kun tiuj anarkiistaj «krimuloj», ĉi tiuj rakontis al ili tion malbonan, ke ili vivis, ne povante realigi ian ajn laboron, estante la plimulto el ili ekzilitoj en Siberio. La 29-an revenis la delegitaro al Leningrado kaj ree la redaktisto de *Pravda* venis intervjui Carreño-n. Ĉe tiu momento de la vojaĝo, li jam estis laca de la rusa diplomatio kaj havis pri la sovetia reĝimo la plej malbonan el la impresoj. Kolerigita de la

---

* NeT: Tendenco labori super la normalaj laborniveloj. Vidu: https://eo.wikipedia.org/wiki/Sta%C4%A5anov-movado

280 «Listo el la anarkiistaj kaj anarkisindikatistaj kolegoj enkarcerigitaj kaj ekzilitaj en Sovetio, kiun la delegitaro de NKL, dum sia estado en ĝi, transdonis al la respondeculoj de la sindikatoj petante ilian tujan liberigon», dokumento konservita en la Arkivoj de NKL, IISH, Amsterdamo.

281 Anatoly B. Dubovik kaj D. I. Rublyov, *After Makhno. Hidden histories of Anarchism in the Ukraine* (angle, Post Makhno. Kaŝitaj historioj pri Anarkiismo en Ukrainujo), Kate Sharpley Library, Londono, 2009.

282 F. Carreño, J. Berruezo kaj M. Gudell, «Informo de la Delegitaro de NKL, kiu iris al Sovetio en la monato de novembro 1936 al la Regiona Komitato de Katalunujo», citita verko.

konstantaj misprezentoj de siaj vortoj en la gazetaro, li forĵetis el la ĉambro la ĵurnaliston. Ne vane, Martín Gudell, en unua opinio pri la vojaĝo, diris, ke tio plej ofenda estis la perantoj, nedisigeblaj akompanantoj, la *perevochik*, rusa vorto, kiu ne ĝuste signifas 'interpretiston' ĉar «la komisio de la *perevochi* ne estas nur interpreti, estas interpreti laŭ ties maniero»[283]. La tri NKL-istoj subskribis dum la vizito neniun dokumenton kaj rifuzis alparoli la ŝtathomojn; nur alparolis la laboristojn. Ili finis sian informon per aŭgura averto:

> *... la bolŝevikoj sendas al Hispanujo ĉiujn komunistojn de Eŭropo.*
>
> *Ĉi tien venas homoj ne nur de Francujo, Anglujo kaj aliaj landoj, sed ankaŭ de Sovetio. Ni havis okazon paroli kun iuj, kiuj eliris el ĉi tiu. Ĉiuj ili armiĝas en Hispanujo kaj oni devas esti singarda, antaŭvidante, ke ĉi tiuj armiloj turniĝus kontraŭ ni*[284]*.*

Carreño diskonigis la informon inter la aktivularo. En Regiona Delegitkunveno de anarkiistaj grupoj, la reprezentanto de Los Irreductibles rilatigis la stalinistan intencan fuŝadon pri la hispana revolucio kun la sperto travivita de la delegitaro: «Ni scias, ke la delegitaro, kiu iris al Rusujo, konsistigita de la kamarado Carreño kaj aliaj, deklaras, ke en Rusujo renversis niajn anarĥiajn konceptojn»[285]. Kaj, en junio 1937, la kaŝa ĵurnalo *Anarquía FAI* publikigis la fragmenton, koncerne la anarkiistajn malliberulojn. NKL, kontraŭe, ne igis publikaj la kritikojn de sia delegitaro, nek publikigis la menciitan liston de malliberaj

283 Martín Gudell, «Tio plej agrabla kaj malagrabla de Sovetio», *Solidaridad Obrera*, 15-an de decembro 1936. Tio plej agrabla estis la infanoj: «Neniu en Sovetio nin akceptis per la koro tiel malfermita, kiel la infanoj; ili al ni diris la plej grandajn verojn kaj neniu, kiel ili tiom zorgis pri la aferoj de Hispanujo. Ho, la infanoj de Sovetio estis, kiuj ja ploris adiaŭante nin!».

284 F. Carreño, J. Berruezo kaj M. Gudell, «Informo de la Delegitaro de NKL, kiu iris al Sovetio en la monato de novembro 1936 al la Regiona Komitato de Katalunujo», citita verko.

285 Aktoj de la Delegitkunvenoj de anarkiistaj grupoj de Katalunujo, okazigitaj la 6-an de decembro 1936 kaj 14-an de februaro 1937.

rusaj anarkiistoj, kvankam diskrete la Regiona Komitato komunikiĝis kun la konsulo Antonov-Ovseenko petante ilian liberigon, kaj ĉi tiu, nome la politiko de reciproka alproksimiĝo, promesis transdoni la peton al la rusaj aŭtoritatoj[286]. Estas necerte, ke la konsulo sendos ĝin kaj NKL forgesis la aferon. La tuta delegitaro estis akceptita kun honoroj en la rusa konsulejo de Barcelono. Ĉeestis la prezidanto Companys kaj ties proksimuloj; la stalinistoj Comorera kaj Sesé kaj iuj militistoj. La grupo de NKL estis la plej multnombra: Valerio Mas, Dionisio Eroles, Aurelio Fernández, Félix Martí Ibáñez, Puig Elías, Fábregas, Toryho, Galipienzo kaj Muñoz[287]. Sekvatage, okazis politika amaskunveno organizita de la Amikoj de Sovetio en la Gran Price de Barcelono, kie parolis Carreño sciigante la kialojn de la vojaĝo. Ankaŭ ĉeestis la konsulo Antonov-Ovseenko, tre aplaŭdita de la homamaso, kaj la liberecana ministro pri Industrio Juan Peiró, kiu, laŭ la komisiito ŝtataligi la respublikan ekonomion, Arthur Stashevsky,

> *... li deklaris sin per sufiĉa malmoleco kontraŭ la komitatoj por kontrolo en la fabrikoj kaj petis disciplinon sen ia rezervo. Preskaŭ estis la parolado de komunisto.*
>
> *La plej bona parto el la anarkiistoj estas en tiu proceso de ideologia transiro al ni*[288].

Peiró estis la plej granda reprezentanto en NKL de la porstalinisma politiko, ĝis la ekstremo subteni, kiel ili, la prioritaton de la milito super la revolucio:

> *... se ĉiuj interkonsentas, ke unue estas la milito kaj poste la Revolucio, ni ne parolu pri Revolucio kaj nur parolu pri milito [...] Diri nun, ke ni socialigos laŭ komunisma liberecana senco*

---

286 «Malgraŭ la promesoj de la komunistoj, la rusaj anarkiistoj plu restas en la malliberejo», *Anarquía*, kaŝa organo de la anarkiistaj grupoj de Barcelono, n-ro 5, 22-an de julio 1937.

287 «Revene de la Sovetia Rusujo», *La Noche*, 11-an de decembro 1936.

288 Letero de Stashevsky al L. Rozengolts, 14-an de decembro 1936, en Radosh kaj aliaj, citita verko.

*povus esti tiel malutila, kiel kiuj pretendas aserti, ke la socialigo devas esti submetata al la reguloj de la socialigo de la ŝtato.*

Peiró opiniis, ke kvar ajnaj ministraj postenoj, kaj unu aŭ du seĝoj en fantoma institucio, kiel la Supera Konsilantaro por la Milito, sufiĉis por partopreni «laŭ rekta maniero» en la direkto de la milito. Sed la afero estis, ke por teni sin en la ŝtato ankaŭ ili devis forgesi siajn revoluciajn projektojn kaj fari ĉiajn cedojn: «Ĉi-momente la fundamenta problemo estas scii kompreni, ke cedi estas venki, ne nur en la milito, sed en la Revolucio»[289]. La rusaj informantoj diris pri Peiró, ke li «parolis, kiel komunisto». Sed ili ankaŭ sciis, ke tiu ne estis la lingvaĵo de la anarkiistaj laboristoj, tute konstatante la malakordon inter la gvidantoj kaj la homamasoj, kiujn, kiam tio al ili konvenis, ili karakterizis, kiel «honestajn laboristojn erare konvinkitaj esti farante revolucion» kaj, kiam ne, ili misfamigis ilin, kiel ĉifonproletarojn, neregeblulojn kaj banditojn.

La delegitaro, sen la katalunaj delegitoj, daŭrigis sian vojaĝon ĝis Valencio. La 13-an oni ĝin honorigis en la Teatro Principal. La vojaĝantoj ne ŝparis laŭdojn; ĉio estis admirinda en tiu proleta paradizo, la reganta disciplino, la lernejoj, la metro de Moskvo, la virtoj de la virinoj, la fabrikoj, la bienoj, la infanaj parkoj... Kiam estis la vico de la reprezentanto de NKL, Emiliano Pascual, de la Motorvetura Bataliono de Maŝinpafiloj (Fronto de la rivero Tajo), ĉi tiu laŭdis la paradon de la Ruĝa Armeo, kies elmontrita armilaro multe impresis lin. Li ne parolis pli ol necese pri la rusaj estroj sed ja substrekis la intereson de la malnovaj revoluciuloj: «Ili diris al ni: via lukto estas la nia, ni tute estas kun vi». La ceremonio estis ankaŭ fermita de Peiró, kiu, kiel jam antaŭe faris en la Gran Price, ege kritikis la komitatojn

289 «Politika amaskunveno de fermo de la Delegitkunveno de la Orienta Regiona Konfederacio», *Fragua Social*, 17-an de novembro 1936.

kaj prenis Sovetion, kiel ekzemplon: «Ili diris al ni, ke la milito kaj la revolucio sentas sin pli en Rusujo ol en Hispanujo. Ĉi tiu estas leciono, kiun ili sincere al ni donas»[290]. La porsovetia atmosfero tiom disvolviĝis inter la liberecanaj gvidantoj, ke Berruezo, membro de la delegitaro en reprezento de la Regiona Komitato de Katalunujo, devis precizigi:

> *Mi povis vidi kaj rimarki la intereson, altruismon kaj volon per kiu tiuj homoj kaj infanoj senigas sin je tio malmulta, kion ili posedas por donaci ĝin favore de kiuj kuraĝe kaj heroe luktadas por la bonstato kaj la libero de la hispana popolo. Koncerne al ĉio cetera, neniaĵo nin surprizis.*
>
> *Al tiuj, kiuj per pli aŭ malpli da vasteco zorgas pri la ĉiulanda socia problemo, kiuj pli-malpli konas la socian politikan situacion de la mondo, ne povis surprizi nin tio, kion ni povis vidi en Sovetio, ĉar pri tio ni jam havis konon [...] Mi iris al Sovetio subtenante federacian koncepton pri la organizo de la aferoj, kiel respondas al la kriterio, kiun havas la anarkiistoj pri la sociologio kaj la vivo. Post mia reveno mi daŭre sammaniere pensas[291].*

Ankoraŭ estis alia diplomatia vojaĝo al Rusujo, ĉi-foje organizita de la Regiona Konsilantaro de Aragono, kiam ĉi tiu ŝanĝis sian membraron elirigante la radikalulojn, kiel Alberola kaj Mavilla kaj permesante la eniron de ĉiuj politikaj fortoj (la komunistoj atingis du postenojn en la Konsilantaro). Superregis en la Konsilantaro tendenco inklina al la interkompreniĝo kun la centra Registaro kaj ties ĉefa gvidanto, KPH. Kiel bonaj realismaj politikistoj, Evelio Martínez «Servet» kaj Adolfo Arnal, konsilistoj de NKL pri Nutraĵ-provizado kaj Terkulturo, avidis, ni opinias, ke tre senmalice, koni la socian kaj ekonomian atingon de la

290 *La Voz Valenciana*, respublika maldekstra ĵurnalo, porsovetia, 14-an de decembro 1936.

291 José Berruezo, impreso de la vojaĝo al Sovetio, du folioj skribmaŝine, Barcelono, 31-an de decembro 1936, Arkivoj de NKL, IISH, Amsterdamo.

supoza rusa revolucio, ĉefe koncerne al ties teknikaj sukcesoj en la kamparo.

> *Iutage, iu sugestis en unu el ĝiaj kunsidoj la konvenon pri la vojaĝo kaj neniu kontraŭmetis sedojn. Oni starigis delegitaron el la stalinisto Pedro Duque kaj du politikistoj pliaj. Kompreneble, la vizito estis elreviĝo, maskita per entuziasmaj frazoj por la publiko, kiam ĝi revenis. La delegitoj plenumis la kutiman programon de vizitoj parolante kun neniu kamparano, laboristo aŭ teknikisto, vidante nenion el tio, kion ili volis, sed, kiam ili revenis, al ili ne mankis vortoj por rimarkigi la «neprofitemon» de la rusa helpo kaj laŭdi la fabrikojn, laboratoriojn, esplorejojn, muzeojn kaj fine, ĉion, kion iliaj gastigantoj al ili montris*[292].

La sinteno de la liberecana burokrataro, kiu estis formiĝanta, tute favoris la burĝan politikon kaj la kunlaboradon de klasoj. Ĝi do troviĝis en la sama tereno, ke la komunista politiko. La sovetia helpo ĝin pelis al ĉiuj koncesioj kaj silentoj tiel, kiel ĝia propra timemo. Toryho, kiel respondeca de la Oficejoj pri Propagando de NKL-IAF en Barcelono, sendis cirkuleron al la oratoroj de la Organizo malpermesante al ili mencii la liberecanan komunismon[293]. La burokrataro permesis al si kritiki la sendisciplinon kaj la malordon de la komitatoj por kontrolo aŭ de la perfortaj kolektivigoj, kutimaj kliŝoj de la komunistoj. En sekreta informo de la agento de la Kominterno André Marty oni povas legi :

> *Anarkiistoj. Granda ŝanĝo. Kompleta frakcio de la anarkiista movado, pri kiu mi ĵus parolis, kun ĉiuj ĝiaj nuancoj, marŝas kune kun la partio kun la samaj instrukcioj. La plej grava elemento determinanta la pliboniĝon kun la anarkiistoj,*

292 José Zafón Bayo, *El Consejo Regional de Aragón* (hispane, La Regiona Konsilantaro de Aragono), Editorial Planeta, Barcelono, 1979.

293 Floreal Ocaña, «Letero malfermita al anarkiista amiko», *Cultura Proletaria*, Nov-Jorko, 17-an de aŭgusto 1940.

*inkluzivitaj la katalunaj, estas la efika helpo de Sovetio, la ĉeesto de ŝipoj kun nutraĵoj en Barcelono kaj Valencio*[294].

Ili akceptis la eksigon de LPMU de la kataluna registaro postulita de USPK kaj Jacinto Toryho, «influita» de la rusoj kaj nova direktisto de la *Soli* oficiala[295], neebligis, ke ajna negativa komento pri Rusujo publikiĝis. Ĉefe, la referencoj al la komunista interveno en la morto de Durruti, kiu abunde cirkulis inter la anarkiistaj aktivuloj. Toryho parolis nome de la Nacia Komitato de NKL kaj de la Duoninsula Komitato de IAF, atribuante la famojn al la faŝisma malamiko, kiu

*... por atingi rompi ĉi tiu spiritan kaj materialan unuiĝon [kun la komunistoj] diskonigis la fian kaj ĉiam falsan famon, ke nia kamarado Durruti estis mortigita de uloj apartenantaj al aliaj kontraŭfaŝismaj organizoj.*

*Ni protestas kontraŭ ĉi tiu famo. Ni neniam kredis ĉi tiun mensogon. Ĉar ni havas plenan fidon en la kontraŭfaŝismaj sektoroj, kiuj kun ni luktas kontraŭ la reakcio. Ĉar ni havas plenan fidon pri ilia lojaleco. Ĉar ni havas plenan fidon pri iliaj vortoj kaj verkoj. Ni batalas kontraŭ ĉi tiu fia famo kaj avertas ĉiujn laboristojn, ĉiujn sen escepto, ke ili neniel kredis ĝin. Estas ruzaĵo de la malamiko, celanta rompi la nerompeblan unuiĝon de la laboristoj*[296].

Vere, la fido de Toryho kaj la komitatoj sur la komunistoj devis esti plena, ĉar ĉi tiuj dediĉis ĉiutage kritikaĉi la revoluciajn atingojn de la laboristoj, ĉu la kolektivigoj, ĉu la industrioj por milito, ĉu la aktiveco de la volontarmeoj. Tamen antaŭ iliaj manovroj, la figuro de Durruti levis kiel rifo. La germana ĵurnalisto Hans Kaminski lin pentris fidelece:

---

294 «La hispana demando», 7-an de marto 1937, en Radosh kaj aliaj, citita verko.

295 Toryho fieras pri sia amika rilato kun la rusoj en *Del triunfo a la derrota* (hispane, De la venko al la malvenko), Argos-Vergara, Barcelono, 1978. Floreal Ocaña lin akuzis, en «Malfermita letero al anarkiista amiko», «iĝi la *Soli* en respublika porbatalanto, kiu preskaŭ ĉiutage estis, en la militfronto, ĉifita de revoluciaj manoj, trabajonetita aŭ mortpafita kun rabio de ĝiaj reprezentatoj, kiuj ne vidis sin reprezentitaj en ĝi». En *Cultura Proletaria*, Nov-Jorko, 17-an de aŭgusto 1940.

296 *Solidaridad Obrera*, 22-an de novembro 1936.

*Buenaventura Durruti estis la heroo de la Revolucio, ties vivanta simbolo kaj sendube la plej forta personeco devenanta de ĉi tiu popola, spontanea kaj anonima movado. Li ankoraŭ ne aĝis kvardek jarojn, sed lia vivo jam estis legendo. Oni citis liajn parolojn. Lia volo trudiĝis super ĉiuj decidoj. Li estis amata, ege respektata kaj timata. Tamen, lia aŭtoritato ne eliris el hierarkia supereco, originis el la fido, kiun inspiris la viro, vera viro*[297]*.*

Homo neregebla kaj sekve nesuperebla obstaklo por la sovetiaj planoj en Katalunujo kaj Aragono. Kaj li povus esti ankoraŭ pli da obstaklo se Caballero enoficigus lin, kiel estron de la madrida sektoro. Trockij mem kredis, ke la sovetianoj lin mortigis, serĉante per tiu mortelvoka maniero reakiri la simpation de la okcidentaj demokratioj[298]. La rusoj manovris por alporti lin al Madrido. Ĉu tiel malfacile estus por ili, ke enŝteliĝinto ilia en la kolono kaŭzus kverelon kaj finus la laboron? Ĉu ili ne havis specialiston, la spionon Mamsurov, kromnome Xanti, ĉe li?[299] La ekzisto, almenaŭ

297 H. E. Kaminski, *Los de Barcelona* (hispane, Tiuj de Barcelono), Ediciones del Cotal, Barcelono, [1937] 1976.

298 En intervjuo farita la 23-an de aŭgusto 1937 de *Herald Tribune* de Nov-Jorko, kaj neniam eldonita, Trockij eldiris siajn kialojn: «La sovetia burokrataro volas atingi la fidon de la anglaj kaj francaj burĝaroj koste de la hispana popolo. Pro tio, antaŭe, la sovetia militista helpo estis kondiĉita de la kompromiso de la hispana Registaro malfermite batali kontraŭ la revoluciaj laboristoj kaj kamparanoj. ŜPD (NeT: Государственное политическое управление, ruse, Ŝtata Politika Direktantaro) translokis sian aparaton sur la hispanan grundon por ekstermi ĉiujn defendantojn de la proleta revolucio. La mortigo de la anarkiisto Durruti, de Andreo Nin kaj de aliaj estroj de LPMU (kiuj, ni diru preterpase, havis nenion komunan kun la trockiismo) estis organizita de sovetiaj agentoj direktitaj de la konsulo Antonov-Ovseenko sub la rektaj instrukcioj de Moskvo. Stalino diras al Londono kaj Parizo: “Vi povas fidi min”». *Escritos de León Trotsky* (1929-1940) (hispane, Skribaĵoj de Leo Trockij (1929-1940)), 5a volumo, Editorial Pluma, Bogoto, 1977.

299 En intervjuo, kiun al li faris la ĵurnalisto Egor Yakovlev en 1968, Mamsurov, jam ĝeneralo de KSŜ (NeT: Комитет государственной безопасности, ruse, Komitato pri la Sekureco de la Ŝtato), rekonis, ke li estis «militista konsilanto» de Durruti kaj la unua komunisto, kiu membris en liaj trupunuoj (kio ne veras), sed li neis esti rilatigita kun lia morto, pretekstante, ke tiutage «ne ĉeestis» (*Carta del Este*, 16-an de septembro 1978). La ideo de enŝteliĝo enradikiĝis inter la akompanantoj de Durruti. *Les Giménologues* kolektis la ateston de luktanto de la kolono en Madrido, Millán de Lahoz, kiu je la 1960-a jardeko, en la franca ekzilo, diris, ke «estis multaj perfiduloj en NKL kaj, ke Durruti estis mortigita de la komunistoj konsente kun iuj kunuloj el sia

de enŝteliĝintaj informantoj, estis pruvita de la atesto de la rusa kameraisto Roman Karmen, kiu akompanis Xanti-on por paroli kun Durruti iom antaŭ ol ĉi tiu eniros en la Packard-on kaj renkontiĝos kun la sorto. Unu horo poste, li renkontis Xanti-on en la Stabo de Miaja kaj ĉi tiu jam konis lian morton, kulpigante «ilin», la «klasikajn» anarkiistojn[300]. Ĉi-rilate, konvenas memorigi la ĉeeston de Orlov, estro de KPIA, alveninta de Rusujo por direkti la ekstermon de LPMU kaj revoluciaj anarkiistoj. La 1-an de decembro, la komunisto Hans Beimler, estro de germana bataliono inkluzivita en la Internaciaj Brigadoj kaj suspektinda de maldekstrismo, falis en la militfronto de Madrido pro, oni diris, «perdita kuglo». Pavel Thalmann, kiu tiujn tagojn vizitis la madridan militfronton, kolektis en la anarkiistaj medioj la famon, ke Durruti estis mortigita de la komunistoj kaj aldonis pri Beimler: «oni ankaŭ diris pri li, ke li estis viktimo de internaj intrigoj de partio kaj malkuraĝe mortigita de post la dorso»[301]. Ankaŭ rezultas stranga kaj mistera la morto de komandulo, kiu eble ne plaĉis al la rusoj, la kapitano Rafael López Tienda, estro de la Kolono Libertad, de USPK, viktimo de «malfeliĉa akcidento» en militfronto proksima al Madrido «kiam lia pistolo pafiĝis al li»[302]. La fakto okazis la 26-an aŭ 27-an de oktobro, sen konataj atestantoj, verŝajne en Móstoles. Li estis enterigita je la sekva tago kaj ĉeestis la ambasadestro Rosenberg. Ses tagojn poste, kontraŭe, oni

---

rondo».

300 Paz, citita verko.

301 Pavel kaj Klara Thalmann, *Combats pour la liberté* (france, Bataloj por la libereco), La Digitale, Quimperlé, 1983. Lia parulino Antonia Stern akuzis KPIA-on, kiel respondecan de lia morto. La socialisto Justo Martínez Amutio traktis la aferon en *Chantaje a un pueblo* (hispane, Ĉantaĝo al popolo), Gregorio del Toro, Madrido, 1974. La enterigo de Beimler okazis en Barcelono la 6-an de decembro kaj ĉeestis delegitoj de ĉiuj kontraŭfaŝismaj organizoj kaj la aŭtoritatoj, inkluzivita la rusa konsulo. Pro tiu motivo, la stalinistoj organizis la unuan militistan paradon, kiun vidis Barcelono.

302 «La viktimoj de la devo», *La Vanguardia*, 28-an de oktobro 1936.

diris, ke li falis «viktimo de sia heroeco kaj sia braveco»[303] kaj oni neniam remenciis la supozan akcidenton. Jesús Hernández, tiama ministro pri Publika Instruado de KPH, faris surprizajn deklarojn, kiam finiĝis la milito. Fidindulo de Orlov, li realigis la jenan konfidencon al sia privata sekretario:

> *Orlov decidis mortigi Prieto-n. Li rilatiĝas kun iu el la persona eskorto de la ministro. Oni pretendas ŝajnigi bedaŭrindan akcidenton: iu el la akompanantoj «neglekte» lasas en la kofrujon de la aŭtomobilo manbombojn, kiuj pro la tremado de la aŭto eksplodas. Oni projektas la atencon en la unua vojaĝo farota sur ŝoseo[304].*

Do, la simileco kun la kazo Durruti estas rimarkinda. Durruti mortis eskortita de kvar aŭ ses personoj. Iu lin elirigis el lia Stabejo avertante lin pri senorda diskuro de liaj homoj. Tiumomente, Xanti ĉeestis. Rionda, proksimulo lia, pli ol dudek jaroj post la okazaĵo asertis, ke la morto estis pro la akcidenta pafo de lia fusilo «naranjero»[*], en loko ŝirmita de la kugloj, kie lia aŭto haltiĝis[305]. Li rakontis al Enzenberger: «Manzana al mi certigis, ke tiel okazis». La madrida NKL-isto Rada, kromnome Ramón García, kiu al li konfesis esti eskorto de Durruti, klarigis la saman historion.

---

303 *La Vanguardia*, 3-a de novembro 1936. Al la strato Cerdeña, de Barcelono, oni donis lian nomon kaj, en januaro, estis lokita en la kazerno Karolo Markso memoriga ŝtono en lia memoro.

304 Jesús Hernández, *Yo fui ministro de Stalin* (hispane, Mi estis ministro de Stalino), Editorial América, Meksikurbo F. D., 1953.

* NeT: varianto de la subfusilo MP 28 II produktita en Hispanujo, uzita de la respublika flanko dum la enlanda milito. Ĝia manipulado estis danĝera por la uzanto mem pro la eblaj akcidentoj kaŭzataj de la manko de sekurigilo.

305 Lia atesto estis diskonigita en 1972 de la pastro Jesús Arnal en *Por qué fui secretario de Durruti* (hispane, Kial mi estis sekretario de Durruti), reeldonita en la kataluna en Pagès Editors, Ilerdo, 1997. Tamen siamomente li diris la malon. En la numero 57a de *Vía Libre*, proparolanto de NKL kaj IAF de Badalona (20-an de novembro 1937), dediĉita al la memoro de Durruti, li subskribis artikolon, kiu asertis: «Hodiaŭ antaŭ jaro, ke en Madrido malamika kuglo fortranĉis la vivon de nia Durruti trapikante al li la koron, kiam li elaŭtiĝis meze de pluvo el kugloj por revizii siajn fortojn, siajn kamaradojn, kiuj, kiel li, propravole donis siajn brustojn por la defendo de nevenkita kaj nekonkerebla Madrido ».

Santillán ripetis ion similan, konsente kun tio, kion al li rakontis Manzana kaj ankaŭ tion faris García Oliver. Evidentas, ke la historio de la «naranjero» estis mensogo destinita pravigi pafon fare de minimuma distanco. García Oliver konfesis, ke «li ĉiam kredis, ke estis iu kamarado el lia eskorto al kiu pafiĝis la naranjero, kaj Durruti ricevis la pafon»[306]. Horacio M. Prieto donis ateston pri ĉiuj famoj: «Ili diris, ke estis "paco" [kaŝpafisto], unu el la multnombraj, kiu agadis tie, kiu lin mortigis; ili ankaŭ diris, ke estis lia fidindulo, Manzana, kiu pafis lin, senintence kompreneble»[307]. Volontarmeano, kiu estis en Quinto memoras: «Tiom afliktis nin la afero, ke ni iris mortigi malamikojn al Quinto. Mi ĉiam dubis pri lia morto. Mi tiam kredis, ke ĉu lin mortigis unu el la niaj, perfidulo, unu nomita Manzana aŭ Manzano laborante por la faŝistoj, ĉu kaŝita faŝisto»[308]. Kiel interpreti, ke Manzana estis apogita de la gvidantaro de NKL kaj elektita por militistigi la Kolonon Durruti anstataŭ influaj kolegoj kiel Rionda, Mira aŭ Yoldi? Kiel klarigi, ke du jarojn post la morto de Durruti, Manzana daŭre estis glorita, kiel reorganizinto de lia kolono kaj proklamita lia heredinto? Por klarigi la morton de Durruti evidentas, ke oni devas ne kredi ĉiujn, sed ni certas pri io: inter ĉiuj, ili diras ĉion. Por ekmalkovri la veron, Felipo Alaiz konsilis silenton kaj, ĉefe, ne aŭskulti la altrangulojn:

> *La detalon de ĉi tiu morto oni oficiale donis laŭ konfuza maniero kaj poste reĝustiĝis. Estas preferinde silenti ol paroli per stulta buŝo, oficiala; ĝi ĉiam estas la unua mensogi kaj la*

306 García Oliver, citita verko. Federica Montseny, dezirante malproksimigi de si la moralan respondecon, kiun ŝi havis pri la morto, ĉiam apogis la oficialan version de la perdita kuglo, kiun la liberecana burokrataro elpensis por malaperigi la famojn, kiuj celis la komunistojn.

307 *Utopistas* (hispane, Utopiuloj), manskribaĵo neeldonita citita de César M. Lorenzo en letero al *Les Giménologues*, 28-an de aŭgusto 2004.

308 Intervjuo al Isidro Benet fare de *Les Giménologues*, 13-an de novembro 2009. Estas ankaŭ la opinio de Bonilla.

*lasta, kiu silentas. Silentu do, tute konvinkitaj, ke la vero ankoraŭ ne estas dirita[309].*

La 20-an de novembro vespere, la prezidanto de la Estraro pri Defendo de Madrido, generalo Miaja, sendis telegramon al la Ministrejo por la Milito de Valencio informante pri la morto de Durruti «pro la vundoj suferitaj en la antaŭa nokto, dum batalo», kio iel sugestas antaŭan interkonsenton kun la gvidantaro de NKL. Tiu telegramo estis montrita al la ĵurnalistoj, kiuj amasiĝis en la enirejo de la ministrejo. La prezidanto de la Konsilantaro de Ministroj kaj ministro por la Milito, Largo Caballero, respondis lin petegante, ke li sendu telegramojn de kondolenco al la ministroj, NKL kaj Durruti-aj fortoj. Iu ĵurnalo poste precizigis, ke li estis «grave vundita dum la kuratako al la Clínico»[310]. Tiun saman vesperon, post informi la ĵurnalistojn pri projekto de mallibereja urbo, García Oliver foriris al Madrido en reprezento de la Registaro kaj la prezidanto de la Konsilantaro. Ankaŭ tion faris Federica Montseny. Juan Peiró ricevis la novaĵon en la laborĉambro de la sovetia ambasadestro, «kore» debatante kun ĉi tiu kaj la misinformanto Ilya Ehrenburg[311], kio neniel estis stranga, ĉar la ministroj kaj altaj gvidantoj de NKL estis invititaj de la sovetianoj kaj ofte vizitadis la ambasadejon. Sekvatage la novaĵo okupis la unuan paĝon de ĉiuj ĵurnaloj kaj la telegramoj amasiĝis en la laborĉambroj de la ministrejoj, komitatoj kaj la politikaj oficejoj. La nokto de la 21-a Federica Montseny, komisiita de la Nacia Komitato de NKL por komuniki la malĝojan novaĵon al la madrida popolo, lokis sin antaŭ la mikrofono de Unión Radio, instalita en la Ministrejo por la Milito de Madrido, sed krom laŭdi Manzana-on, forgesante la «posteulon» Ricardo Sanz, kaj

309 Alaiz, citita verko.

310 *El Sol*, 22-an de novembro 1936.

311 Joan Manent (Sekretario de Peiró), «La morto de Durruti», *Vía Libre*, 20-an de novembro 1937.

maski la novajn aparatajn instrukciojn inter la ĉi-okaze kutimaj kliŝoj, evitis doni iun konkretan donitaĵon pri la morto de la granda revoluciulo[312]. Ŝi komencis per retorika “mi kulpas”:

> *Se iu kulpo estus en ĉi tiu morto de Durruti, estus tute nia, kiuj de Katalunujo lin devigis, ke li alvenis al Madrido [por atingi kuriozan dedukton:] kiam homo akiras kategorion de mito, li ĉesas esti homo reprezentanta tendencon por iĝi la aŭtentika reprezento de la tuta raso.*

La tuta manipulado de la figuro de Durruti estas enhavita en la tre konata frazo; Durruti estas rasa mito, ne simpla luktanto de la proletaro. La moralaĵo de tia sensencaĵo minimume celas la militistigon:

> *Ĝis nun ni luktis laŭ instinkta maniero, danke al popolaj volontarmeoj, preskaŭ ĉiam direktitaj de propra iniciato, sen kunordigo, sen antaŭviditaj kaj kombinitaj planoj. Estontece ni devas esti efikaj kaj lukti per kompleta organizo[313].*

La tuta versio de la parolado precizigas, ke la doloro kaŭzita de la morto de Durruti «nur povas kompari sin kun la sentita de Rusujo, kiam mortis Lenino». Estas signifa la aludo al Rusujo, kiu ripetiĝis en la parolado de García Oliver dum la enterigo en Barcelono. Koncerne kion signifis tio de la «kompleta organizo»: «Ni bezonas starigi unuforman tipon de konduto, ni bezonas, ke niaj volontarmeoj iĝu la nevenkebla revolucia armeo»[314]. Efektive, en la Tutlanda Delegitkunveno de la 12-an de decembro, NKL akordigis dissolvi siajn kolonojn en militaj taĉmentoj. La tutlanda komunisma gazetaro reproduktis ĉi tiun postmortan ekzekuton kun plaĉo. Eĉ pli, la rusa konsulo Antonov-

312 Li aludis Manzana-on (kiun li nomas Manzano), kiel «lia ombro [tiu de Durruti], oni povus diri lia ĝemelo, en kiu personiĝas lia spirito», kiu «daŭrigos la verkon komencita de ĉi tiu». *La Vanguardia*, 22-an de novembro 1936.

313 *El Mercantil Valenciano*, 22-an de novembro 1936.

314 «Laŭdo de Durruti», Buenaventura Durruti, broŝuro plurlingve eldonita de la servoj de propagando de NKL-IAF. Sen dato de publikigo, sed tutcerte decembro 1936.

Ovseenko sendis leteron de kondolenco al Companys! Laŭ tio dirita en la parolado de Federica: «Al la nomo de Durruti estas ligita la kreo kaj plifortiĝo de la kontraŭfaŝisma fronto kaj la kreo de la disciplinita Popola Armeo»[315]. La kunligiteco de ideoj inter la ĉefaj liberecanaj gvidantoj kaj la stalinistoj funkciis, kvankam ankoraŭ oni devis gajni al si la aktivularon, substrekante, ke Durruti estis neniu estro, ĉar la anarkiistoj ne havas estrojn. La ideo saltis de parolado en parolado: de Marianet al García Oliver, de Ricardo Sanz al Federica.

La oficiala versio de NKL, la plej neverŝajna, ĵetis la kulpojn de la morto de Durruti al perdita kuglo pafita de la faŝista flanko:

> *Durruti, la pasintan vendredon, direktis sin je la oka kaj duono matene viziti la skoltaron de sia Kolono. Sur la vojo li rekontiĝis kun volontarmeanoj, kiuj revenis de la militfronto. Li haltigis la aŭton kaj, elirante el ĝi, sonis pafo, kiu, oni supozas, estis farita de iu fenestro de iu hoteleto de la Moncloa. Durruti falis morta kaj sen prononci solan vorton.*
>
> *La mortiga kuglo al li trairis la dorson de flanko al flanko. La vundo neeviteble kaŭzis la morton*[316]*.*

Federica Montseny korektis de Madrido la redaktistojn de *Acracia*:

> *Kuglo fortranĉis la vivon de nia Durruti post paroli ĉi tiu kun la volontarmeanoj kaj produkti en ĉi tiuj la plej grandan entuziasmon la impulso de la varmaj vortoj, kiuj ĉiam eliris el liaj lipoj*[317]*.*

La fakto, ke en la loko de la okazaĵo Durruti estis ŝirmita, pli ol kilometro for de la militfronto, ŝajnis zorgi

315 En la sama verko.

316 «Kiel perfide estis mortigita nia kamarado Durruti», *Solidaridad Obrera* kaj *Fragua Social*, 22-an de novembro 1936.

317 *Acracia*, 22-an de novembro 1936.

neniun, almenaŭ tiumomente[318]. Tamen, komence «oni malpermesis al kiuj lin akompanis, ke la novaĵo diskonatiĝos»[319]. Nedubeble oni devis forĝi oficialan version, utila al la interesoj de la organizo, kiu estus minimume kredebla. Sendube, oni timis reagon kontraŭ KPH. Noto de la Nacia Komitato vaste diskonigita de la gazetaro malkonfirmis la malverajn famojn, kiuj celis la komunistojn, kategorie asertante, ke «la vivo fortranĉita en sia florado de la kamarado Durruti estis produktita de faŝisma kuglo kaj ne de uloj de determinita sektoro».

Zugazagoitia, direktisto de *El Socialisto* kaj partiano de Prieto, tiutempe en la stabo de Miaja, aldonis malakordajn detalojn en sia studaĵo pri la milito. Durruti elaŭtiĝis kun pistolo en ĉiu mano kaj severe admonis siajn volontarmeanojn, kiuj returniris, kriante «perfidon». Ĉi tiuj regrupiĝis kaj li, ne aŭskultante ilin, signante la militfronton al ili diris:

> *Ni tien iras. Kiuj min volas sekvi, ke min sekvu.*
>
> *Li ekpiediris. La soldatoj lin sekvis pretigante la fusilojn kaj aklamante lin. Kuglo rompis la scenon. Durruti falis al tero, morte vundita kaj liaj viroj, pli laŭte, kriis solan vorton: «Perfido! Perfido!» De kiu?*[320]

Bona demando. En siaj memoraĵoj, García Oliver rimarkigas tiaman kutiman fakton ĉe la madridaj militfrontoj:

318 Jaron poste, la madrida NKL klopodis fajli la kontraŭdirojn de la oficiala versio manipulante aŭ elpensante faktojn: «Sekcio de liaj fortoj atendis la momenton ataki. Durruti veturis per sian aŭton, sen timo al la danĝero, sur la ŝoseo de la Universitaria, kiu komenciĝas en la Dehesa de la Villa. Li distris sin kun siaj knaboj en la Fakultatejo pri Sciencoj. Li parolis kun la estroj de la Internacia Kolono, kiuj prenis la Fakultatejon de Humanaj Sciencoj. Kiam li alvenis al la trinkejo, kuniĝante kun siaj knaboj, kuglo el la multaj, kiuj kvazaŭ ŝtormo el fero ĉiudirekte kruciĝis, pafitaj de la malamiko disde la Clínico, mortigis la militestron». En M. B., «Kiel mortis Durruti», *CNT*, Madrido, 20-an de novembro 1937.

319 En la sama verko.

320 Julián Zugazagoitia, *Guerra y vicisitudes de los españoles* (hispane, Milito kaj sorto-ŝanĝoj de la hispanoj) eldonita en Parizo en 1940. Reeldonita de Editorial Tusquets, Barcelono, 2001.

«Ie tie estis la armefuĝintoj, posedataj de la paniko. Unuope kaj triope. Ĉi tiuj estis la danĝeraj, ĉar se oni riproĉis al ili ilian konduton, ili kapablas pafi onin»[321]. Do, Ricardo Sanz en 1981 skribis alian version, publikigita post lia morto, kiu implikis armefuĝintojn. Laŭ tio, Manzana, la milita asistanto de Durruti, rakontis al li konfidence:

> *La aŭto iris malrapide; haltiĝis sen tio, ke iu petis la ŝoforon fari tion. Durruti al li diris:*
>
> *—Ne elaŭtiĝu, subtenu la motoron funkcianta por, se venas la aviadilaro, povi rapide foriri.*
>
> *Elaŭtiĝas Durruti kaj mi; ni piediras paŝojn al la antaŭaj pozicioj kaj renkontiĝas kun tri junuloj, kiuj venis laŭ kontraŭa direkto. Durruti ilin demandis:*
>
> *—Kien iras, knaboj?*
>
> *—Serĉi longajn armilojn, ĉar ni ne trovis fusilojn por batali — ili respondis.*
>
> *—En la postmilitfronto ne estas fusiloj —respondis Durruti—. Ni portas ilin al la paflinioj.*
>
> *—Ni ilin trovos —insistis la junuloj.*
>
> *—Revenu en la ŝirmajn fosaĵojn —ilin postulis Durruti.*
>
> *—Ni estas serĉontaj armilojn.*
>
> *Tiam, Durruti faris geston, kvazaŭ por eltiri sian pistolon. Unu el la junuloj, kiu portis mallongan armilon en la mano, pafis kontraŭ Durruti kaj la tri ekkuris. Durruti ne havis tempon eltiri sian pistolon kaj mi lin kaptis vundita kaj malfacilece portis lin al la aŭto[322].*

---

321 García Oliver, citita verko.

322 Eldonita post morti Sanz en la *Boletín de la Amicale de la 26 División*, n-ro 3, Toulouse, 20-an de novembro 1991. Manzana eksiĝis, kiel estro de la kolono en la militfronto de Aragono post kverelo kun Mira, en aprilo 1937. Oni akuzis lin esti la respondeculo de la katastrofa atako al la Carrascal de Chimillas, kie granda kvanto de ĵus militistigaj volontarmeanoj estis portitaj sennecese al la buĉejo. José Fortea Gracia kredas, ke estis kaptilo, kiun al li preparis la komando de la militfronto en Sariñena pro politikaj kialoj, pri kiu li ne sciis ĝustatempe kompreni (*Mi paso por la Columna Durruti/26 División* [hispane, Mia paso je la Kolono Durruti/26a Divizio]),

La rakonto de Sanz tute similas la historion kolektitan de Joan Llarch kaj volontarmeano nomita «Paco», kiu «multfoje akompanis Durruti-on kaj kiu, ĝuste tiujn tagojn, forestis de la militfronto, ĝuante forpermesajn semajnojn». La volontarmeano estis informita de iu respondeculo en la domo NKL-IAF de la Vía Layetana[323], kio, se verus, provus, ke ĉe la komitataj gvidantaroj ĉiuj sciis la veron kaj ĉiuj konscie mensogis. Ĝi ankaŭ estis konata en LPMU. Thalheimer, delegito de OKP[*], proksima germana partio, sciis ĝin el lipoj de Andreo Nin. Ĉi tiu al li diris, ke «irante al la militfronto, Durruti renkontiĝis kun grupo de volontarmeanoj, kiu malproksimiĝis de li. Li petis ilin, ke ili revenu. Estis kverelo kaj li estis mortigita de unu el ili»[324]. Ankaŭ unu el la kuracistoj, kiuj priatentis Durruti-on, Manuel Bastos, asertis en siaj memoraĵoj, skribitaj laŭ edife reakcia tono, ke oni al li «komprenigis», ke la pafo devenis de la respublika tendaro[325]. La katalunaj komunistoj mem rakontis ion similan, sed aldonante la sufiĉan fantazion por povi

Centre d'Estudis Llibertaris Federica Montseny, Badalona, 2005). Tamen, ankoraŭ la Nacia Komitato de NKL volis enoficigi lin, kiel estro de la Divizio Durruti sed Sanz proponis la alternativon «aŭ li aŭ mi» kaj Manzana estis malakceptita. Oni povas legi en la semajna gazeto de la 42a Divizio, konsistigita de la tri brigadoj devenantaj de la malnova Kolono del Rosal, ke «Malsano kaŭzis, ke Manzano kontraŭ sia volo translokiĝis al la postmilitfronto» (*La Libertad*, Cuenca, n-ro 5, ĉu aŭgusto? 1937). Tiu devis esti la oficiala preteksto. Li definitive forlasis la divizion post la faktoj de majo.

323 Joan Llarch, citita verko. Llarch aŭdis la rakonton de «iu rilatigita kun personoj proksimaj al la konfederaciaj medioj», sed ne povis trovi tian Paco-n, kiu jam forpasis, nek scii lian familinomon.

* NeT: Opozicio de la Komunista Partio.

324 August Thalheimer, *Diario de Cataluña* (hispane, Taglibro de Katalunujo), Revolutionary History, 4a volumo n-roj 1-2, 1991-1992. Tamen, versio de LPMU identa al la oficiala de NKL aperis en *La Batalla* kaj *Combat*, la 21-an de novembro 1936: «Ni ricevis la korŝiran novaĵon pri la kolego Durruti, mortigita de la malamikaj kugloj. Ĉi tiu matene, irante viziti la skoltajn trupojn, li rekontiĝis kun kelkaj volontarmeanoj, kiuj devenis de la militfronto kaj elaŭtiĝinte por kontroli ilian taskon, sonis pafo. Durruti falis teren morta. La malamika kuglo trairis la ŝultron. Oni supozas, ke la pafo estis farita de iu fenestro de la hotelo de la Moncloa».

325 «Tiuj, kiuj lin ĉirkaŭis senkaŝe al mi komprenigis, ke estis liaj partianoj mem la kaŭzantoj de la vundo.» En Manuel Bastos Ansart, *De las guerras coloniales a la Guerra Civil*. *Memorias de un cirujano* (De la koloniaj militoj al la Enlanda Milito. Memoraĵoj de kirurgo), Editorial Ariel, Barcelono, 1969.

aserti, ke Durruti-on mortigis la liaj. Laŭ Almendros, militista sekretario de UPSK, ĉi tiuj forlasis la ŝirmajn fosaĵojn pro malmola atako de maŭroj kaj legianoj:

> *Durruti, konscia pri sia respondeco kaj la katastrofo, kiu signifis forlasi la sektoron, kunvenigis grupon de fidinduloj. Li starigis specon de retenbaro. Ĉi tiuj viroj, kun maŝinpafileto en mano, minacis per la morto ĉiun, kiu fuĝus. Antaŭ tia sinteno, multaj rezistis en la ŝirmaj fosaĵoj, sed aliaj perdis la vivon klopodante fuĝi. Inter kiuj sukcesis transiri la baron estis kiu, pro reago de solidareco rilate al siaj mortigitaj kunuloj en la postmilitfronto, pafis en la dorson Durruti-on[326].*

Kurioza vojo de la kuglo, ĉar Durruti ricevis la pafon en la brusto. Ĉar multfoje, per pli aŭ malpli da ornamoj, la stalinistoj havigis ĉi tiun version, ni inklinas pensi, ke ĝi estis instrukcio. Sed oni ankaŭ diskonigis la famon, ke Durruti-on mortigis liaj kolegoj, ĉar «li volis aliĝi al la komunista partio»; eĉ hungara korespondanto asertis, ke lia morto okazis dum atako de lia kolono al Valencio, defendita de la komunistoj. Evidente, ĉi tiuj estis la unuaj interesataj, ke la veron oni ne sciis. La enŝteliĝantoj de la kvina kolono kolektis ĉiujn famojn, kiujn la Franco-ista radio elsendis en la venontaj tagoj.

Ni ree parolu pri Sanz, ĉi tiu diris, ke post tiu «malĝoja kaj peniga intervidiĝo» kun Manzana daŭrigis siajn dubojn,

---

326 Joaquín Almendros, *Situaciones españolas: 1936/1939. El PSUC en la guerra civil* (hispane, Hispanaj Situacioj: 1936/1939. USPK en la enlanda milito), Dopesa, Barcelono, 1976. Manuel Tagüeña estis pli avara je detaloj; li simple diris, ke Durruti mortis «apud la Ciudad Universitaria, kiam li klopodis haltigi senordan diskuron de siaj volontarmeanoj» (*Testimonio de dos guerras* [hispane, Atesto de du militoj], Planeta, Barcelono, 1978). Ĝuste tion saman diras Enrique Líster en siaj memoraĵoj. La versio de la Brigado Kléber prezentas variantojn: Durruti estis en sia posteno de komando apud la malliberejo Modelo kaj ne fronte al la Clínico. Ne estis senorda diskuro. Li falis mortigita de kugloj, kiuj ŝajnis «deiri de malantaŭe»: «De aŭgusto, la anarkiista trupestro faris multajn malamikojn inter la veteranoj de NKL-IAF, kiuj al li riproĉis lian emon por la disciplino. Iuj lin akuzas pri ambicio. Minutojn poste, anarkiistoj el lia kolono diras al la sekciestro Pierre Rösli: “Estas el la niaj, kiuj mortigis Durruti-on”». En Jacques Delperrie de Bayac, *Les Brigades Internationales* (france, La internaciaj Brigadoj), Fayard, Parizo, 1968.

ĉar ne malaperis liaj suspektoj, sed «en tiuj cirkonstancoj mi ne povis fari aliaĵon», t. e., li nur povis silenti. Fakte li faris la malon kaj pasigis la vivon ripetante, kiel papago la oficialan version. Tion saman faris la aliaj. Antonio Bonilla, kiu vidis la scenon je dudek metroj de distanco, ne rakontis ĝin ĝis kvardek jaroj poste, sed neniam menciis la pafon de la junulo. Li pravigis sin dirante, ke li pasigis la vivon serĉante Manzana-on, kiun li supozis kulpa[327]. La versio ankaŭ koincidis kun tiu de la ŝoforo de Durruti, Julio Gravas, la plej oficiala, kiu menciis la detalon de grupo de junuloj, kiun sekvis «pluvo el kugloj» malamikaj[328]. Laŭ Mira, Bonilla tiam donis version egalan al tiu de la ŝoforo, aldonante, ke estis li, kiu gvidis Durruti-on al la Clínico avertante al li, ke la bataliono Asturias rifuzis helpi la volontarmeanojn ĉirkaŭbaritajn tie. Tamen, la kuracisto Martínez Fraile, kiu diagnozis, ke la vundo estis neeviteble kaj senrimede mortiga, parolis pri la vojo: «Estis aĵo pli de supre ol de sube. Mi povus klarigi, ke estus preskaŭ horizontala linio». Miravitlles, kiu havis en siaj manoj la ĉemizon de Durruti, rakontis, ke la truo de la kuglo prezentis brulintaĵojn, propraj de pafo farita je mallonga distanco. Laŭ li, la kolegaro de la vidvino pensis pri akcidento[329]. La kuracisto Santamaría, respondeca pri sano de la kolono, kiu faris la anatomian ekzamenon al la kadavro, asertis, ke la mortiga vundo de Durruti estis kaŭzita de pafo farita je malpli ol kvindek

327 Ĝis la fino de la milito, Manzana estis konsiderita de la liberecanaj gvidantoj «frato» de armiloj kaj «morala filo» de Durruti. Apartigita de NKL, li ekloĝis en Meksikurbo, estis prospera entreprenisto, plurfoje vizitis Hispanujon kaj mortis pro kancero en 1973 sen tio, ke iu lin ĝenis.

328 Bonilla rakontis sian historion al Pedro Costa Muste en la revuo *Posible*, n-ro 80, julion 1976. Dum renkontiĝo de veteranoj en Barcelono, la 26-an de novembro 1977, li asertis, ke li pasigis ĉiujn tiujn jarojn serĉante Manzana-on «por mortigi lin». Julio Graves, la ŝoforo, klarigis sian version al Ariel, frato de Eduardo Val kaj korespondanto de la *Soli* en Madrido. Tie li ĝin publikigis unue: «La lastaj tagoj de Buenaventura Durruti», *Solidaridad Obrera*, 20-an de novembro 1938. Jam en la ekzilo, li skribis ĝin en broŝuro titolita *Cómo murió Durruti* (hispane, Kiel mortis Durruti).

329 Intervjuoj de Enzensberger, citita verko.

centimetroj de distanco. Ĉu fare de la nekonata junulo, el la brigado Kléber eble, el la Kvina Regimento, el la kolono de USPK aŭ el ajna alia trupunuo, kiu luktis en la Ciudad Universitaria? Ĉu fare de Manzana? Ĉu fare de unu el la eskorto?[330]

Oni neniam tutcerte scios ĝin. Marianet kunvenigis ĉiujn atestantojn kaj instigis ilin gardi silenton. En la responda kunsido de la Estraro pri Defendo de Madrido, la komunisto Diéguez proponis, ke la kunvenantoj esprimu sian doloron al la liberecanaj organizoj kaj la tuta Katalunujo. Tiam, la delegito de NKL, Enrique García Pérez, deklaras, «ke li kompreneble konsentas sed konvenas, ke oni tion faru per la plej granda ebla rezervo, por ke la novaĵo ne diskoniĝu ĝis post kelkaj tagoj»[331]. Kurioza la silenta kaj singardema sinteno de la delegito. Kial okazis tio? Poste, la komunistoj faris sian kutiman laboron de misinformado samtempe, ke invadis la oficejoj de NKL per sentriĉaj telegramoj de kondolencoj. Kiel diris André Prudhommeaux, Durruti-on mortigis la kontraŭrevolucio kaj la kontraŭrevolucio estis direktita de la komunistoj. La sekreta agado respondis sin kun la solidigo de gvidanta burokrataro en la liberecanaj amasoj kaj estis rekta efekto de ĝi. Tiu burokrataro estis subjekto kun siaj propraj interesoj kaj celoj. La defendo de ĝiaj interesoj —tiuj de la «Organizo»— estis tio pligrava kaj kio determinis ĝian pozicion ĉe la vero, ne konsiderante ajnan revolucian postulon. Kiel la vero pri la morto de Durruti ne favoris tiujn interesojn, restis pravigita la falseco kaj, sekve, la sekreto. La vero restis degenerinta al hipotezo, al kiu la forigo de ajna objektiva kriterio, t. e., la

330 José Gabriel asertas en sia libro, ke Durruti «estis mortigita de la Internacia Kolono de la generalo Kléber, “specialista forto pri purigo en la postmilitfronto” (kiel oni jam senkaŝe nomas ĝin)», opinio deveninta verŝajne de la LPMU-aj medioj de Barcelono. Gabriel aludas konspiron de la Registaro apogita de Anglujo, Francujo kaj Rusujo, malamikaj landoj de la hispana Revolucio.

331 Akto de la kunsido okazigita la 20-an de novembro je la 19a horo, en Aróstegui kaj Martínez, citita verko.

anstataŭigo de la liberecana opinio per la propagando, iĝus nepruvebla.

Estas okulfrapa afero, kvankam tre ripetita en la historio, la nomita *trahison des clerqs*[*], t. e., la aliĝo de la intelektuloj al la partio, kiu plej bone reprezentas la ordon kaj, sekve, kiu plej bone protektas iliajn nutraĵajn interesojn: dum la revolucia enlanda milito tiu partio estis KPH. En la kazo de la poetoj, tiu aliĝo estis preskaŭ ĉioma. For de la militfronto, en komfortaj ŝtataj postenoj, la poetoj sin dediĉis per fervora entuziasmo al la afero de la burĝa demokratio, produktante la necesan epopeon per versigado de titoloj de Mundo Obrero. La politiko de Stalino estis kantita de romanco por produkti kroman propagandan efekton sed, kiel diris mire Alberti, la malnova romancaro estis la ĉefa instrumento por versigi la defendon de la privata propraĵo kaj la kunlaboradon de klasoj. La figuro de Durruti meritis unu el tiuj kantoj kaj havis sian respondan porcion de oksilabaj versoj. La menciita romanco prezentis Durruti-on tiel zorgita pri la sorto de Madrido, ke li propravole alparolis siajn homojn kaj animis ilin, instigante ilin iri al la ĉefurbo ĉar «kaj vi jam scias, ke Madrido estas la koro de Hispanujo». La patrioto Durruti «haro sur brusto, malmola barbo», kia *Cid Campeador* «tra kastiliaj teroj», alvenis al Madrido kun «la katalunoj» por lukti kontraŭ la kanajlaro, «kiu de Maroko venis», samkiel dum la Rekonkero. Malamiko de «la afrikaj popolaĉoj» li rapide ordonis: «Ke restu vivanta neniu maŭro!», esprimo de forta nacia lirikismo inda de disĉiplo de Santiago aŭ de Sankta Georgo. Tiumomente la poemo atingis Lorca-ajn tonojn ĉar Durruti, en milita ekstazo, kiel bovbatalisto, provokis la morton «vizaĝe-al-vizaĝe». La resto de ĉi tiu interligo inter la trumpeto de papero kaj la kontraŭrevolucio estas antaŭvidebla:

---

* NeT: france, perfido de la intelektuloj.

*La katalunoj progresas.*
*Frenezaj, al la kvar ventoj,*
*fajfas kaj fajfas la kugloj,*
*kiuj, perditaj, celtrovas,*
*hazarde, en ĝin sin najlas.*
*Unu el tiuj pafaĵoj*
*haltigas abrupte l' marŝon*
*de ĉiuj katalunoj...*
*Regas l' timeg'. —Kio okazas?*
*Neniu scias nek respondas.*
*Har' sur brust', malmola barbo,*
*Buenaventur' Durruti,*
*kiu la morton provokis,*
*brakumita al la morto,*
*rigida sur la kamp' restis.*[332]

Kiom for restas la romanco de Lucía Sánchez Saornil, fondintino de Mujeres Libres[*], per sia belega kanto al la unueco por la daŭrigo de la revolucia verko[333].

---

332 Luis Pérez Infante, «La Muerte de Durruti», *Romancero General de la Guerra Civil* (hispane, «La morto de Durruti», Ĝenerala Romancaro de la Enlanda Milito), unue eldonita en Bonaero, 1944. Mi citas la kunan eldonon de Visor Libros kaj la Ministrejo de Kulturo, Madrido, 2006.

* NeT. Liberaj virinoj: hispana anarkiisma virina organizo. Vidu: https://eo.wikipedia.org /wiki/Mujeres_Libres

333 Superbe deklamita en la dokumenta filmo *Durruti en la Revolución española* (hispane, Durruti en la hispana Revolucio), de Abel Paz kaj Paco Ríos, videaĵo de la Fondaĵo Anselmo Lorenzo, Madrido, 1998, kaj tute reproduktita je la fino de la libro.

# 6. Barcelono

La 23-an de novembro Franco ordonis ĉesi la atako al la ĉefurbo, per kio la anarkiista burokrataro povis prezenti Durruti-on, kiel savinton de Madrido. Tial la intereso kaŝi la detalojn, kiuj povis senkreditigi la figuron de la mortinto, kiel ekzemple la sinteno de la volontarmeanoj de la kolono en la ĉefurbo, kiuj senkuraĝigitaj rifuzis batali kaj estis enkazernigitaj pro timo, ke ili realigis protestagadojn sur la madridaj stratoj kaj estigis tumultojn. En la kazerno, ili rifuzis manĝi ĝis kiam aperis Ricardo Sanz. Laŭ li poste rakontis, devis veni García Oliver kaj Federica de Valencio kaj patroni lin antaŭ la volontarmeanoj; tamen, ĉi tiuj tute ignoris lin. Ili estis konvinkitaj, ke Durruti estis mortigita de la komunistoj kaj ne volis resti en la ĉefurbo. Sanz ne plibonigis la situacion, kiam ilin urĝis militistigi[334]. Tamen, Federica Montseny, tiel fidela al la vero, kiel povus esti la ĉefrolulino de la burokrataro, senhonte asertis:

> *Ne estas suspektemoj, ne povas nek devas esti [...] La animo de la popolo montriĝas tre alta, kvankam la morto de nia heroo povis produkti certan klarigeblan senkuraĝiĝon. Ne ekzistas la plej minimuma malfido kaj la kontraŭfaŝisma interligo estas pli forta ol neniam[335].*

Malgraŭ sciante, ke kiuj jam sufiĉe aĝis ankaŭ estus mobilizotaj, la malkontenta plimulto el volontarmeanoj forlasis la kolonon kaj foriris al Barcelono, kie ili klopodis okazigi asembleon por klarigi, kion ili pensis pri la morto de tiu granda proleta luktanto. La aktoj de la kunvenoj de la 25-

---

334 Alfons Martorell Gavaldà, *Memorias de un libertario* (hispane, Memoraĵoj de liberecano), Fondaĵo Anselmo Lorenzo, Madrido, 2003. Martorell apartenis al la centopo Floreal de la Liberecanaj Junularoj de Reus, kiu luktis en Madrido kaj malfondiĝis post la morto de Durruti.

335 «De Madrido, Federica Montseny al ni parolas pri la morto de Durruti kaj la venka heroaĵo, kiun travivas la madrida popolo», *Acracia*, 22-an de novembro 1936.

a de novembro kaj la 2-a de decembro, en la Domo NKL-IAF, de la komitatoj de la Organizo estas plenplenaj de insultoj dediĉitaj al tiuj batalantoj ĝis antaŭ nelonge ege gloritaj, kiel liberigantoj: perfiduloj, maldezirinduloj, malkuraĝuloj, armefuĝintoj, ktp., proponante severajn disponojn, kiel elpeli ilin, redoni ilin al Madrido, enmeti ilin en pundisciplinajn rotojn, enmeti ilin en unuan frontlinion kun maŝinpafilo ĉe ilia dorso, ktp[336]. Nenion el ĉi tio oni faris, eble ĉar estis pli grava ĵeti teron sur la aferon pri la morto de Durruti ol ĵeti ĝin sur la ĉerkon, kiu enhavis lian kadavron. Pierre Besnard, fidela al tio, kion reprezentis lia figuro, estis, kiu plej bone klarigis la grandon de lia perdo:

> *Durruti ne nur estis, por ĉiuj ni, la venkinto de la faŝismo en Barcelono, la admirinda organizinto de la militfronto de Aragono, la animo de la rezisto al la faŝismo en la militfronto. Li ankaŭ reprezentis pro sia forta personeco, sia klara spirito, unu el la sekuraj fortoj de la revolucio en Hispanujo; la firma garantio, ke la nuntempa movado marŝus spite de la sortoŝanĝoj al la celoj, kiujn oni al ĝi asignis. Ĉi tio sciis la internacian movadon kaj kalkulis kun li por ke la grandega verko de la liberigo de la hispana proletaro sukcese plenumiĝu[337].*

La impreso kaŭzita de la morto de Durruti ankaŭ efikis en la parto de la kolono, kiu restis en Aragono. Ekzemple, la garnizono de la supro de Monte Oscuro havis kunvenon de centopo por legi «komunikaĵon, kiu devenis de la stabo, kiu estis tre konciza kaj diris: nia kolego Durruti estis mortigita de la komunistoj en Madrido»[338]. Kompreneble ne estis oficiala komunikaĵo, sed estas signifa, ke ĝi libere cirkulis tra la kolono. La suspekto aŭ la konvinko, ke Durruti estis

---

336 En la Arkivoj de NKL, IISH, Amsterdamo.

337 *Le Combat Syndicaliste*, organo de la CGT-SR (NeT: Ĝenerala Konfederacio de la Laboro-Sindikatista Revolucia), Parizo, 27-an de novembro 1936 *De l'espoir à la désillusion. La CGT-SR et la Révolution espagnole* (france, De la espero al la disreviĝo. CGT-SR kaj la hispana Revolucio), Éditions CNT-Région Parisienne, 2000.

338 Ramos, citita verko.

mortigita de la komunistoj estis ĝenerala inter la volontarmeanoj; en la grupo loĝigita en La Ermita, je malmultaj kilometroj de Pina direkte al Bujaraloz, svisa komunisto, Edi Gmür, laca disputi kun siaj anarkiistaj kunuloj, notis en sia taglibro:

> *18-an de januaro [...] Vespere, mi demandis Henrique-on ĉu veris, ke Durruti estis mortigita de la niaj. «Certe. Estas la komunistoj, kiuj lin mortigis», li respondis min. Li elpoŝigis fotografaĵon de Durruti morta. Oni klare vidis en la nuda torso la truon de la kuglo, rekte al la koro. Mi tre senkuraĝiĝis. «Politiko!», ekkriis Henrique[339].*

Manzana, alveninta al Bujaraloz por malfondi la Komitaton por la Milito kaj militistigi la kolonon, informis al la komitatoj, ke la morto de la plej admirita kolego kaŭzis, ke «manifestis la deziron reveni al Barcelono kaj malaliĝi el la kolono ĉirkaŭ mil kolegoj, inter kiuj estis homoj de reala sindikata valoro»[340].

Durruti mortis la mateniĝon de la vendredo 20-an de novembro. La kadavro estis enbalzamigita kaj translokita de la malsanulejo al la malnova sidejo de la Nacia Komitato de NKL fare de Manzana, Luque (de la Regiona Komitato), José López, Ariel (de la ĵurnalo CNT) kaj kelkaj intimuloj de Durruti. La volontarmeanoj de lia kolono paradis antaŭ li kaj gardis lin ĝis la momento de lia foriro. La ĉerko, kovrita per ruĝa-nigra flago, ekveturis je la kvara matene per fermita kamioneto akompanita de pli ol cento da veturiloj, al kiuj

339 Albert Minnig, *Pour le bien de la révolution. Deux volontaires suisses miliciens en Espagne* (france, Por la bono de la revolucio. Du svisaj volontarmeanoj en Hispanujo), Edi Gmür (ed.), CIRA, Lausanne, 2006.

340 «Informo pri la Kolono Durruti fare de ĝia respondeculo Manzana. Pina, Januaro 1937», Arkivoj de NKL, IISH, Amsterdamo. Finfine, nur foriris sescent kaj ilian foreston kovris bataliono de Kataluna Ŝtato. Kiam Manzana komencis militistigi la kolonon foriris aliaj mil, kiuj fondis en Barcelono la grupigon Los Amigos de Durruti. Isidoro Velasco, membro de la 43a centopo, kiu iris al Madrido, konsistigita en ĝia plimulto de loĝantoj de Binéfar, rakontas, ke la efektoj de la militistigo «estis gravaj ĉar estis multaj kolegoj, kiuj forlasis la Kolonon. El mia centopo nur restas proksimume la duono». Skribita atesto en Tarbes, Francujo, datita en oktobro 2004.

kuniĝadis, kiuj devenis de Valencio. Ĝi estis gardita de Manzana, García Oliver kaj iuj volontarmeanoj proksimaj al Durruti. Je la 11a horo ĝi trairis Utiel-on kaj malrapidiĝis ĉar la laboristoj kaj kamparanoj de la trairataj vilaĝoj amasiĝis ĉe la ŝoseo. Je la 14a horo la karavano alvenis al Mislata, en la ĉirkaŭaĵoj de Valencio, kie atendis multnombraj komisionoj por kuniĝi al la karavano, kune kun la konfederaciaj ministroj Juan López kaj Juan Peiró, la civila guberniestro, la delegito de la sovetia Ambasado kaj pluraj reprezentantoj de volontarmeoj. La impreso kaŭzita en Valencio estis forta, ĉar la homoj, kredante, ke la kadavro trajne veturis, frue matene okupis la stratojn ĉirkaŭ la stacidomo neebligante la trafikon en la urbocentro. Impona silenta homamaso rigardis la paradon sur la stratoj Blanquería kaj Pintor López, Torres de Serranos, placo de Tetuán, Glorieta, strato de la Paz (kie estis la sidejoj de IAF kaj de la Liberecenaj Junularoj), Avenuo Blasco Ibáñez kaj placo Emilio Castelar, fronte al la Banko Vitalicio, kie estis instalitaj la nova Nacia Komitato (kun Mariano R. Vázquez ĉekape), la Regiona Komitato de NKL kaj la Urba Federacio de Sindikatoj. Tie, la sekvantaro haltis momenton kaj estis lokitaj multnombraj bukedoj kaj kronoj el floroj. La laboristoj silente elmontris siajn porteblajn afiŝojn de honorigo laŭlonge de la akompanantaro, kiu daŭrigis tra la stratoj Játiva kaj Guillén de Castro al la Camino de Tránsitos, kie kruciĝas kun la ŝoseo al Barcelono. Je la krepusko, la trinkejoj, kafejoj, kazinoj kaj publikaj spektakloj fermis pro funebro. La komercistaro same agos sekvatage matene. En Sagunto, Villarreal kaj Castellón fermis fabrikojn kaj komercejojn; la homamaso, kun la koro malĝoja, kunpuŝiĝis pro la paso de la aŭtoj kaj ĵetis bukedojn el floroj. En ĉi tiu lasta urbo, la partioj, sindikatoj kaj volontarmeoj paradis kun siaj porteblaj afiŝoj por donaci florajn kronojn kaj triangulojn

al la granda luktanto falinta. La silento nur estis rompita kiam de iu balkono iu gravulo elparolis honorigvortojn.

La sekvantaro nokte alvenis al Taragono kaj prokrastiĝante en la trairitaj vilaĝoj, alvenis al Barcelono je la unua kaj duono de la mateniĝo de la 22-a. La ĉerko restis en la teretaĝo de la Domo NKL-IAF de Vía Layetana, poste Vía Durruti, aranĝita, kiel funebra ĉambro. Liberto Callejas klarigis:

> *La vundo de kuglo, kiu al li traboris la koron lasis en lia vizaĝo majestan serenecon. Mi lin vidis en lia ĉerko de morto, glata la mentono, la frunto pura kaj la buŝo faldita, sen dolora grimaco.*[341]

Je la deka kaj kvara eliris la ĉerko eskortita de la patroloj pri kontrolo kaj la volontarmeanoj de la kolono, antaŭiĝintaj de taĉmento de urbaj motorciklistoj kaj skadro de kavalerio, dum ĉirkaŭ duona miliono da personoj okupis la stratojn de Barcelono.

En la kaploko estis komisionoj de NKL kaj IAF, de la Konsilantaro de Aragono, de la Komitato por Defendo de Madrido, kaj de ĉiuj partioj kaj kontraŭfaŝismaj organizoj. García Oliver reprezentis la Registaron; Manzana, la kolonon; la konsulo Antonov, Sovetion. Malantaŭe Companys kaj la konsilistoj Tarradellas, Fábregas, kaj Comorera!, la prezidanto de la kataluna Parlamento kaj la ministro Ayguadé. Malantaŭ ili, la Muzikistaro de la Volontarmeoj kaj amaso da laboristoj, portante porteblajn afiŝojn de sindikatoj kaj partioj. La sekvantaro iris de Vía Layetana al la placo Urquinaona, sekvante sur ronda de San Pedro, placo de Catalunya, Ramblas kaj monumento al Kolumbo, ĉe ĝi la kadavro estis enmetita en funebran aŭton, kiu ĝin portis al la Nova Tombejo (de Montjuich). Preskaŭ ĉe la fino de Ramblas, la sekvantaro devojiĝis al la placo de la

341 «Ascaso-Durruti», *Solidaridad Obrera*, 19-an de julio 1947, Meksiklando.

Sankta Madrona, kie falis Francisco Ascaso, kiel memorigis platon. Skadro de aviadiloj superflugis la vojon. La enterigo estis granda proleta manifestacio de doloro, finita de punkto de komedio en la oficiala kaploko. Mary Low, kiu ĉeestis kune kun ŝia parulo Breá, la deputito John McNair, Jordi Arquer kaj aliaj membroj de LPMU, ekridegis vidante pasi la porteblan afiŝon de RMK kun la surskribo «Al nia kara frato Durruti»:

> *Arquer diris: «Karan fraton, ili diras!». Respublika Maldekstro havas sorton esti en lia funebro kaj ne en alia parto. Se li estus vivanta, mem ilin respondus per maŝinpafilo[342].*

Unu el la miloj da ĉeestantoj al tiuj «funebroj de la Utopio», okazigitaj en Barcelono per tuta soleneco, konvinkiĝis, ke

> *... tiu multnombra manifestacio fermis, per la tomboŝtono de la homamaso, la periodon de la revolucia pasio. Poste, la oficialaj aŭtoj de la funkciuloj de la nova laborista burokrataro ŝoviĝis sur la stratoj de la respublika postmilitfronto pli ofende sekuraj. La Liberecana Revolucio mortis samtempe, ke Buenaventura Durruti[343].*

Tio surprize tute similas unu el la unuaj libroj, kiuj aperis en la mondo pri la hispana milito, skribita «ĉe la kanonpiedo» de pola talenta ĵurnalisto, sen iu rilato kun la anarkiismo:

> *Ni ne sufiĉe pripensis ĉi tiun morton malgraŭ ke la anarkiistoj faris malĝojegajn konjektojn, malgraŭ ke la marksismo sukcesis pro ĉi tiu «stranga hazardo» atingi grandan triumfon, ĉar ĝi perdis la plej danĝeran el siaj rivaloj. Oni nun povis laŭdi*

---

342 Mary Low, *Cuaderno rojo de Barcelona. Agosto-diciembre 1936* (hispane, Ruĝa kajero de Barcelono. Aŭgusto-Decembron 1936), Alikornio Ediciones Barcelono, 2001. La originalo, Red Spanish Notebook, publikiĝis en Londono en 1937.

343 Llarch, citita verko. Por Arturo Parera, volontarmeano de la Kolono Ortiz, «fakte la respublika Registaro kion volis estis eltiri Durruti-on el Aragono por povi neniigi ĉiujn kolektivigojn, sed ni tion komprenis tro malfrue. Ili portis lin al Madrido kun du mil homoj kaj tie trovis okazon mortigi lin». Komuniko al Alba Escalón en 2003, havigita de *Les Giménologues*.

*Durruti-on, ĉar li jam ne estas viva. Pri lia morto oni povas fari konjektojn, ĉar ĝi okazis post stranga koincido de cirkonstancoj, sed estas nediskutebla, ke ĝi estis utila por ke la posta fluo de la hispana revolucio daŭrigu sur sola vojo*[344].

Estis la momento de la ripetaj, kliŝaj, vakaj, celantaj paroladoj. Jaime Rosquillas Magriñá parolis «pri la granda perdo» nome de NKL kaj «dankis al la barcelona popolo la funebrojn, kiujn ĝi tributis al kiu ĉion transdonis por la afero de la proletaro». Antonov-Ovseenko parolis en la kataluna «kun la premata animo» indikante la vojon al la ceteraj: «La nomo de Durruti estas ligita al la kreo de kontraŭfaŝisma fronto kaj konscia disciplino en la militfronto kaj en la postmilitfronto». García Oliver, kiu intervenis per la patoso, kiun la okazo postulis, «elverŝante la larmojn», parolis pri la «politika testamento de Durruti», kiu ŝajne konsistis senlace tage kaj nokte labori en la postmilitfronto, per disciplino, ofero, abnegacio kaj unueco en la kontraŭfaŝisma fronto, vortoj per kiuj la gvidantoj maskas siajn dezirojn esti obeataj sen kontestado. Krome, li kuraĝis sendi «sinceran, emocian saluton al ĉiuj frataj popoloj, kaj ĉefe al la popolo de Rusujo, kiu al ni donas sian gravan kunlaboradon por la atingo de la venko». Sen komentoj. La finon faris Companys, «profunde emociita», petante, kiel ĉiuj, unuecon, disciplinon, sobrecon kaj kuraĝon[345]. Post ses monatoj, Alaiz faris la sekvan komenton:

*Kiam jam ne povis esti ĉi tiu [Durruti] viva opozicio en la tragika Hispanujo duonsensangigita de la faŝismo, la ŝtato kaj ties dependantaj institucioj al li faris ĉiujn honorojn, eble ĉar li jam ne reĝenos*[346].

---

344 Ksawery Pruszynski, *En la España roja* (hispane, En la ruĝa Hispanujo), Alba editorial, Barcelono, 2007. La libro estis eldonita en Pollando komence 1937 kaj malpermesita de la germanfaŝista cenzuro en 1939 kaj ankaŭ de la komunista post la fino de la milito.

345 *Solidaridad Obrera*, 24-an de novembro 1936.

346 Alaiz, citita verko. Paĝo reproduktita en *Acracia*, 19-an de julio 1937.

Kaj li estis la unua indiki la realan signifon de la ceremonio:

*Ke neniu kredu, ke li plenumis sian devon ĉeestante al la enterigo [...] La popolo amase akompanis la kadavron per multa pli da sindediĉo ol akompanis la batalantan Durruti-on. Kaj ĉi tio estas dolora, intense tragika. Per la ĉeesto al enterigo de kvarona miliono da amikoj de Durruti pleniĝas la arkivojn de fotografaĵoj, nenio plia*[347]*.*

Pro hazardo de historia ironio, en alia tre malsama tribuno, García Oliver eldiris la solan memorindan paroladon:

*Durruti, kiel bona gerilano kaj homo de respondeco, donis ekzemplon al siaj volontarmeanoj lokiĝante en la unua paflinio. Kolumnestro ne havas neceson iri kun la skoltaro por direkti la operaciojn.*

*Sed Durruti ne estis teoriisto pri la milito sed agadhomo, kiu animis siajn homojn kaj gajnis al si la simpatiojn kaj la fidon de la batalantoj irante al la lokoj de plej granda danĝero.*

*Tial al ni kaŭzis ne surprizon lia morto, kvankam la koro velkis pro doloro sciinte la kompatvekan realon.*

*La milito kaj la revolucio perdis per Durruti unu el iliaj plej bonaj homoj. Senriproĉa anarkiisto, certa pri liaj ideoj, pli vigla ol konformista, Durruti al si gajnis la volon de ĉiuj liberecanaj homoj kaj estis la mastro de la koro de la homamasoj, ĉar la popolo ĉiam amas la heroojn kaj la aktivulojn de virtoplena konduto.*

*Durruti havas komparon kun nenia anarkiisto. Estis spegulo kaj ne spegulbildo. Oni lin povas intelekte kompari nek kun Anselmo Lorenzo, nek Mella, nek Farga Pellicer. Li estis ne intelektulo, sed proleto. Inter la agadhomoj oni lin povas kompari ne kun la individualistoj laŭ la maniero de Angiolillo. Li eble havas similecon kun Néstor Makhno, la heroo de la rusa revolucio de Ukrainujo. Kiel Makhno, Durruti estis individueco perdita inter la homamaso. Li estis homo de fabriko, de*

347 En la sama verko.

*manlaborejo, de sindikato, de malliberejo. Filo de la laboro. En Leono, en Katalunujo, en Francujo, en Bruselo, en Berlino, en ĉiuj amerikaj respublikoj, ĉiam luktis kun la laboristoj. Pere de la organizita perforto kaj la respondeca agado de la homamasoj, li volis atingi la emancipiĝon de la malriĉaj amasoj. Lia influo en NKL kaj IAF havis resonojn de tutlanda karaktero. Kun García Oliver, Francisco Ascaso, Aurelio Fernández kaj aliaj valoraj aktivuloj de la anarkiismo, li reprezentis la ekstreman maldekstran tendencon ene de la hispana revolucia movado.*

*Buenaventura Durruti estis la homo de la milito kaj la revolucio. Li malofte eraris dum sia vivo. Homo de senlima sperto, vaganto kaj revoluciulo, persekutita de la ĉiulandaj registaroj, li agadis kaj samtempe meditis. La iniciatoj aperis en lia cerbo per la rapideco de la fulmo.*

*Kiam li parolis al la homamasoj al li eliĝis la koro tra la buŝo. Lia fizika aspekto estis kruda, forta, kiel skulptita en bronzo. Sed sentimentala, kiel virino aŭ knabo.*

*La milito, la revolucio kaj la anarkiismo perdis per Durruti ĉion, kion li de mortema havis: lian korpon. Sed al la milito, al la revolucio kaj al la anarkiismo restas ĉio, kion Durruti havis de flago, simbolo kaj ekzemplo.*

*Sano al Durruti!*

*Lia memoro eterne vivos en la koro de la homamasoj, kiel potencega lampo, kiu lumigas la vojon sur kiu devas marŝi la proletaro en sia lukto por la libero, la kulturo kaj la socia justeco, la grandaj idealoj de la kamarado, kiun ni ĵus perdis kaj pro kiu ni ankoraŭ ploras*[348]*.*

Durruti-on mortigis liaj kolegoj; mortigis lin, kiam koruptis liajn ideojn. De la postvivantoj de la grupo Nosotros, nur ‘el Valencia’ kontraŭis la militistigon kaj forlasis la Kolonon Los Aguiluchos kaj la militfronton[349]. Al Durruti oni atribuis opiniojn, kiuj «hazarde» tute similis la

348 Mira, citita verko.

349 Tamen, fine de 1937 li estis politika komisaro en la Diviziona Kompanio de Trajno, vidu *Tierra y Libertad*, 6-an de novembro 1937.

oficialan kunlaboreman sintenon de la liberecana movado, kaj lia nomo estis utila, kiel enirpunkto por enkonduki ajnan tipon de forcedo. Kiel minimume, la morto de Durruti faciligis la militistigon de la kolonoj. Federica Montseny estis, kiu plej luktis por la nuligo de la volontarmea demokratio favore de armeo el aŭtomatoj direktita de militistoj kontrolitaj de la laboristaj burokrataroj:

> *La problemo estas limigita al ĉi tiuj du aspektoj: akcepti militistan forton organizitan, harmonie ligitan, kun komando kaj disciplino, ke oni akceptu la direkton de tiuj homoj nur por la militista aspekto kaj ni tiel faros la militon, kiel oni faras la militojn.*
>
> *La alia aspekto estas la plej komplika, ĉar ĉiuj ni finfine rekonis, ke la unuiĝo de komando nepras, pro la manko de kunagado en la operacioj, de la movebleco de niaj fortoj, ĉar kiam premis la malamiko ni forlasis la poziciojn. La individua iniciato en la milito nur al ni portis katastrofojn. La neceso de komando, la neceso strukturi militistan armeon per teknikaj militistoj de absoluta fido kaj per la rekta kontrolo de la laboristaj organizoj estas tio, kion ĉiuj jam rekonis*[350]*.*

Federica fidele reproduktis la paroladon de la komunistoj, identa kun la parolado de la Nacia Komitato, kaj, kiel ili, kiam ŝi parolis pri disciplino, ne parolis pri la lojaleco de klaso, sed ŝi aludis la ununuran disciplinon, kiun konas la burokratoj, la kazernan. Ankaŭ la Nacia Komitato mem rekte profitis la morton de la heroo por alvoki la militistigon, «la plej bona honorigo, kiun al Durruti ni povas doni»:

> *Ni devas venki la militon, kontraŭfaŝistaj kolegoj ĉiuj; por tio nenio pli bona ol imiti la ekzemplon de la falinta frato kaj akcepti la ununuran komandon kaj la bezonan disciplinon*[351]*.*

---

350 Parolado reproduktita en *Fragua Social*, 1-an de decembro 1936.

351 Deklaro de la Nacia Komitato de la Nacia Konfederacio de la Laboro, *Fragua Social*, 24-an de novembro 1936.

Iuj el kiuj akompanis Durruti-on, kiel Mira, Yoldi, Rionda, Flores Roda aŭ Ros lasis sin konvinki, eble ĉar la praktika malfondo de la kolono en Madrido ilin elrevigis pri la volontarmeoj. Pli klare: la 21-an de novembro, la kataluna registaro kreis per dekreto la «Armeon de Katalunujo», per la konsento de la konsilistoj de NKL kaj IAF kaj, ĝenerale, de la tuta liberecana gvidantaro. La *Soli*, en manoj de Toryho, reflektis tiun ĝeneralan rezignon de la liberecanaj gvidantoj konsideri la militon kontraŭ la faŝismo, kiel lukton de klasoj, proponante ŝovinismajn titolojn: «LA HISPANA ENLANDA LUKTO IĜIS MILITO DE NACIA SENDEPENDECO»[352]. La Centra Komitato de la Komunista Partio en sia alvoko de la 18-a de aŭgusto ne diris aliaĵon:

> *... la milito, kiu en la unua momento povis havi la karakteron de lukto inter la militista premgrupo kaj la nialandaj reakciaj kastoj, unuflanke, kaj kiuj deziras vidi progreseman kaj demokratian Hispanujon, aliflanke, rapide superis tiun kadron kaj iĝis milito de la sendependeco.*[353]

José Díaz, sekretario de KPH, levis la instrukcion al fundamenta politika faktoro en politika amaskunveno la 2-an de februaro 1937:

> *La originala karaktero de nia lukto: ne estas enlanda milito, sed nacia milito, direktita de nacia registaro. Tio grava hodiaŭ estas venki la militon! Kaj morgaŭ, venki la militon, la popolo mem solvos la demandon de la politika reĝimo. Por la sendependeco de Hispanujo!*[354]

---

352 *Solidaridad Obrera*, 21-an de novembro 1936.

353 Citaĵoj de Stoyán Mínev Stepánov, kromnome Moreno, delegito en Hispanujo de la Kominterno, en sia informo *Las causas de la derrota de la República española* (hispane, La kaŭzoj de la malvenko de la hispana Respubliko), skribita en aprilo 1939 kaj eldonita de Miraguano, Madrido, 2003. Alia delegito insistis pri tio sama: «La revolucio en Hispanujo, kiu estas kompleta parto de la tutmonda kontraŭfaŝisma lukto, estas revolucio kun tre ampleksaj sociaj bazoj. Estas revolucio de la popolo. Estas nacia revolucio. Estas kontraŭfaŝisma revolucio [...] La hispana popolo estas solvanta la taskojn de la burĝa demokratia revolucio», en M. Ercoli (Palmiro Togliatti), *The Spanish Revolution* (angle, La Hispana Revolucio), Nov-Jorko, 1936.

354 Stépanov, citita verko.

De post majo 1937, la formulo de Díaz, «la popolo solvos», ĝeneraliĝis inter la liberecanaj amasoj iĝante oficiala. La plej grava ofendo estis farita de la suspektinda Fernand Fortin, polemika membro de la «franca Sekcio» de NKL, kiu, kiel kapitulaco, elirigis el la buŝo de la forpasinta Durruti la sekvajn vortojn: «Nuntempe mi ne faras la revolucion: faras la militon. La faŝistoj ĉirkaŭas Madridon kaj se ni baldaŭ ne reagas venos Franco bombardi vin». Estis la unua fojo, ke la kadavro de Durruti tute klare rezignis la socian revolucion. Kiel diris la telegramo de kondolenco de la komunista Kolono Galán: «Lia morto devas kunigi ĉiujn nin laŭ pli forta maniero. Ĉi tiu estos la plej bona maniero honori lian memoron»[355]. Kaj, efektive, neniu povos nei, ke la morto de Durruti ege alproksimigis la gvidantan burokrataron de NKL kaj IAF al la stalinismo samtempe, ke ĝi malproksimiĝis de la Revolucio. Ili tiel honoris lian memoron.

Cipriano Mera rakontas en siaj memoraĵoj, ke tiam li vojaĝis en Valencion kun Eduardo Val kaj Mariano Valle, ambaŭ el la Konsilantaro pri Defendo de la Centro, por trakti kun la Nacia Komitato kaj la ministroj la kunordigon de la konfederaciaj volontarmeoj kaj postuli pli bonan reprezenton en la direkto de la milito. Kiam al Mera venis en la kapon proponi 'García Oliver'-on, kiel posteulon de Durruti ĉekape de ties kolono, troviĝis kun la obstina rezisto de la Nacia Komitato kaj de García Oliver mem, kiu kroĉiĝante al la posteno pretekstis la abundon de kandidatoj por okupi la funkciojn de la mortinto. La disputado estis malmola. Fine, laŭ vortoj de Mera,

> *... Ni finis elirante el la kunveno, forirante kun tre malbona humuro konstatante, ke en la oficialaj medioj de Valencio eĉ ne niaj kolegoj vivis laŭ la ritmo de la milito. Ĉiuj klopodis*

355 Skribaĵo de Fortin kaj telegramo de Galán en la memoriga broŝuro «Buenaventura Durruti», NKL-IAF, Oficejo pri Propagando, sen dato.

*pasigi ĝin, kiel eble plej bone; iris al la oficejoj je la deka matene, kaj poste plenigis la trinkejojn kaj la restoraciojn, kie mankis nenio*[356]*.*

Post la morto de Durruti, García Oliver proklamis, samkiel faradis la komunistoj, la superecon de la milito super la socialigo de la industrioj kaj teroj, invitante la sindikatojn meti sin je la servo de la ŝtato: «Necesas granda disciplino, ne komprenita laŭ arĥaika senco, sed emanita de Registaro, kiu reprezentas la tutan laboristan klason»[357]. Li ankaŭ diris maloportunan frazon dum la parolado de malfermo de la juĝa jaro:

*Kiam la revolucia Rusujo, tiu Rusujo de malliberejoj, leviĝis kontraŭ la inerteco de caro, de cara familio, de kvanto da ebriaj ortodoksaj pastroj kaj episkopoj, kaj de generaloj ankaŭ plenaj de voluptamo kaj malŝato, ni vidis, kiel sur la scenejo de la rekonstruo aperas la figuroj, de kiuj? De la grandaj rusaj malliberuloj: de Lenino, Stalino, ĉiuj tiuj finfine [al kiuj] antaŭis la gigantoj de la Revolucio, kiuj ankaŭ estis uloj de malliberejo, kiel Bakunin kaj Kropotkin*[358]*.*

La priskribo intence allasas paralelismojn inter klerikala Hispanujo kaj cara Rusujo, kaj inter malliberuloj, kiel li mem kaj Stalino, tiu «ĉampiono». Pli naŭze ne eblis. Dume, Marianet subskribis manifeston kun José Díaz kaj Federica Montseny ne hezitis laŭdi la rusajn «liberojn» —«En Rusujo jam ekzistas Konstitucio»—, ĝian «federaciismon», la spiriton de sinofero kaj ĝiajn ekonomiajn atingojn, en politika amaskunveno, kiu starigis doktrinon[359]. En alia parto, ŝi publikigis la laŭdon al Stalino, kiu tiom skandalis Berneri-

356 Mera, citita verko.

357 Parolado en la Teatro Apolo de Valencio, *La Noche*, 5-an de decembro 1936.

358 *Solidaridad Obrera*, 1-an de januaro 1937.

359 La parolado de la politika amaskunveno en la kinejo Coliseum de Barcelono aperas en *Solidaridad Obrera*, n-roj de la 5-a, 6-a kaj 7-a de januaro 1937.

on[360], sed la kritiko de ĉi tiu ne ŝin haltigis; Federica eĉ komparis Leninon kun Jesuo kaj Stalinon kun Sankta Paŭlo:

> *Ne estis la idealisto, kiu konstruis la doktrinon kaj organizis la forton, kiu devis trudi ĝin, sed la praktikulo. Kaj en Rusujo ne estis Lenino, kuniganto de diversaj fortoj, interpretanto kaj resumanto de du doktrinoj, ne estis Lenino la reala rekonstruinto de Rusujo kaj kiu bone aŭ malbone strukturis novan socian sistemon: estis Stalino, realiganta kaj praktika spirito, multe malpli genia sed multe pli persistema kaj dotita de organiza kapablo[361].*

Ĝenerale, la konfederacia kaj anarkiista gazetaro dankadis la «malavaran apogon» de Rusujo kaj ne hezitis aserti, ke tio estis pro «nia ĝenerala revolucia gesto»[362]. Tiu gesto simple konsistis rezigni la liberecanan komunismon kaj promocii la ŝtatigon de la ekonomio. Federica, kiu jam posedis klaran vidadon pri la problemo «sen danĝeraj idealismoj», vidis en federacia respubliko «la savontan formulon, kiu morgaŭ certigos la daŭrigon de ĉi tiu kunvivado atingante harmonie starigi la novan politikan kaj socian ordon». Ĉi tiu reveno al Pi y Margall*, t. e., al la programo de la radikala burĝaro de la 19a jarcento, kompletiĝis per speco de sindikatista kapitalismo de ŝtato:

> *La anarkiistoj konsideras, ke ne povos rekonstrui sin Hispanujo se antaŭe ĉiuj ne rekonas la centralizon de la industrioj en manoj de direktantaro, en kiu same kunlaboros la sindikatoj kaj la kontraŭfaŝisma Registaro leĝe establita[363].*

---

360 Camillo Berneri, «Malfermita letero al Federica Montseny», *Guerra di classe*, n-ro 12, 14-an de aprilo 1937.

361 Federica Montseny, «La superado de la anarkiista movado», *Fragua Social*, 14-an de februaro 1937.

362 *Fragua Social*, 8-an de novembro 1936.

* NeT: Hispana politikisto, prezidinto de la Unua hispana Respubliko. Vidu: https://eo.wikipedia.org/wiki/Francisco_Pi_y_Margall

363 Deklaroj al la gazetaro en Valencio, *Bandera Roja*, proparolanto de HLSP de Alakanto, 21-an de januaro 1937. En politika amaskunveno okazigita en Elda, Federica ripetis la federacian formulon kaj la komunistan instrukcion pri respekto al la propruloj: «Mi deklaras bezona kaj konvena la kunlaboradon de la etburĝoj».

Ĉiuj kapitulacoj alproksimigis la politikan stalinistan lingvaĵon al la dialekto de la liberecanaj gvidantoj, kio estis kaŭzo de fortaj kontraŭdiroj, kiuj konfuzis la sindikatojn kaj la volontarmeojn, kaj devigis la «respondecajn kamaradojn» distordi la lingvaĵon por disigi la revolucion de la milito. Oni devis konvinki tiujn, kiuj ankoraŭ kredis je la revolucio, ke la kontraŭrevoluciaj disponoj malfermis la vojon al ĝi, ĉar per ili oni venkus la faŝismon. La organo de LPMU, *La Batalla*, interrompis la antaŭnuptan feston inter NKL kaj KPH, kiam malkovris, ke la helpo de Stalino devenis de simplaj kalkuloj pri ekstera politiko fremdaj al la defendo de la hispana revolucio:

> *... kio reale interesas Stalinon ne estas la sorto de la hispana kaj internacia proletaro sed la defendo de la sovetia registaro laŭ la politiko de interkonsentoj starigitaj de iuj ŝtatoj fronte al aliaj ŝtatoj[364].*

Tiu artikolo kaŭzis la rektan intervenon de Antonov-Ovseenko antaŭ la kataluna registaro, kialo de la eksigo de Andrés Nin la 17-an de decembro, kun la aprobo de NKL. Poste estis la vico de Berneri, kiu memorigis komunistan averton eldonita en *Le Populaire*, ĵurnalo de la Franca Sekcio de la Laborista Internacio: se la faŝismo estus venkita, la socialista-komunista bloko kontraŭstarus la realigon de la socia programo de NKL. La Plenuma Komitato de KPH ĵus deklaris, ke la nuntempa lukto protektis la privatan propraĵon kaj la parlamentan demokration, sekve:

> *Flaras en la medio certa odoro al Noske[*]. Se Madrido ne estis flamanta ni denove estos devigataj memori Kronstadt-on. Sed la politiko de Madrido estas triumfota. Ĉu ĝi ne malakceptis armi kaj financi la revolucian Katalunujon kaj metis sin en*

---

*Bandera Roja*, 27-an de januaro 1937.

364 *La Batalla*, 15-an de novembro 1936.

* NeT: germana socialdemokrata politikisto, ministro pri Defendo de Germanujo inter 1919 kaj 1920, kiu ordonis la mortigon de elstaraj anarkiistaj aktivuloj de Bavarujo.

*manojn de Sovetio, kiu havigis armilojn kaj kadrulojn destinitaj mallarĝe estri la kontraŭfaŝisman lukton kaj bremsi la disvolviĝon de la socia revolucio en ties armita lukto kontraŭ la fortoj de la faŝismo? [...] Retenita inter la prusoj kaj la versailles-anoj la Komunumo inspiras brulegon, kiu ankoraŭ lumigas la mondon. Inter Burgoso kaj Madrido estas Barcelono. Ke la Goded-oj*[**] *de Moskvo ĝin pensu!*[365]

Bedaŭrinde, Berneri estis preskaŭ nekonata de la proletaj katalunaj amasoj kaj tro konata de la sovetiaj agentoj. Tutcerte la artikolo vekis la intereson de la krudaj agentoj de KPIA, kiuj lin mortigis en majo. Antonov-Ovseenko, sincere ĉagrenita, protestis antaŭ la Regiona Komitato de NKL kaj demandis ilin ĉu ili konsentis. Ni povas imagi la respondon. La Regiona Komitato ne deziris maltrankviligi la rusojn kaj fermis la okulojn antaŭ la evidenteco sed LPMU ankoraŭ klopodis malfermi ilin al ĝi publikigante en *La Batalla* novaĵon el la ĵurnalo Universala Gráfico de Meksiklando, kiu atribuis al *Pravda* la sekvajn celojn: «Rilate al Katalunujo, oni komencis la purigon de trockiistaj kaj anarkiistaj individuoj, verko, kiu plenumiĝos per la sama energio, ke plenumiĝis en Sovetio»[366]. La informo estis falsa ĉar la sovetianoj tiam klopodis gajni sin al la anarkiistaj gvidantoj; la konsulejo rapidiĝis malkonfirmi ĝin per la sekva noto: «En la sovetia gazetaro ne estas nek povas esti loko por iu atako kontraŭ la frata movado de la laboristoj de Hispanujo aliĝintaj al NKL»[367]. Efektive, en intervjuo publikigita la 22-an de decembro de *Manchester Guardian*, Antonov-Ovseenko nur havis laŭdajn vortojn por la liberecanoj, ĉefe por iliaj reprezentantoj, «speciale pretaj

** NeT: ribela ĉefgeneralo de la Balearaj Insuloj.

365 «La Milito kaj la Revolucio», *Guerra di Classe*, n-ro 6, 16-an de decembro 1936.

366 «Averto-atentigo», *La Batalla*, 5-an de januaro 1937. La afero estis traktita de Bolloten, citita verko.

367 Frank Mintz, *La autogestión en la España revolucionaria* (hispane, La memadministrado en la revolucia Hispanujo), La Piqueta, Madrido, 1977.

por kontentigi la necesojn de la ĉeestanta situacio»[368]. Eble la LPMU-istoj klopodis averti NKL-on kaj IAF-on pri la destino, kiu al ili estis rezervota iam ili mem estus forigitaj. Tiumomente, la spiono de KPIA Orlov premis Caballero-n por atingi la eksterleĝigon de LPMU kaj ili devis scii ĝin. La liberecana burokrataro volis vidi tion, kiel kverelo inter «marksistoj» fremda al iliaj interesoj, kiuj baziĝis sur bona rilato kun la sovetianoj. Tiucele, la anarkiista kaj konfederacia gazetaro silentigis la hontindajn Procesojn de Moskvo, kiuj tiam estis okazantaj kaj la skandalan fakton de la malliberigo de la eksterlandaj luktantoj de la Internaciaj Brigadoj, kiuj petis aliĝi al anarkiistaj trupunuoj[369]. Tial resonis, kiel kanonpafo, ke Alejandro Gilabert publikigis en *La Noche*, nun direktita de Balius, ambaŭ malnovaj redaktistoj de la *Soli* revolucia, liniojn kontraŭ la ekscesoj de la komunistaj gvidantoj:

> *Kun ega surprizo ni devis aŭskulti, kiel unu el la plej elstaraj membroj de USJ* de Hispanujo asertis, ke «la trockiismo estas la plej granda malamiko de la hispana popolo», kiam miloj da trockiistoj ĉiutage riskas sian vivon sur la batalkampoj luktante kontraŭ la faŝismo. Oni ankaŭ ne povas aserti, se volas respondece paroli, ke la «ekonomio de Katalunujo estas severe difektita de la antaŭtempaj provoj de socialigo» (Santiago Carrillo en la politika amaskunveno de la Price), kiam la laboristoj, kiuj socialigas la rimedojn de produktado estas, kiuj ekfunkciigis la fabrikojn kaj la entreprenojn forlasitajn de la burĝaro implikiĝinta en la faŝisma ribelo.*
>
> *Ankaŭ rompas la disciplinon, kiun ĉiuj al ni mem devas trudi, ke oni diras, ke «tiuj, kiuj juĝas la Konsilantaron de la kataluna registaro estas provokistaj agentoj, kiuj agitas la feĉon de la*

368 Citita de J. García Pradas, *Rusia y España* (hispane, Rusujo kaj Hispanujo), ediciones Tierra y Libertad, HLM (NeT: Hispana Liberecana Movado) de Francujo, 1948.

369 Besnard, en sia *Rapport Moral* (france, Morala raporto), mencias 27 belgojn kaj 8 francojn enkarcerigitajn en decembro en la malliberejo Modelo de Barcelono pro tiu kialo.

* NeT: Unuiĝintaj Socialistaj Junularoj.

*socio» (Juan Comorera en la politika amaskunveno de la Price)*[370]*.*

La letero de la Regiona Komitato de la Liberecanaj Junularoj de Katalunujo al la konsulo Antonov-Ovseenko petante al li, ke li faru alveni al sia Registaro la deziron, ke oni ne oferu pli da vivoj pro la proceso okazinta en Moskvo, estis oportune silentigita sed Gilabert kaj Balius tiam faris ion eksterordinaran: denunci la krimojn de Stalino.

*Neniu modere saĝa persono povas kredi, ke Trockij agadis konsente kun Hitlero por disfali la diktatoradon de Stalino. La reala fakto estas, ke la sovetiaj aŭtoritatoj kreis serion de fantazioj por «forigi» la opozician movadon interne de Sovetio kaj internacie malprestiĝigi la politikan movadon gvidatan de Trockij [...] Mi neniam estis trockiista, nek kredis je la efikeco de la pluraj sociaj movadoj devenantaj de la marksismo; sed mi opinias, ke ĉiuj liberaj konsciencoj de la mondo devas meti sin ĉe la vero, la pravo kaj la justeco, neebligante, ke daŭre plenumiĝis novaj krimoj pro simplaj diferencoj de politika karaktero.*

*La atakago kontraŭ la trockiismo efikis en Hispanujo, kaj laŭ perforta maniero en Katalunujo, malutile de partio, kiu konsistigas la kontraŭfaŝisman fronton [...]*

*La valora kaj neprofitema helpo, kiun Sovetio donas al Hispanujo rajtigas neniun por ke oni politike klopodu nuligi unu el la partioj de opozicio al la burĝa demokratio kaj la marksisma reformismo. La proceso, kiu ĵus okazis en Moskvo kontraŭ pluraj elementoj el la malnova bolŝevikismo ne devas etendiĝi preter la limojn de Sovetio, se ne estas por neebligi, ke oni ekzekutos la akuzitojn, restarigi la veron kaj redoni al Trockij la prestiĝon, kiun volas elpreni al li la partianoj de Stalino, ĉar la tuta proceso konsistas el falsaĵoj kaj malbonaj famoj. Ekster ĉiu politika intereso oni devas mobilizi la liberajn konsciencojn de la mondo por eviti, ke la mortpuno plu uziĝos*

370 A. G. Gilabert, «Nerespondeco», *La Noche*, 25-an de januaro 1937.

*en lando, kiu de preskaŭ dudek jaroj estas en socialisma rekonstruo*[371]*.*

Antonov-Ovseenko probable sentis panikon pro la respondecoj, kiujn oni al li postulus en Moskvo permesante tian artikolon kaj rapidis intervidiĝi kun Balius por ke ĉi tiu publikigu malkonfirmon, sed Balius lin invitis foriri. Li tiam protestis antaŭ la Regiona Komitato, kiu, ĉi tiu jes, senrajtigis la artikolon. La rusa popolo havas la samajn celojn, ke la hispana «popolo» kaj sekve oni ne devas enmiksi sin en la aferojn de Sovetio. Eĉ pli, por individuoj kiel García Oliver, la rusa proletaro marŝis sen la plej malgrandan dubon al la socialismo[372].

La anarkiista aktivularo tute ne forcedis kaj ni jam ripetis, ke la rusaj agentoj klare diferencis inter la plimulto de la porstalinistaj respondeculoj kaj la revoluciaj anarkiistoj, karakterizitaj, kiel «neregebluloj», «amikoj de la trockiitoj», «agentoj de la germana sekreta polico», ktp. La perdo de Malago nutris per pretekstoj la liberecanan burokrataron de la komitatoj por trudi per unu fojo kaj por ĉiam en sia aktivularo la militistigon kaj la komisararon, kaj por apogi la peton de KPH pri elpurigo de la Ĉefkomandularo, samtempe faciligante la stalinistan superregadon en la nova Popola Armeo kaj la senarmigon de la proletaro. Estis la unua elstara momento de la kora konsento inter la anarkiistoj de ŝtato kaj la stalinistoj. Toryho tion konfirmis per historia ĉefartikolo en la *Soli* de la 21-a de februaro 1937: «Ni rezignas ĉion krom la venko», dediĉita al la aŭtoritato kaj la obeado. La frazo, elpensita de Ehrenburg[373], estis atribuita al Durruti sen ia respekto.

371 A. G. Gilabert, «La monstra proceso de Moskvo efikis en Hispanujo», *La Noche*, 30-an de januaro 1937.

372 Parolado en la Coliseum recenzita en *Solidaridad Obrera*, 26-an de januaro 1937.

373 Ilya Ehrenburg, *Corresponsal en España* (hispane, Korespondanto en Hispanujo), Tiempo Contemporáneo, Bonaero, 1968. Serio de artikoloj publikigitaj, kiel libro unuafoje en Londono, en 1937, sub la titolo de *No pasarán* (hispane, Ili ne pasos).

Fakte, en artikolo titolita «Ĉe Durruti», Ehrenburg atribuis al ĉi tiu la volon krei armeon kaj elirigis el lia buŝo la sekvajn vortojn: «Se necesas ni ordonos la ĝeneralan mobilizon. Ni enkondukos feran disciplinon. Ni rezignos ĉion krom la venko». Abad de Santillán reproduktigis tiun artikolon en la oficiala organo de IAF, *Tierra y Libertad*, en la numero de la 29-a de oktobro 1936, t. e., kiam Durruti ankoraŭ vivis. Peirats plurfoje asertis, ke li neniam ĝin aŭskultis:

> *Al Durruti oni «atribuis» tion de «Ni rezignas ĉion krom la venko» ĉar la burokratojn de tiu NKL interesis tio, kiel fiŝhoko por fiŝkapti ministrajn postenojn[374].*

La frazo estis aldonita al la fama parolado de Radio Bujaraloz «fare de la ŝorcistoj de la komitatoj de la Oficejoj pri Informo kaj Propagando de Barcelono, kies fronto estis mia rivalo Toryho»[375].

En la ekzilo estis la sola voĉo, kiu pridubis ĝian aŭtentikecon. En letero al Gaston Leval li diris:

> *Bone konante Durruti-on oni ne devas dubi, ke se iu afero li metintus super ĉio estis la revoluciaj konkeroj; pro lia karaktero, pro lia temperamento, Durruti intense travivis la revolucion, kiu lin portis ĝis la unua paflinio mem. Krome, vi ne forgesu, ke lia parolado de Bujaraloz datiĝas de la monato de*

374 Letero de Peirats al Joan Llarch, en *Cipriano Mera. Un anarquista en la guerra de España* (hispane, Cipriano Mera. Anarkiisto en la milito de Hispanujo), Plaza y Janés, Barcelono, 1977.

375 Peirats, *De mi paso por la vida* (hispane, Pri mia paso tra la vivo), citita verko. Aliloke li rekte aludas la paroladon de la 4-a de novembro. Tiama direktisto de *Acracia*, li prenis notojn kaj farante netan kopion por la ĵurnalo trovis nenion strangan, sed «ricevante la *Soli*-on sekvatage ni rimarkis, ke li asertis tion, pri "antaŭ ol la revolucio ni devas venki la militon". Mi tute certis perfekte aŭdi liajn vortojn kaj asertis, ke tiu versio estis aldonita de la ŝorcistoj de la komitatoj de la Oficejoj pri Informo kaj Propagando de Barcelono, kies fronto estis mia rivalo Toryho». Sendube, Peirats konfuzas sin ĉar en la versio eldonita de la *Soli* la 6-an de novembro ne aperas la menciita frazo, ankaŭ ne en kiu reproduktis la paroladon de Bujaraloz la 12-an de septembro. La opinio, kiu, kiel ni vidis, al li estis atribuita, kiel famo en februaro, devenas de Ehrenburg kaj eĉ ne inspiriĝas el la intervjuo publikigita en la *Soli* la 6-an de septembro, kiu fakte estas tiu, kiun aludas Peirats.

*aŭgusto 1936, t. e., en plena revolucia entuziasmo, kiel li tiam povis rezigni la revoluciajn konkerojn?*[376]

La frazo kombinis sin kun tiu alia de Federica en Unión Radio, kiu identigis la personon de Durruti kun la liberecana burokrataro: «Durruti ne estas viro, Durruti estas ni mem». Do, tiuj «mem», kiuj faciligis lian morton sendante lin al Madrido neniigis lian revolucian heredaĵon eliriginte el lia buŝo kvazaŭsovetiajn vortojn pri kapitulaco, kiuj pravigis iliajn proprajn kompromisojn. La revolucia Durruti kaj, sekve, kontraŭstalinisma, ne interesis. Ĝuste, la projekto fari veran kaj senmitigan filmon pri la persono kaj ties kolono, kiu Armand Guerra interkonsentis kun la Organizo, estis bojkotita laŭ perfide ruza maniero; laŭlonge de la milito Armand neniam povis disponi de filmbobenoj[377]. Indignoplena pro la konduto kvazaŭstalinisma de la respondeculoj de NKL, Fritz Benner, teksa laboristo kun longa historio kontraŭ la germanfaŝistoj, en asembleo de DAS eĉ diris, ke «Pluraj gvidantaj kolegoj estis sekretaj agentoj de Moskvo»[378]. Li nur duone eraris: tiel la stalinistaj burokratoj, kiel la liberecanaj klopodis fini kun la reala Durruti kaj, tiusence, ili objektive laboris por Moskvo.

Tamen atribui al Durruti rusajn instrukciojn, la sovetia sinteno rilate al NKL kaj IAF tute ŝanĝis inter februaro kaj marto. Unue estis la artikoloj de Ehrenburg kontraŭ la anarkiistoj. Tiu publikigita en *Izvestia* la 15-an de februaro estis ja malmola, kun batoj al la *Soli*. Tiu de la 28-a de la sama monato, subskribita «zet», prezentis la liberecanojn, kiel malamikojn de la disciplino, nerespondecaj kaj

376 *CNT*, proparolanto de NKL de Hispanujo en la ekzilo, Toulouse, n-ro 727, 5-an de aprilo 1959.

377 Francisco Agramunt Lacruz kaj José A. Ríos Carratalà, *Armand Guerra, un sembrador de rebeldías* (hispane, Armand Guerra, semanto de ribelemoj), Urba Fondaĵo de Kino-Mostra de València-Urbodomo de Valencio, 2008.

378 Letero de Rüdiger al Michaelis, fidelaj al la NKL-a burokrataro sed kontraŭaj al la kunlaborado kun «marksismaj» organizoj, datita la 22-an de februaro 1937, menciita en Nelles kaj aliaj, citita verko.

subtenantoj de LPMU, partio, kiun la artikolisto substrekis kiel faŝisma. La kontraŭkolektivisma propagando de KPH kaj USPK atingis nivelojn pli altaj ol neniam. La politiko de sindikata unuiĝo de la NKL-aj gvidantoj estis sisteme bojkotita. La eksterlanda komunista aŭ samideologia gazetaro entreprenis kontraŭliberecanajn kampanjojn. La amerikaj kaj eŭropaj anarkiistoj sendis informojn de la mensogoj diskonigitaj de la komunistoj, kiel ekzemple tiu pri la rifuzo de la katalunaj anarkiistoj sendi nutraĵo-provizojn al Madrido, tiu pri ilia malkuraĝa fuĝo de Malago aŭ tiu pri la mortigo de aŭtoritatema Durruti ĉar li estis aliĝonta al KPH. La celoj serĉitaj estis pluraj: forpreni al NKL la superregadon de la publika ordo en Katalunujo kaj, ĝenerale, la regadon de la postmilitfronto; neebligi, ke ĝi superregis la ekonomion per la socialigo; nuligi ĝian militistan forton disigante ĝin de la direkto de la milito kaj disdividante ĝiajn batalionojn en brigadoj miksaj kaj divizioj, sub malamikaj komandoj. Ankaŭ, devigi ĝin apogi la deliran rusan politikon pri ekstermo de «trockiistoj»; sed, ĉefe, devigi ĝin rompi ĝian progresan interligon kun Largo Caballero. Kiam la diferencoj inter Rosenberg kaj Largo ege akriĝis, la liberecanaj gvidantoj estis celo de konstantaj ĝentilaĵoj fare de la sovetia ambasadestro kaj la konsulo Antonov. Vane, ĉar per la subteno donita al la Registarestro NKL reakiris terenon al PCE. Tio kostis la vivon al ambaŭ. La rilatoj inter la estroj de ambaŭ organizoj malpliboniĝis. Toryho publikigis artikolon en la *Soli* —la ununura—, en kiu li moderece protestis pro la maljustaj atakoj al la anarkiistoj en la sovetia gazetaro kaj pro la misfamigo pri la figuro de Durruti[379], al kiu *Pravda* kolere kontestis:

> *La centra organo de la anarkiistoj de Barcelono,* Solidaridad Obrera*, publikigis insultan atakon kontraŭ la sovetia gazetaro. Estas signife, ke la aŭtoro ĉefe direktis siajn atakojn kontraŭ la*

379 «La Punkto super la i», *Solidaridad Obrera*, 19-an de marto 1937.

*informoj aperintaj en la sovetia gazetaro rilate al la kontraŭrevoluciaj aktivecoj de la trockiistoj de LPMU kaj asertas, ke ĉi tiuj kalumniaj taktikoj simple havas, kiel celon krei la dividon inter la membroj de la kontraŭfaŝisma fronto en Hispanujo.*

*Ĉi tiu maldeca defendo de la trockiistaj perfiduloj devenas de dubindaj individuoj enŝteliĝintaj en la aliĝantaron de la anarkiista organizo. Estas la malnovaj kunuloj de Primo de Rivera en la faŝisma Falango kaj la trockiistoj. Ne estas sekreto, ke ĉi tiuj «fiuloj» neplibonigeble prosperas en* Solidaridad Obrera*, ĉar oni scias, ke la nuntempa direktisto de la ĵurnalo estas Cánovas Cervantes, malnova direktisto de la faŝisma ĵurnalo* La Tierra*.*

*Ĉi tiuj agentoj de Franco estas hodiaŭ protektitaj de la anarkiista organizo por detrui la hispanan Popolan Fronton, sed ili ne sukcesos. La anarkiistaj amasoj ĉiutage plej bone komprenas la neceson de ferdisciplino kaj de registaro konsistigita de fortaj personecoj. Tial la malamikoj de la hispana popolo enŝoviĝis en la anarkiistajn grupojn kaj pretas batali kontraŭ la Popola Fronto per timinda frenezo [...]*

*Ĉi tiu kontraŭsovetia epizodo en* Solidaridad Obrera *estas la pruvo, ke malantaŭ la centra organo de la anarkiistoj, estas la trockiistoj kaj la agentoj de la germana sekreta polico. La fakto zorgas la katalunajn anarkiistajn gvidantojn, kiuj volas serioze batali la internacian faŝismon[380].*

Rimarku la kutiman distingon inter bonaj kaj malbonaj male elmetita: la amasoj estas nun kvazaŭkomunistaj kaj la gvidantoj, trockiistaj. La vizaĝo de la stalinismo tro evidentiĝis kaj por favori siajn interesojn en Hispanujo, kiuj konsilis akordiĝi kun NKL, tiam la sovetia diplomatio devis «klarigi» tion diritan de ĝiaj plumknaristoj, asertante, ke ili ne estis oficialaj verkistoj de la rusa Registaro:

380 *Pravda*, 22-an de marto 1937. Reproduktita de Rudolf Rocker en *La tragedia de España* (hispane, La tragedio de Hispanujo), unue aperinta en la angla dum la aŭtuno 1937. Eldonita en la franca en 2006 de Éditions CNT- Région Parisienne kaj en la hispana de Melusina, 2009.

*Veras, ke* Izvestia *de la 23-a de novembro enmetis komunikaĵon pri la enterigo de la kamarado Durruti. Ĉi tiu komunikaĵo estas plena de amo kaj doloro al ĉi tiu heroa batalanto falinta. Finiĝante, ĝi diras, ke Durruti ĉiam pli kaj pli alproksimiĝis al la Komunista Partio. La kolego T[oryho] ne indikas kial ĉi tiu persona opinio de la korespondanto pri la alproksimiĝo de Durruti al la komunistoj en la demandoj pri la organizo, la Registaro kaj la restrukturigo de la Armeo, estas mallojaleco. Veras, ke en* Pravda *de la 17-a de decembro publikiĝis komunikaĵo de la kamarado Koltzov de Madrido, «Malnoblaj manovroj de la trockiistoj en Katalunujo». Sed ĉi tiu komunikaĵo ja estas citaĵo prenita el* Mundo Obrero *kaj parolas pri la aktivecoj, ĉies konitaj, de la estraro de LPMU en Katalunujo, tute ne koncernante la proletan movadon direktita de NKL*[381]*.*

La letero de la respondeculo de la Oficejo pri Gazetaro de la rusa konsulejo en Barcelono finis proponante kiom da informoj kaj novaĵoj pri Sovetio oni bezonos. El NKL estis interamikiĝa respondo: «Niaj brakoj estas ĉiam malfermitaj por ĉiuj, kiuj estante kontraŭfaŝistoj agadis per honesteco kaj nobleco. Ni scias esti kaj estos konformiĝemaj, komprenemaj kaj toleremaj kun la amiko, la frato»[382]. Tuj poste okazis la faktojn de Majo, la falo de la Registaro de Largo Caballero, la malfondo de la Konsilantaro de Aragono kaj la persekutado de LPMU kaj la honesta anarkiismo, kaj la brakoj daŭre estis pli malfermitaj ol neniam: la Nacia Komitato direktis sin al la Plenuma Komitato de KPH kun la mano etendita, kaj la ĝenerala sekretario de NKL petis postenon en la Registaro de Negrín. Se estis io nevariebla en la politiko de la hispana liberecana movado ĝis la ŝtatrenverso de Casado, t. e., preskaŭ dum la tuta milito, estis ĝia eksterlanda senkondiĉa sekvado de la rusa opinio

381 Letero de la Oficejo pri Gazetaro komisiita de la ĝenerala konsulo de Sovetio en Barcelono al la direktisto de *Solidaridad Obrera* por ke li ĝin enmetu en ĝian sekvan numeron. Sen dato, sed fine de marto 1937, IISH, Amsterdamo.

382 David Antona, «Per ĉiu koreco. Se la Komunista Partio volas pacvivi kun NKL, ĉi tiu al ĝi etendas sian fratan manon», *Fragua Social*, 7-an de aprilo 1937.

kaj la interna pasiva sinteno antaŭ la Komunista Partio. Estas io, kio malfacilas kompreni, sed estas tiel. Akceptebla klarigo povas dedukti sin pro la foresto en NKL de internacia kaj interna politikoj sufiĉe klaraj kaj difinitaj. Ĝia eksterlanda propagando estis kontrolita de ILA, situacio finita de la Duoninsula Komitato de IAF en aprilo 1937. Dum NKL-IAF rezignis la revolucion kaj penetradis en la instituciojn, anstataŭigis la anarkiistan bildon per la kontraŭfaŝisma, devigante varii sian strategion kaj precizigi celojn, kiuj principe ne malsamis de tiuj de la partioj, inkluzivita KPH. Eksterlande, ĝi preparis sin serĉi politikajn apogantojn ekster la apenaŭaj organizoj de ILA, en la demokrataj, socialistaj kaj ĉefe komunistaj rondoj, la plej influaj sur la tutmonta proletaro kaj la ŝlosilo de la sovetia armilaro. La eksterlanda politiko sekve tute dependis de la interna. En la oficejoj pri propagando laboris tre malmultaj homoj, kio signifas, ke NKL delegis la defendon de la komuna respublika projekto en la stalinistoj. La grandega provoko de Majo kaŭzis la eliron el la Registaro de la ministroj de NKL kaj komencis la enkarcerigon de centoj da anarkiistoj kaj LPMU-istoj inter junio kaj julio, kaj ĉi tiu proceso atingis la apogeon per la malapero de Andreo Nin. NKL klopodis haltigi la politikan malvenkon per interligon kun ĜUL, kiu estis perforte bojkotita de la komunistoj kaj centrismaj socialistoj. Noto de José Díaz en *Frente Rojo* de la 31-a de julio 1937, denuncante la ekziston de «ekstremistaj grupoj» preparante sin por «kaŭzi tumultojn kaj kriminalajn agojn en la postmilitfronto», elĉerpis la paciencon de la organizo. La gvidantaro de NKL rimarkis, ke la noto celis kontraŭ ĝi kaj ĝia interligo, sed ankaŭ rapidiĝis disigi la malakordojn kun «la partio de la instrukcioj» de la amikeco kaj dankemo al Sovetio. Marianet eĉ diris:

*En la menso de neniu anarkiisto, nek en la koro de iu revoluciulo, nek en la sentoj de iu kontraŭfaŝisto estas loko por la simpla supozo de malamikeco kun Rusujo*[383]*.*

La 11-an de aŭgusto okazis la militista detruo de la Konsilantaro de Aragono kaj la perforto kontraŭ la kolektivigoj fare de la 11a Divizio komandita de Líster; du tagojn poste, ordono de Negrín, tiu de la 13-a de aŭgusto 1937, eksterleĝigis la kritikojn al Sovetio; fine, la 15-an de la sama monato oni kreis la Servon pri Militista Informo (SMI), supoze sekreta servo de la Ĉefstabo de la Popola Armeo, baldaŭ iĝinta filio de ŜPD kaj potenca instrumento en manoj de KPH. Sed, malgraŭ tiom da humiligo, la Nacia Komitato ne akrigis la kritikojn, kontraŭe ilin forigis. La ĝenerala sekretario Marianet serioze laboris por tute ŝanĝi la politikon de la Organizo, ekzaminante la avantaĝojn de interligo kun la komunistoj kaj Negrín, kiu havigus iun ministran postenon. Tial, ne strangas, ke la *Soli* de la 9-a de septembro titolis: «La tutmonda proletaro devas aktive apogi la pozicion de Sovetio». Ĉu memmortiga blindeco? Ĉu oportunismo sen bremso? Ĉu korupteco kaj duobla ludo? Ĉu malkuraĝo kaj submetiĝo? Ĉu kunkulpeco? Ĉu perfido? Estis multo da ĉio, ĉar ĉiuj estas aspektoj de sama taktiko. Tiu, kiun Santillán eldiris per elturniĝema pedagogio:

*Ofte okazas, ke ne estas la rekta linio, kiu pli rapide kaj sekure kondukis al la celo; kelkfoje oni alvenas la unua farante zigzagojn. Eĉ okazas, ke oni pli antaŭeniras kaj alvenas la unua reirante sur siaj paŝoj*[384]*.*

En malpli ol jaro el zigzagoj de IAF kaj NKL, la rusoj disponis la aferojn kaj la personojn kvazaŭ Hispanujo estus ilia aparta kolonio. Ajna traktato, de ministrejo ĝis sendo de devizoj, la decido estis en iliaj manoj. Oni ne povis doni

383 *Solidaridad Obrera*, 3-an de aŭgusto 1937.

384 Abad de Santillán, «Ĉu anarkiistoj en la registaro aŭ porregistaraj anarkiistoj?», *Tiempos Nuevos*, Barcelono, junio 1937.

solan paŝon ne havante la aprobon de la sovetiaj reprezentantoj. Kaj la malsaĝa liberecana burokrataro akceptis ĉion, kompletigante la vendon de la hispana proletaro al ties ekzekutistoj.

Kaj Durruti ree estis utila, kiel alibio por la kvalita salto al la interklasa naciismo farita de NKL-IAF en julio 1937. Dum la ceremonio de lokado de la plato en lia honoro en la barcelona strato, kiu portis lian nomon, Federica Montseny priskribis lin, kiel «nacian simbolon de la hispana libereco», ĉar en lia persono «vivis La Empecinado, la urbestro de Móstoles* kaj la tuta spirito de la iberia raso»[385]. La proletaj luktantoj, post rezigni «ĉion» kaj konkrete la lukton de klasoj, iĝis necesaj patriotaj mitoj, ĉar la subpremanta ŝtato aperis en la anarkiista propagando, kiel «patrujo de la 19-a de Julio». Ekzemple, García Oliver mem diris en politika amaskunveno okazigita la 5-an de septembro, ke «la patrujo estas en danĝero» kaj, ke oni devis defendi ĝin «ĉar nia patrujo, la patrujo de la laboristoj, estas la heredaĵo, kiun ni hodiaŭ posedas en niaj manoj»[386]. En la datreveno de la morto de Durruti la tuta liberecana gazetaro montris sur la unua paĝo tiun «Ni rezignos ĉion krom la venko», kun la klara mesaĝo, ke la anarkiismaj idealoj al ajna nivelo estis nekonformaj kun la defendo de la burĝa respublika reĝimo kaj, ke sekve, oni devis rezigni ilin, sekvante la supozan ekzemplon de Durruti. En la Teatro Apolo de Valencio, en la kinejo Monumental de Madrido, en la Olympia de Barcelono kaj en ĉiuj ceteraj respublikaj ĉefurboj, la plej gravaj gvidantoj ne ĉesis ripeti la tre konatan frazon, kiu resumis la tutan strategion de burokratigita NKL-IAF. Nu, kiel bone diris García Oliver, estis «penso, kiu estas ago, tamen ja sufiĉe

* NeT: herooj de la hispana milito de la sendependeco, 1808-1814, kontraŭ Francujo.

385 Recenzoj de la ceremonio en *La Libertad* kaj *La Vanguardia*, 2-an de julio 1937. Ricardo Sanz donis senintencan komikan noton fermante ĝin per la frazo: «Ni estas pretaj rezigni ĉion, eĉ enspezi».

386 *Frente Libertario*, Madrido, 8-an de septembro 1937.

senmakula kaj pura por ke ni ne perdu la tempon serĉi al la numtempa situacio aldonojn kaj pli longajn difinojn»[387]. En tiu datreveno plenumiĝis lia transformado en objekto de kulto, «mito de la raso», «militestro de la popolo», personigo de ĉiuj virtoj de la burokrato. Toryho resumis lian ekzemplon kaj lecionon per du vortoj: «obei kaj komandi». Durruti estis levita al la kategorio de «heroo de legendo», nevenkebla kaj preskaŭ sola savinto de Madrido kaj, sekve, instiganto de la militistigo kaj modelo de konduto por la organizo[388]. Liaj propraj vortoj pri «la libero malbone komprenita», kiel preteksto «por eviti riskojn» estis alvokataj por pravigi la forigon de tiel elementaj liberoj, kiel la rajto malkonsenti, kritiki kaj publike esprimi sin. *Mundo Obrero* tre rapide kaptis la aludon rekte identigante liberon kun malorganizo kaj tragedio, montrante Durruti-on, kiel la malamiko de tiu libero[389]. Por ofendo de la revolucio, ĉi tiu iĝis referenco de la komunistoj. Poste, ajna libero, kiu ne estus obei kaj plenumi ordonojn estus «malbone komprenita» kaj tiu, kiu rifuzus submeti sin al la instrukcioj de la aparataj komitatoj estus akuzita eviti riskojn, kiel la malkuraĝuloj. Li iĝis «ĉies homo», de ĉiuj burokratoj, kompreneble; kaj tiel la komunistoj sin profitis farante lin lukti kaj morti «por la

387 *Solidaridad Obrera*, 21-an de novembro 1937.

388 Tiu estis la celo de multnombra literaturo, modelo de kiu estas *Madrid, rojo y negro* (hispane, Madrido, ruĝa kaj nigra), de Eduardo de Guzmán, eldonita de la Sekcio pri Propagando de la Komitato por Konfederacia Defendo de la Centro en 1938, kiel respondo al la stalinisma *Contraataque* (hispane, Kontraŭatako) de Ramón J. Sender, tial ĝi havas neniun dokumentan valoron pri tio, kio rilatas al Durruti. Tiucele, ĝi falsas la alvenon de la kolono al Madrido, kiun datas la 15-an vespere por ne impliki ĝin en la tiutaga retiriĝo kaj pliigas ties membrojn je kvar mil, por ke ĝia «decida» rolo estu kredebla, kio ne atingeblis per lia morto «ĉekape de liaj homoj», fulmomortigita de «perdita kuglo». Por la malnova Peirats, estis la fatala destino, «kiun sen dubo li deziris». La sama opinio aperis en *Los que fuimos a Madrid* (hispane, Kiuj iris al Madrido), de Ricardo Sanz. Federica Montseny pliigis la kvanton de akompanantoj de Durruti al ok mil en «Madrido, leciono de heroeco», publikigita en *Solidaridad Obrera*, la 6-an de decembro 1938.

389 «Niaj luktantaj mortintoj falis kune», *Mundo Obrero*, organo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Hispanujo, 20-an de novembro 1937.

Respubliko», kun la konsekvenca kolero de NKL[390]. Dume, García Oliver teoriadis pri la «transformo —elĉerpigitaj la revoluciaj ebloj— de nia socia milito en militon de la sendependeco pro la italagermana invado»[391]. La similaĵoj kun la stalinismo estis tiomaj, ke, en la Pleno de la Centra Komitato de la Komunista Partio okazigita en Valencio en la monato de novembro 1937, akordiĝis plifirmigi la rilatojn kun NKL kaj IAF, «memorigante, ke hodiaŭ ekzistas neniu kampo en kiu komunistoj kaj anarkiistoj ne povas labori kune»[392].

La politika lingvaĵo ĉiam pli kaj pli fariĝis unuforma en la respublika flanko, ĝis kiam oni ne distingis unuj organizojn de aliaj. Ekzemplo: Ricardo Sanz, estro de la 26a Divizio turnis la penson de Durruti apenaŭ prenita la komando de sia militistigita kolono:

> *Ni estas homoj el realaĵoj. Ekde la komenco ni komprenis, ke nia venko super la faŝismo bezonus potencan instrumenton, kiu nur devas esti tiu, kiun oni estas skizanta aŭ tuj starigonta: la Armeo de la Popolo. Ni al ĝi dediĉas ĉiujn niajn fervorojn[393].*

Jaron poste, la 31-an de julio 1938, Sanz mem faris la sekvan paroladon per la radio:

> *... la nuntempa momento estas momento, kiu postulas grandajn oferojn, kaj ni, la homoj, kiuj eliris el la manlaborejo, la fabriko, la mino aŭ la oficejo por batali la invadanton, kunĵuris rezigni ĉion, cirkonstance, kiel bone diris nia neforgesebla Durruti. Ni rezignis niajn ideojn, ĉar super ĉiuj estas la neceso liberigi Hispanujon de la fremdaj invadantoj, kaj kiam ĉi tio estos atingita, la hispana popolo, kunigata kiel*

390 «Durruti luktis kaj mortis por la Revolucio», *Solidaridad Obrera*, 27-an de novembro 1937.

391 «Projekto pri kreo de institucio, kiu organizos la disfalon de la ribela postmilitfronto», probable skribita fine 1937. Arkivoj de la Duoninsula Komitato de IAF, IISH, Amsterdamo.

392 Dokumento de la Provinca Komitato de Madrido de KPH, reproduktita en *La Vanguardia*, 21-an de novembro 1937.

393 «Parolas Ricardo Sanz», *El Frente*, n-ro 86, 14-an de junio 1937.

*nun, determinos kiun estos la reĝimo, kiu devos regi ĉiujn nin[394].*

Kaj ili ja rezignis. Krome la propagando kreis la rezignantan miton de Durruti por kovri ilian nekompetentecon kaj sankcii iliajn kapitulacojn, krom ilia soifo de povo kaj deziro de eterneco, kun la aplaŭdo de KPH, sed tio ne sufiĉis. Mankis rezigni la anarkiismon, «niajn ideojn», por savi «Hispanujon» de la «invadanto»; estis devige iĝi ŝovinistoj. Prave, la grupigo, kiu batalis la kapitulacojn diris pri Durruti:

*Li falis en Madrido, la koro trairita de ribelanta kuglo —aŭ supoza amika—. Kiu pafis? La mortigisto sciis, ke ĉiuokaze serĉante la grandan koron de Durruti, serĉis la koron mem de la revolucio[395].*

Cele postvivi kiel burokrataro, la «komitakrataro» pretis alkroĉiĝi al ĉiuj najloj, ĉefe al la stalinista najlo. Marianet, ĝia maksimuma gvidanto, malhelpis en decembro 1937 rezolucion de ILA, kiu postulis la liberigon de la ĉiulandaj politikaj malliberuloj, inkluzivitaj la rusoj, multaj el ili anarkiistoj. En januaro 1938, li petis al Emma Goldman, ke ŝi mildigu la kritikojn al KPH kaj la Registaro de Negrín pro la persekutadoj, kiujn ili faris al la liberecanoj, per la stranga argumento, ke ili elrevigus la tutmondan proletaron[396]. Kaj ankoraŭ dum la Kongreso de ILA de oktobro 1938, kiam la

394 Arkivoj de NKL, IISH, Amsterdamo.

395 «20-an de novembro 1936 – 20-an de novembro 1937. Buenaventura Durruti», *El Amigo del Pueblo*, kaŝa organo de la grupigo Los Amigos de Durruti, 20-an de novembro 1937. Tiutempe, multaj revoluciuloj kredis, ke ankoraŭ nenio estis perdita. La superrealisma poeto Benjamin Péret, kiu forlasis la Kolonon Durruti en aprilo 1937, al ni donis optimisman sonĝan bildon: «Mi kredis, ke la instruo, kiu konsistas la vivon de Durruti ne perdiĝus, ke —konsente kun la konata kliŝo— la semo (la ovo), kiun li semis frue enradikiĝus (elkoviĝus)». «La ovo de Durruti elkoviĝos», *Cahiers GLM*, marto 1938.

396 Leteroj de Mariano R. Vázquez, de la N. K. de NKL, kaj de Petro Herrera, de la D. K. de IAF, de la 11-a de januaro 1938, IISH, Amsterdamo, cititaj de Marta A. Ackelsberg, *Mujeres Libres. El anarquismo y la lucha por la emancipación de las mujeres* (hispane, Liberaj Virinoj. La anarkiismo kaj la lukto por la emancipo de la virinoj), Virus editorial, Barcelono, 1999.

sovetianoj estis fermintaj la kranon kaj sekve jam ne tiom nepris, li havis la kuraĝon publike insisti pri la temo:

> *Ĉiu tiu propagando pri la superregado de la komunistoj en Hispanujo kaj persekutadoj de revoluciuloj tio sola, kion ĝi faras, estas difekti la movadon por kontraŭfaŝisma Hispanujo eksterlande[397].*

Sed la komunista politiko pri hegemonio pasante super ĉiuj estis tro memmortiga, por ne esti pridubita, kiam malfortiĝis ĝia pozicio post la fatala batalo de la rivero Ebro. En la dua datreveno de la morto de Durruti, la aparatistoj de la Liberecana Movado ne bedaŭris la rezignojn, kiujn ili devis fari, sed esti la solaj, kiuj faris ilin:

> *Kiam Durruti diris sian faman instrukcion, ke dependigis ĉion de la venkoceloj, komprenis, kiel ni komprenas, ke la sinofero de la apartaj interesoj de sektoro aŭ klaso devis inkluzivi, sen escepto, ĉiujn sektorojn[398].*

Nun preskaŭ ĉiuj atendis la malvenkon je ajna momento kaj estis, kiu demandis sin ĉu meritis la penon tiom da koncesio. Ne estis la sinteno de García Oliver, kiu en la politika amaskunveno de la Olympia de Barcelono diris, ke «ie oni parolas pri kapitulacoj sed super ĉio estas gajni la militon». En la alia ekstremo, en la kinejo Monumental de Madrido, la «leŭtenanto kolonelo» Mera adiciis —aŭ subtrahis— du kaj du: «Kiam oni parolas pri Durruti, oni memoras lian faman frazon "ni rezignas ĉion krom la venko". Kaj por atingi la venkon oni efektive devas rezigni multon»[399]. Neniun faritaĵon oni reviziis, kvazaŭ la fulmmortigo de la idealo estus la celo de anarkiismo, kiel dio ordonas. Ĉi-foje Durruti estis multe malpli menciita de la respublika gazetaro ol la antaŭa jaro, kaj estis la liberecanaj medioj, kiuj ekskluzive uzis la ŝovinistajn adjektivojn:

---

397 Nelles kaj aliaj, citita verko.

398 «Ĉefartikolo», *Solidaridad Obrera*, 20-an de novembro 1938.

399 *La Vanguardia*, 20-an de novembro 1938.

«esprimo de la profunda Hispanujo», «hispana», «specifa tipo de ibero», «geniulo de la raso», «gerilano de la sendependeco», ktp.

Oni jam ne luktis por la anarkio, eĉ nek por konservi la revoluciajn konkerojn, sed por defendi «la Liberecon kaj la Civilizacion»[400], naiva maniero altiri la atenton de Francujo kaj Anglujo, lasta ŝanco de NKL. La rezulto estis eksteordinara, militisma kaj ŝovinista babilaĉado, kiel tiu per kiu esprimis sin filo de ministoj, ŝoforo de Los Solidarios kaj kolego de Durruti:

> *La cirkonstancoj kaj urĝa devo min faris soldato de la revolucio kaj de la sendependeco de nia amata patrujo, sento de soldato, kiu daŭros enradikiĝanta en mi profunde. Hispanujo bezonas la sinoferon de ĉiuj siaj filoj por purigi la plankon de invadantoj kaj defendi sian dignon kaj siajn liberojn, kaj super ĉiuj ideologioj, kvankam ĉi tiuj estu tre ekstremismaj, ni devas senti fieron vesti la uniformon, kiu personigas la simbolecon de la disciplino kaj la ordo, kiuj estas la maksimuma garantio de la venko de nia afero[401].*

Se la naciismo estis la burokrata supero de la anarkiismo, la nacia heroo, estis la supero de la proleta heroo. La memoro kaj la sobra rekono de la persona ekzemplo iĝis kulto. Neniu pli bona ol Federica Montseny por esprimi ĝin: «La dioj mortis, sed la kulto al la naciaj herooj estos porĉiame». Nu Durruti daŭre estis ne la simbolo de laborista kaj kamparana klaso tute penanta konstrui novan, liberan kaj justan mondon sur la ruinoj de mondo de sklaveco kaj maljusteco; plej bone li estis

> *... tiu Durruti, kiu levas la flagon de la sendependeco, kiu organizas la unuajn legiojn de batalantoj, kiu iras renkonte de la ribelanta faŝismo kaj ties internaciaj helpantoj; kiu marŝas al Zaragozo, kavaliro de la ĉevalo de la Cid. Tiu Durruti*

400 Germinal Esgleas en *Solidaridad Obrera*, 31-an de januaro 1939.

401 E. Rubio Fernández, «Miguel García Vivancos. Leŭtenanto kolonelo de la respublika Armeo», *Mi Revista*, 1-an de decembro 1938.

*personigo kaj simbolo de Iberujo. Tiu Durruti geniulo de la Raso [...] granda militestro de la popolo, kun ĉiuj esencaj virtoj de la hispana soldato[402].*

Post finiĝi la milito, García Oliver aldonis novajn argumentojn al la rezigno stampante al ĝi pure ideologian karakteron: «La anarkiismo estas senefika armilo por liberigi la Homaron»[403]. Tion saman oni povis aŭdi, eĉ antaŭ ol finiĝi la milito, en buŝo de ajna respondeculo de NKL aŭ IAF sufiĉe aŭdaca, kiel por klare paroli malhavante la ideologiajn kliŝojn. Efektive, klasidearo ne facile adaptiĝis al liberala kaj popularisma parolado pli propra al la etburĝaro. La reviziisma periodo komenciĝinta, kiam Peiró kaj Federica ekparolis pri «federacia Respubliko», kiel «garantio de la justa estonteco de Hispanujo», cirkaŭ decembro 1936, finiĝis en la momento de la malvenko per diversa aro de politikaj projektoj de partio: Hispana Liberecana Partio (Horacio Martínez Prieto), Laborista Partio de la Laboro (García Oliver), programo de la Antaŭenpelantoj (Chueca), Laborista Partio (Pestaña-istoj), Ibera Federacia Liberecana Partio (Yoldi), Federacia Partio refondita (familio Urales), ktp. En la nova situacio, Durruti plenumis identigan funkcion, kvazaŭ refondanta mito. Kiel burokrataro, al la gvidantoj de la Liberecana Movado oni ne povis riproĉi, ke ili agadis laŭ sia naturo, sed eĉ pri tio ili ne montris iom de la grandeco de la originoj. Sengrava pentulo faris en sia postmilita konfeso la solan validan riproĉon por la historio de la hispana Revolucio:

*Oni al ni ne akuzos ĝeni la planojn de la komunista respublika Registaro, tamen oni nin povas akuzi ne ilin ĝeni kaj antaŭ la estonteco ĉi tiu akuzo multe pli pezos[404].*

402 Federica Montseny, «Laŭ la ekzemplo de ŝiaj herooj. Durruti», *Solidaridad Obrera,* 20-an de novembro 1938.

403 Letero de García Oliver al Cipriano Mera de la 7-a de septembro 1939, citita en *A Contretemps, Bulletin de Critique Bibliographique*, n-ro 17, julio 2004.

Kaj efektive, neniu minimume informita povus ŝarĝi al la anarkiistaj gvidantoj la respondecon de socia Revolucio, kiun ili havis al la atingo de la mano. Poste, klopodante pravigi sian kunlaboradon, ili diris, ke ne volis perforte trudi siajn ideojn. Sed, kiel indikas Peirats, «kion oni al ili riproĉas ne estas la rezigno al la anarkiista diktatorado sed elekti la kontraŭrevolucion»[405].

Naŭ jarojn post tiu fatala novembro, kiam mortis Durruti, Felipe Alaiz, la plej bona liberecana plumo, bedaŭris la kulton al la fikcia personeco, kiu en la ekzilo nutris ĉiujn tiujn, kiuj faris la militon malantaŭ inkujo, kiam «inter la mortintoj pro nobla afero oni ne povas distingi nur unu». Se estis heroeco, por Alaiz estis tiu de la popolo, kiu devis lukti samtempe kontraŭ la faŝismo kaj kontraŭ «la arogantaj liberecanoj de la kontraŭa sektoro», kiuj ĉe la potenco, kiun ili dividis, malfaciligis kaj implikis la revolucian agadon de laboristoj kaj kamparanoj:

> *Tio ekzempla de Durruti estis lia furioza protesto —estintus multe pli se li ankoraŭ vivus— kontraŭ la perfido de la diigita postmilitfronto en letargio, kiu povis efike decidi la batalon kontraŭ la Franco-ista sovaĝeco kaj ne tion faris. Tio ekzempla de Durruti estis lia sinteno kontraŭ la militistigo [...] Tio ekzempla de Durruti estis lia senafekteco, kiam li kontraŭstaris la fantaziojn de la subitaj diplomitoj. Tio ekzempla de Durruti estis lia volo de tuta aŭtonomeco por la ekonomiaj kernoj, kiuj stariĝis en Aragono ĉe la militfronto mem, kaj ne per nova etikedo de Nacia Konfederacio de la Laboro, sed kun lia superita kaj vigligita spirito per tujaj kaj bonaj ekzemploj. Tio ekzempla de Durruti estis lia kontraŭa opinio al la galona militismo kiu, post perdi ĉiujn militojn, neebligas la pacon.*

404 Abad de Santillán, Por qué perdimos la guerra (hispane, Kial ni malvenkis la militon), citita verko.

405 «Ĉu rezignis la Hispana Liberecana Movado, en 1936-1939, efektivigi la Revolucion?», José Peirats, en la revuo *Presencia, Tribuna Libertaria*, n-ro 5, Parizo, septembro-oktobro 1966.

*Tiaj estis en Durruti la kialoj de agado kontraŭ Franco. Se ĉi tiuj estus en ĉiujn mensojn, se la batalantoj kaj ne la politikistoj metitaj en inkujoj estus la administrantoj de la milito, ĉi tiun oni ne perdintus. Ni ne perdintus Durruti-on nek liajn kolegojn de malfeliĉo, nek ni nun perdus la tempon disputante la galonojn, kiujn oni devas surmeti sin*[406].

*Unua redakto decembron 2006,*
*reviziita kaj ampleksigita inter 2009 kaj aŭgusto 2013*

406 Felipe Alaiz, «Buenaventura Durruti aŭ la heroeco bone komprenita», skribita la 11-an de novembro 1945 kaj kolektita en *Tipos españoles (segunda parte)* (hispane, Hispanaj tipoj (dua parto)), Ediciones Umbral, Parizo 1965.

# «Romanco de Durruti»

Kiu kugl' al vi tranĉis la pason
malbeno de tiu horo,
je vespero de novembro
sur la vojo de la venko?
La Montaroj de Guadarrama
detenis la lumon kaj ombron
al horizonto malseka
je malklara akv' kaj heroa sang'.
Kaj je via dorso Madrid',
la okul' atenta al via bot',
mordita de la brulegoj,
per anheloj de leonin',
viajn paŝojn mezuris
firmaj la pugno kaj la buŝ'.
Je vespero de novembro,
nigra makul' de l' Histori'!
Buenaventur' Durruti,
kiu konis alian angoron
pli maldolĉan ol via mort'
sur la hispana tero?
Eble vi estis sonĝanta
la stratojn de Zaragozo
kaj densan akvon de Ebro
vojojn de laŭro-rozo,
kiam la krio de Madrid'
tranĉis vian sonĝon en malbona hor'...
Giganto de la montoj,
kie vi ellaboris vian gloron,
ĝis la nuda Kastilio
iris kiel uragano

por forskrapi el la teroj
brunaj la nigran kadavraĵon,
kaj malantaŭ vi, lavange,
viaj homoj, kiel via ombr'.
Ĝis la ĉieloj de Iberuj'
vin pafis la buŝoj.
La aero svingis vian nomon
inter flagoj de gloro
—sonora kanto de milit'
kaj malmola kanto de forĝ'—.
Kaj vespero de novembro
malseka de heroa sang',
en cindroj de krepusko
falis vian vivon rompita.
Vi nur parolis ĉi vortojn
jam ĉe via fina horo.
Unuec' kaj firmec' amikoj
por venki vi sufiĉas!
Durruti, frato Durruti,
neniam vidiĝis alia angor'
pli maldolĉan ol via mort'
sur la hispana tero.
Vizaĝoj harditaj de la norda vent'
rompas sian rokmalmolecon;
kiel fragilaj tigoj
ĝis la tero faldiĝas
herkuloj el firma ŝtalo.
Viroj el fero plorĝemas!
Funebraj tamburoj batas
ebenigante la tombofoson.
Durruti mortas, soldatoj,
KE NENIU MALPLIIGU LIAN VERKON!

Oni serĉas manojn etenditajn,
la malamoj disfaliĝas,
kaj en la tranĉeoj profundaj
naskiĝas profundaj realoj
ĉar ĉe la vizaĝ' de la mort'
la neebloj elĉerpiĝas.
—Ĉi tie estas mia dekstra, frat',
malsoifigu vian soifon en mia buŝ',
miksu vian sangon kun la mia
kaj via spir' kun mia raŭka voĉ'.
Dividu kun mi vian panon
kaj viajn larmojn se ploras.
Durruti sub la tero
dume atendas sian dignon.
Muĝas la brustoj frataj,
la armiloj je la aer' kolizias,
super la krudaj kapoj
nur standardo svingiĝas.
DURRUTI MORTAS. MALBENITA
KIU MALPLIIGOS LIAN VERKON!

**Lucía Sánchez Saornil**

# Enhavtabelo

Antaŭparolo....................................................................1
1. Zaragozo....................................................................5
2. Osko....................................................................45
3. Madrido kun registaro....................................................................81
4. Madrido sen registaro....................................................................107
5. Moskvo....................................................................141
6. Barcelono....................................................................169
«Romanco de Durruti»....................................................................205

Organiziĝu

Kleriĝu

Biblioteko
Mateo Morral

Agu

www.bmmorral.org
info@bmmorral.org